

Aŭspiciitaj de

Ĉina Esperanto-Ligo

Japana Esperanto-Instituto

Korea Esperanto-Asocio

Historio por Malfermi Estontecon

Moderna Historio de Ĉinio, Japanio kaj Koreio

Redaktokomitato de la Lernolibro pri
Komuna Historio de Ĉinio, Japanio kaj Koreio

Esperantigita de la Pacamaj Esperantistoj
en Ĉinio, Japanio kaj Koreio



Eldonita de Ĉina Fremdlingva Eldonejo, 2007



Historio por Malfermi la Estontecon

Moderna Historio de la Tri Landoj en Fotoj




Ĉinio troviĝas en la centro sur la "Kunyu-Monda mapo" de Matteo Ricci [Riĉi], kristana misiisto en la 16-a jarcento. (Miyazaki [mijazaki] Gubernia Biblioteko)



En la monda mapo farita en Koreio en la 18-a jarcento, Ĉinio troviĝas centre kaj Koreio dekstre. (Biblioteko de Yeungnam [jeungnam] Universitato, Koreio)




Kun la preteksto de la Yihetuan-Movado en Ĉinio en 1900, 8 potencoj Usono, Britio, Germanio, Rusio, Francio, Japanio, Italio kaj Aŭstrio formis kombinitan trupon, okupis Pekinon kaj premis la Qing-registaron subskribi protokolon. Laŭ la protokolo, Ĉinio devis pagi 450 milionojn da taeloj da arĝento por kompenso, kaj rekoni, ke tiuj landoj konstruu diplomatiajn zonojn protekteblajn per iliaj militaj gardistoj en Pekino. Kaj la Qing-registaro ankaŭ konsentis, ke la potencaj landoj havu rajtojn postenigi soldatojn en diversaj lokoj en Ĉinio. La foto montras la ambasadorojn de 11 landoj en Ĉinio kaj Li Hongzhang (la duan dekstre en la antaŭa vico), la reprezentanton de la Qing-registaro. La dua maldekstre estas Kimura Jutaro, japana reprezentanto.




En 1910, Japanio aneksis Koreion kaj koloniis ĝin. La General-gubernatoro Terauchi [Teraŭĉi] Masatake kaj ĉefministro Li Wan-yong [Li Ŭanjong] subskribis la traktaton.

En 1895, Japanio venkis en la Ĉina-Japana Milito, kaj Taiwan estis cedita al Japanio kaj fariĝis ĝia kolonio. Sed la loĝantaro de Taiwan ne rekonis la pakton kaj vigle kontraŭbatalis dum 5 monatoj. La foto montras la Kontraŭjapanan Monumenton en Enrao, Taiwan.






Venkinte en la Ĉina-Japana Milito (1894-1895), Japanio fortigis sian influon en Koreio. En Koreio, la Sendependiga Asocio movadis por vera sendependiĝo de la nacio kaj reformo. Dongnipmun (Sendependiĝ-Portego) estas konstruita kaj Dongnipsinmun (Sendependiĝa Tagjurnalo) ekeldoniĝis.




Venkinte en la Japana-Rusa milito en 1905, Japanio rapide fortigis sian regadon de Koreio. La popolo formis "civilarmeon" kaj kontraŭbatalis. La foto montras la membrojn de koreaj civilsoldatoj, kiuj estis pafmortigitaj arestitoj de la japana armeo.



Post la anekso de Koreio en 1910, Japanio regis la landon per militpolico. Sed post la Movado de la 1-a de Marto en 1919, la politiko ŝanĝiĝis en "kulturan regadon". Tamen la kontrolo de la ĵurnaloj fariĝis pli forta. La foto montras cenzuritan ĵurnalon kun malplena spaco.



De la Evento de la 18a de Septembro ("Manĉuria Incidento") en 1931, la batalfronto disvastiĝis en la tutan Ĉinion dum la Ĉina-Japana Milito en 1937, kaj Japanio ekengagiĝis en militon kontraŭ Usono kaj Britio. Sub la Tennenoo (imperiestro), kiu komandas la tutan militforton laŭ la konstitucio, la milito estis direktita de la ĉefstabejo. La foto montras la kunsidon de la ĉefstabejo en la ĉeesto de la imperiestro (la centra) en 27 aprilo 1943.



Engaĝiĝinte en la militon kontraŭ Usono kaj Britio, Japanio proponis fondon de "Kunprospera Sfero de la Granda Orientazio". Okupinte multajn landojn dum la Pacifika Milito, Japanio fondis pupregistarojn ĉie. En novembro 1943, Japanio okazigis konferencon por elmontri la ideon de "Kunprospera Sfero de la Granda Orientazio". La foto montras de maldekstre: U Bamaŭ, la ĉefministron de Birmo, Zhang Jinghui, la ĉefministron de la pupa Manĉurio, Wang Jingwei [Ŭangjĵinŭei], la ĉefon de la pupa Nankina Registaro, Toojo [Tojo] Hideki, la ĉefministron de Japanio, Wan Waitayakon, la agantan ĉefministron de Tajlando, la prezidenton Laurel de Filipinoj, kaj Chandra [Ĉandra] Bos, la ĉefon de la Provizora Libera Registaro de Hindio.



Adorkulto al la Tennoa (imperiestra) palaco. En Koreio kaj Taiwan, kiuj farigis kolonioj de Japanio, "japaniga politiko" estis forte plenumata ekde 1940. La celo estis japanigi la loĝantaron en tiuj lokoj kaj kunlaborigi ilin por la milito. En Koreio, ĉiutage kaj ie ajn en tagmezo, oni devis halti kaj salute klini la kapon direkte al Tokio, kie estas la imperiestra palaco.

En la daŭro de la milito, mankis militmaterialoj en Japanio. Pro tio, diversaj hejmaj metalajoj estis perforte forprenitaj. La foto montras koreajn hejmajn metalojn malproprigitajn de japanoj.




La japana registaro postulis, ke la popolo sindone helpu la militadon. La foto montras propagandantojn kiuj instigas la homojn ŝpari monon en ŝparkonto ĉe poŝtoŝefejo.



Memorhalo de Pingding-monta Masakro. Post la okupo de la nordorienta regiono de Ĉinio, la Fushun-karbminejo estis atakata de kontraŭjapanaj gerilanoj en 16 septembro 1932. Por venĝi sin, japana armeo ĉirkaŭis vilaĝojn sur la Monto Pingding, kolektis 3000 vilaĝanojn kaj mortigis ilin ĉiujn per maŝinpafiloj. La ostoj estas konservitaj ĉi tie.



En 1936, japana armeo fondis bakterian trupon en Harbin kaj nomumis Ishii Shiro [Ŝiro] kiel la komandanton. La trupo estis nomata "Manĉuria Trupo 731" kaj oni establis ĝiajn branĉojn en kelkaj lokoj. La Trupo 731 enmetis arestitajn kontraŭjapanajn batalantojn en karceron kaj eksperimentis efikon de bakterioj uzante ilin kaj iliajn kadavrojn. Laŭ la atesto de la eksmembroj de la Trupo 731, almenaŭ 3000 homoj estis eksperimente mortigitaj. La foto montras restaĵon de la kaldronĉambro de la Trupo 731.



La longdaŭra milito finfine finiĝis kaj la Ĉina Popola Respubliko estis fondita en 1 oktobro 1949. La foto montras la gvidanton Mao Zedong kaj liajn samideanojn, kiuj proklamas la fondon de la nova Ĉinio (pentraĵo konservata en la Ĉina Nacia Muzeo).



La 15-jara Azia-Pacifika Milito finiĝis pro la atombomba atako al Hiroŝimo. La foto montras la urbon Hiroŝimo, kiu fariĝis ruino pro la atombombo. Fotita de usonano post la atako.



*La Muzeo de Atombombo en Hiroŝimo, Japanio
(la longa domo malantaŭ la detruita kupolo).*



*Memorhalo de la Ĉina Popola Kontraŭjapana
Rezistmilito.*



Korea Sendependiĝa Memorhalo.

*Malfermi la novan estontecon en Orientazio estas la
tasko de la gejunuloj. La 3-a Historia Kampado de la
tri-landaj gejunuloj, aŭg. 2004.*



Historio por Malfermi la Estontecon

Moderna Historio de
Ĉinio, Japanio kaj Koreio

Redaktokomitato de Lernolibro de
Komuna Historio de Ĉinio, Japanio kaj Koreio

Esperantigita de pacamaj esperantistoj
en Ĉinio, Japanio kaj Koreio

Unua Eldono 2007

ISBN 978-7-119-04842-0

© Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio, 2007

Eldonita de Fremdlingva Eldonejo

24, Baiwanzhuang-strato, Pekino 100037, Ĉinio

Hejmpaĝo: <http://www.flp.com.cn>

Retpoŝto: info@flp.com.cn

sales@flp.com.cn

Distribuata de Distribua Fako de El Popola Ĉinio

24, Baiwanzhuang-strato, Pekino 100037, Ĉinio

P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Retpoŝto: libroservodeepc@163.com

elpc@china.com

Presita en la Ĉina Popola Respubliko

Konstruu Belan Mondon

La terglobo vidita de la spaco estas bela en blua koloro. Nia terglobo estas la nura planedo en la sunsistemo sur kiu loĝas vivantaĵoj. Sur la bela astro, homoj reformis la naturon kaj kreis kulturon. La plej grava forto por homaro evoluigi sian kulturon estas literoj. La memorkapablo de homoj estas limigita, sed dank' al literoj nuna generacio ricevas scion de antaŭa generacio kaj aldonas novan scion.

Sed, homoj ne ĉiam memoras la spertojn de antaŭaj generacioj. Foje oni kaŝas aŭ tute forviŝas la memoron de la pasinteco. Por vivi fiere, oni emas rapide forigi neĝojan pasintecon. Sed atentu: ĉu forigi malĝojan memoron estas ĉiam bone? Ni supozu, ke iu studento falis pro ŝtoneto sur strato, survoje al sia lernejo. Se la studento tute forgesus la aferon, dirante: "Hodiaŭ estas malfeliĉa tago!", eble li/ŝi ankoraŭfoje falus revenvoje de la lernejo, ĉu ne? Kiam ni bone memoras pasintan malbonon, ni povus eviti ripeti la saman eraron. Ni studas historion por malfermi la estontecon, lerninte de la pasinteco.

“La Historio por Malfermi la Estontecon” estas libro pri la moderna historio de Orientazio, speciale pri Ĉinio, Japanio kaj Koreio. La historio de Orientazio en la 19a kaj 20a jarcentoj estas makulita de invadoj, militoj, subpremo de homaj rajtoj, ktp. Sed la pasinteco de Orientazio ne estis ĉiam malluma. Orientazio havas longan tradicion de interŝanĝo kaj amikeco, kaj troviĝas multaj homoj kiuj klopodis por la hela estonteco, transirante landlimojn. Por malfermi pli pacan kaj pli helan estontecon sur la bela terglobo, ni devas heredi pozitivajn aspektojn de la pasinteco, sed devas tutkore memkritiki la erarojn. Por la estonteco de Orientazio, kie paco, demokratio kaj homaj rajtoj estu garantiataj, kion ni povos lerni pere de historio? Ni pripensu pri tio, legante ĉi tiun libron.

Por verki la libron, partoprenis scienculoj, instruistoj kaj civitanoj de Ĉinio, Japanio kaj Koreio. Dum la pasintaj 4 jaroj, ni ofte spertis malsamajn opiniojn rilate al la historio, sed pere de dialogo kaj traktado, ni sukcesis havi komunan historian vidpunkton kaj nun ni eldonas la libron samtempe en la tri landoj. La tri landoj, historie kaj geografie, havas nedisigeblajn interrilatojn. Sur la malgrandiĝanta terglobo, esperante pli bonan komprenon pri historio kaj pli bonajn interrilatojn kun la najbaraj landoj, ni preparis ĉi tiun libron. Ni esperas, ke la gejunuloj de la tri landoj kune solvos la taskojn kiujn la maljunaj generacioj ne povis solvi, kaj malfermos la novan estontecon de Orientazio. Ĉar la libro traktas modernan historion de la tri landoj, foje troviĝas malfacilaj kaj nekompreneblaj partoj. Sed ne malesperiĝu. La klopodado mem por kompreni unu la alian jam donas helan estontecon de ne nur Orientazio sed ankaŭ la tuta mondo.

Majo 2005

*La Redaktokomitato de Lernolibro
de Komuna Historio de Ĉinio, Japanio kaj Koreio*

Instruo de Historio

La plej grava tragedio en la historio de tragedio estas ne la tragedio mem, sed forgesi la historion de la tragedio.

Historio evoluas senhalte. Por evoluigi historion en la direkto dezirinda por la tuta homaro, ni devas lerni la instruon de la pasinta historio. Niaj prapatroj ne povas esti ĉiam ĝustaj. Ili ankaŭ povus esti eraraj kion iliaj praidoj ne devas ripeti. Historio instruas al ni kion niaj praidoj devas lerni de ni, kaj kion ili ne devas ripeti.

Historiaj faktoj estas realoj, kaj nek kaŝeblaj, nek distordeblaj. Sed oni povas intence rigardi nur la ŝatatajn flankojn de la historiaj faktoj, aŭ oni povas rigardi la tutan historian faktaron senkaŝe kaj objektive. Por rigardi la tutan faktaron de historio objektive, ne lasante malplaĉajn partojn en la pasinta historio, oni bezonas kuraĝon. Unu el la kuraĝuloj estas d-ro Hasumi Shigehiko [Ŝigehiko], prezidanto de la Tokia Universitato, kiu emfazis, ĉe la diplomiĝa ceremonio en marto 2001, "Eĉ se la nuna generacio ne rekte kulpas, ni devas esti respondecaj pri la pasinteco... la distordo de la pasinta historio rilate al Koreio (kaj ankaŭ Ĉinio), kun kiu ni devas alfronti la estontecon komune, eble alportus al ni malgrandan memkontenton sed ne la kuraĝon alfronti la estontecon".

Pro la geografia proksimeco, Ĉinio, Japanio kaj Koreio ofte interrilatadis historie, kaj pro tio foje konfliktoj okazis inter la tri landoj. Por paca kaj harmonia kunvivado, ni bezonas historion komunan al la tri landoj. Sed la ĝisnunaj lernolibroj de historio eldonitaj de la respektivaj landaj aŭtoritatoj estis skribitaj surbaze de nacia intereso, kaj multaj historiaj eventoj estas interkontestitaj.

Pro tio, 42 pacamaj historiistoj en la tri landoj (17 ĉinoj, 13 japanoj, 12 koreoj), nome de la Redaktokomitato de Lernolibro de Komuna Historio de Ĉinio, Japanio kaj Koreio, eldonis "Historio por Malfermi la Estontecon — Moderna Historio de Ĉinio, Japanio kaj Koreio", en 3 lingvoj (la ĉina, japana, korea) en 2005. Ĉar la libro estas pri "komuna historio", ĝi devas esti skribita en neŭtrale komuna lingvo, por ke ĝi estu vera "komuna historia lernolibro".

Por helpi malfermi komunan kaj harmonian estontecon, kaj ankaŭ por montri la utilecon de Esperanto por tia komuna projekto, pacamaj esperantistoj en Ĉinio, Japanio kaj Koreio volontule partoprenis en traduko, redakto kaj eldono de ĉi tiu Esperanto-versio de la libro.

La libro havas tri notindajn punktojn. Unue, la libro estas skribita por paco kaj kontraŭ milito. Due, la libro estas skribita surbaze de internacia justeco kaj egaleco. Trie, la libro estas skribita el la vidpunkto de la popolo. Pro tio eble ne ĉiuj legantoj konsentus la priskribon de la historiaj faktoj.

Malgraŭ tio, la Esperanto-asocioj de la tri landoj (Ĉina Esperanto-Ligo, Japana Esperanto-Instituto, Korea Esperanto-Asocio) aŭspiciis la kunlaboradon por traduki

kaj eldoni la Esperanto-version. La Komitato de Universala Esperanto-Asocio oficiale decidis subteni la projekton.

Entute 44 pacamaj esperantistoj (11 el Ĉinio, 22 el Japanio, 11 el Koreio) dediĉis siajn tempon kaj talenton al la tradukado kaj redaktado. (Vidu "Liston de kontribuintoj por tradukado kaj redaktado" en la fino de la libro). Ĉiu landa tradukado estis kunordigita de Yu Tao (Ĉinio), Satoo Morio (Japanio) kaj Lee Chong-Yeong (Koreio), kaj la tuta teksto estis kunmetita kaj kontrolita ĉefe de Lee Chong-Yeong kaj Satoo Morio. S-ro Robert Moerbeek, la profesia korektisto ĉe UEA, tralegis la tuton kaj korektis.

La Fremdlingva Eldonejo, Ĉinio, profesie paĝaranĝis kaj eldonis la libron. D-ro Kobayashi Tsukasa kaj s-ino Syozi Keiko (reprezentante Esperantistan Grupon de la bilddokumento, "Hirosima-Nagasaki") kaj multaj aliaj donacis grandan sumon por eldoni la libron. Multaj pacamaj esperantistoj montris sian subtenon al la projekto, antaŭmendinte la libron. La Redaktokomitato de Lernolibro de Komuna Historio de Ĉinio, Japanio kaj Koreio senpage donacis la kopirajton de la libro. Ili ĉiuj meritas varmegan aplaŭdon de la tuta pacama esperantistaro.

Sed se ankoraŭ troviĝas eraroj, ni kulpas.

Ni esperas, ke ĉi tiu libro montros la praktikan utilecon de Esperanto, kaj ankaŭ kontribuos por "malfermi helan estontecon", speciale inter la gejunuloj en Orientazio.

Januaro 2007

Pacamaj esperantistoj en
Ĉinio, Japanio kaj Koreio

Enhavo

Enkonduka Ĉapitro	La Tri Landoj antaŭ la Malfermo	19
Subĉapitro E-1	Interrilatoj de la Tri Landoj	20
	Peco de Historio:	
	Kiel oni vidis la mondon?	22
	“Drivuloj” inter la tri landoj	23
Subĉapitro E-2	Interna Situacio en la Tri Landoj	24
	1. Japanio — Samurajoj kaj Plebanoj	24
	2. Koreio — Yangban kaj Plebanoj	26
	3. Ĉinio — Ĝentlemanoj kaj Plebanoj	28
	Peco de Historio:	
	La ĉefurboj de la tri landoj	30
	Konfuceanismo kaj la tri landoj	31
Ĉapitro I	Malfermo kaj Moderniĝo	33
Enkonduko		33
Subĉapitro I-1	La Premo de Eŭropaj Potencoj kaj la Reagoj de la Tri Landoj	34
	1. Ĉinio — La Opia Milito kaj Okcidentiga Movado	34
	2. Japanio — Malfermo kaj Meiji-Restaŭro	36
	3. Koreio — Konfliktoj Rilate Malfermon	38
	Peco de Historio:	
	Malfermitaj havenoj en la tri landoj	40
	La Tennoa sistemo de la moderna Japanio	41
Subĉapitro I-2	Militoj Englutis Orientazion	42
	1. Konfliktoj inter la Tri Landoj	42
	2. Ĉina-Japana Milito	44
	3. Japana-Rusa Milito	46
	Peco de Historio:	
	Fukuzawa Yukichi	48
	Kim Ok-Gyun	49
	Li Hongzhang	49
Subĉapitro I-3	La Reformada Movado en la Tri Landoj	50
	1. Japanio — la Movado por Libereco kaj Popolaj Rajtoj	50
	2. Ĉinio — la Reformado de la Qing-Dinastio kaj Yihetuan-Movado	52
	3. Koreio — la Terkulturista Milito kaj la Sendependiga Movado	54

	Peco de Historio:	
	Nakae Chomin	56
	Kang Youwei	56
	Gvidantoj de la Donghak terkulturista milito	57
Subĉapitro I-4	Vivo kaj Kulturo de la Popoloj en la Tri Landoj	58
	1. Ŝanĝiĝo de la Korea Socio kaj la Popolo	58
	2. Ŝanĝiĝo de la Ĉina Socio kaj la Popolo	62
	3. Ŝanĝiĝo de la Japana Socio kaj la Popolo	66
	Peco de Historio:	
	Ĉinaj literoj en la moderna historio	70
	Resumo	72
Ĉapitro II	Ekspansio de la Japana Imperiismo kaj la Rezistado de Ĉinio kaj Koreio	73
Enkonduko		73
Subĉapitro II-1	La Tri Landoj ĉirkaŭ la Unua Mondmilito	74
	1. Japana Aneksio de Koreio kaj Rezistado de Koreoj	74
	2. Japana Kolonia Regado de Taiwan	76
	3. La Revolucio de 1911 kaj Fondiĝo de la Ĉina Respubliko	78
	4. La Unua Mondmilito kaj la Japana Imperiismo	80
	Peco de Historio:	
	Kontraŭjapana Armita Batalo de Taiwan-a Popolo	82
	Ahn Jung-Geun kaj Ito Hirobumi	82
	Ĉu Japanio perforte okupaciis aŭ laŭleĝe aneksis Koreion?	83
Subĉapitro II-2	La Intensigo de la Japana Regado de Koreio	84
	1. Militpolica Regado	84
	2. La Realo de "la Kultura Politiko"	86
	3. Ekonomia Politiko kaj Uzurpado	88
	4. Eduka kaj Kultura Politiko	90
	Peco de Historio:	
	Kontroli la fervojon	92
	Orienta Koloniada Kompanio	93
Subĉapitro II-3	Sendependiga kaj Rezista Movado kaj Socia Movado	94
	1. La Movado de la Unua de Marto	94
	2. La Movado de la Kvara de Majo	96
	3. Socia Movado en la Tri Landoj.....	98
	4. Granda Tertremo de Kantoo kaj Masakro de Koreoj kaj Ĉinoj	100
	Peco de Historio:	
	Shin Chae-Ho	102
	Fuse Tatsuji	102

	Li Dazhao	103
	Chen Tiejun	104
	Chung Jong-Myeong	104
	Kaneko Fumiko	105
Subĉapitro II-4	Ŝanĝiĝo de Socio kaj Kulturo	106
	1. Ŝanĝiĝo de la Koreaj Socio kaj Kulturo	106
	2. Ŝanĝiĝo de la Ĉinaj Socio kaj Kulturo	110
	3. Ŝanĝiĝo de la Japanaj Socio kaj Kulturo	114
	Peco de Historio:	
	Okcidentigo kaj ŝanĝiĝo de la virina vivo	118
	Resumo	120
Ĉapitro III	Invadmilito kaj la Damaĝo al la Popolo	121
Enkonduko		121
Subĉapitro III-1	Japana Invado en la Nordorientan Regionon de Ĉinio	122
	1. La Evento de la 18-a de Septembro	122
	2. Naskiĝo de la "Manĉuria Respubliko", la Pupa Reĝimo	124
	3. Socio kaj Ekonomio de "Manĉurio"	126
	4. Unuiĝinta Rezistado de la Ĉinaj kaj Koreaj Popolanoj	128
	Peco de Historio:	
	Zhang Hanhui kaj la kontraŭjapana kanto "Ĉe Songhua-Rivero"	130
	Yun Bong-Gil: Heroa ago en Ŝanhajo	131
Subĉapitro III-2	Japana Invadmilito	132
	1. Ĉina-Japana Totala Milito	132
	2. Azia-Pacifika Milito	134
	3. Iluzio de "Kunprospera Sfero de la Granda Orientazio"	136
	4. Tutforta Militsistemo	138
	Peco de Historio:	
	Gvido de la milito fare de la Showa-Tennoo	140
	La milito en propagandaj folioj	141
Subĉapitro III-3	La Kruela Agado al la Ĉina Popolo Fare de Japana Armeo	142
	1. Popolanoj kaj Rifuĝintoj en Batalkampoj	142
	2. Masakro en Nankino	144
	3. Sendistinga Bombado, Tri-neniiga Operaco kaj Starigo de Senhoma Zono	146
	4. Bakteria Milito, Gasmilito kaj Homkorpa Eksperimentado	148
	5. Seksa Perfortado de Japanaj Soldatoj	150
	Peco de Historio:	
	Feng Yiping: Atesto pri perforta laborado	152
	Atesto de eksa japana soldato	152

Subĉapitro III-4	Koreio kiel Militbazo kaj la Damaĝo al la Popolo	154
	1. Japaniga Politiko	154
	2. Milita Industrio en la Milittempo	156
	3. Mobilizado de Milita Materialo	158
	4. Mobilizado de Homforto	160
	5. Koreaj Virinoj Forprenitaj kiel la Japanarmeaj Konsolvirinoj	162
	Peco de Historio:	
	"Porjapaniulo" kaj naciperfidulo	164
	Avino Kang Duk-Kyung, kiu denunciis la damaĝon de la konsolvirinoj	165
Subĉapitro III-5	Damaĝo kaj Damaĝiĝo de la Japania Popolo	166
	1. Dumilita Ĝenerala Tutmobilizado kaj Kunlaboro de la Popolo por Milito	166
	2. La Vivo kaj Rezistado de Popolo	168
	3. Granda Aeratako al Tokio kaj Aliaj Urboj	170
	4. Batalo en Okinavo	172
	5. Atombombo al Hiroŝimo kaj Nagasako	174
	Peco de Historio:	
	Kamikaze: Atakoaviadiltrupo kaj junaj studentoj	176
	La japana totala milito kaj virinoj	177
Subĉapitro III-6	Malsukceso de la Japania Invadmilito	178
	1. Kontraŭjapana Milito Fare de Ĉinio	178
	2. Rezistado de Koreoj kaj Preparado por Nacia Sendependiĝo	180
	3. Rezistado de la Popolo en la Okupita Sudorienta Azio	182
	4. Venko en la Kontraŭfaŝisma Milito kaj Japania Kapitulaco	184
	Peco de Historio:	
	Provizora Registaro de la Korea Respubliko	186
	Kontraŭmilita Ligo de Japanaj Soldatoj	187
	Resumo	188
Ĉapitro IV	Orientazio post la Dua Mondmilito	189
Enkonduko		189
Subĉapitro IV-1	Nova Komenco de la Tri Landoj	190
	1. Malvenko de Japanio kaj Postmilita Reformado	190
	2. Liberiĝo kaj Dividiĝo de Koreio	192
	3. Fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko	194
	Peco de Historio:	
	Du vizaĝoj de D. MacArthur	196
	Fora patrujo	197
Subĉapitro IV-2	"Likvido de la Pasinteco" de Japanio	198

	1. La Tokia Juĝado	198
	2. La Sanfranciska Pacpakto kaj la Problemo de Kompenso	200
	3. Sociaj Problemoj, Postlasitaj de la Kolonia Regado kaj la Milito	202
	Peco de Historio:	
	Aliaj militaj tribunaloj	204
	Internacia komparo de la postmilita kompenso	205
Subĉapitro IV-3	Dividiĝo de Orientazio kaj Normaligo de Diplomatiaj Rilatoj	206
	1. Malvarma Milito de Orientazio kaj la Korea Milito	206
	2. Normaligo de Diplomatiaj Rilatoj inter Koreio kaj Japanio	208
	3. Normaligo de Diplomatiaj Rilatoj inter Ĉinio kaj Japanio	210
	4. Establo de Diplomatiaj Rilatoj inter Ĉinio kaj Koreio	212
	Peco de Historio:	
	Batalo por la rajtoj de la koreoj en Japanio	214
	Japanoj revenintaj el Ĉinio	215
	Resumo	216
Fina Ĉapitro	Taskoj por Paco en Orientazio en la 21a Jarcento	217
Enkonduko		217
	1. Kompenso al la Forlasitaj Homoj	218
	2. Japanarmejaj Konsolvirinoj kaj la Virinaj Homaj Rajtoj	220
	3. Lernolibro de Historio	222
	4. La Demando pri la Ŝintoisma Sanktejo Yasukuni	224
	Peco de Historio:	
	Ienaga Saburoo, kiu lanĉis proceson kontraŭ la malaprobo de lernolibro	226
	Milito kaj muzeoj	227
	Civila Virina Internacia Tribunalo pri Militkrimoj	229
	5. Interŝanĝo de Gejunuloj de la Tri Landoj en Orientazio	230
	6. Kontraŭmilita Pacmovado kaj Civila Movado	232
	7. Por Repacigo kaj Paco en Orientazio	234
	Postskribo	236
	Kronika Tabelo de la Moderna Historio de Ĉinio, Japanio, Koreio kaj la Mondo	238
	Listo de la Kontribuintoj por Tradukado kaj Redaktado	241
	Divido de la Traduktasko inter Ĉinio (Ĉ), Japanio (J), Koreio (K)	242
	Financaj Kontribuintoj	247

Enkonduka Ĉapitro

La Tri Landoj antaŭ la Malfermo


Interrilatoj de la Tri Landoj

Ĉiu el la tri landoj — Ĉinio, Japanio, Koreio — havas sian propran tradicion kaj kulturon. La loĝantaroj de la tri landoj de longe kunvivis kiel najbaroj. Sed foje ili kverelis kaj militis. Nun ni vidu kiel la tri landoj interrilitis antaŭ la invado de eŭropaj landoj per armiloj.

Interrilatoj de la tri landoj

Inter Ĉinio, Japanio kaj Koreio antaŭ la modernigo, ekzistis aktivaj interrilatoj pere de oficialaj diplomaciaj kanaloj kaj civitanaj interrilatoj. La diplomaciaj rilatoj inter Ĉinio kaj ĝiaj najbaraj landoj estis nomataj "tributa rilato". Kiam najbara lando sendis sian ambasadoron kaj oferis tributon, Ĉinio rekonis la dignon de la lando de la sendinto kaj sendis reciprokaĵon. Ĉinio ne intervenis en la internan administradon kaj la diplomation de tiu lando. Ekde la lasta duono de la 16-a jarcento, Ĉinio kaj Japanio ne havis oficialajn diplomaciajn rilatojn sed kontaktis ĉefe pere de komerco. En tiu kadro, la tri landoj (Ĉinio, Japanio, Koreio) tenadis ĝiajn intimajn rilatojn.

Invado de japana Toyotomi-Reĝimo al la Korea Duoninsulo kaj delegitoj



En Japanio en la fino de la 16-a jarcento, Toyotomi Hideyoshi finis la longdaŭran militon kaj prenis la povon. Tiam regis "Ming" en Ĉinio kaj "Chosun" en la korea duoninsulo.

Kun la celo konkeri la ĉinan kontinenton, Toyotomi Hideyoshi dufoje invadis Chosun (Koreion). Sed la invado de Japanio ne sukcesis pro la rezistado de la korea popolo kaj la kontraŭatako de la korea mararmeo. Ankaŭ la helptrupo de Ming kontribuis por forpeli japanan armeon el Chosun. Post la morto de Toyotomi Hideyoshi, Japanio kaj Koreio ree establis diplomatajn rilatojn.

La du landoj interŝanĝis delegitojn. La delegito de Koreio al Japanio estis nomata "Chosun-delegito". La delegito kontribuis politikan efikon por altigi la aŭtoritaton de la Edo-registaro.

Ŝanĝo en Ĉinio kaj reago de Koreio

En la nordorienta regiono de Ĉinio, la Nüzhen-nacio, la antaŭulo de Manĉur-nacio, pli kaj pli gajnis povon kaj fondis la ŝtaton "Houjin". La armeo de Houjin komencis militon kontraŭ Ming kaj samtempe invadis Koreion. Pro tio la korea popolo multe suferis. Qing, kiu anstataŭis Houjin, sukcesis regi la tutan Ĉinion. Sed Koreio konsideris sian rilaton kun Ming pli grava, kaj kelkaj eĉ proponis ekspedicion al la nordo por puni Qing.


Interŝanĝo pere de komerco

La Edo-registaro en Japanio unue ekspansiigis internacian komercon. Sed kiam la influo de la kristanismo grandiĝis, ĝi limigis kontaktojn kun alilandanoj. Ekde 1641, nur nederlandanoj kaj ĉinoj estis permesitaj komerci en Nagasako.

Koreio establis "japanan blokon" en Busan kaj pere de ĝi kontinuis komercon kun Japanio. En la japana bloko loĝis la funkciuloj de la Tsushima-provinco kaj komercistoj.

Ekde la mezo de la 17-a jarcento, Koreio komercis kun Qing en Pekino, ĝia ĉefurbo, kaj apud la landlimo. Unue, la Qing-registaro malpermesis internacian komercon por preventi koluzion de interna kaj ekstera povoj. Sed kiam la interna politika situacio stabiliĝis, internacia komerco estis permesita kaj ĝi vigliĝis.

En la posta duono de la 18-a jarcento eŭropaj potencoj pli kaj pli premis Azion, sed kontraŭ la movo, la tri landoj rifuzis internacian komercon. La internacia komerco estis limige permesita en Kantono, Ĉinio, sed aliaj havenoj estis fermitaj.



La urbestro de Dongrae akceptas japanan ambasadon. En la "japana bloko" estis oficejoj, loĝdomoj, vendejoj kaj provizejoj. Japanaj komercistoj povis komerci nur en la japana bloko, kaj koreoj sen permeso ne povis eniri en la japanan blokon.

Peco de Historio

Kiel oni vidis la mondon?

La mapoj de la tri landoj

De antikva tempo, la orientazianoj pensis ke Ĉinio estas en la centro de la mondo kaj la malpli civilizitaj landoj troviĝas ĉirkaŭ ĝi. Ankaŭ Koreio kaj Japanio akceptis tiun vidpunkton. Sed aliflanke, ili pensis, ke ili mem estas simile civilizitaj, kaj ili faris mapon montrante detalojn de iliaj landoj.



En la 15-a jarcento, la Korea dinastio faris tre detalan mapon. "Honilganri-Landmapo" montras la grandan Ĉinion en la centro, la Korean Duoninsulon kaj Japanion dekstre, kaj Arabion, Afrikon kaj Eŭropon maldekstre. Koreio importis tiamajn mapojn el Ĉinio kaj Japanio, kaj desegnis sian propran.

En Japanio, post la enkonduko de budhismo, oni opiniis, ke la mondo konsistas el Japanio, Ĉinio kaj Hindio. Pro tio, en la mapo ili montris Hindion en la centro kaj Ĉinion kaj Japanion apud Hindio. En la lasta duono de la 16-a jarcento, ili interkomunikadis kun hispanoj kaj portugaloj kaj importis novan mapon de la mondo el Eŭropo.

Grava ŝanĝo okazis al la monda mapo farita de la orientaziaj landoj, kiam Matteo Ricci, kristana misiisto, vizitis Ĉinion fine de la 16-a jarcento kaj desegnis novan mapon nomatan "Kunyu-Monda mapo". La mondo sur la mapo estas en elipso kaj dividita en kvin kontinentojn: Eŭropo, Libio (Afriko), Azio, Ameriko, kaj Maĵeraniko (ĉirkaŭ la suda poluso). La reviziita mapo montris Ĉinion en la centro malsame ol la originala specimeno de la eŭropa, kaj estis facile akceptita de la azianoj kiuj kutimiĝis al la ideo ke Ĉinio estas la centro. La nomoj de lokoj sur la mapo estis skribitaj en ĉinaj ideografiaĵoj, kaj faciligis akcepton de lokaj popoloj. Unuafoje, Azio kaj Eŭropo estis skribitaj en ĉinaj ideografiaĵoj.

Maldekstre: Kunyu-Monda mapo

Dekstre: Honilganri-Landmapo



La Kunyu-Monda mapo estis akirita de Koreio kaj Japanio kaj multaj mapoj estis desegnitaj surbaze de la Kunyu-mapo. En la lasta duono de la 17-a jarcento, kristana misiisto Bervist en Ĉinio desegnis novan "Kunyu-Mondan mapon", kiu montris la mondon per du cirkloj, okcidento kaj oriento. Poste ankaŭ la mondaj mapoj desegnitaj en Japanio kaj Koreio estis en elipso, kaj montris la mondon per du cirkloj, oriento kaj okcidento.

Sed en Koreio estis homoj kiuj kontraŭis la eŭropstilan mondan mapon kaj ree emfazis la tradician vidpunkton. Ĝi estis la "Ronda Monda Mapo". Sur la mapo, Ĉinio troviĝas en la centro, Koreio apud ĝi kaj aliaj landoj en diversaj lokoj. La mapo estis populara ĝis la 19-a jarcento.

En Japanio, eĉ dum la fermita periodo, la komercado kun Nederlando kontinuus kaj novaj mapoj el Eŭropo estis importitaj. Komence de la 19-a jarcento, "Reviziita Monda Mapo" estis desegnita. Oni reviziis novan mondmapon desegnititan de brito konsiderinte la scion gajnitan el esplorado de Saĥaleno. Ĝi estas la unua mapo en la mondo kiu montris Saĥalenon kiel insulon.

Tiel orientazianoj klopodis montri per mapoj la regionojn kaj la landojn en la mondo.

"Drivuloj" inter la tri landoj

Estis homoj, kiuj kontraŭvole hazarde aldrivis al alia lando pro marakcidentoj. Oni nomis ilin "drivuloj". La dekstra bildo estas desegnita de iu japano, kaj ĝi montras 12 koreojn, kiuj aldrivis al japana marbordo komence de la 19a jarcento.

Oni konstatis, ke preskaŭ 10,000 koreoj aldrivis al Japanio dum 270 jaroj post la fino de la 16a jarcento. Aliflanke ankaŭ japanoj aldrivis al Koreio. Estis ankaŭ aldrivintoj de Ĉinio al Japanio, kaj inter Ĉinio kaj Koreio.

Tiuj drivuloj estis resenditaj al siaj hejmlandoj laŭ internacia kontrakto. Ankaŭ la 12 koreoj en ĉi tiu desegnaĵo revenis Koreion.

Antaŭ la moderna epoko estis tiaj "interpopolaj kontaktoj" pere de drivuloj inter Japanio, Koreio kaj Ĉinio.



Desegnaĵo de aldrivintaj koreoj

Dankletero de la kapitano de korea ŝipo al la Totori Gubernio (Shimane-Gubernia Biblioteko)

La Ronda Monda Mapo

Interna Situacio en la Tri Landoj


1. Japanio — Samurajoj kaj Plebanoj

Kia estis Japanio antaŭ la minacoj el Eŭropo kaj Usono? Ni lernu pri la politiko, ekonomio kaj socio de Japanio ekde la 17a jarcento ĝis la mezo de la 19a jarcento.

Politika centro kaj landlimo

La mapo montras Japanion antaŭ la malfermo de havenoj kun la ĉirkaŭaĵo. La politika centro estis en Edo (nuna Tokio), kie sidis ŝoguno (regnestro) el familio Tokugawa, kaj la registaro nomata Bakufu regis la tutan landon. Aliflanke sidis Tennoo (imperiestro) en Kioto, kiu estis de longe la ĉefurbo de Japanio. Tamen jam de longe Tennoo perdis sian politikan potencon.

La plej norda insulo de la mapo estas la nuna Hokkaido. Tiam ĝi estis nomata Ezo-lando, kie loĝis ainoj, minoritata popolo. Aliflanke en Okinavo troviĝis alia lando, nomata Ryukyu-reĝlando. La ŝoguno regis de Matsumae en nordo ĝis Kagoshima en sudo (inkluzive la insularon Amami).




Strukturo de la regado

La lando konsistis el du partoj, kies unuan parton rekte regis la ŝoguno, kaj la alian, dividitan en ĉirkaŭ 260 teritorioj, regis daimioj (feŭdestroj). La ŝoguno garantiis teritorion al ĉiu daimio, kiu tenis vasalojn nomatajn samurajoj, kaj regis la popolon posedante potencon pri politiko, juro, ekonomio k.a. en sia teritorio.

Okdek elcentoj de la loĝantaro estis kamparanoj, kiuj loĝis en vilaĝoj. La socia bazo estis agrikultura produktado de la kamparanoj. La ŝoguno kaj daimioj administris la politikon kaj socion laŭ la tributo (jara imposto) el la kamparanoj. Samurajoj vivtenis sin per tiu tributo. Ŝoguno kaj daimioj ŝanĝis tributitan rizon al

mono, kaj aĉetis necesajojn por sin vivteni. En urboj loĝis ne nur samurajoj, sed ankaŭ komercistoj kaj metiistoj.

La samurajoj kaj la ordinara popolo apartenis respektive al klare dividitaj malsamaj klasoj. Nur la samurajoj rajtis havi sian familian nomon kaj porti glavon ĉe la kokso. Samurajo kaj aliklasano principe ne rajtis intergeedziĝi. Ili loĝis aparte en ĵute aliaj vivstiloj.



Skuiĝis la socia bazo

Kampanaroj klopode plibonigis agrikulturan teknikon por altigi la produktivecon. Disvastiĝis ankaŭ tiaj komercaj plantoj por vendi, kiel koton, kolzo kaj tabako. Aliflanke populariĝis produktado de alkoholaĵoj, sojsaŭco, papero k.a. En la lasta duono de la 18a jarcento aperis potencaj komercistoj kaj kampanaroj, kiuj pruntedonis materialon kaj monon al aliaj kampanaroj por produkti komercaĵojn, aŭ dungis kaj laborigis homojn en fabrikoj.

Aliflanke la financo de la ŝoguno kaj daimioj malboniĝis iom post iom laŭ la ekonomia evoluo kaj plialtiĝo de ilia vivnivelo. Rezulte de tio daimioj aŭ plialtigis la tributon aŭ prunteprenis monon el grandaj komercistoj. Post la mezo de la 18a jarcento la ŝoguno kaj daimioj provis diversajn reformojn por rebonigi la financon, sed ili plejofte malsukcesis.

Ankaŭ multaj kampanaroj perdis sian kampon, ĉar ili ne povis pagi ŝuldon. Aldone daimioj plialtigis la tributon, kaj finfine kampanaroj ribelis en diversaj lokoj por amase postuli malaltigon de la tributo. La nombro de la ribeloj fariĝis pli kaj pli granda post la mezo de la 18a jarcento. Kampanaroj el diversaj vilaĝoj komencis agadi komune en pli vasta sfero.

Tiel skuiĝis la socia bazo de Japanio. Tiam, ekde la fino de la 18a jarcento, ankaŭ eŭropaj landoj kaj Usono ekminacis Japanion, postulante malfermon de la lando. Tiel Japanio komencis skuegiĝi pro kaj enlandaj kaj eksterlandaj kialoj.

Sceno en teksejo en la komenco de la 19a jarcento. Tiam aperis nova produktmetodo: dungi kampanarojn por dividitaj laboroj en fabriko. Multaj virinoj teksis teksaĵon. (el Famaj Scenoj en Owari)

2. Koreio — Yangban kaj Plebanoj

En la dua duono de la 19-a jarcento, en Koreio la dinastio Chosun komencis starigi diplomatiajn rilatojn kun okcidentaj potencaj landoj. Kia estis Chosun tiutempe?

Yangban-centra Socio


La dinastio Chosun starigis Hanyang kiel sian ĉefurbon, dividis la tutan landon en 8 provincojn por administri, kaj sendis ŝtatoficistojn nomumitajn de la reĝo.

La socia klaso konsistis el la reganta klaso — yangban, la meza klaso — teknikistoj kaj administrantoj, kaj la regata klaso — plebanoj kaj servistoj.

Yangban konsistas el la nobelaroj civilaj kaj militaj, kiuj respondecis respektive pri administrado kaj militaj aferoj en Seulo kaj aliaj urboj.

Por fariĝi ŝtatoficistoj oni devis sukcesi en ŝtat-ekzameno. Yangban estis magnatoj, kiuj havis multajn bienojn en diversaj lokoj, servistojn, kaj potencon super plebanoj, kaj ĝi estis statuso, kiu monopolis registaran postenon de generacio al generacio. Dume, la

popolanoj devis pagi diversajn impostojn, plenumi la devon de nacia defendo kaj estis devigitaj al konstruadoj.



Mapo de Chosun
(Koreio)

Ŝanĝiĝo de la socio

Plejparto de la plebanoj en la dinastio Chosun okupiĝis pri agrikulturaj aferoj en kamparo, sed parto el ili pri la aferoj komercaj kaj industriaj. La agrikulturistoj estis en du specoj: unuj estis la posedantoj de propraj agroj, la aliaj estis farmistoj. En la dua duono de la 17-a jarcento, la manieroj de agrikulturado multe progresis kaj grandiĝis la produkta kvanto. Dank' al tio, la komerco kaj industrio fariĝis tre viglaj, kaj legomoj, ginsengoj, tabako kaj aliaj komercaj produktoj


estis kultivataj, kaj ankaŭ la metioj vigle progresis. La regulaj bazaroj, kiuj estis malfermitaj en ĉiu kvina tago aŭ sepa tago, disvastiĝis en la tutan landon, kaj la nombro atingis pli ol 1000. En la centro de komerco kaj trafiko aperis gastejoj, kaj en Seulo kaj en aliaj lokaj urboj pli kaj pli multiĝis la vendejoj. La loĝantaro de Seulo en la 18-a jarcento estis pli ol 300 mil.

Parto de la kamparanoj kaj komercistoj fariĝis riĉaj utiligante la ekonomian ŝanĝiĝon. Iuj eĉ aĉetis la postenojn de yangban, tial la nombro de yangbanoj grandiĝis. Rezulte de tio, la koncepto de la ordo de socia statuso malfortiĝis, kaj la ekonomia forto okupis gravan lokon en la socio, estante ne malsupera al la statuso.

Popola postulo pri reformo

Enire en la 19-an jarcenton, la politika disciplino ekfalis, kaj pro la monopollo pri potenco far kelkaj nobelaj familioj furoris la vendado de oficialaj postenoj, kaj la socia korupto fariĝis pli serioza tagon post tago. La popolanoj ne povis elteni plu kaj deziris la ŝanĝiĝon de la socio. La popolo protestis al lokaj ŝtatoficejoj, postulante justan kolekton de imposto kaj prohibicion de neleĝa uzurpo. Je la malakcepto de ilia propono, popolanoj provokis popolan leviĝon en diversaj lokoj. En 1811~1812 en la nordokcidenta parto de Koreio okazis grandskala popolleviĝo. En la jaro 1862, en ĉiuj anguloj de la tuta lando okazis popolleviĝoj. La popolleviĝo tiutempa okazis en unu vilaĝo, kaj poste disvastiĝis al najbaraj vilaĝoj. Tio bone pruvis, kiel forte la kamparanoj deziris reformon.

Ŝanĝo de statuso-
klaso (Regiono Taegu)



3. Ĉinio — Gentlemanoj kaj Plebanoj

Antaŭ la 19-a jarcento Ĉinio praktikis la politikon de nacia pordofermo kaj izolismo. Kiaj estis ĝiaj socia strukturo kaj popola vivo antaŭ la enmudiĝo de okcidentaj potencoj en Ĉinion?



Ŝtatoficistoj en
mandarena kostumo

Regado de la Qing-dinastio

Dum la pli ol 200 jaroj de 1644 ĝis 1911 Ĉinio vivis sub regado de la Qing-dinastio. Qing estis la lasta feŭda dinastio de Ĉinio. Tiam la lando konsistis el 25 provinc-nivelaj administraj unuoj, kaj manĉuraj aristokratoj ĉiam okupis gravajn postenojn en la centra kaj lokaj registaroj, dum la hanaj kaj alietnaj intelektuloj povis akiri lokon en la burokrata sistemo pere de ŝtata ekzameno. La sociaj rangoj en la Qing-dinastio estis klare distingitaj. La imperiestro, liaj familianoj, la nobelaro, burokratoj kaj riĉaj intelektuloj apartenis al la supera tavolo de la socio, dum la komercistoj, metiistoj, kamparanoj kaj aliaj plebanoj vivis sur la socia fundo, tial la socia strukturo aspektis kiel piramido.

La lasta duono de la 17-a jarcento kaj la tuta 18-a jarcento estis prospera periodo de la Qing-dinastio. Oni nomis ĝin la pospera periodo de la eraoj Kanxi [kangŝi] kaj Qianlong [Ĉianlong], tamen pro la koloseco de la reganta strukturo kaj la korupteco de la burokratoj la registara elspezo estis grandega, la enspezo ne povis kovri la elspezon, tial la registaro energie elpemis riĉaĵojn el la popoloj de la socia fundo kaj eĉ vendis diversajn ŝtatoficojn por ŝtopi la breĉon de la financado, kio pliseriozigis la koruptiĝon. Tiam cirkulis popoldiro: “En 3-jara oficado de prefekto, oni gajnas cent mil taelojn da arĝento.” Pro tro peza impostado la sociaj kontraŭdiroj fariĝis pli kaj pli akraj.

Popola vivo

En la komenca periodo de la Qing-dinastio la registaro per siaj fortoj popularigis la manĉurajn kostumojn kaj etiketon kaj postulis, ke la viroj portu harplektaĵojn. Tiam la socia pozicio de la manĉuroj estis pli alta ol tiu de la hanoj. La registaro alprenis serion



Virino en ŝpinado, hejme

da pozitivaj ekonomiaj rimedoj. Tiam la popola vivo estis relative stabila, kaj la loĝantaro kreskis. En la 100 jaroj de 1741 ĝis 1840 la tutlanda loĝantaro triobliĝis kaj atingis 410 milionojn, kies plejparto vivis en la kamparo kaj okupis sin pri terkulturado kaj metiado. Sed kun la polarizo de la socia riĉeco, la agroj iom post iom estis kaptitaj de la burokratoj, aristokratoj kaj bienuloj, pli kaj pli multe da kamparanoj perdis sian teron, ilia vivo fariĝis pli kaj pli mizera kaj ili organizis sekretajn societojn por kontraŭstaro. La regadon de la Qing-kortego minacis krizo.

Ekstera komerco

En la Ming- kaj Qing-dinastioj la nacia ekonomio de Ĉinio disvolviĝis konsiderinde multe. Tiam la ekonomiaj branĉoj estis kompletaj, la enlanda merkato estis vasta kaj Ĉinio povis fundamente kontentigi siajn bezonojn sen fremdaj varoj. La regantoj de la Qing-dinastio ĉiam opiniis, ke Ĉinio estas lando riĉa je materiaj produktaĵoj, tial ĝi ne havis iniciativon komerci kun aliaj landoj. En 1757 la kortego rigore difinis, ke la okcidentaj landoj rajtas fari komercadon nur en Kantono.

Ĉar la ĉinaj varoj, kiel silkaĵoj, teo kaj porcelanaĵoj, havis grandan debiton eksterlande, tial ĝis la 80-aj jaroj de la 18-a jarcento la valoro de la eksporto de Ĉinio ĉiam superis tiun de la importo kaj ĉiujare granda kvanto da arĝento fluis en la ĉinan kason. Sed ekde kiam Britio okupis la opian produktojn de Hindio, ĝi komencis eksporti opion al multaj lokoj ĉe la marbordo de Ĉinio, ankaŭ la opiaj komercistoj de Usono sekrete eksportis opion al Ĉinio. La opio serioze difektis la korpon kaj spiriton de ĉinoj, komplete nuligis la aktivan komercan bilancon de Ĉinio kaj forportis multege da arĝento el Ĉinio. Ekde 1833 Ĉinio ĉiujare devis elspezi pli ol dek milionojn da taeloj da arĝento, tial la kortego maltrankvilis pri elĉerpigo de la arĝento kaj devis serĉi rimedon por solvi tiun problemon.



Opi-fumantoj

Peco de Historio

La ĉefurboj de la tri landoj

Pekino



Tian'anmen-pordego en Pekino



Edo-Kastelo: La antaŭa Edo-Kastelo fariĝis Imperiestra Palaco, kie loĝas Tennō post la Meiji-Restaŭro en 1868. Nun oni nomas ĝin Tennō Rezidejo.



Gwanghwamun kaj strato de ŝtatoŝefoj: Ŝtatoŝefoj estas starantaj antaŭ la Gwanghwamun, kiu estas la ĉefa pordego de la palaco Gyongbokgung.

Pekino estas fama urbo en la ĉina historio. De la jaro 1153 la dinastioj Jin, Yuan, Ming kaj Qing prenis ĝin kiel sian ĉefurbon. En la Ming-dinastio oni faris al ĝi grandskalan rekonstruadon. La Qing-dinastio komplete konservis la konstruaĵojn de Ming kaj konstruis multe da belaj imperiestraj ĝardenoj en la okcidenta antaŭurbo.

Meze de la urbo estis la Imperiestra Palaco, alinome la Malpermesita Urbo, kie la imperiestroj vivis kaj plenumis la ŝtatoŝefcon. La palacon ĉirkaŭis la interna urbo, kie dislokiĝis registaraj oficejoj kaj nobelaj loĝejoj, gardataj de soldatoj. La ekstera urbo estis loko, kie loĝis bienuloj kaj plebanoj. Tie oni faris ankaŭ komercadon kaj metiadon. En la Qing-dinastio Pekino havis pli ol milionon da loĝantoj. Tie estis unu el tri grandaj komercaj centroj. Pekino estis trafika centro liganta la tutan landon. La greno estis transportata tien ĉefe tra la Granda Kanalo.

Edo


Antaŭ la malfermo de havenoj, Japanio havis 3 grandajn urbojn: Edo, la politika centro (nuna Tokio), Kioto, la tradicia ĉefurbo kie loĝis la Tennō, kaj Osako, la ekonomia centro. Edo estis la plej granda el ili, kaj ĝi funkciis kiel reala ĉefurbo. La konstruado de la urbo Edo progresis en la frua periodo de la 17a jarcento. En ĝia urbocentro troviĝis la Edo-Kastelo, kie la ŝoguno loĝis kaj regis, ĉirkaŭite de la domegoj de daimioj el ĉiuj regionoj de Japanio.

En Edo loĝis multaj samurajoj, kiuj amasiĝis el diversaj regionoj de Japanio, kaj ankaŭ diversaj komercistoj kaj metiistoj. Edo fariĝis urbego elstara en la mondo, kies loĝantaro nombris pli ol milionon en la frua periodo de la 18a jarcento, kaj kies nombro de kvartaloj kreskis de 300 ĝis preskaŭ 1700 en la mezo de la sama jarcento. Populariĝis popolaj kulturaĵoj, kiel teatro kaj spektaklo, kaj amuzaĵoj kiel bankedo sub sakuro kaj diversaj festoj.

Seulo

De post la jaro 1394, tuj post la fondiĝo de la dinastio Chosun, ĝis hodiaŭ Seulo estas la ĉefurbo de Koreio dum pli ol 600 jaroj. Ĝi estas ĉirkaŭita de muro kun 8

pordegoj, kiuj kondukas eksteren. Kiel vi vidas en la bildo, la urbo ne estis en regula formo, ĉar kvin palacoj, ŝtatoŝeficejoj, komercaj kvartaloj, kaj loĝdomoj estis konstruitaj laŭ la naturaj montoj kaj ebenaĵoj. Ĉe ambaŭ flankoj de la palaco Gyongbokgung, la centra palaco, estis lokitaj la ŝtatoŝeficejoj; ĉe ambaŭ flankoj de la stratoj, kondukantaj al oriento kaj okcidento, estis establita la butikoj, kiuj vendis ĉiutagajn necesojn. Ĝenerale la loĝlokoj estis klasigitaj laŭ la sociaj pozicioj. La potencaj yangbanoj, kiuj estis altrangaj burokratoj, loĝis nordoriente de la palaco Gyongbokgung, kaj la malriĉaj yangbanoj, kiuj perdis potencon, loĝis najbare de la monto Namsan. En la Meza Vilaĝo, situanta sude kaj norde de la rivero Cheonggyecheon, loĝis ĉefe mezklasaj plebanoj. En la lasta periodo de la Chosun-dinastio, bazaroj estis establita ĉirkaŭ la pordegoj Namdaemun kaj Dongdaemun, tiel ke la komerco fariĝis vigla. Ekster la muro estis konstruitaj vojoj kaj por-komunikaj instalaĵoj, kiuj estis konektitaj kun la tuta lando, kaj la rivero Hangang, proksime de la Seul-centro, estis utila por transporti imposto-rizon kaj tributon.



Mapo de Seulo

Konfuceanismo kaj la tri landoj

La konfuceanisma kulturo estas komplika morala doktrino aŭ ideologia sistemo fundamentita de la granda edukisto kaj pensulo Konfuceo. Tiu sistemo havas intiman rilaton kun la moralaj principoj kaj sociaj moroj en la tradicia kulturo kaj ĉiutaga vivo. Post la morto de Konfuceo tiu kulturo dividiĝis en plurajn sektojn, inkluzive tiujn de Menzio kaj Xunzio. Post la Han-dinastio la regantaro ĝin sanktigis, dum la intelektuloj ĝin sistemigis. En la Song-dinastio granda erudiciulo Zhu Xi disvolvis ĝin en doktrinon de Zhuzi-o.

Transpasinte la naciajn kaj regionajn limojn, la konfuceanisma kulturo kondukiĝis poste en Japanion, Koreion kaj aliajn landojn. La doktrino de Zhuzi-o havis tiom grandan influon en la Korea Duoninsulo, kiom en Ĉinio mem. En la 15-a jarcento ĝi fariĝis la reganta ideologio en Koreio. Meze de la 16-a jarcento famaj koreaj intelektuloj Lee Tue Gae kaj Lee Yi disvolvis la doktrinon, kaj la nova doktrino havis grandan influon ankaŭ en Japanio kaj eĉ hodiaŭ estas homoj, kiuj tre estimas la familian etikon de Zhuzi-o, alte taksas lian moralon, ideologion kaj koncepton pri valoro de la homa vivo.



*Konfucea Templo
en Qufu, Shandong
provinco*

Peco de Historio

En la tempo de Edo Bakufu, en Japanio la doktrino de Zhuzi-o fariĝis reganta doktrino kaj estis rigardata kiel lernobjekto en la lernejoj. Tiam en multaj lernejoj oni instruis konfuceanisman kaj aperis en Japanio sektoj speciale studentaj la doktrinon de Zhuzi-o kaj iuj militistoj kaj oficistoj fieris pro sia konfuceanisma klereco.

Ĉapitro I

Malfermo kaj Moderniĝo

Enkonduko

De post la fino de la 18a jarcento ĝis la 19a, okcidentaj landoj kapitalismiĝintaj direktis sian aktivadon en aziajn landojn por vendi varojn kaj akiri materialojn. Britio unue ekregis Hindion, kaj komencis minaci la sudorientan Azion kaj Ĉinion. Francio envenis en la sudorientan Azion kaj Rusio minacis de nordo. Ankaŭ Usono avancis en la okcidentan Pacifikon. Tiel la historio de orienta Azio devis disvolviĝi sub fortaj premoj de eŭropaj landoj kaj Usono. Kiel do reagis Ĉinio, Japanio kaj Koreio kontraŭ tiuj premoj?

Ĉinio volis forpeli la minacon de Britio, sed malvenkis en la milito kaj devis havi malegalajn interrilatojn kun okcidentaj landoj. Poste en Ĉinio naskiĝis forta movado por modernigo, akceptante okcidentajn teknikojn kaj kulturojn, sed daŭris la reĝimo de la Qing-dinastio.

Post la malfermo de la lando, en Japanio okazis arda enlanda konflikto pri la maniero, kiel interrilati kun okcidentaj landoj, kaj baldaŭ fondiĝis nova registaro. La nova registaro rapide antaŭenigis modernigon de la lando kaj baldaŭ fortiĝis ĝia inklino etendi sian potencon en Koreion, ktp.

Koreio unue lanĉis la politikon forpeli okcidentajn fortojn, sed finfine malfermis havenojn, devigite de Japanio, subtenata de okcidentaj landoj.

Kial do Japanio volis etendi sian potencon en la orientan Azion? Kaj kiajn konfliktojn naskis tiu japana inklino?

Paralele kun la ŝanĝoj en internaciaj rilatoj, en ĉiu lando okazis enlandaj reformaj movadoj, kiuj celis modernigon de la politiko kaj socio. Kiaj movadoj do disvolviĝis en la tri landoj? Kiaj estis la rilatoj inter la reformaj movadoj kaj politiko? Ni pripensu ĉies karakterizojn. Dume modernigo en ĉiu lando donis grandan ŝanĝon ankaŭ al la vivo de la popolo. Ni do esploru, kia ĝi estis en la tri landoj, interalie kiaj estis la edukado, fervojoj, ĵurnaloj, kalendaro k.a.

La Premo de Eŭropaj Potencoj kaj la Reagoj de la Tri Landoj

1. Ĉinio — La Opia Milito kaj Okcidentiga Movado

Kiamaniere malfermiĝis la pordo de Ĉinio en la mezo de la 19-a jarcento? Kiujn kontraŭrimedojn alprenis la ĉina registaro tiuokaze? Kiel sin tenis la diversaj socitavoloj de Ĉinio en tiu subite ŝanĝiĝanta situacio?

La Opia Milito kaj Nankina Traktato

La opio alportis seriozan influon sur la socio kaj ekonomio de Ĉinio. Por bremsi la importon de opio la imperiestro de la Qing-dinastio sendis al Kantonon en 1838 Lin Zexu kiel revizoron por malpermesi opion. Atinginte Kantonon, Lin Zexu ordonis al la fremdaj komercistoj eldoni sian opion kaj detruis la kolektitajn 1180 mil kg da opio en Humen.

La brita registaro faris militan venĝadon al Ĉinio. Ĝi sendis militŝipojn al la marbordo de Kantonon, dum Lin Zexu komandis soldatojn kaj popolojn por brava rezistado. Fine la registaro de la Qing-dinastio sendis korteganon por trakti kun la britaj agresantoj por pacigo, eksigis Lin Zexu kaj aliajn generalojn, kiuj pledis por rezistado, tamen tio ne haltigis la invadon de la britaj militistoj.

Aŭguste de 1842 britaj militŝipoj atingis Nankinon kaj, minacate de la batalo, Qing-kortego-devigite subskribis kun Britio la Nankinan Traktaton, laŭ kiu Ĉinio koncesis Hongkongon al Britio kaj malfermis al ĝi la urbojn Kantonon, Fuzhou, Xiamen, Ningbo kaj Ŝanhajo kiel komercajn havenojn kaj proklamis, ke la doganoj de tiuj havenoj ne devas esti difinitaj de la ĉina registaro mem, sed nur post interkonsiliĝo kun Britio. Tial ĝi fariĝis la unua malegala traktato en la moderna historio de Ĉinio.


Lin Zexu detruas opion en Humen, Kantonon



Pordomalfermo kaj alilandaj influferoj

Post la subskribo de la Nankina Traktato okazis la Dua Opia Milito, Ĉina-Franca Milito kaj aliaj agresoj de imperiismaj potencoj al Ĉinio. Ĉinio kvankam faris rezistadon, tamen ĉiufoje ĝi malvenkis. Rezulte de tio granda areo de ĉina teritorio estis forkaptita kaj granda sumo elspezita por milita kompenso kaj Ĉinio pli larĝe malfermis sian pordon kaj donis pli da avantaĝoj al la potencoj. Ĝi malfermis pli da havenoj por komercado kun fremdaj landoj, permesis al alilandaj misiistoj fari predikadon en Ĉinio kaj konsentis, ke la fremdlandanoj ne obeu ĉinajn leĝojn kaj ĝuu eksterteritoriecon. Ĉinio devas doni al

ĉiuj aliaj landoj la saman privilegion, se ĝi jam favoris iun ajn landon per specialaj rajtoj. Tiel iom post iom la fremdlandaj potencoj ekhavis en Ĉinio ĉiu sian propran influferon. Ekz. la influfero de Britio estis en la baseno de Yangzi-rivero, tiu de Germanio en la Shandong-a Duoninsulo, tiu de Francio en la ĉemara regiono de Fujian kaj tiu de Rusio en la Nordoriento de Ĉinio, dum Usono proponis la principon malfermi la pordon de Ĉinio.



Akriĝo de la sociaj kontraŭdiroj kaj popola kontraŭstaro

La torento de la okcidentaj varoj en Ĉinion detruis la aŭtarcian kamparanan ekonomion de Ĉinio. La registaro de la Qing-dinastio pli kaj pli serioze elvringis monon el la kamparanoj por pagi militan kompenson al la okcidentaj potencoj, kio multe akriĝis la sociajn kontraŭdirojn kaj kaŭzis socian tumulton. En 1851 eksplodis grandskala kamparana insurekcio de la Paca Ĉiela Lando estrata de Hong Xiuquan [ŝjuĉuan] kaj Yang Xiuqing [ŝjuĉing] en Guiping de Guangxi [guangŝi] sub religia mantelo. La ribelaj kamparanoj celis la regadon de la Qing-kortego kaj fondis kamparanan reĝimon de la Paca Ĉiela Lando, kiu persiste luktadis 14 jarojn. La Paca Ĉiela Lando prezentis projekton egale dividi agrojn kaj starigi aŭtarcian idealan socion. Sed ĝia interna konflikto kaŭzis krizon, kaj la registaro de la Qing-dinastio, alianciĝinte kun fremdaj fortoj, finfine venkis la kamparanojn. Tamen la sociaj kontraŭdiroj en Ĉinio fariĝis pli akraj.

*Maŝinfabrika Buroo
Jiangnan naskiĝinta en
1865 estis grava frukto
de la Okcidentiga
Movado. Fine de la
19-a jarcento ĝi fabrikis
pafilojn, kanonojn kaj
pulvon.*

Okcidentiga Movado

La agresado fare de la okcidentaj potencoj al Ĉinio serioze malfortigis la regadon de la Qing-dinastio, en kio iuj ŝtatoficistoj iom post iom vidis la minacon de la okcidentaj potencaj militŝipoj kaj kanonoj. Por defendi la regadon de la Qing-dinastio, ili deziregis lerni kaj enkonduki la militan sciencan kaj teknikajn de okcidentaj landoj, levi siajn proprajn fortojn kaj potencigi la patruon. Iuj ŝtatoficistoj invitis okcidentajn fakulojn kaj pere de la avangardaj teknikoj de la okcidento entreprenis modernajn militajn industriojn, konstruis fervojojn, ekspluatigis minejojn, fondis novtipajn lernejojn kaj sendis junulojn alilanden por lerni. Li Hongzhang kaj iuj aliaj ŝtatoficistoj invitis okcidentajn militistojn por trejni militistojn de la Qing-dinastio kaj fondis modernajn mararmeojn. Ĝis la 90-aj jaroj de la 19-a jarcento la supre menciitaj mempotencigaj aktivadoj donis certajn fruktojn, metis la bazon de la modernaj industrioj de Ĉinio kaj iagrade larĝigis la vidkampojn de la ĉinoj. Oni nomas tiujn aktivadojn Okcidentiga Movado kaj la aktivulojn de tiu movado okcidentigistoj. Sed la okcidentigistoj ne sciis, ke la ĉefa kaŭzo de la malvenkoj de Ĉinio estas la politika dekadenco de la kortego, tial la sukcesoj de la Okcidentiga Movado estis tre limigitaj kaj en la senĉesa agresado de la potencoj ĝi suferadis sinsekvajn malvenkojn.

2. Japanio — Malfermo kaj Meiji-Restaŭro

Meze de la 19a jarcento Japanio finfine malfermis sian pordon, komencis interrilati kaj komerci kun aliaj landoj, kaj fine naskiĝis nova registaro. Kiajn interrilatojn Japanio intencis havi kun la cetera mondo sub la nova registaro? Kian vojon Japanio intencis iri?

Granda ŝanĝo post la malfermo kaj fondiĝo de la nova registaro


La informo, ke Britio venkis Ĉinion (Qing-dinastio) en la Opia Milito, ŝokis la japanan ŝogunan registaron. En 1853, dek jarojn post la malfermo de Ĉinio, usonaj militŝipoj venis kaj minace devigis Japanion malfermi la pordon. Kaj en la sekva jaro 1854, Japanio malfermis sian pordon post pli ol 200-jara fermado. Japanio komencis oficialajn interrilatojn kaj komercon kun eŭropaj landoj, aranĝante sinsekvajn paktojn kun Britio, Rusio, Francio kaj Nederlando. Tamen tiuj paktoj estis same malegalaj kiel tiuj, kiujn Ĉinio aranĝis kun eŭropaj landoj kaj Usono.

Post kiam la ŝoguna registaro malfermis la landon, rapide kreskis la opinio kaj movado, kiuj celis forpeli alilandanojn. Okazis atakoj al alilandanoj kaj alilandaj ŝipoj. Loke okazis eĉ militaj konfliktoj kun alilandoj. Enlanda kontraŭstaro pliakriĝis kaj kontraŭregistra potenco enprenis kaj metis en sia centro la imperiestron.

Dume, pro la internaciaj komercrilatoj kruda silko kaj aliaj enlandaj produktaĵoj elfluis eksterlanden kaj malabundiĝis. Tio kaŭzis ankaŭ subitan altiĝon de varprezoj. Sub tiaj diversaj ekonomiaj malordoj la vivo de la popolo malfaciliĝis. En multaj lokoj kamparanoj ribelis postulante plibonigon de la socio, dum la popolo en urboj atakis rizvendistojn kaj postulis, ke ili vendu rizon malaltpreze.

Dum tiuj tumultoj daŭris, la potenco de provincaj samurajoj, kiuj kontraŭis al la ŝoguna registaro, iom post iom plifortiĝis. En 1868, ili renversis la potencon de la ŝoguno kaj fondis novan registaron.

Meiji-Restaŭro oni nomas tiun grandan ŝanĝon en la politiko kaj socio, en kiu



renversiĝis la ŝoguna registaro, kaj naskiĝis kaj ekkreskis la nova ŝtato.

La delegitaro ekiris de la haveno Jokohamo en novembro 1871, unue vizitis Usonon kaj, transpasinte Atlantikon, vizitis eŭropajn landojn. Ĝi iris tra aziaj landoj kaj revenis Japanion en septembro 1873.



Moderniĝo celita de la nova registaro

Batalante kun la malnova ŝoguna potenco, la nova registaro renomis la urbon Edo je Tokio, kaj ĝin faris ĉefurbo de Japanio. La nova registaro detruis la malnovan politikan sistemon, en kiu regis la ŝoguno kaj feŭdestroj nomataj "daimioj", kaj centralizis sian potencon, prenante la Tennoon (imperiestron) kiel ĉefon. Kaj ĝi adoptis gvidprincipon aktive interrilati kun okcidentaj landoj, modernigi la landon laŭ la modelo de okcidentaj landoj, kaj cele al tio, ĝi dungis multajn alilandajn instruistojn kaj sendis multajn studentojn al Eŭropo kaj Usono.

La nova registaro reviziis la klassistemon kaj proklamis, ke ĉiuj klasoj estas principe egalaj. Ĝi abolicis la privilegiojn de samurajo kaj fondis konskripcian sistemon por organizi armeon konsistantan ĉefe el kamparanoj, kaj fondis ankaŭ sistemon de deviga eduko.

Tiaj rapidaj reformoj naskis en la popolo fortan kontraŭsenton kaj kontraŭagojn, sed la nova registaro subpremilo ilin por puŝadi la reformadon. Samurajoj, senigitaj je la privilegioj, ribelis tie kaj ĉi tie, sed la nova registaro subpremilo ankaŭ ilin.

La nova registaro konstruis ĉie en la lando fabrikojn, metis fervojajn relojn, disvastigis poŝtan kaj telegrafan servon, kaj faris novajn mon- kaj banksistemon. La nova registaro antaŭenigis modernigon de la lando per forta ŝtata potenco.

Membroj de la Iwakura-Delegitaro

Centre, en japana kostumo, estas Iwakura Tomomi, speciala plenrajta ambasadoro. La aliaj estas vicambasadoroj. De maldekstre Kido Takayoshi, Yamaguchi Naoyoshi, Ito Hirobumi, Okubo Toshimichi.

Lernu de Eŭropo kaj Usono — la vojo al riĉa lando kun forta armeo

La supra foto montras la ĉefajn membrojn de la delegitaro, kiu estis sendita al Eŭropo kaj Usono kvar jarojn post la fondiĝo de la nova registaro. Ĉiuj estis ĉefaj membroj de la registaro.

La 46-membra delegitaro, kun ĉirkaŭ 60 akompanantoj (studentoj k.a.) ekiris de Jokohamo en novembro 1871. Post tiam dum unu jaro kaj 10 monatoj ili vizitis 12 landojn, nome: Usonon, Brition, Francion, Prusion (Germanion), Rusion k.a., kaj observis la aspektojn de politiko, juro, ekonomio kaj socio. Tuj post la fondiĝo de la nova registaro, ĝiaj ĉefaj membroj tamen forlasis Japanion por preskaŭ du jaroj por avide observi Eŭropon kaj Usonon.

La karaktero de la delegitaro bone montras la vojon, laŭ kiu la moderna Japanio volis paŝi, t.e. eliri el Azio kaj kungrupiĝi kun okcidentaj potencoj. Tio kondukis al alia vojo, laŭ kiu oni rigardis Azion kiel "neevoluintan" kompare kun la okcidentaj landoj, kaj intencis subigi Azion sub la "evoluinta" Japanio.

3. Koreio — Konfliktoj Rilate Malfermon

Ĉe la novaĵo de la malvenko de Ĉinio en la Opia Milito, en Koreio altiĝis la singardo kontraŭ la okcidentaj fortaj landoj. Kiel Koreio alfrontis kontraŭ la postulo de pordomalfermo fare de Japanio kaj okcidentaj landoj?

Invado al Ganghwado fare de Francio kaj Usono

Meze de la 19a jarcento, la registaro de Chosun estis rifuzanta komercon kun okcidentaj landoj. En 1866 ĝi komencis persekuti katolikojn kaj francajn misiistojn por defendi la landon kontraŭ la rabado de fremdaj potencoj kaj por enlanda politika stabilo.

Pretekste de ĉi tio, Francio invadis la insulon Ganghwado per milita forto. En la sama jaro Usono invadis per la komerca ŝipo General Sherman la urbon Pyongyang, norde, kaj kanonante rabadis, sed la ŝipo estis bruligita de la indigna popolo. Kulpigante tion, en 1871 Usono sendis eskadron al Koreio kaj invadis la insulon Ganghwado. En la dufojaj militoj multaj domoj estis bruligitaj kaj homoj mortigitaj. Ankaŭ altvaloraj kulturaj havaĵoj estis rabitaj.


Kvankam la du landoj tiamaniere postulis komercadon nome de internacia komerco, tamen la registaro de Chosun kontraŭbatalis, pensante, ke la akcepto de ilia postulo endanĝerigos Koreion. La ŝtono-monumentoj Chok-hwabi (Monumento kontraŭ la Pacperado), starigitaj en multaj lokoj de la lando, estis esprimo de firma volo rifuzi la komercadon kun okcidentaj landoj.

Japana postulo por malfermi la havenon kaj la Traktato de Ganghwado



Monumento kontraŭ Pacperado "Ne batali kontraŭ la invado de eŭropanoj signifas pacperadon, kio egalas vendi la landon"

En 1873 en Chosun okazis granda politika ŝanĝo, ke retiriĝis Hungson Daewongun, kiu estis la patro de la reĝo Goĝong, kaj kiu, estrante la politikan situacion, ordonis nacian izoladon kaj la reĝo Goĝong komencis mem respondi pri la politiko. Japanio, profitante tiun ŝancon, sendis sian militŝipon Unyoho al Ganghwado kaj intence kaŭzis konflikton. Tio estas imito de la manifestacio de milita forto, kiun uzis Usono, kiam ĝi malfermigis la japanajn havenojn. Tiutempe la ĉirkaŭaj landoj esperis, ke Japanio povos malfermi la pordon de Chosun, kaj ankaŭ Ĉinio konsilis al Chosun eviti la konflikton de arma forto kontraŭ Japanio.



Maldekstre: La baterio en Ganghwado, uzita kiam franca, usona aŭ japana militŝipo invadis.

Supre estas tiama kanono, nun en Chojjin.

Tiutempe la popolopinioj en Chosun estis dividitaj en du partoj; unuj estis tiuj, kiuj obstine kontraŭis la postulon de haven-malfermo far Japanio, kaj aliaj estis tiuj, kiuj konsentis pri la japana postulo. La kontraŭstarantoj kritikis, dirante, ke Chosun pereos, ĉar kun la malfermo de la havenoj katolikismo disvastiĝos laŭvole kaj Japanio prirabos Chosun ekonomie. Male, la konsentantoj pensis, ke Chosun ne povas prokrasti plu la malfermon de haveno por eviti la militon kontraŭ Japanio. Fine, la registaro de Chosun decidis malfermi la havenojn kaj faris la traktaton de Ganghwado (Paciga Traktato inter Chosun kaj Japanio). Sed la registaro de Chosun ne sciis sufiĉe pri la problemoj kaj danĝeroj de la enhavo, ĉar ĝi haste faris la traktaton sen sufiĉaj antaŭpreparoj.

La Traktato de Ganghwado fariĝis la motivo por la invado kaj interveno de Japanio kaj aliaj landoj. Laŭ la Traktato Chosun devis plivastigi la malfermitajn havenojn, kaj ne povis puni la krimojn faritajn en la havenoj fare de japanoj, ĉar la Traktato de Ganghwado kaj ĝiaj akcesoraj traktatoj permesis al japanoj la ekonomiajn rabadojn sen apartaj restriktaj. Do, la unua artikolo diras, ke "Chosun estas sendependa lando". Kial? Japanio faris tion por akcenti, ke ĝi volas ekskludi Ĉinion en la tiutempa diplomatio de Chosun kaj Chosun devas teni intiman rilaton kun Japanio.

De la jaro 1880, Chosun starigis diplomaciajn rilatojn kun diversaj landoj, t.e. Usono, Britio, Germanio, Francio kaj Rusio. Sed ankaŭ la traktatoj kun ili estis malegalaj kiel tiu de Ganghwado.

Artikolo 1: Chosun estas sendependa lando kaj havas egalan rajton kun Japanio.

Artikolo 5: La havenoj de Chosun estu destinitaj por tiuj de internacia komerco.

Artikolo 7: Japanaj navigantoj povas libere mezuri la marbordojn de Chosun.

Artikolo 10: La krimoj, kiujn faris japanoj en malfermitaj havenoj, estu punataj nur de japanaj policistoj.

Peco de Historio

Malfermitaj havenoj en la tri landoj

Ŝanhajo



Ŝanhajo en 1880

Post la subskribo de la Nankina Traktato Ŝanhajo malfermiĝis al aliaj landoj novembre de 1843 kaj tien entrudiĝis pli kaj pli multe da fremduloj. Du jarojn poste, Britio apartigis la kvartalon koncentre loĝatan de la britoj kaj faris la lokon koncesiejo, kie ĝi praktikis rektan administradon pri la socia politiko, ekonomio kaj sekureco. Sekve de tio ankaŭ aliaj okcidentaj potencoj fondis koncesiejon en Ŝanhajo, kie ili instalas retojn de gaso, elektro, kran-akvo, telefono k.a., kiuj poste populariĝis tra la tuta urbo. La disvolviĝo de komerco kaj pliiĝo de fabrikoj iom post iom urbigis la lokon. En 1915 la loĝantoj de Ŝanhajo atingis 2 milionojn kaj per tio ĝi fariĝis la plej granda urbo en Ĉinio. Ankaŭ la rilato de Ŝanhajo kun aliaj landoj intimiĝis. En la 40-aj jaroj de la 20-a jarcento tie loĝis 150 mil fremdlandanoj. La kvartalo Hongkou fariĝis koncentre loĝata de japanoj. En 1919 naskiĝis en Ŝanhajo la provizora registaro de la Korea Respubliko. En la 30-aj jaroj tie vivis 30 mil judaj fuĝintoj. Oni nomis Ŝanhajon, kie la komerca kulturo estis bone disvolviĝinta, moderna municipo kaj aventurista edeno.

Jokohamo



Jokohama haveno

Laŭ la pakto subskribita en 1858 Japanio malfermis kvin havenojn al eksterlando. Unu el ili estis Jokohamo. En la malgranda fiŝkaptista vilaĝo kun ĉirkaŭ 100 domoj, nova haveno estis urĝe konstruita kaj ĝi malfermiĝis en la sekva jaro. En la haveno estis konstruitaj tiaj instalaĵoj kiel varfo, tenejoj, doganejo k.a. Japanaj komercistoj venis al alilandaj komercistoj en la setlejo de la haveno, vendis krudan silkon kaj aliajn japanajn varojn, kaj aĉetis alilandajn varojn importitajn en la havenon.

Tra tiu fenestro, kiu malfermiĝis al okcidento, eniris en Japanion diversaj okcidentaj kulturaĵoj, kiel ĵurnaloj, ĉevalkonkursoj, parkoj, okcidentaj kuiraĵoj, biero ktp. Jokohamo, la plej proksima haveno al Edo, la ĉefurbo, evoluis kaj fariĝis la plej granda komerca haveno en Japanio.

Inchon

Japanio, kiu faris la Traktaton de Ganghwado en 1876, postulis la malfermon de la havenoj de Busan, Wonsan kaj Inchon, kiu estas proksima al Seulo, kaj efektivigis tion. Kiam la havenoj estis malfermitaj, Inchon estis kvieta haveno, nomata "Chemulpo" kun

3 mil loĝantoj. Post la malfermo en Inchon estis establitaĵoj por fremduloj, kie oni konstruis parkojn, hotelojn kaj preĝejojn. Kun la multiĝo de fremduloj, oni eĉ plenigis la marbordon per tero. Por la unua fojo la fervojo, telefono kaj telegrafo estis inaŭguritaj. Japanaj rizovendistoj elportis rizon al Japanio, kaj Inchon fariĝis la staplejo de rizo. Krom tio, Inchon estis la loko, kie kolektiĝis diverslandaj ŝipoj, kiam ajn Ĉinio, Japanio kaj Rusio konkuris por antaŭ-okupi Chosun. Do, Inchon estis la pordego kondukanta al Seulo, la centro de komercado, kaj la arma trapasejo.



*En Inchon troviĝas
vilaĵoj, preĝejo kaj
eŭropstilaj domoj.*

La Tennoa sistemo de la moderna Japanio

De post ĉirkaŭ la 7a jarcento en Japanio oni nomis sian monarkon "Tennoo". La vorto "Tennoo" onidire devenis de la ĉina, kiu signifas dion de la ĉielo.

En antikveco Tennoo havis efektivan potencon regi la landon, sed en postaj jaroj nobeloj kaj samurajoj enmanigis potencon al si, dum la Tennoo preskaŭ perdis efektivan potencon pri politiko. Sed pro tio la Tennoa reĝimo povis vivi daŭre kiel centro de digno kaj aŭtoritato, tenante sin iugrade malproksime de la politikaj konfliktoj.

Tamen post la malfermo de la havenoj, la Tennoo estis metita en la centro de la potenco kiu celis renversi la ŝogunan registaron. La nova registaro, kiu akiris potencon anstataŭ la ŝoguna, fondis politikan sistemon, kies centro estis la Tennoo. La nova registaro deklaris ĉe sia fondiĝo, ke ĝi antaŭenigos la politikon, metante la Tennoon kiel centron. La tiama Tennoo prezidis la ceremonion, en kiu li ĵuris al la dioj pri la fundamento de la posta politiko. Ankaŭ la sistemo pri la eraa nomo estis ŝanĝita tiel, ke oni uzu nur unu eraan nomon por la tempo regata de unu Tennoo. Ankaŭ festotagojn oni decidis laŭ la ritoj de la Tennoa familio.

Estas la Konstitucio de la Granda Japana Imperio, kiu klare prezentis la reĝimon, kies centro estas la Tennoo, kiel leĝan kaj politikan sistemon. Estis preskribite, ke la Tennooj apartenas al unu genealogia sango, kiu daŭras ekde la komenco de la mondo, kaj ke neniuj rajtas profani la Tennoan sanktecon. Ĉiuj el la leĝdona, administracia kaj justica potencoj apartenis tute al la Tennoo. La Tennoo estis ankaŭ la supera respondeculo pri komandado kaj ordonado al la armeo (generalisimo). La Tennoa Dekreto pri Edukado estis proklamita por antaŭenigi tennoisman edukadon.

Kaj tiel, malsame ol Britio kaj Francio, kie oni aŭ rabis aŭ limigis la reĝan potencon per revolucio, la Meiji-Restaŭro de Japanio nur plifortigis la potencon de la burokrata registaro, kies ĉefo estas la Tennoo. Sub la Tennoa registaro Japanio antaŭenpuŝis sian politikon, kiu celis modernigon de la lando kaj ekspansion en Azion.

*Tennoo Meiji unufoje
en militista kostumo*



Tennoo Meiji en tradicia kostumo



Militoj Englutis Orientazion

1. Konfliktoj inter la Tri Landoj

En la dua duono de la 19-a jarcento, la konflikto kaj streĉo inter la tri landoj serioziĝis. Kial la tri landoj ne estis en paca rilato sed kontraŭstaris?

Aserto konkeri Chosun kaj invado al Taiwan

Post la Meiji-Restaŭro en 1868, Japanio sendis delegiton al Chosun (Koreio) por anonci la fondon de la nova registaro. Sed en la japana diplomatia dokumento troviĝis la literoj "皇" kaj "敕", kiuj signifas, ke la imperiestro sendas malsupren al subuloj. La registaro de Chosun ne akceptis la dokumenton, ĉar la enhavo de la dokumento kaj la kanalo de transdono deviis de la kutima diplomatia konvencio. Pro tio en la japana registaro leviĝis la aserto konkeri Chosun.

"Ni devas tuj decidi la politikon super la tuta mondo, sendi ambasadoron al Chosun kaj pridemandi la ofendaĵojn de ĝi. Se ĝi ne obeos, ni akuzu ĝin pri krimo kaj invadu ĝin kaj alten levu la prestiĝon de Japanio, kiu estas la lando de dio."

— El la taglibro de Gido Takayosi, la centra figuro de la nova japana registaro (la 26an de januaro, 1869)

En 1873, alten leviĝis la aserto por konkeri Chosun. Sed, tio ne efektiviĝis, ĉar la hegemonion havis la homoj, kiuj asertis tion pli grava, ke enlandaj problemoj estas solvendaj antaŭ ĉio.

Tiutempe, Japanio intencis inkludi al sia teritorio la insulon Ryukyu. Ĝis tiam, unuflanke, la reĝlando Ryukyu havis la rilaton de tributo kun Ĉinio, aliflanke, estis regata de japana feŭdestro. En 1871, okazis la kazo, ke iu Taiwan-ano murdis drivanton de Ryukyu. En 1874, la japana registaro invadis Taiwan por venĝi la kazon de murdo. La sekvantan jaron, Japanio ĉesigis Ryukyu-on pagi

la tributon al Ĉinio kaj en 1879 inkludis ĝin en sian teritorion kaj nomis ĝin la gubernio Okinavo.

Konflikto de Japanio kaj Ĉinio rilate al Chosun

Kiam la Traktato de Ganghwado estis subskribita en 1876, inter Japanio kaj Ĉinio ĝermis konflikto rilate al Chosun. En 1882, en Chosun la soldatoj de la malnova armeo kaj malaltklasaj homoj kune arme ribelis. En tiu procezo, japana legaciejo estis bruligita

kaj damaĝita. Ĉinio, petite de la Chosun-registaro, sendis armeon kaj subpremis la situacion. Eĉ post tio, la ĉina armeo ne retiriĝis sed daŭre garnizonis, kaj intervenis en la politikon de Chosun. Ankaŭ Japanio garnizonis sian armeon en Seulo kun la preteksto gardi siajn diplomatojn.

Ĉar Qing (Ĉinio) pli kaj pli intensigis la intervenon en la enlandan politikon, kaj la reformo ne progresis, la reformistoj, Kim Ok-Gyun, Bak Yeong-Hyo kaj aliaj, sentis krizon tagon post tago. Ili intencis, eĉ per milita forto, ekpreni la politikan potencon kaj progresigi la socian reformon. Finfine, en 1884 kun helpo de la japanaj legacio kaj armeo ili sukcesis ekpreni la registaran potencon. Sed tio finiĝis en malsukceso nur post 3 tagoj pro la interveno de ĉina armeo. Oni nomas ĉi tion la Politika Evento de 1884. Tiu ĉi okazaĵo estis la movado por la moderna reformo de Chosun, kiel oni povas scii en la 14 politikaj principoj por reformo.



Ĉefaj figuroj de la Evento de 1884 (De maldekstre): Bak Yeong-Hyo, Seo Uang-Bom, Seo Jae Pil, Kim Ok-Gyun

Artikolo 1. Daewongun tuj revenu al hejmlando, kaj abolu la vantan ceremonion de tributo al Ĉinio.

Artikolo 2. Leĝigu la egalan rajton de la popolo kaj dungu la ŝtatoficiistojn laŭ la individua kapablo.


Artikolo 14. Forigu ĉiujn nenecesajn registarajn instancojn escepte de la bazaj ses instancoj, kaj faru tion post diskuto kun ministroj.

Resumo el la politikaj principoj de la Evento de 1884 (el Gapsin-ilok)

Japanio kaj Ĉinio retiris siajn armeojn, ĉar ili pensis, ke ankoraŭ ne venis la tempo fari ĝeneralan militon en Chosun. Sed Ĉinio ankoraŭ daŭrigis la intervenon pri enlanda politiko de Chosun, kaj pligrandigis la ekonomian influon. Ankaŭ Japanio kreskigis la armean forton por venki en eventuala milito kontraŭ Ĉinio kaj por gardi la profiton de sia lando kaj okupi Chosun en estonteco. Fine, en 1894 Japanio startigis la militon kontraŭ Ĉinio.

2. Ĉina-Japana Milito

Post la Meiji-Restaŭro Japanio turnis sian rigardon eksterlanden kaj post nelonge lanĉis militon kontraŭ la Qing-dinastio. Kiamaniere kaŭziĝis tiu milito? Kiel la milito iris kaj kium rezulton ĝi donis?



Mapo pri la Ĉina-Japana Milito en 1894-1895

Eksplodo de la milito kaj Koreio

Printempe de 1894 eksplodis la kamparana insurekcio, Donghaglan, pro la burokrata koruptiĝado kaj peza impostado super la kamparanoj en Koreio, kaj ĝi rapide implikis la tutan landon. La korea registaro de la Lee-dinastio urĝe petis, ke la registaro de la Qing-dinastio subpremu la ribelon. Sed ankaŭ Japanio, kiu antaŭ longe preparis sin, decidis sendi armeon al Koreio por kaŭzi konflikton kun Ĉinio, forpeli la ĉinajn fortojn el Koreio kaj mem regi ĝin. Por realigi tiun planon la japana armeo ne retiriĝis eĉ post la sufoko de la insurekcio. Male, julie ĝi sieĝis la reĝpalacon de Koreio, arestis la reĝon Go Jong [gojong] kaj la reĝinon Min Bi. Kaj krome la japanoj devigis la patron de la korea reĝo Daewon Gun, kiu tenis la efektivan regpovon, deklari, ke Koreio sendependiĝos de Ĉinio kaj abolos la antaŭe subskribitajn paktojn de Koreio kaj Ĉinio. Samtempe kun tio la japana mararmeo surprizatakis ĉinan floton kaj ŝipojn transportantajn soldatojn sur la Flava Maro. Tio kaŭzis la eksplodon de la Ĉina-Japana mara milito. Kaj tuj poste la japana armeo atakis ĉinan armeon garnizonantan en Pyongyang.

Tiel komenciĝis ankaŭ tera milito inter Ĉinio kaj Japanio. La milita fajro rapide implikis la Liaodong-duoninsulon de Ĉinio. Kaŭze de malsufiĉa preparo kaj malhelpo de la porpaciĝaj elementoj en la Qing-kortego la tera kaj mara armeoj de la Qing-dinastio ambaŭ estis frakasitaj.

La Masakro en Lüshun kaj la Traktato de Shimonoseki

La japana armeo invadis Dalian kaj Lüshun kaj faris brutalan masakron de la popoloj, kiuj ne partoprenis la batalon. La kruelaĵo de la japana armeo estis unuanime

riproĉita de la internacia publiko.

Januare de 1895 la japana armeo atakis Shandong kaj konkeris la militan havenon Weihai, kie la Norda Floto de la Qing-dinastio komplete pereis. La registaro de la Qing-dinastio sendis Li Hongzhang al Japanio por peti paciĝon. Li subskribis la Traktaton de Shimonoseki la 17-an de aprilo, 1895.

La ĉefa enhavo de la Traktato de Shimonoseki

1. Ĉinio agnoskas la sendependiĝon de Koreio.
2. Ĉinio koncesias al Japanio la Liaodong-duoninsulon, Taiwan kaj la Penghu-insularon.
3. Ĉinio donas al Japanio 200 milionojn da taeloj da arĝento kiel kompenson.
4. Ĉinio malfermas Shashi, Chongqing, Suzhou kaj Hangzhou kiel komercajn havenojn, kaj japanaj ŝipoj rajtas libere veturi al tiuj havenoj.

La interrilatoj inter Ĉinio, Japanio kaj Koreio

Rusio, Francio kaj Germanio ne deziris, ke Japanio, venkinta en la Ĉina-Japana Milito en 1894-1895, multe profitu de la venko. Ili malaprobis, ke Ĉinio koncesiu la Liaodong-duoninsulon al Japanio. Helpate de la supre menciitaj tri landoj, la registaro de la Qing-dinastio reprenis la duoninsulon, tamen pagis pliajn 30 milionojn da taeloj da arĝento al Japanio.

Pro la malvenko de sia armeo, la registaro de la Qing-dinastio koncesiiis Taiwan al Japanio kaj malfermis pli da havenoj. Ĉar Ĉinio devis pagi kompenson trioble de la jara enspezo, ĝia registaro devis multe monprunti de aliaj landoj, kaj sekve ĝi ekportis pezan ŝarĝon. Samtempe la alilandaj potencoj akiris sian konkurencon por dividi Ĉinion.

Post la milito Japanio fariĝis la azia potenco kaj enviciĝis inter la monda potencaro. Ĝi plirapidigis siajn paŝojn agresi aliajn landojn. Tio maltrankviligis aliajn potencojn.

Oktobre de 1895, la japana ambasado elkovis murdon de la reĝino de Koreio Min Bi, sekve de tio la korea reĝo fuĝis en la rusan ambasadorejon, kaj post tio pligrandiĝis la influo de Rusio sur Koreio. La korea popolo leviĝis por rezisti kontraŭ Japanio, tamen la insurekcioj estis aŭ ruinigitaj de la moliga politiko de la korea registaro, aŭ subpremitaj de la japana kaj korea armeoj.

Japanaj militistoj en la okupita Mararmea Oficejo, Lüshun



3. Japana-Rusa Milito

De februaro 1904 ĝis julio 1905 Japanio militis kontraŭ Rusio. Kio estis la celo de la milito? Kion signifis la milito por la tri landoj en Orientazio?



Kio estis la vera celo de la milito?

Tiu ĉi mapo montras, kie okazis la milito. Kie estis la bataalkampoj? La lokoj, kie militis la du landoj, estis nek en Japanio nek en Rusio, sed en Koreio kaj "Manĉurio" (nordorienta regiono de Ĉinio). Tio klare montras la karakteron de la milito. Nu, kial Japanio decidis militi kontraŭ Rusio? Legu la pretendon de Komura Jutaro, la tiama ministro pri eksterlandaj aferoj de Japanio.

Koreio estas duoninsulo, kiu, kvazaŭ akra klingo, etendiĝas de la kontinento al la centra parto de Japanio. La pinto tre proksime situas al la insulo Tsushima. Se potenca ŝtato okupus la duoninsulon, la sekureco de Japanio povus esti minacata. Japanio neniel povos akcepti tian situacion. Preventi la minacon estas japana politiko heredita de la pasinteco.

(Resumo el lia propono en 1903)

Tio estis farita duonjaron antaŭ la milito. Tiutempe Japanio mem ne estis sub danĝero de rusa atako. Sed Komura pretendis, ke Japanio devas anticipi okupi

Koreion, ĉar estos danĝere, se Rusio okupos Koreion. Laŭ Komura la milito fundamente koncernis la hegemonion pri Koreio.

Kion Japanio deziris fari pri Koreio?

En majo 1904 dum la milito, la japana registaro decidis jene:

Rezidigi japanan armeon en Koreio, meti la koreajn eksterlandajn aferojn kaj la financon sub la kontrolo de Japanio, akiri fervojojn, havenojn kaj aliajn trafikilojn, kaj poŝtan, telegrafan, telefonan kaj aliajn komunikilojn, sendi japanojn en agrikulturon, arbarkulturon, minindustrion kaj fiŝkaptadon, kaj tiel pligrandigi la rajtojn de Japanio pri ili. Ĉiujn ĉi aferojn la japana registaro firme decidis meti en sian politikon. Unuflanke militante kontraŭ Rusio, aliflanke Japanio antaŭenigis sian regpolitikon al Koreio.

Japanio akiru protektajn potencojn, kaj politikan kaj militan, super Koreio, kaj tiel celu ekonomie pli da koncesioj.

(Resumo el la ministrara decido)

Koreio kaj Ĉinio dum la Japano-Rusa Milito

Dum la Japano-Rusa Milito, Japano armeo forprenis teron de Koreio kiel teron por fervojoj kaj armeaj bazoj, kaj perforte liverigis per koreoj personojn kaj ĉevalfuraĝon por la milito. Kompreneble la korea popolo plifortigis sian kontraŭagadon. En septembro 1904 kelkiloj da koreoj insurekciis kontraŭ la rekvizicio por konstrui la fervojojn inter Seulo kaj Busan kaj inter Seulo kaj Uiju, kaj ili koliziis kontraŭ japanoj. Krom tio ofte okazis diversloke sabotaĵoj, tranĉado de telegrafaj dratoj kaj malhelpo al la fervoja konstruado. Fronte al tio la japana armeo fortigis sian kontroladon kaj subpremis la ribelajn movadojn. Dume, antaŭenigante la militon, la armeoj de Japanio kaj Rusio forprenis privatajn posedaĵojn kaj nutraĵojn tie kaj ĉi tie en Ĉinio. Pro la milito, en ĉinaj vilaĝoj domoj estis forbruligitaj, brutoj estis forrabitaj kaj kampoj por agrikulturaĵoj estis priŝtelitaj kaj detruitaj. Laŭ onidiro kelkdek mil homoj rifuĝis el diversaj lokoj de Fengtian (nuna Shenyang).

Japanio plifortigis sian imperiismon

La milito trudis grandan ŝarĝon ankaŭ al la japana popolo. Pro la Japano-Rusa Milito japanaj popolanoj estis amase mobilizitaj kaj peze impostitaj. Pli ol 1,080,000 soldatoj estis mobilizitaj, el kiuj pli ol 80,000 mortis kaj almenaŭ 380,000 estis vunditaj.

Tamen Japanio, kiu venkis Rusion, plifortigis sian tendencon al imperiismo, kaj celis plivastigi sian teritorion kaj influferon. Japanio ne nur akceptigis al Rusio la fakton, ke Japanio regu Koreion, sed ankaŭ gajnis la konsenton de Usono kaj Britio pri la regado super Koreio, kaj tiele firmigis sian grundon por koloniigi Koreion. Anstataŭ Rusio, Japanio akiris la rajton regi Lüshun kaj Dalian de "Manĉurio" kaj administri la Sudmanĉurian Fervojon, kaj komencis invadi la regionon de Nordorienta Ĉinio. En Japanio oni komencis havi fortan konscion, ke Japanio fariĝis unuaklasa potenca lando en la mondo.




*Japano armeo
pafmortiganta koreojn
kiuj malhelpis la
konstruadon de
fervojo (El "Korea
foto-albumo" de
Hakubunkan eldonita
20 junio 1905)*

Peco de Historio

Fukuzawa Yukichi (1834-1901)

"La civilizacio" pravigis la invadon

Komence de la moderna epoko, intelektuloj, kiuj spertis observan viziton al Usono kaj eŭropaj landoj kiel anoj de delegitaro aŭ kiel studentoj senditaj al tiuj landoj, informis japanojn pri la tiama stato de la mondo. La plej fama el ili estis Fukuzawa Yukichi. Li skribis en "Resumo de la argumento pri la civilizacio", eldonita en 1875, ke Okcidento estas civilizita, Azio estas duone civilizita kaj Afriko estas barbara. Li emfazis, ke Japanio devas civilizi sin, lernante de Okcidento kiel la modelo, ĉar la civilizeco evoluas de barbareco al duoncivilizeco, de duoncivilizeco al civilizeco. En 1881 li asertis, ke Japanio estas la centro de Azia civilizacio kaj la gvidanto de la Oriento, tial ni devas protekti Azion, kaj se Koreio ne akceptos civilizacion, ni devas perforte civilizi ĝin kaj haltigi la invadon de la Okcidento. Sed ĉe la registara krizo de Koreio en 1884 malsukcesis la ribelo de la reforma partio. En 1885 li skribis faman artikolon titolitan "La argumento pri el-Aziigo". Ĝi asertis, ke de nun Japanio ne civilizu Azion, sed rompu la interrilaton kun Azio kaj ĝin subigu, same kiel okcidentaj landoj faras. Post dek jaroj, kiam eksplodis la Ĉina-Japana Milito, li skribis, ke la milito estas milito de civilizacio (Japanio) kontraŭ barbareco (Ĉinio). La opinio pri civilizacio multe influis la rigardon de Fukuzawa pri Azio. Lia opinio estis ankaŭ la opinio de la moderna Japanio.



Fukuzawa Yukichi,
"Resumo de la
argumento pri la
civilizacio"

Kim Ok-Gyun (1851-1894) la gvidanto de la Politika Evento de 1884

Kim Ok-Gyun (1851-1894) estis korea tipa movadanto por reformado, kiu aktivis en la jaroj 1880-1890. De post sia juneco, li estis influita de la penso pri klerigo, kiu asertas la malfermon de la ŝtata pordo. Kiam li vizitis Japanion por la unua fojo en 1881, li estis forte impresita de ĝia evoluinta aspekto post la Meiji-Restaŭro. Kaj li pensis, ke ankaŭ Chosun devas akcepti okcidentan modernan civilizacion kaj reformi la landon.

En 1884, li provokis la Politikan Eventon de 1884 kaj asertis, ke oni "abolu la familian devenon kaj leĝigu la egalajn rajtojn de la popolo", "punu putrajn ŝtatoficistojn kaj reformu la politikon". Post la malsukceso de la ŝtatrenverso, Kim Ok-Gyun rifuĝis al Japanio kaj tie li daŭrigis sian aserton pri la reformado de Chosun. Iam antaŭe li prezentis al la reĝo la apelacian skribon por interŝanĝo inter okcidentaj potencaj landoj kaj por reformo de la enlanda politiko.

Kim Ok-Gyun pensis, ke alilanda helpo estas necesa por la reformo pro la enlanda cirkonstanco. Sed eĉ post la rifuĝo al Japanio, li ricevis nenian helpon tie. En la jaro 1894, fine li iris al Ŝanhajo por peti helpon de Li Hongzhang, kiu estis ĉina potenculo tiutempe. Sed Kim Ok-Gyun estis murdita de la koreo, kun kiu li iris al Ŝanhajo. Sed, eĉ se li renkontus Li Hongzhang, ĉu Li Hongzhang helpus lin laŭ lia volo?



Kim Ok-Gyun

Li Hongzhang (1823-1901) la gvidanto de la Okcidentiga Movado

Li Hongzhang estis grava politikisto kaj diplomato en la lastaj jaroj de la Qing-dinastio. Li funkciis kiel gubernatoro de Zhili kaj ministro de nordaj aferoj dum 25 jaroj, partoprenis en la decido de serio da internaj kaj eksteraj, ekonomiaj kaj militaj aferoj. En kontaktado kun eŭropaj kaj amerikaj landoj kaj Japanio li konsciis la gravecon lerni sciencojn, teknikojn kaj militajn aferojn de la okcidentaj landoj, tial li fariĝis unu el la gravaj personoj de la Okcidentiga Movado kaj fondis la plej fortan okcidentigan grupon. Li elmetis la teorion pri mara defendo kaj iniciatis konstrui modernan mararmeon. Li estis la fondinto de la Norda Floto. Li proponis la diplomatian taktikon "turni fremdlandon kontraŭ fremdlando", kiam Ĉinio estis ĉirkaŭita de la potencoj, kaj deziris akiri pli longan tempon por la Okcidentiga Movado de Ĉinio. Post la Ĉina-Japana Milito en 1894-1895, pro premado de Japanio, lia diplomatia taktiko turniĝis al amikiĝo kun mondaj potencoj. Komence li volis koalicii kun Rusio kontraŭ Japanio, sed poste rimarkinte ke Rusio avidas la Nordorienton de Ĉinio, li turnis sin al amikiĝo kun aliaj potencoj por kune kontraŭstari al Rusio. Li estis lerta en diplomatio, traktis multe da diplomataj aferoj, sed ankaŭ subskribis multe da malegalrajtaj humiligaj traktatoj.



Li Hongzhang

La Reformada Movado en la Tri Landoj

1. Japanio — la Movado por Libereco kaj Popolaj Rajtoj

La nova registaro de Japanio akcelis reformon por modernigo. Tamen la realan potencon tenis nur malmultaj politikistoj. Rigardu, kiel la popolo agadis kontraŭ tia situacio! Ni pripensu tion ankaŭ en rilato kun Azio.

Popolaj rajtoj kaj libereco — politikon en la manojn de la popolo!

Karaj! Mi volas diri ion al vi. Vi ĉiuj egale havas unu valoran trezoron. Kio estas la valora trezoro? Ĉu fortune-naska monujo? Ĉu oro? Ĉu arĝento? Ĉu diamanto? Ne, ne tia objekto! En la mondo estas unu pli valora trezoro. Tio estas la rajto esti libera. Ni ne povos akiri feliĉon nek komforton, se ne kreskos libereco kaj popolaj rajtoj. (Resumo el la libro Popolaj Rajtoj kaj Libereco)



Ueki Emori

Ĉi tio estas citaĵo el la unua parto de la libro, kiun verkis Ueki Emori en 1879. Li apelaciis al la legantoj pri la graveco partopreni en politiko kaj havi konstitucion por la popolo. Li pensis, ke la lando sekure evoluos ĝuste surbaze de libereco kaj la konstitucio.

De tiam, kiam li alvokis por tio, pli kaj pli leviĝis voĉoj alvokantaj por starigo de parlamento. Reprezentantoj de regionoj kolektiĝis en Tokio kun subskriboj kaj opinioj de la popolo, kaj ili postulis de la registaro starigi parlamenton. Parolad-kunvenoj okazis tie kaj ĉi tie. Multe da ĵurnaloj kritikis severe la registaron.

Disvastiĝis ankaŭ movadoj por fari projektojn de konstitucio. La popolo lernadis kaj plurfoje diskutadis, kaj preparis malnetojn de japana konstitucio. Ĝis nun restas ĉirkaŭ 70 tiamaj malnetoj de konstitucio. Unu el ili, la malneto de Ueki Emori, diras jene pri popolaj rajtoj:

La japana popolo havas liberecon pri ideologioj. La japana popolo havas rajton por libere okazigi kunvenojn. La japana popolo rajtas rezisti kontraŭ ĉiu ajn kontraŭleĝa aŭ maljusta ago. Kiam la registaro neglektas liberecon kaj rajtojn de la popolo spite la konstitucion, tiam la japana popolo rajtas renversi la registaron por rekonstrui novan.

(Resumo de "Malneto de Japana Konstitucio")

Tiaj malnetoj de konstitucio baziĝis sur la ideo, ke la popolo starigas ŝtaton ĝuste por

gardi siajn rajtojn kaj liberecon realigi sian feliĉan vivon.

En tia granda disvastiĝo de la movado por libereco kaj popolaj rajtoj, fine en 1881 la registaro estis devigita promesi starigi parlamenton post 10 jaroj. Tamen la registaro deklaris, ke ĝi sola faru la konstitucion, kaj pli kaj pli subpremis la popolan movadon. Popolaj movadoj kontraŭis la registaron, interalie fondante politikajn partiojn, sed ili malfortiĝis iom post iom.

Stagno kaj konvertiĝo de la Movado por Libereco kaj Popolaj Rajtoj

La movado celis ŝanĝi Japanion en landon de libereco kaj popolaj rajtoj. Sed ju pli la movado stagnis enlande, des pli fortiĝis la opinioj, ke oni rigardu eksterlanden, kaj Japanio plivastigu sian potencon eksterlanden. En Koreio okazis la Politika Evento de 1884, kaj tiam la ĵurnaloj de la movado forte riproĉis Ĉinion (la tiaman Qing-dinastion), kaj sencede insistis, ke Japanio batalu kontraŭ Ĉinio.

En la sekva jaro 1885 estis malkovrita eĉ plano fare de aktivuloj de la movado, ke ili eniru Koreion, mortigu potenculojn de Koreio kaj tiel rompu la rilatojn inter Koreio kaj Ĉinio. Profitante de la kontraŭstaro inter Japanio kaj Ĉinio, kiu sekvas la murdon, ili intencis realigi revolucion en Japanio. (Konspiro de Osaka)

*Monumento en
Jokohamo por la loko,
kie la konstitucio de
Japanio estis skribita.
Ito Hirobumi kun
du kancelarianoj
loĝis ĉi tie, kaŝite
en la gastejo, kie ili
skribis la malneton
de "La Konstitucio
de la Granda Japana
Imperio".*

Starigo de la Konstitucio de la Granda Japana Imperio

La registaro kaŝe preparis konstitucion, kaj en 1898 ĝi proklamis la Konstitucion de la Granda Japana Imperio, kiel "donitan" de la Tennoo. Ĝi estis tute malsama ol tiuj de Ueki kaj aliaj aktivuloj de la movado, ĉar ĝia modelo estis, interalie, la konstitucio de Prusio (Germanio), kies monarko havas grandan potencon. Ĝi deklaris, ke la Tennoo estu la supera potenculo pri politiko kaj milito, sed male la popolo havu nur limigitajn liberecon kaj rajtojn. Tiel la Tennoa registaro de Japanio firmigis sian reĝimon, kaj efektive ekmarŝis la vojon de ekspansio en Azion.



2. Ĉinio — la Reformado de la Qing-Dinastio kaj Yihetuan-Movado

Post la Ĉina-Japana Milito en 1894-1895 la okcidentaj potencoj unuj post aliaj eksportis kapitalon al Ĉinio, konkurencis pri rajtoj pri fervoja konstruado, mineja ekspluatado, perforta okupo de koncentritaj kvartaloj kaj determino de la influferoj. Ĝuste kiel jena mapo pri la situacio montras. Ĉinio estis dispecigita kaj ŝajnis pereanta. Do kiel sin tenis la diversaj socitavoloj de Ĉinio en tiu kriza situacio?

La ĉefa enhavo de la nova politiko en la reformado:

Eksigi superflujajn mandarenojn kaj aŭskulti la popolan voĉon.
Protekti agrikulturon, industrion kaj komercon, reformi la financon.
Praktiki devigan rekrutigan sistemon kaj fondi novan armeon.
Funkciigi lernejojn pri ĉinaj kaj okcidentaj scioj.
Establi ĵurnalajn redakciojn, tradukan buroon kaj sendi junulojn eksterlanden por studado.

La Reformado de 1898

Post la Ĉina-Japana Milito en 1894-1895, Kang Youwei, unuiĝinte kun aliaj intelektuloj, faris peticion al la imperiestro Guangxu kontraŭ subskribo de la Traktato de Shimonoseki. Post tio li kune kun Liang Qichao kaj aliaj reformistoj organizis societojn, kaj eldonis ĵurnalon, pledante por politika kaj ekonomia reformado de supre malsupren. Precipe post kiam Germanio okupis la Jiaodong-golfon de Shandong kaj Rusio arbitre pruntis Lüshun kaj Dalian, ili elmetis la sloganon “Savu la nacion el perejo”. La imperiestro Guangxu akceptis la proponon de la reformistoj kaj publikigis edikton en 1898 pri apliko de novaj gvidlinioj pri

politiko, ekonomio kaj kulturo. Tio montris, ke la reformistoj jam fariĝis politikaj fortoj kun klara politika tendenco kaj kaŭzis teruron ĉe la manĉuraj kaj hanaj burkatoj. Pro timo, ke la reformado malutilos al iliaj interesoj, la konservativa sekto kun la imperiestra patrino Cixi kiel la ĉefo ĝin subpremis. Ili malliberigis la imperiestron Guangxu, murdis Tan Sitong kaj aliajn 5 famajn reformistojn, kaj Kang Youwei kaj Liang Qichao devigite forfuĝis al Japanio. La reformado daŭris nur 103 tagojn kaj estis sufokita.



Karikaturo: Urso kaj aglo dividas Ĉinion.

La Yihetuan-movado kaj agreso de la Ok-potenca Alianca Armeo al Ĉinio

Kun la agreso de la okcidentaj potencoj al Ĉinio la kristanisma predikado pli kaj pli vastiĝis en Ĉinio, kio faris kolizion kun la tradicia ĉina kulturo. Iuj misiistoj tre arogantaj akiris la konflikton kun la popoloj de Ĉinio, kaj en multaj lokoj leviĝis batalo kontraŭ la okcidenta religio. Aŭtune de 1898 la popolo en Shandong organizis la societon Yihetuan kontraŭ fremdlandanoj kaj okcidenta religio kaj elmetis la sloganon “Por Qing kontraŭ fremdlando”, atakis fremdlandajn preĝejojn en diversaj lokoj de

Ĉinio. La movado iom post iom disvastiĝis al la politika centro Pekino kaj Tianjin. Dezirante kontraŭstari la okcidentajn potencojn per la fortoj de Yihetuan, la registaro de la Qing-dinastio eĉ sendis armeojn al Yihetuan por kune bruligi preĝejojn kaj ataki alilandajn ambasadorejojn. Sekve la alilandaj ambasadorejoj atakitaj unu post alia petis helpon de siaj hejmlandoj.



Subskribado de la Traktato de 1901. Maldekstre en la foto sidas la senditoj de la 11 potencoj kaj dekstre la delegitoj de la Qing-registaro, Yikuang (antaŭe) kaj Li Hong-zhang (malantaŭe)

Junie de 1900 Britio, Germanio, Rusio, Francio, Usono, Japanio, Italio kaj Aŭstrio kune organizis aliancan armeon kaj konkeris Pekinon. En la alianca armeo la japanaj militistoj estis la plej grandnombraj. La imperiestra patrino Cixi, kiu tenis la regpotencon de la registaro, haste fuĝis okcidenten, kiam la alianca armeo proksimiĝis al Pekino, kaj ordonis ekstermi Yihetuan, kio fiaskigis la kontraŭ-imperiisman batalon. La militistoj de la alianca armeo barbare murdis, rabis kaj incendiis en Pekino. Ili forrabis multege da riĉaĵoj kaj devigis la registaron de la Qing-dinastio subskribi la Traktaton de 1901. La traktato difinis, ke Ĉinio kompensu la 8 potencojn per 450 milionoj da taeloj da arĝento (tio signifas, ke ĉiu ĉino pagu unu taelon da arĝento), fondu ambasadorejan kvartalon en Pekino, gardotan de soldatoj de la koncernaj landoj, kaj permesu al la fremdlandaj trupoj garnizoni en multaj lokoj de Ĉinio. Por Ĉinio tiuj kondiĉoj estis tre severaj.


La novaj politikoj de la Qing-dinastio

Komence de la 20-a jarcento la regantaro de la Qing-dinastio finfine konsciiĝis pri la grandaj fortoj en- kaj eksterlandaj por reformado. Por daŭrigi sian regadon, la kortego decidis plenumi novajn direktivojn ekde 1901, tio estis la pluapaŝa reformado surbaze de la Reformado de 1895. Ĝia ĉefa enhavo estas: 1. reorganizi la nacidefendan ministrejon kiel terarmean ministrejon, asigni grandan monsumon por elimini la malnovan armeon kaj starigi novan armeon per la okcidentaj milit-strategiaj teorio kaj principoj; 2. fondi komercan ministrejon por prosperigi komercon kaj premii industrion, permesi kaj kuraĝigi liberan disvolviĝon de privata kapitalismo, levi la politikan kaj socian pozicion de la nacia burĝaro; 3. aboli la ŝtatan ekzamenan sistemon kaj fondi novajn lernejojn, sendi studentojn alilanden, kaj legalizi la studon kaj disvastigon de la naturaj kaj sociaj sciencoj; 4. reformi la ŝtatoficistan sistemon kaj ordigi la oficistigan sistemon.

Iuj el la supre menciitaj direktivoj utilis ne nur al la disvastiĝo de la demokratia revolucia penso kaj kulturo kaj disvolviĝo de la nacia kapitalismo, sed ankaŭ stimulis la okazigon de la Revolucio de 1911 kaj akcelis la pereon de la Qing-dinastio.

3. Koreio — la Terkulturista Milito kaj la Sendependiga Movado

En la lasta duono de la 19-a jarcento, multe da korupto kaj maljusto pli kaj pli implikiĝis en la korea socio. Ekstere, la imperiismaj potencoj forte premis Koreion tagon post tago.



La kriego de terkultivistoj — la Terkulturista Milito en 1894

En 1894 okazis granda insurekcio en la provinco Jeolla-do, sud-okcidenta parto de la korea duoninsulo. Komence la gvidantoj de la terkulturista armeo Jeon Bong Jun, Kim Gae Nam, Son Hwa Jung pligrandigis sian forton utiligante la religian organizaĵon Donghak. La anoj de Donghak, kies ideo estas ke ĉiu persono estas tiel kara kiel Dio, multiĝis je la disvastiĝo de espero al sendiskriminacia mondo.

Jeon Bong Jun ekribelis kune kun la amasiĝintaj terkultivistoj en 1894. Kvankam la registaro de Chosun taĉmentis armeon, la terkulturista armeo okupis la urbon Jeonju, kiu estas la centro de Jeolla-do, trakurinte plurajn regionojn. Tiam Qing-dinastio taĉmentis armeon al Chosun. Ĉe la taĉmentado ankaŭ Japanio tuj sekvis sammaniere, kvazaŭ ĝi atendis tion.

Zorgante la intervenon de eksterlandoj la registaro de Chosun kaj terkulturista armeo interkonsentis, ke ili ne kontraŭu unu la alian, sed kune korektu la maljustan politikon.

La terkulturista armeo mem fondis lokajn aŭtonomajn organizaĵojn en la provincoj Jeolla-do kaj Chungcheong-do. Tie la terkulturista armeo punis koruptitajn ŝtatoficistojn kaj fifamajn nobelojn, kaj ankaŭ reformis la maljustan impost-sistemon.

En julio, japana militistaro enveninta en Seulon okupis la palacon de Chosun kaj komencis ataki la armeon de Qing. Tiukaze la reform-tendencaj burokratoj akiris potencon. Ili parte akceptinte la postulon de la terkultivistoj provis aboli la sklavecon kaj ŝtat-oficistan ekzamenon kaj reformi la maljustan impost-sistemon ktp. Sed la intermiksiĝo de Japanio tiel fortiĝis, ke oni ne povis sufiĉe plenumi la aferojn.

La terkulturista armeo ekribelis kontraŭ Japanio. Ĉi-foje oni leviĝis en diversaj lokoj en la tuta lando, Geongsang-do, Gangwon-do, Hwanghae-do. La ordono de Donghak subtenis ĝin. En novembro, sturmante Seulon, la terkulturista armeo multfoje batalis

kontraŭ japana kaj siaŝtata armeoj. Sed la armeo ne povis venki la japanan, kiu sin provizis per modernaj bataliloj. Tiam pereis kelkdek mil terkulturistaj armeanoj.

Korea Imperio kaj la politika reformada movado de Sendependiga Asocio

En 1897 la registaro de Chosun ŝanĝis la nomon al Daehanjeguk (Granda Korea Imperio) kaj memvole antaŭenpuŝis sian politikan reformon. La registaro de Korea Imperio starigis lernejojn, trejnigis armeon, kaj evoluigis komercon kaj industrion. Ĝi, esplorinte la terposedantojn tra la lando, donis la koncernajn dokumentojn.

La popoloj forte postulis reformi la socion. En 1896 kleruloj kaj reformemaj oficistoj de la ŝtato fondis Sendependigan Asocion, starigis Sendepend-Pordegon (Dongnipmun), kaj eldonis Sendependigan ĵurnalon (Dongnipsinmun).


En 1898 la anoj de Sendependiga Asocio kaj civiluloj fojfoje kunsidis kaj mallaŭdis la fremdlandajn potencojn, kiuj perforte forprenis profitdonajn rajtojn de Chosun. Kaj ili postulis pligrandigi la bazan rajton de la popolo. Ili provis fondi parlamenton kaj partopreni la politikon.

La Ses Reformoj, kiujn popol-komunumo postulis de la registaro en 1898

1. Sendepende de eksterlandoj, la registaro kaj popolo unuanime kunlaborante firmigu la rajton de sia imperiestro.
2. Kiam registaro kontraktas aŭ faras traktaton kun eksterlandoj pri profitdonaj rajtoj, ĝi plenumu nur la aferojn, kiuj estas subskribitaj de la rilatataj ministroj kaj la kabineto.
3. La ministrejo de financaj aferoj administru la ŝtatan financon kaj publikigu la buĝeton kaj bilancon de la ŝtato.
4. Gravajn krimulojn oni juĝu publike, tamen protektante iliajn homajn rajtojn.
5. Por nomumi altrangajn ŝtatfunkciulojn, oni demandu de ŝtato kaj konsideru la opiniojn de plimultaj personoj.
6. Nepre plenumu la difinitajn kondiĉojn.

La Korea Imperio ne akceptis ilian postulon, sed malfondis la Sendependigan Asocion. Poste, la registaro de Korea Imperio povis reformi nur la imperian familion. Tion pli multo de la popoloj ne plu subtenis.

Venkinte en la Ĉina-Japana Milito (1894-1895), Japanio fortigis sian influon en Koreio. En Koreio, la Sendependiga Asocio movadis por vera sendependiĝo de la nacio kaj reformo. Dongnipmun (Sendependiĝ-Pordego) estas konstruita kaj Dongnipsinmun (Sendependiga Tagĵurnalo) ekeldoniĝis.



Peco de Historio



Nakae Chomin

Nakae Chomin (1847-1907) Japanio por "demokratia lando"

En Japanio estis filozofo konata kiel "Rousseau de Oriento". Li nomiĝis Nakae Chomin, kiu studis modernajn ideojn en Francio dum 1871-1874. Lia nomo "Chomin" estas plumnomo, kies signifo estas "plebanoj", kio montris lian sintenon stari por la popolo. Reveninte Japanion li tradukis verkojn de la franca filozofo Rousseau en la klasikan ĉinan lingvon, uzante konfuceanisman terminojn, por diskonigi la gravecon de demokratio, libereco kaj egaleco en Oriento.

En 1887 li verkis libron titolitan "Politika diskuto inter tri drinkemuloj". Tio estas fikcia rakonto, en kiu tri viroj nomataj "Sinjoro okcidento-sciencisto", "Bravulo de Oriento" kaj "Doktoro el suda maro", drinkante diskutas pri la estonta direkto de Japanio. La "Sinjoro" opiniis, ke Japanio fariĝu ideala demokratia lando kun libereco, egaleco, kaj paco, sed sen armeoj, kaj eĉ se iu malamika lando invadus Japanion, eĉ tiam oni rezistu sen armiloj. Kontraŭe la "Bravulo" kritikis, ke tio estas nur fantazia ideo, ĉar iu kruela lando invadus Japanion, se Japanio malhavis armeojn. Li insistis, ke Japanio havu armeon kaj ekonomian forton, fariĝu potenca lando, kaj invadu la ĉinan kontinenton.

Tiuj du akre kontraŭstarantaj opinioj certe havas diskutindajn punktojn gravajn ne nur en la tiama cirkonstanco, sed ankaŭ por prilumi la postan direkton de Japanio aŭ konsideri eĉ la nunajn demandojn de Japanio.

Kang Youwei (1858-1927) Deziro pri reformado kaj malsukceso

Kang Youwei estis la unua persono en Ĉinio, kiu proponis efektivi reformadon de la reĝimo de supre malsupren. Li naskiĝis en Nanhai, Guangdong-provinco, vojaĝis al Hongkong kaj Ŝanhajo. Konatiĝinte kun la okcidenta civilizacio, li komencis legi okcidentajn eldonaĵojn kaj ekvolis fari reformadon de la reĝimo. Post la subskribo de la Traktato de Shimonoseki, li prezentis kune kun 1300 intelektuloj partoprenintaj la ŝtatan



Kang Youwei

ekzamenon por oficistiĝo, peticion pri tio, ke la imperiestro senprokraste publikigu edikton pri reformado: lerni de la Okcidento, reformi la politikon, starigi lernejojn kaj disvolvi industriojn kaj komercon. Li ankaŭ konigis al la imperiestro la reformon de Rusio kaj Japanio. La imperiestro ordonis al Li Hongzhang kaj aliaj korteganoj aŭskulti liajn opiniojn. Kune kun Liang Qichao, li sin okupis pri eldono de ĵurnaloj kaj fondis la societon "Qianxuehui", por plifortigi la reformistaron.

Sed post fiasko de la reformado, li fuĝis al Japanio kaj distrumpetis pri konstitucia monarkio, oponis la revolucion celantan renversi la feŭdisman aŭtokration de la Qing-dinastio kaj fariĝis fama rojalisto. Kiam komenciĝis la burĝa revolucio Kang Youwei persistis plue en reformado kaj staris kontraŭ la revolucio.

Gvidantoj de la Donghak terkulturista milito

La gvidantoj de la terkulturista milito en 1894 estis Jeon Bong Jun (1855-1895), Kim Gae Nam (1853-1894) kaj Son Hwa Jung (1861-1895). Ili ĉiuj, naskitaj en najbaraj vilaĝoj, estis Yangbanoj, tamen ilia situacio similis al tiu de terkulturistoj. Ili ne povis elteni la indignon pri la socio plena de korupto kaj zorgis la nacian krizon kaŭzitan de la eksterlandaj invadoj. Ili partoprenis Donghak-organizaĵon por plenumi sian deziron.

Ili deziris sukcese revolucii per Donghak-organizaĵo. En 1894 ili leviĝis por realigi siajn revojn korekti la diskriminacian kaj koruptitan socion, kaj ke terkulturistoj estu feliĉaj en la mondo.

Tiam Koreio estis en krizo pro la invado far Japanio. La ĉefo Jeon Bong Jun alvokis fari sian plejon por kontraŭstari Japanion. Sed la ribelantoj malvenkis en la batalo, kaj la gvidantoj pereis malsukcesinte plenumi sian deziron. La popolo bedaŭris la pereintojn kaj ilian malsukcesintan revon. Do ili faris kanton titolitan "Birdoj, birdoj, bluaj birdoj". La kanto furoris tra la lando, kaj estas heredita ĝis nun.

Birdoj, birdoj, bluaj birdoj
ne sidiĝu sur la kampo de verdaj pizetoj.
Se falus la floroj de verdaj pizetoj,
plorante forirus la vendisto de gelato el verdaj pizetoj.

Jeon Bong Jun estis tiel malalta ke oni ame nomis lin "Nokdu-Janggun" (Generalo Verda Pizeto). Ni povas kompreni, ke per la kanto oni kantis pri la malĝojo de la malsukcesinta terkulturista milito.



Jeon Bong Jun

Vivo kaj Kulturo de la Popoloj en la Tri Landoj

1. Ŝanĝiĝo de la Korea Socio kaj la Popolo

Koreio akceptis okcidentan kulturon ekde la lasta duono de la 19-a jarcento. Kiel la vivon de la popolo ŝanĝis la korea modernigo, kiu okazis dum la invado kaj interveno de eksterlandoj?

La suna kalendaro estis adoptita

Kalendaro de la naŭa monato de 1908 laŭ la luna kalendaro


La registaro de Chosun proklamis, ke la 17-a tago de la 11-a monato en 1895 laŭ luna kalendaro estas la 1-a de januaro en 1896 laŭ la suna. La registaro oficiale adoptis la


jaron laŭsunan. Samtempe ĝi adoptis semajnan sistemon tradukitan el la japana maniero: 月, 火, 水, 木, 金, 土, 日 (lundo, mardo, merkredo, ĵaŭdo, vendredo, sabato, dimanĉo). Kvankam la registaro decidis uzi nur la sunan kalendaron, oni ne ĉesis uzi la lunan. Siatempo multaj koreoj persistis oferservi al siaj prapatroj en la tago laŭ la luna kalendaro, ĉar oni pensis, ke la animoj de prapatroj, kiuj mortis nesciante la sunan kalendaron, ne povus reveni en la ĝusta rito-tago. Post malpli ol unu jaro de post la ŝanĝo de la kalendaro sistemo, ankaŭ la registaro devis celebri la feston de la naskiĝtago kaj oferi riton al la prapatroj de reĝofamilio laŭ la luna kalendaro. Kompreneble la oficiala dokumento de la ŝtata adiministrado uzis la sunan kalendaron.

Japanio regante Chosun igis ĝin uzi la sunan kalendaron. Tamen oni obstine observis la tradicion laŭeble uzante la lunan kalendaron en la ĉiutaga vivo.

La lanĉo de tramo kaj trajno

En 1887 iniciatite de la registaro elektraĵ lampoj estis enkondukitaj en la palacon. En la lasta duono de la 1890-aj jaroj, Hanseong Elektrokompanio estis fondita kune kun usonano, kaj tramo estis lanĉita en Seulo. Tiam en la vagonoj troviĝis nur lignobenkoj sen eĉ fermaĵoj de la fenestroj. Do kiam pluvus, la pasaĝeroj en la vagono





*Elektrotramo ĉe
Chongro-haltejo, Seulo,
1900*

devis uzi ombrelon. Kaj vintre ili devis elteni malvarmon. Sed la tramoj tre interesis la publikon kiel vidindaĵo.

Dume sinsekvis pli-malpli grandaj akcidentoj. 5 tagojn post la lanĉo, iu 5-jara infano mortis pro akcidento de tramo. Kaj la japana kondukisto de la tramo forkuris. La kolera publiko pro tio forbruligis la tramon. Kaj foje rikiŝistoj, kiuj frontis malfacilon en sia vivteno pro la tramo, malhelpis la veturadon.

Imperiismaj potencoj konkuris unu kun la aliaj pri koncesio je fervojoj en Chosun. Fine de 1896, Usono kaj Francio akiris la koncesion pri la fervojoj Geongin-linio kaj Geongui-linio; en 1898 Japanio tiun de la Gyeongbu-linio. Poste Japanio akaparis ankaŭ tiujn de la Gyeongin-linio kaj Geongui-linio. En septembro 1899, japana kompanio lanĉis la fervojon inter Seulo kaj Inchon, kiu estis la unua fervojo en Chosun. Tiam la rapideco de trajnoj estis 20-30 km hore. Tamen ŝajnis al la spektantoj, ke eĉ flugantaj birdoj ne povus ilin sekvi. Sed la veturkosto tro pezis por plejparto el la popolo. Multaj do ankoraŭ sin translokis perpiede. Kaj ankaŭ ŝarĝojn oni transportis per surakva trafiko. Pro tio, komence la trajna komerco malprofitis.

Lerni la mondon per ĵurnalo

En 1890 la unua privata ĵurnalo Dongnipsinmun (Sendependiga Ĵurnalo) estis fondita.

Nuntempe oni esperas, ke infanoj 7-8-jaraj lernas en nove starigitaj lernejoj. Sed estas malfacile lerni kaj instrui novan sciencon por plenkreskuloj, kiuj havas 20-30 jarojn kaj jam ne povis havi la okazon. Sen ĵurnalo la registaro kaj popolo ne povus scii la situacion de la socio. Per ĵurnalo oni ordigas moron, kaj ne nur scipovas eksterlandajn situaciojn, sed ankaŭ diversajn aferojn rilatantajn al komerco, medicino, higieno ktp. Do ĵurnalo gravas por efike civilizati personojn same kiel lernejo.

– La Sendependiga Ĵurnalo (la 17an de aprilo 1889)

*La Byukdol- ĵurnalo
raportas la alvenon
de Itōo, la Japana
General-Gubernatoro
en Koreio.*



La Sendependiga Ĵurnalo tiel klopodis instrui novan sciencan kaj sciigi ŝanĝon de la cirkonstanco al la publiko. La nombro de la abonantoj kreskis tagon post tago, kvankam trafika rimedo ne estis tiel evoluinta kaj la abonprezo estis sufiĉe alta. Troviĝas la rekordo, ke kiam unu ekzemplero de ĵurnalo estis liverita, ĝin transdonante legis 85 personoj. Speciale la publiko inkluzive virinojn povis facile legi ĝin, ĉar ĝiaj artikoloj estis skribitaj nur en Hangul (korea alfabeto), malsame ol antaŭe, kiam oni eldonis ĵurnalojn en ĉinaj ideogramoj. Oni aparte eldonis ankaŭ ĵurnalon en la angla lingvo por fremduloj en Chosun.

De post 1898 multiĝis la specoj de eldonataj ĵurnaloj. En 1905 la japana armeo venkinta en la Japana-Rusa Milito komencis cenzuri ĵurnalojn en Chosun. Sed ĵurnaleldonejoj rifuzis la ordonon de Japanio — t.e. anstataŭigi la malpermesitajn artikolojn per alia — kaj presis ilin inversiginte litertipojn, kiuj aspektis kiel blokoj amasigitaj unu sur la aliajn.

Japanio igis la registaron de Chosun proklami la "Leĝon de ĵurnaloj" por sisteme reglamenti la landon. Japanio konfiskis aŭ ĉesigis la eldonon de ĵurnaloj, kaj malpermesis ankaŭ la vendadon.

Artikolo 10: Antaŭ ol eldoni ĵurnalon, oni sendu 2 ekzemplerojn de ĉiu numero al la interna kaj rilatata registara instanco.

Artikolo 21: Se la Ministro pri Enlandaj Aferoj konstatas, ke iu ĵurnalo konfuzas la socian ordon aŭ malordigas la moron, oni povas malpermesi la vendadon kaj publikigon, konfiski kaj ĉesigi la ĵurnalon, aŭ malpermesi la eldonon.

— "Leĝo de ĵurnaloj" (julio 1907)


En 1910 Japanio perforte malpermesis ĉiujn ĵurnalojn escepte de la organo de la generala gubernatorejo de Chosun.

Lernejoj vekis nacian konscion de la popolo

Ekde la 1880-aj jaroj, moderna edukado komenciĝis kaj lernejoj estis fonditaj. La loĝantoj en Wonsan, kiu estis malfermita haveno, instruis al siaj gefiloj okcidentajn sciencojn por reciproke rilati kun japanoj. Ankaŭ la registaro starigis lernejojn por eduki la popolon per la okcident-tipaj sciencoj – la angla lingvo, aritmetiko ktp. Kaj fremdlandaj misiistoj fondis lernejojn por disvastigi kristanismon, kaj instruis la Sanktan Biblion kaj novan sciencon.

Oni aranĝis modernan eduksistemon per la Politika Reformado en 1894. Kaj laŭ la iniciato de la registaro, oni starigis diversformajn lernejojn, elementajn lernejojn, mezlernejojn, instruistajn lernejojn, fremdlingvajn lernejojn, medicinajn fakultatojn ktp. Ankaŭ civiluloj fondis privatajn lernejojn en multaj lokoj, kaj la registaro subtenis tion. Speciale klerigmovadoj entuziasmiĝis por starigi lernejojn pro la ideo, ke edukado plej gravas por grandigi la nacian forton. Privataj lernejoj mem eldonis lernolibrojn, kaj edukis la lernantojn pri nacia spirito kun la lecionoj, la naciaj lingvo kaj historio.

Studentoj legante ĵurnalojn diskutis pri civilizo kaj partoprenis en kunveno por mallaŭdi potencojn, kiuj rabis profitdonajn rajtojn. Oni kantis la kantojn komponitajn laŭ okcidenta melodio, gimnastis kaj sin ekzercis arme-maniere. Komence virinaj lernejoj spertis malfacilaĵojn en la varbado de lernantoj pro la konvencio, ke oni hezitis enirigi virinojn en la socion. Tial lernantinoj estis varbataj, kondiĉe de senpaga lernado kaj provizo per dormejo. La nombro de virinaj lernejoj pli kaj pli kreskis, ĉar vastiĝis la socia konscio, ke ankaŭ virinoj devas edukiĝi same kiel viroj, kaj ke de virinoj dependas la edukado de infanoj, kiuj repondekas pri la nacia estonteco. Sed decidinte regi Chosun, Japanio komencis reglamenti privatajn lernejojn, kiuj inspiris nacian spiriton al la lernantoj.



Pyongyang Daesung-Lernejo, 1907, emfazis nacian spiriton. En 1912, tuj post la unuaj ellernintoj, la lernejo estis perforte fermita.

2. Ŝanĝiĝo de la Ĉina Socio kaj la Popolo

Sekve de la invado de la okcidentaj potencoj en Ĉinion, la soci-kulturaj faktoroj de la okcidentaj landoj eniris en la ĉinan socion. Kiajn ŝanĝiĝojn alportis la kunfandiĝo de la ĉina kaj okcidenta kulturoj al la ĉina popolo kaj ĝia kulturo?


Ekprospero de la komercaj urboj

De post kiam Ĉinio devigite malfermis havenurbojn, iom post iom ili fariĝis komercaj centroj inter ĉinoj kaj eksterlandanoj kaj pli kaj pli prosperiĝis. Inter ili estis koncesioj specialaj por alilandaj komercistoj. Tie funkciis multe da vendejoj, kolektiĝis ĉinaj kaj alilandaj komercistoj. Tien iris ankaŭ multe da komercistoj kaj popolanoj el la najbaraj lokoj. La urboj Ŝanhajo, Tianjin, Wuhan k.a. disvolviĝis rapide pro la facila trafiko. Fine de la 19-a jarcento en ĉiu el tiuj tri urboj vivis centmiloj da loĝantoj, kaj la loĝantaro de Ŝanhajo nombris pli ol milionon.

En tiuj urboj stariĝis te-trinkejoj, teatroj, drinkejoj, opi-fumejoj, bordeloj kaj aliaj amuzejoj. Sole en Ŝanhajo funkciis miloj da tiaj amuzejoj. La urbaj kaj komercaj sociaj rilatoj, la vivmanieroj de konsumado kaj distrado elkulturis la plej fruajn modernajn burĝojn de Ĉinio.

Populariĝo de la okcidenta kulturo kaj eduka reformado

Por disvastigi kristanismon en Ĉinio, la okcidentaj misiistoj starigis preĝejojn kaj lernejojn kaj en iuj urboj, eĉ fondis tradukeldonejon. Malgraŭ tio, ke ili disvastigis la



*La Ĉefurba (Pekina)
Universitato, fondita en
1898*

religion kun propra celo, tamen kun ilia energia predikado populariĝis en Ĉinio ankaŭ la modernaj okcidentaj sciencoj, teknikoj kaj kulturo. Okcidentigaj ŝtatifacistoj fondis en Pekino lernejon por instrui fremdajn lingvojn kaj okcidentajn sciojn. En Ŝanhajo, Kantono, Tianjin, Fuzhou, Nankino, Wuhan kaj aliaj lokoj oni starigis lernejojn pri fremdaj lingvoj, ŝipkonstruado, telegrafio, mineralogio, mararmeo kaj terarmeo, kiuj elbakis la plej fruajn ĉinajn diplomatajn, teknikajn personojn kaj militistojn. En 1898 en Pekino fondiĝis la Ĉefurba Universitato. Ĝi estis la unua ŝtata universitato de la moderna okcidenta eduka sistemo, origino de la hodiaŭa Pekina Universitato.

Por pli rapide kaj pli bone elkulturi personojn kun okcidentaj teknikoj, ekde 1870 la kortego de la Qing-dinastio sendis studentojn eksterlanden. Tiuj homoj, studintaj dum jaroj alilande, revenis Ĉinion kaj fariĝis kompetentaj homoj en diversaj kampoj. Zhan Tianyou, kiu faris elstarajn kontribuojn al la fervoja konstruado de Ĉinio, estis unu el ili. Ekde 1876 la ĉina registaro sendis arojn da junaj studentoj al Eŭropo por lerni tie militarton kaj ŝipkonstruadon. Inter ili estis Yan Fu, kiu poste fariĝis elstara pensulo kaj tradukisto, kaj Liu Buchan, kiu poste fariĝis eminenta mararmea komandanto.

Post kiam la kortego de la Qing-dinastio ekpraktikis novajn politikojn, ĝi ordonis, ke tra la tuta lando oni starigu novtipan lernejon kun la sama lernosistemo, kiu konsistas el infanĝardeno, elementa, meza kaj alta lernejoj, kaj ties lernobjektoj decidiĝu imite eksterlandan lernejon. En 1909 en la tuta lando jam funkciis 60 mil diversnivelaj lernejoj, el kiuj estis 540 superaj lernejoj, fakaj kolegioj kaj diversnivelaj instruistaj lernejoj. En tiuj lernejoj lernis entute 1.6 milionoj da studentoj. Dank' al tio Ĉinio ekhavis modernan nacian edukan sistemon kaj la ĉina popolo ekhavis pli da ŝancoj ricevi modernan edukadon.

Konforme al tio, aperis senprecedenca tajdo studi alilande. En la 10 jaroj antaŭ la pereo de la Qing-dinastio pli ol 20 mil studentoj lernis alilande, el kiuj 90% studis en Japanio. El tiuj studentoj lernintaj alilande aperis aro da eminentaj personoj en politiko, militaj aferoj, industrio kaj kulturo. La famuloj en la moderna Ĉinio Cai E, Lusin, Chen Duxiu, Li Dazhao, Jiang Jieshi (Ĉjang Kajŝek), Zhou Enlai kaj aliaj senescepte lernis en Japanio.

Rekomendo de la registaraj funkciuloj pri la bezono de Okcidenta Lernejo

Laŭ japanaj ĵurnaloj, Japanio nun havas milojn da fakuloj kiuj povas manipuli vaporŝipojn kaj diversajn maŝinojn, kaj kelkcentojn da inĝenieroj kiuj bone scias pri ĥemio, mineralogio kaj maŝinfabrikado. Nia lando estas 10-oblo de Japanio sed homoj trejnitaj en okcidentaj lernejoj nombras malpli ol duonon de tiuj en Japanio. Se io okazas al la mararmeo, al ni severe mankos homforto.


— El "Ekzameno" de Zheng Guanying, 1884

Kreskado de modernaj ĵurnaloj kaj sociaj opinioj

Meze de la 19-a jarcento en Ĉinio aperis ĵurnaloj, kiuj portis plejparte komercajn informojn, ĉinajn kaj alilandajn novaĵojn, kies legantoj plejparte estis kleraj urbanoj kaj komercistoj. La plej fruaj ĉinlingvaj ĵurnaloj estis eldonitaj de fremdlandanoj, kiuj vivis en Ĉinio. Tiuj ĵurnaloj spegulis ĉefe la interesojn de fremdlandanoj en Ĉinio. Tamen por plaĉi al la ĉinaj legantoj, ili portis ankaŭ komercajn kaj sociajn informojn utilajn al ĉinaj komercistoj, okcidentajn sciojn kaj kontribuadojn de ĉinoj, ekz. la Ŝanhaja Ĵurnalo (Shenbao) eldonata de brita komercisto, havis ĉinan redaktoron kaj portis ĉefe eseojn kaj komentariojn de ĉinaj intelektuloj kaj komercistoj kaj opiniojn de ĉinaj civitanoj. Ĝi estis la ĉinlingva ĵurnalo plej ŝatata kaj plej multe legata de ĉinoj de la 70-aj jaroj ĝis la Ĉina-Japana Milito en 1894-1895.

Samtempe kun tio ankaŭ iuj ĉinoj komencis eldoni ĵurnalojn, lerninte de eŭropanoj. En 1858 en Hongkong naskiĝis “Zhongwai Xinbao”, la unua moderna ĵurnalo eldonita de ĉinoj. Post la Ĉina-Japana Milito en 1894-1895 reformistoj eldonis dekojn da ĵurnaloj en diversaj lokoj de Ĉinio por propagandi reforman ideologion kun la celo potencigi la nacion per reformado. Ĵurnaloj raportis reformplanojn kaj artikolojn distrumpetantajn reformadon. Dank’ al ili formiĝis fortaj publikaj opinioj, kiuj havis gravan influon en la popolamaso. Tio estis forta inica movado por vekti la popolon. Oni komentariis, ke eĉ stultuloj vigliĝos kaj eĉ larmos, legante tiujn artikolojn.

Fervojo en Ŝanhajo



Vaporŝipoj kaj trajnoj

Post 1860 okcidentaj komercistoj kaj la ĉina registaro fondis vaporŝipkompaniojn kaj aĉetis vaporŝipojn por transporti pasaĝerojn kaj varojn. De tiam oni povis vojaĝi per komforta kaj rapidkura ŝipo kaj ne plu penigis longdistancaj vojaĝoj. Post nelonge en Ĉinio aperis ankaŭ fervojoj kaj trajnoj. En 1865 angloj konstruis fervojon 500 m. longan en Pekino por mallarĝtraka vagonaro. Sed tiutempe oni rigardis tion kiel monstraĵon kaj leviĝis diversaj onidiroj, de kiuj oni multe maltrankviliĝis. La registaro do ordonis malkonstrui ĝin. En 1876 en Ŝanhajo angla komercisto konstruis alian fervojon ĉe Wusong kaj per ĝi oni transportis pasaĝerojn. Tio estis tre bonvenigata en Ŝanhajo. En nur unu jaro la vagonoj transportis 160 mil homojn. Tamen post nelonge la registaro de la Qing-dinastio ĝin aĉetis kaj malkonstruis.

Post 1880 fine ankaŭ la registaro de la Qing-dinastio komencis konstrui fervojojn. En 1881 ĝi konstruis 9 km longan fervojon de Tangshan ĝis Xugezhuang, kiu poste etendiĝis al Tianjin, kaj alinomiĝis kiel fervojo de Tianjin ĝis Tanggu. En 1905 la registaro komisiis al Zhan Tianyou konstrui fervojon de Pekino al Zhangjiakou 180 km longan. La fervojo devis trairi montaron. Zhan faris esploradon plurfoje kaj decidis konstrui V-formajn liniojn sur montodeklivoj kaj per du lokomotivoj tiri la vagonaron, kaj fine sukcesis konstrui la unuan ĉinan fervojon de Pekino ĝis Zhangjiakou aŭguste de 1909.

La vaporŝipoj kaj trajnoj mallongigis la geografian distancon kaj tre faciligis la vojaĝojn kaj varinterŝanĝon. Tio multe utilis al vastigo de la homaj vidkampoj kaj agadspacoj kaj la homa idearo fariĝis pli malferma.

Horloĝoj kaj elektraj lampoj

Pro ekstera komerco diversaj horloĝoj estis importitaj en Ĉinion kaj oni konkure aĉetis ilin. En iuj komercaj urboj la horloĝoj fariĝis ĉiutagaj bezonaĵoj de la popolanoj kaj oni ne plu observis la antaŭan tradicion juĝi la tempon laŭ sunleviĝo kaj sunsubiro kaj alkutimiĝis kalkuli horojn laŭ horloĝo, kio multe levis la laborefikon.

De post 1860 en Ŝanhajo kaj aliaj komercaj urboj aperis gaslampoj. Super iuj komercaj stratoj kaj en iuj amuzejoj vespere brilis tiaj lampoj. Pro la senprecedenca brileco oni nomis tiajn urbojn sennoktaj urboj. En 1882 en Ŝanhajo aperis elektra lampo pli brila, pli magia kaj pli sekura ol gaslampo. Kaj por la urbanoj rigardi elektrajn lampojn en la nokto fariĝis agrabla amuzo. La novaj lumigiloj faris la noktan agadon pli facila kaj pro tio oni ŝanĝis la malnovan kutimon ekagadi je la sunleviĝo kaj ekriprozi je la sunsubiro.

3. Ŝanĝiĝo de la Japania Socio kaj la Popolo

Kune kun la nova epoko la okcidenta civilizacio envenis en la japanan socion. Kiel ŝanĝiĝis la popola vivo rezulte de tio? Kaj kiel ĝi rilatis al la politiko de la registaro?

Tempofluo ŝanĝiĝis

En la jaro 1872 la nova registaro deklaris, ke Japanio ĉesigos la aplikon de la ĝistiamaj kalendaro (luna kalendaro) farita laŭ la lunmoviĝo, kaj ŝanĝos ĝin al la suna kalendaro farita laŭ la sunmoviĝo, kiun okcidentaj landoj uzas. Kaj oni difinis, ke tago konsistas el 24 horoj kaj semajno el 7 tagoj. Tutlande oni ekhavis novan komunan horon. Tio multe ŝanĝis la kalendaron kaj la tempodividon, sur kiuj baziĝis la popola vivo.


Ĝis tiam, kiel gravajn festojn en ĉiu jaro, la popolo festis sezonajn festotagojn (la 3an de marto, la 5an de majo, la 7an de julio, ktp), kiuj estis enkondukitaj el Ĉinio. Sed la nova registaro anstataŭigis ilin per novaj festotagoj, kiuj konsistis ĉefe el la festotagoj de Tennoo kaj ties familio. La ĉefaj estis la tago de la surtroniĝo de la Tennoo Jimmu (la unua Tennoo laŭ mito) kaj la naskiĝtago de Tennoo.

Sed la malnova kalendaro kaj ties festotagoj funde rilatis al la terkulturo kaj la moroj, kaj tial ili longe restadis en iuj regionoj.

Fervojo kaj popola transmoviĝo

En la jaro 1872, la unua fervojo en Japanio ekfunkciis inter Shinbashi en la ĉefurbo Tokio kaj la havenurbo Jokohamo. Ĝis tiam oni piede iris dum ĉirkaŭ 10 horoj, sed nun oni povis traveturi la distancon en 53 minutoj. Oni uzis ĝin kun miro pro la rapideco kaj la oportuneco. Post tio fervoja konstruado ne progresis glate pro manko de kapitalo. Sed pli kaj pli fortiĝis la opinio, ke fervojo estas grava laŭ la vidpunkto de politiko kaj militaj aferoj. Post la 1880aj jaroj fervojoj estis konstruitaj diversloke en Japanio.

Tiel la nova veturrimedo, nomata fervojo, fariĝis ĉefrolulo de surtera transportado, kaj tio interligis forajn





La redaktejo de la ĵurnalo Tokio-Nichinichi (Pentrita de Bigot)

lokojn kaj multe plivastigis plu la spacon por industrio kaj vivado.

La instalita fervojreto estis multe utiligata ankaŭ por la transportado de militaj necesajoj. Dum la Ĉina-Japana Milito kaj Japana-Rusa Milito la soldatoj estis transportataj per fervojo el diversaj lokoj de Japanio al la milita haveno en la gubernio Hiroŝimo, kaj senditaj al bataalkampoj.

Erao de ĵurnaloj

En Japanio, ekde la komenco de la 17a jarcento, flugfolioj unu-paĝaj estis vendataj por informi la publikon pri novaĵoj per bildoj kaj skribaĵoj, kiam okazis informindaj aferoj. Ĝi estis nomata "tegolpreso". (Oni gravuris literojn kaj desegnaĵojn sur argilon kaj poste bakis ĝin kvazaŭ tegolon. Oni uzis ĝin kiel ksilografian tabulon.) La unua moderna ĵurnalo, kiu regule informis pri novaĵoj, estis eldonita en eksterlanda lingvo fare de eksterlandanoj, kiuj loĝis en Jokohamo, fremdula setlejo, post ties malfermo.

Baldaŭ ankaŭ japanoj komencis eldoni ĵurnalojn. En la jaro 1871, unuafoje eldoniĝis ĉiutaga ĵurnalo. Post tio naskiĝis ĵurnaloj unuj post aliaj kaj ankaŭ en aliaj regionoj aperis diversaj ĵurnaloj. Komenciĝis la epoko, en kiu ĵurnaloj regule informis multajn legantojn pri okazaĵoj. Ĵurnaloj eldoniĝis kaj havis influovon, ĉar ekzistis multaj homoj, kiuj scipovis legi kaj deziris akiri novajn informojn.

Komence ĵurnaloj ricevis subvencion de la registaro, sed baldaŭ komencis porti kritikajn artikolojn kontraŭ la registaro, kaj fortigis la tendencon subteni movadojn por libereco kaj popolaj rajtoj. Kontraŭ tio la registaro faris leĝon por kontroli ĵurnalojn kaj enkarcerigis multajn ĵurnalistojn kaj malpermesis eldonadon de ĵurnaloj.

La legantoj de la ĵurnaloj, kiuj informis ĉefe pri politikaj aferoj kaj opinioj, estis

ekssamurajoj kaj intelektuloj. Aliflanke estis aliaj ĵurnaloj, kiuj raportis pri ĉiutagaj okazaĵoj, onidiroj, noveloj ktp. por respondi al popolaj bezonoj pri distraĵoj kaj intereso. Al ĉi tiu grupo apartenis "La Ĵurnalo Yomiuri" (fondita en 1874) kaj "La Ĵurnalo Asahi" (fondita en 1879). La plejgrandkvante eldonata, en la 1880-aj jaroj, estis la Ĵurnalo Yomiuri, kiu eldonis proksimume dudek mil ekzemplerojn.

Poste, raportaĵoj fariĝis la ĉefa temo de ĵurnaloj, precipe dum la Militoj Ĉina-Japana kaj Japana-Rusa ĵurnalaj raportaĵoj montris sian potencon. Ĵurnaloj fariĝis tre influantaj al la scio, informiteco, konscio kaj rekonado de la popolo.

Vivo kun lernejo

Homo devas lerni. Oni devas fari tiel, ke en vilaĝo ne estu familio kiu ne lernas, kaj en familio ne estu homo kiu ne lernas. Gepatroj devas nepre vizitigi infanojn al lernejo kaj lernigi ilin. (Resumo de la avizo pri la eduka sistemo)

*Lernoĉambro en la fruaj jaroj de la Meiji-
erao, Japanio
(El la 7a Bildaro,
Instruado en elementa
lernejo)*

Tio ĉi estis ordono de la registaro en 1872. La edukado de japanaj infanoj ne estis deviga ĝis tiam kaj la edukmaniero malsamis laŭ socia klaso. La infanoj (virseksaj) de samurajoj lernis en lernejo farita por ili, kaj la infanoj de ordinaraj popolanoj lernis legi, skribi kaj kalkuli en privata lernejo, ekz. en templo. Sed en la nova epoko la registaro



ordonis la gepatrojn, ke ĉiu infano ricevu edukon sen diferencigo laŭ socia klaso kaj sekso.

En la vilaĝoj kaj la urboj de ĉiu regiono konstruiĝis lernejoj. Tutlande vastiĝis la eduka sistemo, laŭ kiu 6-jaruloj eklernis en elementa lernejo kaj vizitadis lernejon ĉiumatene je difinita horo kaj lernis en ĉambro diversajn lecionojn laŭ lecionplano.

Malgraŭ la registara ordono, la deviga eduksistemo ne realiĝis glate. Precipe la procento de knabinaj lernantoj estis malalta, ĉar tiutempe ili estis gravaj laborantoj por hejmaj aferoj kaj vartado. Plie la popolo devis pagi la koston por konstruado de la lernejo kaj la edukado, kaj tio estis forta repuŝo kontraŭ lernejo. En tia cirkonstanco la proporcio de la lernantoj en elementa lernejo superis 90 procentojn nur post la komenco de la 1900aj jaroj post la Ĉina-Japana Milito. Tion helpis la fakto, ke lernado fariĝis senpaga.

Tiel lerneja kaj kvalifika sistemoj estis pli kaj pli kompletigitaj. Laŭ tio la ekzamenoj por pli altnivela lernejo kaj kvalifiko ekhavis gravan signifon. Lernejo fariĝis nepara por la vivado kaj vivdaŭro de homo. Infanoj akiris novajn sciojn kaj pensmanierojn en lernejo.


Edukado kaj ŝtato

Sed lernejo estis pli efika sistemo ol iuj ajn aliaj por penetrigi registarajn ideojn en la popolon. Ĉar ĉiuj infanoj fariĝis lernantoj de elementa lernejo, kiuj estis fonditaj en ĉiu regiono de la tuta lando, kaj lernis tie almenaŭ 4 jarojn (6 jarojn de post 1908).

En la jaro 1890 la registaro dekretis "Imperiestran Mesaĝon pri Eduko" kiel "parolon donitan de la imperiestro al la popolo". La antaŭa parto de la mesaĝo traktas pri moralo, nome servemo al la gepatroj, frateco inter la gefratoj kaj fideleco inter la geamikoj kaj aliaj, sed en la posta parto ĝi abrupte ŝanĝas la temon kaj diras: "Kiam la ŝtato estas en krizo, kuraĝe kaj sindone laboru por la ŝtato, kaj plenumu devon por la prospero de la lando kun la imperiestra familio en la centro."

Por la registaro la bazo de edukado estis fari tian infanon, kia fidele servos por la Tennoo kaj sindone laboros por la ŝtato, en kies centro sidas la Tennoo.

En la sekvinta jaro la registaro decidis la manieron de la ceremonioj, kiujn la lernejoj havis en festotagoj. Ĉiu lernejo en la tuta lando ricevis la portretfoton de la Tennoo kaj kopion de la Tennoa Mesaĝo pri Eduko. En festotagoj infanoj ĉeestis ceremonion ĉe la lernejo, profunde riverencis al la foto de Tennoo, aŭskultis Tennoan Mesaĝon pri Eduko kun klinita kapo kaj kantis kanton "Kimigayo" (aŭ "Tennoa Regado", komponita en la jaro 1880). Tiel Tennoisma kaj ŝtatisma pensmanieroj penetris en la japanan socion.



Peco de Historio

Ĉinaj literoj en la moderna historio

Japanio, Ĉinio kaj Koreio komune uzas la ĉinajn literojn. La ĉinaj literoj, kiel ankaŭ hieroglifoj en Egiptio, estas literoj kun longa historio. Tamen la ĉinaj literoj, kiujn oni hodiaŭ uzas, ne estas la samaj kiel tiuj en antikva tempo. La nuntempaj ĉinaj literoj estas nove formitaj en la moderna historio de la unuopaj ŝtatoj.

En la historio ekde antikvaj tempoj ĝis hodiaŭ, la disvastiĝo de la ĉinaj literoj alfrontis tri grandajn obstaklojn. 1. La japana kaj la korea lingvoj estas tute aliaj lingvoj ol la ĉina. 2. Klasika kaj moderna lingvoj havas grandan diferencon. 3. La ĉinaj literoj estas nombre tro multaj kaj tro komplikaj, por ke multaj homoj povu legi kaj skribi ilin.

Vidu la dokumenton 1-4. Ili tute alie aspektas, sed fakte temas pri la sama teksto, la komenco de la komuna klasikaĵo en la Orientazio, "Analektoj de Konfuceo".

Dokumento 1 estas la originalo de "Analektoj de Konfuceo". Jen ni komparu la tri aliajn kun tiu originalo.

Dokumento 2 estas traduko en la modernan ĉinan lingvon. Tiu traduko havas tri karakterizaĵojn; ĝi estas tradukita en la modernan ĉinan parolstilan lingvon, ĝi estas skribita per la simpligitaj ĉinaj literoj nomataj "Jiantizi" (simplaformaj literoj), kaj ĝi estas skribita horizontale.

En Ĉinio estiĝis fine de la Qing-dinastio strebo reformi la skriban lingvon, kiu plievidentiĝis per movado por parolstila skriblingvo en la 1910-aj jaroj kaj disvastiĝis post la Movado de la Kvara de Majo. Ankaŭ la reformo de literoj progresis iom post iom, sed ĝi realiĝis nur post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. En la 1950-aj jaroj estis enkondukitaj la simplaformaj literoj. Ankaŭ en Taiwan oni uzas parolstilan skriblingvon, sed oni uzas la tradiciajn literojn kaj ĝenerale skribas vertikale.

Dokumento 3 estas "Analektoj de Konfuceo", tradukitaj en la modernan japanan. Ĝin karakterizas jenaj du trajtoj. Uzataj estas plisimpligitaj ĉinaj literoj, la t.n. ĉiam-uzaj ĉinaj literoj. Kaj krom ĉinaj literoj ankaŭ kanaoj (japana alfabeto) estas uzataj. Japanaj kanaoj estas literoj transformitaj el ĉinaj literoj. En Japanio oni ankaŭ kutimiĝis skribi uzante nur la ĉinajn literojn, sed aldone estis evoluigita propra skribmaniero, kiu kombinas la ĉinajn literojn kun kanaoj.

Ekde la mezo de la 19a jarcento, kiam plivastiĝis la kontakto kun Eŭropo kaj Usono, naskiĝis movado por abolicii la ĉinajn literojn kaj uzi nur kanaojn. Komenciĝis ankaŭ movado por alproksimigi la skriban lingvon al la parola lingvo. Sed nur post la Dua Mondmilito, kiam Japanio estis okupaciita de la alianca armeo, limigita nombro da ĉinaj literoj estis elektitaj por "ordinara" uzo, kaj la uzmaniero de kanaoj estis alproksimigita al la moderna lingvo.

Dokumento 4 estas la sama teksto en la moderna korea lingvo. Estas uzataj la literoj

nomataj "hangul", kaj la skribo estas horizontala. Hangul estas literoj inventitaj en la 15a jarcento. Sed ankaŭ post la invento de hangul plejparte oni skribis per la ĉinaj literoj, kaj hangul estis nur uzata helpe. Tamen ekde la fino de la 19a jarcento hangul estis deklarita "nacia litero" kaj disvastiĝis "nacia ĉina skribmaniero", en kiu hangul kaj la ĉinaj literoj estis mikse uzataj.

Post la aneksiĝo de Koreio al Japanio, la japana lingvo estis deklarita "nacia lingvo", sed hangul daŭre disvastiĝis per eldonaĵoj kaj movado por noktaj lernejoj. Post emancipiĝo en aŭgusto 1945 rapide evoluis movado ne nur por ĉesigi la uzon de la japana lingvo sed ankaŭ de la ĉinaj literoj. Kun tiu ĉi movado, kiu celis uzi nur hangul, plimultiĝis ankaŭ la horizontala skribmaniero. Hodiaŭ en Suda Koreio ne malaperis ĉinaj literoj, sed dominas la horizontala skribo per hangul. En Norda Koreio oni ĝenerale uzas nur hangul.

Tiel, literoj nun uzataj en Orientazio havas la klasikajn ĉinajn literojn kiel bazon, sed estis nove formitaj en la moderna historio de la unuopaj ŝtatoj. Studante la historion de la literoj, ni estas invitataj pripensi ankaŭ pri la estonteco de la ĉinaj literoj.

乎 不 亦 朋 之 子
愠 樂 自 不 曰
不 乎 遠 亦 學
亦 人 方 說 而
君 不 來 乎 時
子 知 不 有 習

先生说：“学习而能经常地复习，
不也是很愉快的事吗？
有朋友从远方来，
不也是很快乐的事吗？
别人对自己不理解
而不怨恨，不是君子的胸怀吗？”

1. Analektoj de Konfuceo sur ligna moderna pleto dum la Qing-dinastio, Ĉinio

2. Analektoj de Konfuceo en la ĉina lingvo.

先生がいわれた、「学んでは適当な時期におさらいする、いかにも心嬉しいことだね。だれか友だちが遠い所からたずねて来る、いかにも楽しいことだね。人が分かってくれなくとも氣にかけない、いかにも君子だね。」

공자가 말씀하셨습니다. “배우고 나서 때때로 익히면 기쁘지 않겠는가. 벗이 먼 곳으로부터 찾아온다면 또한 즐겁지 않겠는가. 남들이 알아주지 않아도 서운해 하지 않는다면, 또한 군자가 아니겠는가.”

3. Analektoj de Konfuceo en la moderna japana lingvo.

4. Analektoj de Konfuceo en la moderna korea lingvo.

Resumo

En la unua ĉapitro ni studis la historion ekde la mezo de la 19a jarcento ĝis la komenco de la 20a jarcento. La sekvaj kvar punktoj estas la temoj de tiu ĉi ĉapitro.

(1) Kiamaniere Ĉinio, Japanio kaj Koreio reagis al la premo de potencoj de Eŭropo kaj Usono?

Ĉinio malvenkis en milito kontraŭ Britio kaj malfermis havenojn. Japanio malfermis la landon sub premo de Usono. Koreio malfermis havenojn sub premo de la japana nova registaro.

(2) Kiamaniere ŝanĝiĝis la internaciaj rilatoj en Orientazio sekve de la japana politiko?

Japanio staris kontraŭ Ĉinio, kiu malkonsentis pri la regado de Japanio sur Koreio, kaj komencis la Ĉina-Japanan Militon. En la venkita Ĉinio plifortiĝis invado de okcidentaj potencoj. La venkinta Japanio, intencante plifortigi la regadon de Koreio, kontraŭstaris kontraŭ Rusio kaj komencis la Japana-Rusan Militon.

(3) Kiaj reformaj movadoj aperis en Ĉinio, Japanio kaj Koreio por modernigi siajn ŝtatojn?

En Ĉinio post la Ĉina-Japana Milito aperis movado por reformi la politikon. Aliflanke, la popolo insurekciis kontraŭ la regado de okcidentaj potencoj. La japana Movado por Libereco kaj Popolaj Rajtoj kontraŭstaris kontraŭ la registaro, postulante la fondon de parlamento kaj establon de konstitucio. Ankaŭ en Koreio kamparanoj insurekciis, postulante reformon de la politiko, kaj komenciĝis movadoj por modernigi la politikon, kiel Registara Krizo en 1884 kaj Registara Reformo en 1894, kaj Movado de Sendependiga Asocio.

(4) Kiamaniere la modernigo ŝanĝis la vivon de la popolo?

La vivmaniero kaj valoroj ŝanĝiĝis kaj la popolo akiris novan scion kaj povon. Sed okazis ankaŭ malakordoj kun la tradiciaj vivo kaj kutimoj. En Japanio, kie la registaro antaŭenpuŝis rapidan modernigon, tiu procezo havis karakteron de trudo desupra. En Ĉinio kaj Koreio modernigo entenis malfacilajn problemojn ligitajn kun la enmiksiĝo fare de okcidentaj potencaj landoj kaj Japanio.

En la sekva dua ĉapitro ni vidos la sekvan evoluon en la tri landoj.

Ĉapitro II

Ekspansio de la Japana Imperiismo kaj la Rezistado de Ĉinio kaj Koreio

Enkonduko

Okaze de la Meiji-Restaŭro Japanio fondis novan ŝtaton, kaj per mobilizita armeo invadis Orientazion. En 1890 Japanio venkis Ĉinion en la Ĉina-Japana Milito kaj koloniis Taiwan. En 1905 ĝi, gajninte la Japana-Rusan Militon, faris Koreion sia protektata ŝtato, kaj unuflanke regis Saĥalenon, kaj aliflanke akcelis invadi la kontinenton. En 1910 Japanio komplete koloniis Koreion.


En la 2-a ĉapitro ni esploru, kiel Japanio regis Taiwan, kaj kian regpolitikon ĝi aplikis al Koreio ĝis la "Manĉuria milito". Ni konsideru la tendencon de Japanio kaj internaciaj socioj, rilate al ĉinaj aferoj antaŭ kaj post la Unua Mondmilito. Samtempe ni rigardu, tra diversaj movadoj kaj personoj, kiel koreoj kaj ĉinoj kunfrontis la japanan invadon. Tio inkluzivas la movadojn de la nacioj kaj la provon de internacia solidareco.

Okcidenta civilizacio grandonde alfluis al la landoj en la torento de invado, uzurpo kaj protesto. Industrio evoluis en la landoj influitaj de okcidenta kapitalismo. Ni vidu kiel tio ŝanĝis homajn pensojn kaj agojn, speciale la vivon de virinoj, kiuj estis enfermitaj en feŭdaj kadroj.

La Tri Landoj ĉirkaŭ la Unua Mondmilito

1. Japana Aneksio de Koreio kaj Rezistado de Koreoj

Japanio, subtenate de Britio kaj Usono, venkis en la Rusa-Japana Milito en 1905. Per rezerva milit-forto Japanio faris Koreion protektata ŝtato, kaj 5 jarojn poste kompleta kolonio en 1910.



Japanio regis Koreion

La Korea Imperio deklaris sian neŭtralecon antaŭ la Rusa-Japana Milito en 1905. Sed Japanio perforte premis la korean ŝtaton por ke ĝi permesu al la japana armeo uzi koreajn lokojn por la milito.

La milito iris favore al Japanio. Do Japanio trudis al Koreio "la 1-an japan-korean konsenton", ke Koreio invitu la japanajn konsilantojn pri siaj financaj kaj diplomaciaj aferoj, kiujn Japanio rekomendas. La konsilantoj rekomenditaj de Japanio ne nur konsilis koreajn administrantojn, sed sin trudis en la korean internan politikon kun reala potenco.

Japanio, gajninte la Rusa-Japanan Militon, tuj trudis al Koreio la Protektoratan Traktaton inter Japanio kaj Koreio en 1905, uzurpis koreajn diplomaciajn rajtojn, kaj instalas superintendanton. La japana superintendanto posedis koreajn diplomaciajn rajtojn, kaj fakte enmanigis al si la enlandan politikon.

Japanio eksplicis, ke la superintendanto kun la rajto pri ŝtata administrado traktu la korean enlandan politikon, kaj devigis Koreion nomumi japanojn por ĉiuj vicministroj. Plie ĝi likvidis la korean armeon, forprenis la justicon kaj policaŭtoritaton, subpremis la gazetaron, kaj ankaŭ malpermesis kunvenadon kaj asociadon.

Elpelu japanojn

Je la krizo perdi sian landon, koreoj diversmaniere

kaj kuraĝe batalis kontraŭ la atako de Japanio. La eksaj kaj aktualaj altklasaj ŝtatoficiistoj asertis, per petskribo al la reĝo aŭ per sinmortigo, ke la protektorata traktato inter Japanio kaj Koreio en 1905 devas esti nuligita. En 1907, ili provis alvoki pri la maljusteco de la traktato en Internacia Paca Konferenco en Hago, pere de speciala delegitaro. Miloj da Seul-urbanoj kolektiĝintaj antaŭ la palaco postulis nuligi la traktaton, kaj ankaŭ komercistoj protestis ne malfermante la vendejojn.

Multiĝis homoj, kiuj pensis, ke necesas kreskigi potencon por protekti sian landon. Ili do starigis lernejojn en diversaj lokoj de la tuta lando, kaj klopodis studi korean lingvon, kaj movadis por industriigi la landon.

Sed plej malfaciligis al Japanio la civilsoldatoj, kiuj leviĝis ekkriante "Elpelu japanojn". Laŭ la bildo kaj la materialo ni povas vidi, ke la civilsoldatoj aktive agadis en la tuta lando ekde la printempo de 1908, kvazaŭ ili tuj forpelus la japanojn.


Dum unu jaro de julio 1908 ĝis junio 1909, ni ĉiumonate koliziis kun entute ĉirkaŭ 3 mil ribelantoj. Ilia potenco ŝajnas fiksita. Tagon post tago iliaj agoj fariĝis pli sagacaj. Spionaj agadoj kaj gardmanieroj estas mirige kreskintaj. Iliaj agoj fariĝis tiel rapidaj, kvazaŭ fojfoje ili mokas nian ekspedicion. La potencoj estas foje grandaj kaj foje malgrandaj, sed ili ne estas neglekteblaj. Ni vere zorgas, kiam ni povos komplete subigi ilin.

「Libro pri Ekstermado de Chosun-Ribelantoj」 (Garnizono-Stabo de Japana Armeo en Chosun, 1913)

En la batalo el la civilsoldatoj partoprenis tiuj, kiuj apartenis al diversaj kampoj kaj pozicioj. Kiam la japana armeo likvidis la korean armeon, ankaŭ multaj koreaj armeanoj partoprenis en la ribelo.

Japanio vidis, ke se ĝi ne povos tute submeti la civilsoldatojn, ĝi ne povos kolonii Koreion. Tial Japanio komencis grandskalan operacon. Unue ĝi ekstermis la civilsoldatojn de la meza kaj sudorienta regionoj de la korea duoninsulo, kaj dum 2 monatoj ekde septembro 1909 komplete blokinte la marbordon de la sudokcidenta regiono, efektivigis "sudkorean eksterman operacon" kvazaŭ kombante la regionojn. Laŭ la dokumento de Japanio, la japana armeo pereigis 17,688 civilsoldatojn kaj la vunditoj nombris 3,706.

Japanio komplete subpremis per la senkompata operaco la kontraŭbatalon de civilsoldatoj kaj perforte aneksis Koreion al si en la 29-a de aŭgusto 1910.



2. Japana Kolonia Regado de Taiwan

Post la Ĉina-Japana Milito en 1894-1895, Japanio kaptis Taiwan kaj praktikis koloniisman regadon super ĝi dum 50 jaroj, kaj poste ĝi aplikis sian sperton en tio al la koloniisma regado super Koreio kaj al la Nordorienta Ĉinio dum sia okupado. Kiel do Japanio kondukis la koloniisman regadon super Taiwan?

Invado de Japanio al Taiwan kaj rezistado de la Taiwan-a popolo

Post la malvenko de la Ĉina Norda Mararmeo en marto de 1895, la japana armeo okupis la Penghu-insularon kiu estas la pordo de Taiwan, kaj en majo invadis Taiwan. La mandarenoj kaj bienposedantoj de norda Taiwan forfuĝis panike, sed la popoloj de la meza kaj suda partoj de Taiwan rezistis kontraŭ la invadantoj firmdecide, kaj en multaj lokoj okazis bataloj por haltigi la antaŭenpuŝiĝon de la japanaj agresantoj. Eĉ post kiam la japana armeo jam efektive okupis Taiwan en novembro, la rezistado kontinuus en diversaj lokoj.

Post la okupo de Taiwan, Japanio instalas General-gubernatoran Administracion por ĝin regadi. Dum la 14 jaroj de 1905 ĝis 1919, ĉefgeneraloj aŭ leŭtenantgeneraloj funkciis kiel gubernatoroj kun absoluta regpotenco, por subpremi perforte la armitajn fortojn kontraŭ japanajn. Sub la General-gubernatora Administracio fondiĝis ankaŭ policaj burooj en diversaj lokoj de Taiwan por pligrandigi kaj fortigi la polican sistemon (averaĝe po 160 homoj al unu policano), kiu senkompatie subpremis la kontraŭjapanajn popolojn. Samtempe, ĝi subaĉetis ĉinajn naciperfidulojn, kiuj kapitulacis al la japana armeo, por helpi ĝin establi sian superregadon.

Rabado de ekonomio

La General-gubernatoro de Taiwan faris grandskalan esploradon pri la agroj, perforte rekviziciis vastajn areojn da montaj agroj kaj forstoj kultivataj de popoloj de Taiwan kaj poste vendis ilin je malalta prezo aŭ senpage disdonis al japanaj emeritaj oficistoj aŭ kapitalistoj, aliflanke ĝi establis maljustan sistemon de diversaj impostoj kaj ŝarĝis la mizerajn popolamasojn per plejparto de la impostoj, tiel ke la enspezo de la terkulturistoj de Taiwan egalas nur trionon de tiu de la japanaj, kiuj kulturis samareajn agrojn kaj samajn plantaĵojn.

La japana koloniisma instanco starigis por si la principon transformi la Taiwan-an ekonomion por produktado de greno kaj sukero por Japanio. Tial ĝi investis kapitalon por tiu ĉi celo. Ĝi konstruis elektrejojn por liveri sufiĉe da energio al la prilabora industrio, konstruis havenajn kajojn, dragis navigajn vojojn por ĝustatempe transporti agrikulturajn produktojn al Japanio. Samtempe kun tio, japanaj kapitaloj senĉese torentis en Taiwan por establi sian monopolon. La financaj magnatoj Mitsui, Mitsubishi k.a.

*Yanliao-Monumento
memore al la rezistado
kontraŭ Japanio ĉe
Aodi en Taiwan*



monopolis gravajn industriojn por fabrikado de sukero, kamforo, salo, cigaredoj k.a. En la komenca periodo de la okupado, la japana koloniisma instanco plenumis sistemon de monopola vendado ankaŭ de opio, kaj la enspezo per tio fariĝis grava financa riĉfonto de la Gubernatora Administracio. Kaj krome Japanio regis la komercadon de Taiwan kaj ĝin ŝanĝis en dumpingvendejon de japanaj varoj.

Dum tiu periodo, Japanio sendis multajn oficistojn kaj policianojn al Taiwan kaj mobilizis grandan nombron da industriistoj kaj komercistoj por elmigri al ĝi. En 1905, la nombro de japanoj en Taiwan jam atingis 60 mil. Post la Unua Mondmilito, ilia nombro kreskis al 180 mil kaj en 1927 la japanaj enmigrintoj en Taiwan jam superis 200 mil.



*Ŝintoisma Sanktejo en
Taibei, Taiwan*

Diskriminacia edukado kaj perforta asimilado

Dum sia okupado de Taiwan, Japanio rigore praktikis diskriminacian edukadon kaj difinis per reglamento, ke la japanoj, Taiwan-anoj kaj indiĝenoj devas viziti malsamajn lernejojn. La lernejoj por la japanaj geknaboj havis bonajn instruistojn kaj estis bone ekipitaj, dum tiuj por la lernantoj de Taiwan estis en povraj kondiĉoj kaj la infanoj de la indiĝenoj lernis en edukejoj funkciigataj de la polico sen necesaj ekipaĵoj. La relative bonaj mezlernejoj simple ne akceptis geknabojn de Taiwan-anoj.

La japanaj regantoj uzis edukadon kiel gravan rimedon por realigi sian asimilan politikon al la popolo de Taiwan. Tial en la lernejoj por Taiwan-aj geknaboj la instruado estis nur per la japana lingvo, kaj la ĉina lingvo estis malpermesita. En 1920, la nominala sistemo de kunlernado de japanaj kaj Taiwan-aj geknaboj estis praktikata, tamen oni reglamentis, ke la enira ekzameno nepre inkluzivu teston pri la kono de la japana lingvo. En la lernoprogramo, la japanaj regantoj celkonscie injektis al la Taiwan-aj lernantoj lojalecon al Japanio kaj ĝia Tennoo. Precipe post la lanĉo de la agresa milito kontraŭ la ĉefurbo de Ĉinio, la Gubernatora Administracio antaŭenpuŝis la Kampanjon por Tenno-popolanigo (japanigo), kun la intenco nuligi ĉion kun koloro de la ĉina kulturo, kiel ekz. fermi ĉinstilajn templojn, ordoni al la Taiwan-anoj ŝanĝi la kultajn nomtabuletojn kaj tomboŝtonojn de la prapatroj de la familioj, devigi ilin viziti kulte japanan ŝintoisman sanktejon, kulti Sansho Daiĵin, malpermesi ludon de tradiciaj teatraĵoj kaj muzikaĵoj de Taiwan, devigi ilin kanti militistajn kantojn kaj popolkantojn de Japanio, rigardi teatraĵojn pri la japaniga movado. En 1940, la Gubernatora Administracio komencis movadon “krei familian nomon kaj ŝanĝi la nomon”, perforte devigis Taiwan-anojn adopti japaneskajn nomojn. Post la eksplodo de la Pacifika Milito, ĝi fondis la Societon por Tenno-popolanoj, devigis la Taiwan-ajn familiojn partopreni dummilitan servadon, aĉeti militajn obligaciojn, kontribui militajn materialojn k.s. kaj fortigis militan edukadon, devigis junulojn kaj virojn aliĝi al la japana armeo, ŝanĝante Taiwan en pastabulon por lanĉi la agresan militon en la Suda Pacifiko kaj fonton de soldatoj de Japanio.

3. La Revolucio de 1911 kaj Fondiĝo de la Ĉina Respubliko

La Revolucio gvidata de Sun Yat-sen en 1911 renversis la feŭdan aŭtoritatan regadon kaj fondis la unuan respublikon en Azio. Kiel do pereis la aŭtoritata reĝimo?

Batalo de la revoluciuloj kontraŭ la regado de la Qing-dinastio

Programo de la Ĉina Revolucia Ligo:

Forpeli la invadantojn, restarigi Ĉinion, krei popolan respublikon kaj egale dividi agrojn.

Komence de la 20-a jarcento, pro agresado de imperiismaj landoj, Ĉinio foj-refoje spertis nacian humiligon, fordonante sian teritorion kaj pagante grandajn sumojn de milita kompenso. Por ŝanĝi tiun situacion, aperis en la socio du malsamaj politikaj opinioj. Iuj, kiuj pledis por praktiki parlamentan politikon konservante la imperiestron, estis konataj kiel la konstituciistoj aŭ reformistoj. Ili admiris la venkon de Japanio en la Japana-Rusa Milito kaj opiniis, ke la konstitucia monarkio superas la aŭtokratan monarkion. Kaj aliaj, kiuj pledis por renversi la Qing-dinastion perforte kaj establi respublikon kun regpotenco en la manoj de la popolo, estis konataj kiel revoluciuloj, reprezentataj de Sun Yat-sen.

La konstituciistoj plifortiĝis profitante de la praktikado de “nova politiko” de la registaro de la Qing-dinastio kaj fondis konsiliojn aŭ konsilajn buroojn en diversaj provincoj, por akceli la fondon de landa parlamento kaj respondeca ministraro, dume la revoluciuloj kun Sun Yat-sen k.a. kiel gvidantoj decidis renversi la Qing-dinastion per armita batalo. En novembro 1894, Sun Yat-sen k. a. fondis revolucionan organizon en Honolulo, sekve de tio fondiĝis nombro da revoluciaj organizoj en diversaj lokoj. Laŭ propono de Sun Yat-sen, la ĉefaj revoluciaj rondoj kongresis en Tokio de Japanio en 1905 kaj kune fondis la organizon Ĉina Revolucia Ligo. Kun Popola Ĵurnalo kiel sia organo, la revoluciuloj de la ligo kondukis grandan debaton kun la reformistoj pri la estonteco de Ĉinio, revolucio kaj reformo kaj la ŝtata reĝimo k. a. problemoj. Samtempe kun tio, la revoluciuloj lanĉis plurajn armitajn insurekciojn kontraŭ la Qing-dinastio ĉefe en la suda parto de Ĉinio, kio influis ĝian mezan parton kaj eĉ la Nordorienton. La fama revoluciulino Qiu Jin [ĉiuĝin] lanĉis batalon kontraŭ la Qing-dinastio en Shaoxing [ŝaoŝing], Zhejiang-provinco, kaj oferis sian junan vivon. Ĉiuj tiuj insurekcioj fiaskis, tamen ili dissemis la ideon de demokratia revolucio en la koron de la popolamasoj kaj faris Ĉinion kvazaŭ amaso da seka ligno, kiu povis tuj ekbruli tra la tuta lando, se estos fajrero.

La revolucia armeo okupis la Gubernatoran Oficejon super la provincoj Hunan, Hubei, Guangdong kaj Guangxi.



La Insurekcio en Wuchang kaj la Revolucio de 1911

En aprilo 1911, la Ĉina Revolucia Ligo transigis sian aktivan centron al la baseno de la Yangzi-rivero kun la urbo Wuhan kiel la centro. En septembro efektiviĝis unuiĝo de la revoluciaj grupoj kaj fondiĝis unueca gvida organo por armita insurekcio. Vespere

de la 10-a de oktobro, la Nova Armeo sub la gvido de la revoluciistoj unue okupis la municiejon. Post batalado dum unu nokto ili konkeris Wuchang, la tiean politikan centron, kaj sekve ankaŭ Hankou kaj Hanyang, kaj fondis la Militregistaron de Hubei, kiu elektis Li Yuanhong kiel gubernatoron. Post la eksplodo de la Insurekcio de Wuchang, pluraj sudaj provincoj deklaris sian sendependiĝon unuj post aliaj kaj liberiĝis de la regado de la registaro de la Qing-dinastio. Post nelonge, la nombro de la provincoj, kiuj deklaris sendependiĝon, atingis 14.



Sun Yat-sen en prezido de la unua ŝtata konferenco, San, januaro, 1912.

Fondiĝo de la Ĉina Respubliko

Post la Revolucio de 1911, Sun Yat-sen revenis en Ĉinion kaj komencis preparojn por fondi Provizoran Registaron. En la Nankina Konferenco partoprenata de delegitoj de diversaj provincoj li estis elektita kiel la provizora prezidento de la Ĉina Respubliko kaj oficiale enoficiĝis en la 1-a de januaro de 1912. Post la establo de la Provizora Registaro de la Ĉina Respubliko, Pu Yi, la lasta imperiestro de la Qing-dinastio deklaris sian abdikon en la 12-a de februaro. Do pereis la lasta feŭda aŭtokrata dinastio en la historio de Ĉinio. Dum sia servado kiel provizora prezidento, Sun Yat-sen ellaboris la “Provizorajn Reglamenteojn de la Ĉina Respubliko”, por transformi Ĉinion en demokratian respublikon. Sed subtenate de la imperiismaj potencoj, Yuan Shikai, eksĉefministro de la Qing-dinastio, premadis la revoluciistojn kaj fariĝis provizora prezidento anstataŭ Sun Yat-sen, kun la kondiĉo devigi la imperiestron de la Qing-dinastio forlasi la tronon. Post sia enpotenciĝo, Yuan Shikai ne nur malorganizis la parlamenton, sed ankaŭ abolis la “Provizorajn Reglamenteojn de la Ĉina Respubliko”, kaj eĉ intencis restarigi la imperiestran reĝimon. Sed la Revolucio de 1911 jam sukcesis establi la demokratian respublikon profunde en la koro de la popoloj, kaj Yuan Shikai finfine falis pro la oponado de la tuta popolo. La Revolucio de 1911 frakasis la feŭdan monarkion, kiu regadis Ĉinion dum pli ol du mil jaroj, kaj la Ĉina Respubliko fariĝis la unua demokratia respubliko en la historio de Ĉinio kaj ankaŭ en tiu de Azio.

La Provizoraj Reglamenteoj de la Ĉina Respubliko

Artikolo 5: Ĉiuj popoloj de la Ĉina Respubliko estas egalrajtaj, sen distingo de etno, klaso kaj religio.

Artikolo 6: La popoloj ĝuas jenajn rajtojn de libereco:

1. La popoloj ne devas esti arestatataj, malliberigataj, pridemandataj aŭ punataj kontraŭleĝe.
2. La loĝejo de la popoloj ne devas esti invadata aŭ esplorata kontraŭleĝe.
3. La popoloj ĝuas liberecon teni posedaĵojn kaj entrepreni negocadon.
4. La popoloj ĝuas liberecon paroli, verki, eldoni, kunveni kaj fondi rondojn.
5. La popoloj ĝuas liberecon teni sekreton en korespondado.
6. La popoloj ĝuas liberecon en loĝado kaj transloĝiĝo.
7. La popoloj ĝuas liberecon en kredo de religio.

4. La Unua Mondmilito kaj la Japania Imperiismo

Ekde la malfrua periodo de la 19-a jarcento, potencaj regnoj de Eŭropo kaj Usono komencis dividi la mondon por akiri koloniojn kaj pligrandigi sian influferon. Tion oni nomas "imperiismo". Tra la Ĉina-Japana kaj Japana-Rusa Militoj Japanio fariĝis unu sola imperiisma lando en Azio. La Unua Mondmilito estis milito imperiisma, kies ĉefaj batalkampoj estis en Eŭropo, sed ankaŭ Japanio aliĝis al la milito. Kiel do ŝanĝiĝis, rezulte de la milito, la rilatoj inter la tri landoj en Orientazio?

Japania partopreno en la kontraŭ-germana milito kaj trudo de la "21-punkta postulo"

En julio 1914, batalo komenciĝis inter la du flankoj, nome la Tri-landa Alianco (Germanio, Italio kaj Aŭstrio) kaj la Triobla Entento (Britio, Francio kaj Rusio). Tion kaŭzis la pliintensiĝinta kontraŭstaro inter la du flankoj pro la problemo pri redivido de la Duoninsulo Balkano. Kaj la batalo evoluis, ĝis ĝi fariĝis la Unua Mondmilito.


Tuj kiam la Unua Mondmilito komenciĝis, Japanio, rigardante tion kiel oportunon por plivastigi sian potencon en Ĉinio, deklaris militon kontraŭ Germanio, pretekste de la alianciĝo inter Japanio kaj Britio en 1902. Japana armeo okupaciis Qingdao de Ĉinio, kie estis germana militbazo, kaj forprenis de Germanio la uzrajton de la Duoninsulo Shandong. Japanio ankaŭ okupaciis sen sangverŝo nordpacifikajn insulojn, kiuj estis kolonioj de Germanio, kaj ilin metis sub japanan regadon.

La ĉina registaro postulis, ke la japana armeo evakuu la duoninsulon Shandong, sed

la japana registaro neglektis tion kaj daŭre okupis ĝin kaj prezentis "21-punktan postulon" al Ĉinio en 1915.

La japana registaro intencis apliki ankaŭ al Ĉinio la saman manieron, per kiu ĝi metis Koreion sub sian regadon, perforte postulante devige la duan Japanan-Korean Interkonsenton.

La ĉina popolo kontraŭstaris al la postulo, bojkotante japanajn varojn, kaj ankaŭ la ĉina registaro rezistis. Japanio sendis pli da soldatoj kaj tiel minacis la ĉinan registaron de Yuan Shikai per ultimato, kaj fine akceptigis al Ĉinio la "21-punktan postulon" (escepte la punkton 5).



Rusa Revolucio kaj Ekspedicio al Siberio

La rusa revolucio okazis en 1917 dum la Unua Mondmilito, kaj fondiĝis la unua socialisma reĝimo en la mondo. Dum la revolucio Lenin anoncis "Proklamon pri Paco" en kiu li emfazis la principon de kontraŭo al la imperiisma milito, neankso kaj nekompensoj, kaj demokratia paco, kaj ankaŭ la ideon de nacia memdecido.

Japanio perarmee intervenis en la revolucion (ekspedicio al Siberio) kune kun Britio, Usono kaj Francio ktp, kiuj timis disvastiĝon de influo de la rusa revolucio. Post retiriĝo de la alilandaj armeoj, la japana armeo sola restadis ĝis 1922 en la norda Manĉurio (nordorienta regiono de Ĉinio), la Apudmara Regiono de Rusio kaj Siberio, kun la preteksto de sekurigo de Manĉurio kaj Koreio.

Krome, en 1920, Japanio sendis armeon al la Regiono Jiandao de Ĉinio, kiu situas najbare al Koreio, por subpremi kontraŭ-japanajn armitajn trupojn por korea sendependiĝo.

Pariza Packonferenco kaj "Principo de Nacia Memdecido"


La Unua Mondmilito finiĝis en novembro 1918. Kaj ekde januaro de la sekvanta jaro, la Konferenco por Paco okazis en la Versajla Palaco en suburbo de Parizo. Dum la Unua Mondmilito, Usono fariĝis, anstataŭ Britio, la plej granda potenco en la mondo. W. Wilson, la usona prezidento, anoncis "14 Principojn pri Paco" kiel la principon de la packonferenco, kaj proponis "abolicon de sekreta diplomatio", "fondon de Ligo de Nacioj", k.a., kaj emfazis "la Principon de Nacia Memdecido".

Koreoj bonvenigis la proponon, kaj lanĉis "la Sendependigan Movadon de la 1-a de marto" en 1919, kaj deklaris al la mondo sian volon sendependiĝi. W. Wilson tamen eĉ ne renkontis la reprezentantojn de la Korea Provizora Registaro en Ekzilo, kiuj vizitis Parizon, portante peticion por sendependiĝo de Koreio. "La Principo de Nacia Memdecido" de Wilson estis nur por la nacioj sub la regado de Germanio, Aŭstrio, Rusio ktp, kaj tute ne estis por sendependigi naciojn en Azio.

Ĉinio, kiu aliĝis al la milito kontraŭ Germanio en 1917, postulis, ke oni redonu de Germanio al Ĉinio la rajton kaj intereson pri la duoninsulo Shandong. Sed la potencoj ne akceptis la postulon, kun la preteksto de "la Reciprokaj Oficialaj Dokumentoj pri Traktato de Shandong", kiu al Ĉinio perforte estis akceptigita de Japanio. Kontraŭ tio leviĝis la "Movado de la 4-a de Majo" en Ĉinio.

En 1921-22, la potencaj landoj havis konferencon en Vaŝingtono, Usono, kaj ili diskutis pri ordigo de siaj interesoj en la Orientazio kaj Pacifiko. Ĉinio postulis en la konferenco nuligon de la eksterteritoria rajto kaj redonon de doganrajto, tio ne estis akceptita. Ĉinio nur reprenis la rajton kaj intereson de la duoninsulo Shandong, paginte kompenson al Japanio. Problemoj pri Koreio eĉ ne estis traktitaj.

Peco de Historio



Kontraŭjapana armita batalo de Taiwan-a popolo

En oktobro de 1895, japana trupo konkeris urbon Tainan kaj okupis la tutan Taiwan. En novembro de tiu jaro la Taiwan-a popolo komencis armitan reziston kaj faris gerilan militon kontraŭ japanaj agresantoj en la sekvantaj 7 jaroj. Gan Dai-su, Ke Tie-hu kaj Lim Siau-miau estis honorataj kiel “Tri Kontraŭjapanaj Bravuloj”. Antaŭ kaj post la Revolucio de 1911, la Taiwan-a popolo faris pli ol 10 armitajn ribelojn. Jiaobanian-Ribelo gvidata de Yu Ching-fong influis la tutan insulon kaj daŭris ĝis 1916.

La japana reganta instanco perforte okupis kampojn, trudis devigan laboron al la popolo, kaj la arogantaj policianoj laŭvole tiranis ilin. En oktobro de 1930, ne povante plu elteni la subpremadojn, la Gaoshan-nacia popolo de Wushe en meza Taiwan leviĝis por armite rezisti kontraŭ la japanaj agresantoj. La komandoro de la japana garnizono gvidis trupojn kaj policianojn por subpremi la popolon. Ili eĉ uzis aviadilojn por ellasi venenan gason por mortigi la kontraŭjapanajn rezistantojn, kiuj persistis en la batalo en profunda montaro, kaj multaj popolanoj veneniĝis. Sed la rezistantoj ĵuris ne submetiĝi al la malamiko kaj batalis pli ol unu monaton, kaj postvivis nur 500 el la pli ol 1400 vilaĝanoj. Poste la Taiwan-a Rezidentejo de Japanio mortigis pli ol 10 rezistantojn, kondamnante ilin kiel ĉefkrimulojn, kaj devigis la aliajn transloĝiĝi. La 25-an de aprilo de la sekvinta jaro, japanaj armeanoj kaj policianoj subinstigis pro-japanajn loĝantojn surprizataki la transloĝigitojn kaj tio mortigis pli ol 200 homojn. La japana koloniisma instanco perforte transloĝigis la lastajn pli ol 200 homojn al Chuanzhong-insulo.

Ahn Jung-Geun [ĝungun] kaj Ito Hirobumi

Ito Hirobumi estis sinsekve japana ĉefministro kaj superintendantato de Koreio. Li alvenis al Harbino de Ĉinio ĉirkaŭ la 9-a horo en la 26a de oktobro 1909. Li, kiel la speciala sendito de la japana registaro, estis survoje por inspekti Manĉurion kaj ordigi la rilaton kun Rusio. Kiam li eltrajniĝis kaj estis inspektanta la honoran gvardion, al li impetis Ahn Jung-Geun el la publiko kaj pafis per pistolo. Ito mortis post 30 minutoj de kiam li estis pafita. Ahn Jung-Geun, kiu estis la trupestro de civilsoldatoj, menciis 15 kaŭzojn por kondamni Ito Hirobumi pro la krimoj, ke li mortigis la reĝinon Myeongseong, rezignigis la imperiestron Go Jong, perforte decidis la Protektoratan

Traktaton inter Koreio kaj Japanio en 1905 ktp.

Ahn Jung-Geun, kiu estis arestita ĉe la freŝa faro, postulis juĝadon laŭ internacia juro, ĉar li ekagis kiel la trupestro de civilsoldatoj. Ĉar Harbino estis loko, kiu adaptis eksterteritoriecon, la juĝpovo de la afero origine apartenis al Koreio.

Sed Japanio, pli vaste difinante la regulon de la Protektorata Traktato inter Japanio kaj Koreio en 1905, ke japan-registaraj instancoj protektas koreojn en eksterlandoj, komisiis la aferon al la Japana General-gubernatoro en Manĉurio, kiu estis japana institucio por regi Manĉurion. Ĉar Japanio antaŭtimis, ke la ago de Ahn Jung-Geun stimulos la sendependiĝan volon de koreoj, kaj ke okazos movado kontraŭ la aneksado, la distrikta tribunalo de la Japana General-gubernatoro en Manĉurio ne permesinte fremdulan advokaton kiun Ahn Jung-Geun postulis, juĝfaris kaj verdiktis pri mortpuno al li preskaŭ sen enketo kaj sen interpreto. Kaj je la 10-a horo en la 26-a de marto 1910, Ahn Jung-Geun estis ekzekutita je la sama horo, kiam Ito mortis, kaj 5 monatojn post la la morto de Ito.



Maldekstre: Ahn Jung-Geun

Dekstre: Ito Hirobumi


Ĉu Japanio perforte okupaciis aŭ laŭleĝe aneksis Koreion?

Laŭ la internacia leĝo, pakto subskribita perforte de la reprezentanto de koncernata regno estas konsiderata ne valida. La dua Japana-Korea Interkonsento en 1905 estis subskribita en la palaco de la korea imperiestro, kiu estis ĉirkaŭita de japanaj soldatoj, kaj la imperiestro kaj ministroj estis timigitaj per minacaj vortoj.

Post liberiĝo de la kolonia regado, la korea registaro asertis, ke "La Pakto de 1905" estas nevalida kaj sekve, ankaŭ "La Pakto pri Aneksio de Koreio" subskribita en 1910 premise de la antaŭa pakto estas konsekvence nevalida.

En Koreio oni vaste uzas la esprimon "perforta okupacio". Male, la japana registaro konsideris, ke ambaŭ paktoj supre menciitaj estas validaj, kaj en Japanio oni ĝenerale uzas la esprimon "aneksio de Koreio". La diferenco inter la sintenoj de la du landoj neniel solviĝis, eĉ kiam la du landoj starigis diplomatiajn rilatojn en 1965.

Inter fakuloj estas pli-malpli komuna kompreno, ke la pakto en 1905 estis perforte trudita, dum ili opinias malsame pri tio, ĉu la kolonia regado dum 35 jaroj post la "aneksio" estis laŭleĝa aŭ ne, el la vidpunkto de la internacia leĝo. Koreaj scienculoj konsideras ĝin kontraŭleĝa, dum japanaj scienculoj ankoraŭ ne havis konsentitan konkludon.



La originalo de la "Pakto pri Aneksio de Koreio" subskribita de la General-gubernatoro Terauchi Masatake de Japanio kaj Ĉefministro Lee Wan-Yong de Koreio.


La Intensigo de la Japana Regado de Koreio

1. Militpolica Regado

Japanaj politikistoj ofte diras, ke "koreoj volis la unuiĝon de Japanio kaj Koreio". Kiel vi pensas pri tio? Ĉu tio estas vera?

La General-gubernatoro de Chosun estis absoluta aŭtoritatulo


Palaco Gyongbokgung, blokita de la oficejo de la General-gubernatoro



Japanio perforte forprenis la suverenecon de Koreio, kaj instalas gubernatoran oficejon en Seulo. Konforme al la centro de kolonia regado, la plej multaj altrangaj funkciuloj ĉe General-gubernatoro de Chosun estis japanoj. Komence la General-gubernatoro uzis la domegon de la superintendentejo, sed ĝi ne plu povis enteni la organizaĵojn kaj oficistojn pli kaj pli multnombriĝantajn. Do Japanio konstruis apartan domegon por la General-gubernatoro, malkonstruinte la antaŭan parton de la palaco Gyongbokgung, kiu estis la ĉefstabejo de la Chosun-dinastio.

La General-gubernatoro de Chosun havis rajton laŭplaĉe regi Chosun, ricevante ordonon de la japana imperiestro. Li rajtis ankaŭ komandi la japanan armeon en Chosun kaj fari ĉion por "defendi Chosun", ne nur leĝdonon, justicon kaj administradon de Chosun. En la kolonio Chosun, Japanio ne aplikis la Meiji-konstitucion, pri kiu japanoj fieris kiel simbolo de modernigo. Eĉ iuj japanaj politikistoj antaŭtimis, ke oni donas tro multe da rajtoj al la General-gubernatoro de Chosun.

La Organizo de la Oficejo de la Chosun General-gubernatoro, 1910




De naskiĝo ĝis tombo laŭplaĉe de la polico

Japanio, perforte forpreninte la korean ŝtataŭtoritaton, taĉmentis sian armeon en gravaj lokoj. Ĝi speciale severe gardis la lokojn, kie civilsoldatoj vigle aktivis, kaj tiujn ĉirkaŭ la fervojoj al Seulo. Polico mastrumis la publikan ordon kaj sekurecon, kaj ĝendarmaro komandis la ĝeneralan policon. Kiel ni vidas sur la mapo, estis instalitaj ĝendarmaj taĉmentejoj kaj policoficejoj ankaŭ en izolitaj lokoj sur montoj. Tiel Japanio subpremis kaj regis Koreion per la forto de la armeo kaj polico aranĝitaj en gravaj lokoj.

Ĝendarmaro estas militpolico, kies tasko estas origine ordigi armeanojn kaj esplori iliajn krimojn. Sed la ĝendarmaro akaparitis ankaŭ policajn aferojn. Ĝi intencis, laŭeble frue reglamentante Koreion, firme starigi la socian ordon por oportune regi ĝin kiel sian kolonion. Timigante koreojn laŭ la perforta politiko, Japanio intencis rompi ilian sendependiĝan volon. Pro tio Japanio vestis per uniformo ne nur administrajn oficistojn, sed ankaŭ instruistojn.

La ĝendarmaro respondecis ne nur pri socia ordo kaj sekureco, sed ankaŭ pri preskaŭ ĉiuj aferoj, t.e. registigo de loĝantoj, disvastigo de la japana lingvo, prevento de epidemioj, mezurado de pluvkvanto, kontrolado de tombejoj ktp. Koreoj ekde la naskiĝo ĝis la entombiĝo ja ne povis esti liberaj de la kaŝobservado kaj kontrolado de la militpolicianoj.



Revivigi la punrimedon frapi per vipo

Militpolico havis la rajton puni koreojn sen plenforma juĝo. Ili rajtis doni al koreoj punrimedon frapi per vipo. Ili pensis, ke tio malplimulte kostas ol kateni krimulojn en malliberejo. La punrimedon la registaro de Chosun abolis en la Reformacio de 1894, pro ĝia malmoderneco kaj barbareco. Sed Japanio revivigis ĝin, kaj ĝin pli kruele ŝanĝinte aplikis nur al koreoj. En jena skribaĵo oni povas imagi la suferojn de koreoj, kiuj estis batataj laŭ la punrimedo frapi per vipo.

La puntabulo kaj vipo de la punilo, kiujn japanoj faris por torturi krimulon, estis tute malsamaj karaktere kaj enhave ol la antikvaj, kiujn la Chosun-dinastio faris por regi sian popolon. La japana puntabulo estis farita por ke krimulo kuŝu surventre sur ĝi, kaj havas truon en la parto kien pubo atingas. Oni firme ligis al la puntabulo la talion, ambaŭ brakojn kaj kruojn de krimulo. Fine de la vipo farita el penis de bovo, oni pendigis plumbon, tiel ke pecoj de la karno borata de la plumbos kaj sango terure ŝprucis kiam oni frapis krimulon.

— El 「La 36-Jara Historio de Perforta Okupado de Chosun fare de la Militista Lando, Japanio」 de Mun Jeongchang

2. La Realo de "la Kultura Politiko"

Japanio, kiu regis koreojn utiligante la ĝendarmaron, ŝanĝis la rimedon tuj post kiam okazis la Movado de la 1-a de Marto. "Kulturo" estis uzata anstataŭ pafilo kaj glavo. Kio kaj kiel diferenciĝis la "kultura politiko" kompare kun la militpolica regado?



Gang Ugyu
(1855-1920), kiu jetis
bombon al la nova
General-gubernatoro
Saitoo Makoto.

De la militarisma regado al la kultura politiko


Japanio, spertinte la intensan reziston de koreoj — La Movado de la 1-a de Marto — eksciis, ke ili ne povas regi Koreion nur per armeo. Ankaŭ la malboniĝinta publika opinio estis por ili ŝarĝo. En tia situacio Japanio elektis "kulturan politikon".

La nova General-gubernatoro Saitoo Makoto, kiu alvenis al la posteno malgraŭ la bombado de la 65-jara maljunulo Gang Ugyu, deklaris ke de nun li plenumos "kulturan politikon".

La registaro reformis la registarajn organizojn kaj instituciojn, vastigos la limon nomumeban al la General-gubernatoro, kaj ankaŭ reformis la sistemon de polico. Per plibonigo de la enoficigo kaj la trakto de koreoj, la registaro traktos koreojn egale kun japanoj. ... Mi esperas vian komprenon, ke ni senkompatate traktos per rigora puno tiun, kiu malprudente parolas, agitas la publikon, kaj inhibas publikan sekurecon.

— El 「La Konsilo kaj Instrukcio pri la Ŝtata Administrado」

"Ankaŭ civila oficisto, kiu ne estas armeano, povas esti nomumita de General-gubernatoro." "Militpolican sistemon ni abolas." "Ni ankaŭ nuligas la sistemon, ke la ŝtatoficistoj kaj instruistoj surmetas al si la uniformon kaj glavon. Ni parte agnoskas la liberon de eldonado, kunveno kaj asociado. Ni plivastigas la okazon de edukiĝo de



koreoj" ktp... Nur en unu ekrigardo ŝajnis, ke ĝi plimildigis ol militpolica regado. Sed ial timigas nin la lasta averto: "Mi esperas vian komprenon, ke..."

La "kultura politiko" estis nur ŝajniga

Japanio anoncis pri plenumado de kultura politiko, sed neniu civilulo estis nomumita en la General-gubernatoro de Chosun ĝis la korea emancipiĝo en 1945. Kvankam oni abolis la sistemon de militpolico, neniam estis malstreĉitaj la gvatado kaj subpremado al koreoj. Male Japanio fortigis la policon kaj severe punis tiujn, kiuj kontraŭstaris al la kolonia regado kaj klopodis por sia sendependiĝo, adaptante la leĝon subteni publikan ordon.

Pli multaj koreoj estis nomumitaj en ŝtatificoj kompare kun la periodo de militpolica regado, sed ankoraŭ plejparte en malaltklasaj aŭ provizoraj postenoj. La General-gubernatoro, kvankam li permesis eldonon de ĵurnaloj kaj gazetoj, tamen cenzurante forviŝis la artikolojn kiuj ne plaĉis al li. Dum unu jaro en 1929, vendo de ĵurnaloj estis malpermesita 63-foje, kaj artikoloj estis forviŝitaj 82-foje.


La General-gubernatoro permesis la organizon de sociaj grupoj Singanhoe kaj Geunuhoe, sed policianoj partoprenis la kunvenojn. Kaj se iu parolis kun eĉ iom da agitado, ili tuj arestis tiun meze de la parolado.

Kion Japanio celis per la ŝajniga kultura politiko? Ni esploru la instrukcion de la General-gubernatoro en 1920, "la rimedo kontraŭ la nacia movado de Chosun".

- Japanio, penetrante inter nobelojn, Yangban-ojn, studentojn de konfuceanismo, edukistojn kaj religiulojn, donis al ili oportunecon kaj subtenon laŭ rango kaj stato, por ke ili organizu por-japanajn grupojn.
- Por naski multajn por-japanajn personojn Japanio donis oportunecon kaj subtenon al civilaj simpatiantoj, kaj trejnis ilin sub la nomo de talento-edukado.

Per unu ekrigardo ni povas vidi, ke Japanio volis kreskigi por-japanajn grupojn. Japanoj pensis, ke se ili forte subtenas japanan kolonian regadon, sendependiĝa movado, kiel la Movado de la 1-a de Marto, ne aperos. Do la "kultura politiko" estis strategio por ke Japanio firme regu la kolonion, allogante kaj disigante koreojn.

ĵurnalo blanke cenzurita



3. Ekonomia Politiko kaj Uzurpado

Japanio forprenis la suverenecon de Koreio kaj plenumis diversajn ekonomiajn politikojn por prepari la ekonomian bazon. La gravaj ekonomiaj politikoj en la jaroj 1910-1920 estis termezurado kaj rizoproduktado. Kial Japanio emfazis tiujn politikojn kaj kiujn influojn ili donis al la koreaj ekonomio kaj socio?



*La haveno Gunsan, Koreio.
Rizo transportota al
Japanio akumuligas.*

Ekkomenco de termezurado

Japanio enkondukis termezuradon en Koreio de 1910 ĝis 1918. La tasko modernigi terposedsistemon jam konsiderinde progresis en la periodo de la Korea Imperio. Sed Japanio nuligis tion, remezuris teron kaj faris registron por posedrajto (registrita rajto). Rezulte, Japanio certe garantiis la posedrajton de terposedantoj. Pri la tero, kiun japanoj aĉetis kontraŭleĝe post la malfermiĝo de Koreio, la

leĝa posedrajto estis rekonita. Sed la kultivrajto de la terkulturistoj, kiun ĝis nun oni konvencie rekonis, ne povis esti gardata. Sekve, terkulturistoj batalis kontraŭ bienuloj kaj la Oficejo de General-gubernatoro por gardi la rajton. Rezulte de la termezuro, impostebla tero multiĝis je 52% dum 10 jaroj kaj ankaŭ la enspezo de terimposto duobliĝis.

Laŭ la termezurado, ĉiuj terpecoj apartenitaj al la koreaj reĝaj familioj kaj ŝtatoj, kaj tiuj terpecoj kies posedantoj estis ne klaraj, estis uzurpitaj de la General-gubernatora Oficejo. En la jaro 1920, la General-gubernatora Oficejo posedis ĉirkaŭ 110 milojn da hektaroj.

Rizprodukta plano kaj uzurpado de rizo

La japana ekonomio rapide progresis kadre de la 1-a Mondmilito. Pro la rapida industriiĝo, mankis sufiĉaj laboruloj kaj la prezoj altiĝis. La prezo de rizo rapide altiĝis kaj popolo tumultis kelkloke pro rizo. Pro tio, Japanio ordonis al la General-gubernatoro de Chosun establi planon por pliprodukti rizon (1920-1934).



La unujara rizkonsumo en Japanio estas ĉirkaŭ 6.5 milionoj da sok-oj (1 sok egalas 150 kg.), sed la enlanda produktita kvanto en jaro estas malpli ol 5.8 milionoj da sok-oj. Sekve, Japanio devas kompletigi sian ĉiujaran mankantan porcion el la imperiaj teritorioj kaj aliaj landoj. La popolo de Japanio multiĝas po 700 mil homoj jare. La konsumkvanto por unu homo iom post iom kreskas laŭ la altiĝo de la vivnivelo de la popolo kaj la situacio de rizmanko daŭras. Tial, vere urĝa afero de la nacia politiko estas solvi la problemon pri la nutraĵoj de la Imperio Japanio per pliproduktado de rizo.

— General-gubernatora Oficejo, de Chosun: 『Rizprodukta plano en Koreio』 (1926)

La celo de la rizprodukta plano estas fekundigi la landon kaj multigi la rizprodukton per irigacia sindikato por rezerva akvujo kaj kanalo. Sed, ĉar rizeksporto plimultiĝis ol rizprodukto, la rizkonsumkvanto por unu koreo malmultiĝis. Farmantoj devis pagi al bienuloj ne nur pli ol 50% de la rikoltita kvanto, sed ankaŭ la koston por la irigacia sindikato ktp. Kvankam la terkosto altiĝis kaj la ekonomia povo de la bienulo fariĝis forta pli kaj pli, tamen la ekonomia stato de la terkulturistoj pli malboniĝis. Agrikulturistoj kun sia tero daŭre malmultiĝis, kiel montrite en la grafikaĵo, en 1932, 78.1% de la farmantoj estis luantaj alies terojn. La kulturistoj ne havantaj eĉ unu pecon da tero forlasis sian karan hejmlokon kaj transloĝiĝis al Manĉurio aŭ Japanio ktp.

Chosun-a kompanio-akto kaj japana industria politiko en la kolonio

Dum la 1910-aj jaroj, Japanio estis pasiva al industria evoluo de la kolonioj, sed dediĉis sin al ekonomia evoluo de sia lando pro tio, ke Japanio ne havis povon investi en koloniojn. Por establi kompanion en Koreio, oni devis ricevi permeson de la Chosun General-gubernatora Oficejo laŭ la Chosun-a kompanio-akto (1911). Poste kondiĉoj investi en Koreio estis plibonigitaj, Japanio abolis la Chosun-an kompanio-akton en 1920. De tiu tempo, japanaj kompanioj elbranĉiĝis en Koreion.



4. Eduka kaj Kultura Politiko

Japanio planis fari koreojn "imperiaj regatoj" por eterne regi. Sekve Japanio klopodis, por ke koreoj ne tenu sendependan kaj nacian spiriton. Ĉu ni sciu, kiel japanoj penis fari koreojn "fidelaj japanoj"?

目録	
第一 緒言	第一 緒言
第二 朝鮮の歴史	第二 朝鮮の歴史
第三 朝鮮の政治	第三 朝鮮の政治
第四 朝鮮の経済	第四 朝鮮の経済
第五 朝鮮の文化	第五 朝鮮の文化
第六 朝鮮の教育	第六 朝鮮の教育
第七 朝鮮の宗教	第七 朝鮮の宗教
第八 朝鮮の社会	第八 朝鮮の社会
第九 朝鮮の外交	第九 朝鮮の外交
第十 朝鮮の将来	第十 朝鮮の将来
第十一 朝鮮の現状	第十一 朝鮮の現状
第十二 朝鮮の将来	第十二 朝鮮の将来
第十三 朝鮮の将来	第十三 朝鮮の将来
第十四 朝鮮の将来	第十四 朝鮮の将来
第十五 朝鮮の将来	第十五 朝鮮の将来
第十六 朝鮮の将来	第十六 朝鮮の将来
第十七 朝鮮の将来	第十七 朝鮮の将来
第十八 朝鮮の将来	第十八 朝鮮の将来
第十九 朝鮮の将来	第十九 朝鮮の将来
第二十 朝鮮の将来	第二十 朝鮮の将来

La enhavotabelo de lernolibro pri japana historio.

La korea historio aperas kiel ĝia apendico.

Ne necesas altnivela edukado

Japanio penis instrui al koreaj studentoj uzeblan scion kaj modero-virton, kaj eduki ilin kiel homojn kun kvalito kaj karaktero kiel fidelaj regatoj de la Japana Imperio. Tion ni povas kompreni el la Chosun-a edukado-akto publikigita de la General-gubernatora Oficejo en aŭgusto 1911.

Artikolo 2: La celo de la edukado estas eduki fidelajn popolanojn, surbaze de "la Imperiestra Mesaĝo pri Edukado".

Artikolo 3: La edukado devas esti taŭga por la tendenco de la epoko kaj vivnivelo de la popolo.

Artikolo 5: La celo de la ĝenerala edukado estas instrui ĝeneralan scion kaj funkcion, speciale kultivi popolan karakteron kaj disvastigi la nacian (japanan) lingvon.

Siatempe, enlandaj studentoj de Japanio estis edukataj dum 6 jaroj en elementa lernejo sub deviga edukado kaj dum 5 jaroj en mez-grada lernejo. Tamen koreaj studentoj lernis entute nur 8 jarojn; 4 jarojn en elementa kaj 4 jarojn en mez-grada lernejo. Pretekste de la enlanda cirkonstanco de Koreio kaj nivelo de la popolo (tendenco de la epoko kaj vivnivelo de la popolo) la lernoperiodo estis mallongigita. Japanio distingis ankaŭ la nomojn de lernejoj: ĝenerala lernejo, altĝenerala lernejo kaj virina altĝenerala lernejo por koreoj, kaj elementa lernejo, meznivela lernejo, virina altgrada lernejo por japanoj. Krom tio, la kvarjara elementa edukado ne estis deviga. Kvankam koreoj deziris edukiĝi, ili ne povis eniri pro la manko de lernejoj.

La General-gubernatora Oficejo emfazis elementan kaj teknikajn edukojn pli ol tiujn de kulturo, scienco kaj arto. Se teknika edukado estis altnivela, ĝi ankaŭ estis restriktita. Ĉar al ili ne necesis sagacaj, kritikaj kaj talentplenaj koreoj. Al ili sufiĉis nur homoj silente sekvantaj ordonojn.

Post la Movado de la 1-a de Marto, la edukadperiodo longiĝis ĝis 6 jaroj por elementa lernejo, kaj ĝis 5 jaroj por meza-supermeza lernejo. Sed koreoj kiuj povis eniri en lernejojn ne estis tiel multaj. Jena tabelo montras la proporcion de studentoj koreaj kaj japanaj en Koreio. Kvankam la koreaj studentoj pli multas ol la japanaj, tamen la proporcio estas tre malalta kompare kun la nombroj de koreoj en Koreio. Siatempe malmultaj japanoj loĝis en Koreio. Ju pli kompariĝas la studentoj de supermeza edukado, des pli malleviĝas tiu de Koreio. Speciale, la diferenco de studentinoj de meza-

supermeza lernejo altiras atenton. Krome, Japanio fondis universitatojn, tamen eniri en universitaton estis tre malfacile por koreoj.

Privataj lernejoj kaj "sudang" (tradicia lernoĉambro en vilaĝoj) estis kontrolataj. Se tiuj edukejoj ne uzis tekstojn, kiujn la General-gubernatora Oficejo redaktis kaj oficiale aprobis aŭ agnoskis, aŭ se ili rifuzis instrukciojn, ili devis esti fermitaj. Pro tio, privataj lernejoj malmultiĝis de 2,000 al 749, dum 9 jaroj post la forrabo de la korea suvereneco.

Instrui la japanan lingvon kaj japanan historion

Japanio emfazis la edukadon de la japana lingvo por fari la koreojn "lojalaj regatoj" de la japana imperiestro. Lernohoroj de ĝenerala (elementa) lernejo estis 26-27 horoj en semajno en 1911, el kiuj 10 horoj estis por la japana lingvo. Sed por la korea lingvo nur 5-6 horoj estis donitaj, inkluzive ĉinajn ideogramojn. La lernoperiodo de ĝenerala (elementa) lernejo fariĝis 6 jaroj en 1922. Kaj lernohoroj de la japana lingvo plimultiĝis ĝis 9-12 horoj semajne, kontraŭe tiuj de la korea lingvo malmultiĝis ĝis 2-5 horoj. Samtempe, Japanio emfazis moralon, japanajn historion kaj geografion, por trejni koreojn kiel japanojn.

Eduki malsuperecan komplekson

Plie de tiu ĉi edukada politiko, Japanio distordis la korean historion, ĉar Japanio pensis, ke tio estas metodo de origine bari al la koreoj la "malbonon revii pasintan imagon de sendependa nacio" kaj "la venenon konfuzi popolan menson". La General-gubernatora Oficejo pligrande reorganizis "Kompilogrupon de Korea Historio" kiel "Redaktokomitaton de la Korea Historio" en la jaro 1922. Kaj ĝi redaktis la grandvoluman libron "Historio de Koreio" de la jaro 1932. En la libro Japanio emfazis, ke "koreoj pli ofte disiĝis ol unuiĝis", "la korea socio ne povas progresi pro la stagnado same kiel putra akvo", "la korea historio daŭris ne kun aŭtonomio sed sub heteronomio".

Kompreneble, la konkludo de la libro estas, ke la tradicio kaj kulturo de Koreio estas malsupereca, kaj ke koreoj mem ne havas kapablon sendependiĝi. Pro tio Japanio havas mision klerigi la koreojn kaj progresigi Koreion, kaj kolonii Koreion estis la ĝusta vojo.

Nombro de studentoj, koreaj kaj japanaj, en Koreio, 1925

Elementa lernejo	Nacio	Studentoj	Koreaj/ Japanaj studentoj
Elementa lernejo	Koreo Japano	386,256 54,042	1/6
Mezgrada lernejo (por knaboj)	Koreo Japano	9,292 4,532	1/21
Mezgrada lernejo (por knabinoj)	Koreo Japano	2,208 5,545	1/19
Teknika lernejo	Koreo Japano	5,491 2,663	1/21
Instruista lernejo	Koreo Japano	1,703 611	1/16
Kolegio	Koreo Japano	1,020 605	1/26
Universitato	Koreo Japano	89 232	1/109

Peco de Historio

Kontroli la fervojon

Meze de la 19-a jarcento la trajno kaj fervojo en Eŭropo estis la simbolo de rezervaĵoj kaj riĉo. Sed, la fumo kaj fajfilego ne povis transdoni tiujn sentojn al koreoj. Imperiismaj landoj ĉirkaŭantaj la Korean Duoninsulon konkuris por okupi la konstruadon de fervojoj en Koreio. "La devizo pri konstruo en Koreio" farita de Japanio indikis la kialon.

Elpreni la institucion kaj establaĵon de transportado kaj komunikado estas tre grave por multaj terenoj de politiko, armeo kaj ekonomio. Fervoja entrepreno, la transporta institucio, estas la plej grava por administradi Koreion.

Ekiginte la militon kontraŭ Rusio, Japanio akcelis la konstruadon de trajnlinioj, Seulo-Busan kaj Seulo-Shinueju linioj. La konstrua procedo de la fervojo estis laŭlitere rabado mem. Por la linio Seulo-Busan la kosto aĉeti teron necesan por konstrui stacidomon kaj fervojon estis malpli ol 2% de tuta konstrukosto, sed en Japanio la kosto tiam

estis preskaŭ 13%. Do, se ni komparas la du kostojn, la prezo de la forprenita tero en Koreio estas preskaŭ senpaga. La salajro de la koreoj mobilizitaj por fervoja konstruo estis malpli ol 1/2 aŭ 1/3 de tiu de japanoj. La salajro estis pli malalta ol la pago por porokaza laboristo en provincoj, tra kiuj la fervojo pasas. Eĉ okazis multfoje, ke Japanio ne pagis la salajron.

Ĉu koreoj nur laŭdis ĉi tian fervojon kiel simbolon de "civiliza ekfloriĝo"? Kompreneble ili rezistis. Se oni rigardas "la militan ordonon pri la protekto de militaj kabloj kaj fervojoj", kiun la garnizonanta japana armeo en Koreio publikigis en la jaro 1904, ni povas vidi, kiel serioza la rezistado estis.



Japanaj armeanoj publike ekzekutas koreojn ĉar ili obstaklis la konstruadon de fervojo.

1. Tiu, kiu damaĝis militan kablون (kaj militan fervojon), estos punita per morto.
2. Tiu, kiu kaŝis la damaĝinton, estos punita per morto.
3. Al tiu, kiu arestis damaĝinton, 20 ŭonoj estos donitaj kiel premio.

Kiel ni vidis en la milita ordono, la kabloj kaj fervojoj estis gravaj celoj por ataki. Se volontulaj armeoj estis arestitaj pro la batalo detrui fervojojn, Japanio pafmortigis ilin kiel ekzemplo, antaŭ la popoloj kiuj estis amasigitaj perforte el ĉirkaŭaj loĝantoj. Sed la rezistado ne haltis.

Ankaŭ laboristoj mobilizitaj por fervoja konstruado kaj ĉirkaŭa loĝantaro rezistis al Japanio, obstaklante la konstruadon de fervojoj aŭ malhelpante la veturadon de trajnoj.

Siatempe, la japana fervojo uzis mallarĝan trakon. Japanio akiris konstrurajton de la fervojo inter Andong (Dandong) kaj Fengtian (Shenyang) en la jaro 1909, kaj plenumis konstruadon de fervojponto trans la Riveron Yalu (inter Koreio kaj Ĉinio) en 1911. De tiu tempo, Japanio povis rekte veturi al Ĉinio de Busan en Koreio. La fervojo fariĝis gvidlinio por invadi Ĉinion.


Orienta Koloniada Kompanio

En 1908, Orienta Koloniada Kompanio (OKK), akcia kompanio, estis fondita surbaze de "Leĝo pri Orienta Koloniada Kompanio", kies celo estis plenumi agrikulturan kaj kolonian entreprenadon en Koreio. Okaze de la fondo, burokratoj de la japana registaro ludis la ĉefan gvidrolon.

En 1917 dum la Unua Mondmilito, ĝia centra oficejo estis translokita de Keijo [keiĵo] (la nuna Seulo) al Tokio, kaj novaj celoj de la entrepreno pri financado kaj urboplanado estis aldonitaj. Ĝi etendis sian reton de filiaj oficejoj al Manĉurio, Ĉinio, Filipinoj, Singapuro ktp. Unu eksfunkciulo de la kompanio diris, ke OKK kvazaŭ paŝis kun la sorto de la Japana Imperio.

Kiel montriĝas en la grafikaĵo, OKK, en la unua duono de la 1910-aj jaroj rapide plimultigis sian posedatan areon de rizkampoj, kiu inkluzivis pli ol 10,000 hektarojn da bonkvalitaj rizkampoj, kiujn la eksa Korea Registaro donacis al la kompanio. Kvankam la areo de posedataj rizkampoj malplimultiĝis post la fruaj 1910-aj jaroj, la rango de OKK kiel la plej granda bienulo en Koreio neniam ŝanĝiĝis ĝis 1945.

Evoluo de la areo de rizkampoj posedataj de OKK



Sendependiga kaj Rezista Movado kaj Socia Movado

1. La Movado de la 1-a de Marto

Koreoj amase inundis stratojn krie postulante korean sendependiĝon. Tiam estis kiam koreoj ŝajne ne povis eĉ pripensi la reziston sub la akra tranĉranda ĝendarma kaj polica regado.


Eksplodis la krio "Hura! Korean Sendependiĝon" kiel alta tajdo

Malgraŭ la ĝendarma kaj polica regado, sendependiga movado en kaj ekster Koreio ne ĉesis. Enlande, sekretaj organizoj por sendependiga movado estis fonditaj, publikigis proklamon kaj manifeston, kaj amasigis monrimedojn. La bataloj de voluntularmeoj daŭris. Multaj organizoj fondis lernejojn kaj trejnis sendependigajn armeojn en Manĉurio kaj la Marborda Provinco de Siberio.

Ĉirkaŭ fino de la 1-a Mondmilito, la koncepto de "nacia memdecido" tiris internacian atenton. Dank' al tiu medio, la movadanoj por korea sendependiĝo plispronis al en- kaj ekster-landa sendependiga movado.

De ĉirkaŭ januaro 1919, Chondogyo kaj aliaj religianoj kaj studentoj ludis gvidan rolon por prepari la movadon. Komence, ili antaŭenpuŝis la movadon sendepende, sed okaze de la Deklaracio de Sendependiĝo fare de koreaj studentoj en Tokio, Japanio, en la 8a de februaro 1919 ili integriĝis en unu movadon. La movadanoj adoptis la agadplatformon "popularigo, unuigo, senperforto" kaj distribuis al la ĉefaj urboj tra la lando la Deklaracion de Sendependiĝo, kiun sekrete ellaboris 33 naciaj reprezentantoj.

Ribeloj okazis de tago al nokto, precipe en bazartagoj, en kiuj miloj da





homoj amasiĝis kaj estis malfacile aresteblaj. Studentoj strikis tra la tuta lando. Studentoj de regionoj estis tuj kaptitaj de policanoj kaj revenigitaj al siaj lernejoj, sed plejparto de la studentoj nur ŝajnis sin studi. Plimulto de la terkulturistoj rifuzis semadon. Komercestoj rifuzis malfermi butikojn, ĝis kiam ili estis minacataj per bajonetoj. Pro la malŝalto de la komunikado, oni neniam sciis, kie kio okazas. Pasis du monatoj post kiam la unua ribelo okazis, tamen ankoraŭ ĝis nun ĉiutage alvenas arestitoj. Pro tio, oni povas konjekti, ke la ribelo jam disvastiĝis iugrade ĝis montvilaĝoj. El letero de usona misiisto, 『Kolekto de leteroj de sendependigaj movadanoj sub la japana regado』

Finfine koreoj simultane kriis "Hura! Korean Sendependiĝon!" en la ĉefaj urboj tra la tuta lando en la 1-a de marto, 1919.

La sendependiga movado, kiam ĝi unuafoje komenciĝis, disvastiĝis, kiel ni vidas en mapo kaj leteroj, de la ĉefaj urboj al mezaj kaj malgrandaj urboj, kaj al izolitaj lokoj sur la montoj. Rezulte ĝi okazis tra la tuta lando. Japanio perforte subpremis la reziston de la koreoj. La armeo kaj policanoj de Japanio masakris, arestis kaj torturis koreojn.

La sendependiga movado disvastiĝis eksterlanden el Koreio. Samnacionoj en Manĉurio, la Marborda Provinco de Siberio kaj Usono kriis "Hura! Korean Sendependiĝon", kaj akuzis al internaciaj socioj la kruelajn brutalajn de Japanio.



Nova turnopunkto de la sendependiga movado

Japanio sukcesis subigi la sendependigan movadon sub la silenta konsento de la mondaj potencoj kaj ĝisfunda subpremo de Japanio, sed ili ne povis fleksi la sendependan volon de la koreoj. La korea popolo, vekita pro la Movado de la 1-a de Marto, disvolvis nacian movadon diversforme de laboristoj, terkulturistoj kaj studentoj, ktp.

En eksterlandoj, la movadanoj sentis la necescon de centra organizo por efike gvidi la sendependigan movadon kaj establis Korean Provizoran Registaron en Ŝanhajo, Ĉinio. Koreaj sendependaj armeoj aktive agantaj en Manĉurio kaj la Marborda Provinco de Siberio batalis, frekventante Koreion, kontraŭ japanaj armeoj.

Aliflanke, Ĉinio, Hindio kaj aliaj landoj invaditaj aŭ regataj de Japanio esprimis sian altan intereson pri la Movado de la 1-a marto. Precipe, ĉinaj kleruloj kaj studentoj informis siajn popolanojn pri la korea movado kaj apelaciis al kontraŭjapana batalo.

2. La Movado de la Kvara de Majo

La Movado de la Kvara de Majo en 1919 estis patriota demokratia movado de la ĉina popolo kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo. Kiel fariĝis tiu movado? Kiel ĝi disvolviĝis kaj kian signifon ĝi havas? Kian influon ĝi havis al la ĉina historio?

La 21-punkta postulo de Japanio al Ĉinio

Somere de 1914 eksplodis la Unua Mondmilito. Profitante la okazon Japanio, aliancano de Britio, deklaris militon kontraŭ Germanio kaj kaptis la rajtojn de Germanio en la de ĝi okupitaj urbo Qingdao kaj Shandong-provinco. En 1915, Japanio elmetis al Ĉinio 21 postulojn por heredi la rajtojn de Germanio en la Shandong-provinco kaj aliajn rajtojn politikajn, ekonomiajn kaj militajn. Sub la premo de Japanio, la tiam prezidento de la Ĉina Respubliko Yuan Shikai subskribis en Pekino la “Traktaton pri la Suda Manĉurio kaj Orienta Interna Mongolio” kaj la “Traktaton pri la Shandong-provinco”, bazitajn sur la 21-punkta postulo. Per tiuj traktatoj Japanio ne nur heredis la rajtojn de Germanio en la Shandong-provinco, sed ankaŭ ricevis la rajton konstrui fervojojn, ekspluati minejojn kaj establi komercajn havenojn k.a. rajtojn en Ĉinio.

Ĉefa enhavo de la 21-punkta postulo

1. Pri la problemo de Shandong, agnoski, ke Japanio heredu la rajtojn de Germanio en Shandong.
2. Japanio havas la rajton longe luadi la Sudan Manĉurion (nun la Nordoriento de Ĉinio) kaj la orientan parton de Interna Mongolio, funkciigi industriajn kaj komercajn entreprenojn, ekspluati minejojn kaj konstrui fervojojn en la loko.
3. Ŝanĝi Hanyeping-kompanion en entreprenon kune funkciigatan de Ĉinio kaj Japanio kaj malpermesi ekspluatadon de la minejoj en la ĉirkaŭaĵo fare de aliaj ekster la kompanio.

Pekinaj studentoj kolektiĝis antaŭ la Tian'anmen-pordego okaze de la Movado de la Kvara de Majo.



4. La ĉina registaro promesu ne luigi la havenojn kaj insulojn laŭlonge de la marbordoj al aliaj landoj.
5. Ĉinio dungu japanajn konsilantojn pri politiko, militaj aferoj kaj financo, funkciigu kune kun Japanio policon kaj arsenalojn, Ĉinio cedu al Japanio la rajton konstrui fervojojn de Wuchang ĝis Nanchang k.a., Japanio ĝuu privilegion ekspluati minejojn, konstrui marhavenojn, konstrui ŝipfabrikojn kaj vojojn en la Fujian-provinco, Japanio havu rajton prediki en Ĉinio.


La Movado de la Kvara de Majo

En aŭgusto 1917, Ĉinio deklaris militon kontraŭ Germanio kaj fariĝis unu el la aliancanoj kontraŭ Germanio. Post la fino de la Unua Mondmilito, Ĉinio partoprenis la Pacan Konferencon en Parizo kaj elmetis, kiel unu el la venkintaj landoj, la postulojn aboli la privilegiojn de la potencoj en Ĉinio, aboli la 21-punktan postulon, redoni la rajtojn en Shandong al Ĉinio. Sed Britio, Usono kaj Francio faris kompromison al Japanio, rifuzis la justajn postulojn de Ĉinio kaj decidis transdoni la rajtojn de Germanio en Shandong al Japanio.

Tiam la tajdo de nacia sendependiĝo skuis la mondon. Informiĝinte pri tiu decido de la Paca Konferenco en Parizo, indigniĝis la studentoj de Pekino. En la kvara de majo, 1919, pli ol 3 mil studentoj mitingis antaŭ la Tian'anmen-pordego kaj postulis repreni la rajtojn de Shandong, eksigi la 3 porjapaniajn ŝtatoficistojn koncernatajn pri la subskribo de la "Traktato pri Shandong", kaj manifestaciis antaŭ iliaj loĝejoj. La pekina registaro sendis armitajn policanojn por subpremo kaj arestis pli ol 30 studentojn, sed en la sekvanta tago, la superaj lernejoj de Pekino lanĉis ankoraŭ pli grandan strikon de studentoj por protesti kontraŭ tio.

La patriota aktivado de la pekinaj studentoj influis la tutan landon, kaj la grandaj urboj tuj respondis per siaj agadoj por subteni ilin kaj protesti kontraŭ la perforto de la pekina registaro. En la 3-a de junio, la laboristoj de Ŝanhajo, Tianjin, Wuhan, Qingdao k.a. urboj faris politikan strikon kaj ankaŭ la komercaj entreprenoj ĉesis negoci por protestado, sekve formiĝis patriota demokratia movado tra la tuta lando.

La batalo de la studentoj kaj laboristoj devigis la pekinan registaron liberigi la arestitajn studentojn, eksigi la 3 porjapaniajn ŝtatoficistojn kaj instrukcii al la ĉinaj delegitoj rifuzi subskribon de la Paca Traktato de Parizo. Tio estis la Movado de la Kvara de Majo, kiu havis profundan kaj longan influon en la ĉina historio. La venko de la Movado de la Kvara de Majo plifortigis la voĉon de la ĉina popolo por nacia liberigo kaj batalo kontraŭ feŭdismo en la lando, kaj la naciliberiga kaj demokratia revolucio de Ĉinio atingis altan tajdon kaj antaŭenpuŝis la novkulturan movadon kun la devizo: "Por Demokratio! Por Scienco!"



Devizoj de la Movado de la Kvara de Majo:

Klopodu internacie por akiri la rajtojn de la ŝtato, puni enlande la naciperfidulojn.
Rifuzu subskribi la Pacan Traktaton.
Abolu la 21-punktan postulon.
Redonu nian teritorion!
Mortospite reprenu Shandong!

3. Socia Movado en la Tri Landoj

Laŭ la evoluo de la kapitalisma ekonomio, popolanoj en la tri landoj alfrontis sociajn problemojn, kiel senlaboreco kaj malriĉeco. Pro tio ili komencis laboristajn kaj kamparanajn movadojn. Disvastiĝis movadoj por liberigi virinojn kaj aliajn diskriminacitojn. Kiaj sociaj movadoj disvastiĝis en la tri landoj?



Peng Pai, naskita en la familio de granda bienulo en la provinco Guangdong, Ĉinio, studis ĉe Waseda-Universitato en Japanio. Post la diplomiĝo en 1921 li revenis hejmen, kaj partoprenis terkulturistan movadon, aktive agadis kiel pioniro de terkulturista revolucio en Ĉinio. En 1929 li estis pafmortigita de la registaro de la Kuomintango.

Disvastiĝo de laboristaj kaj terkulturistaj movadoj

De post la Unua Mondmilito, en la tri landoj plimultiĝis laboristoj, kiuj laboris en fabrikoj, karbominejoj, fervojoj, havenoj k.t.p. Sed la laboristoj vivis en severaj laborkondiĉoj kun malalta salajro kaj longaj laborhoroj.

Laboristoj komencis agadi por plibonigi siajn laborkondiĉojn kaj rajtojn. En laborejoj kaj loĝdistriktoj estis organizitaj laboristaj sindikatoj, kaj ilia tutlanda organizo estis fondita. Dum tiu tempo la maja festo (festivalo de laboristoj) estis akceptita inter la laboristoj en la tri landoj.

Pro la alta farmopago kaj procentega monprunto, ankaŭ terkulturistoj havis malfacilan vivon. Farmistoj, kiuj ne havis sian terenon kaj kulturis la pruntitan de bienuloj, organizis terkulturistajn sindikatojn, kaj grupe postulis, ke la bienuloj malaltigu la farmopagon.

Fondo de socialismaj partioj

Laŭ la evoluo de laboristaj kaj terkulturistaj movadoj, plifortiĝis la influo de la socialisma ideo. Post la Rusa Revolucio en 1917, furoris internacia komunisma movado, kaj

en ĉiu el la tri landoj estis organizitaj tiaj socialismaj partioj kiel komunista partio k.a.

En 1921 la Ĉina Komunista Partio estis fondita en Ŝanhajo. La Ĉina Komunista Partio lanĉis gvidprincipon, laŭ kiu ĝi celis liberigi Ĉinion, forminte unuiĝintan fronton kun Kuomintango, kaj en 1924 la Komunista Partio sukcese formis “la Kunlaboradon de Kuomintang kaj la Komunista Partio”. Sub “la Kunlaborado”, laboristaj kaj terkulturistaj movadoj pliaktivigis.

En la jaro 1922 la Japana Komunista Partio estis kontraŭleĝe fondita en Tokio. Post enkonduko en 1925 de la sistemo de ĝenerala elektado, en kiu rajtis voĉdoni nur viroj, naskiĝis laŭleĝaj proletaj partioj kaj provis akiri seĝojn en la parlamento. Sed utiligante la Leĝon de Publika Ordo, kiu estis promulgita en la sama jaro, la registaro severe

subpremis tiujn movadojn, arestante multajn aktivulojn, kaj sukcesis sufoki ilin en la plifortiĝinta atmosfero militisma.

Ankaŭ en Koreio, la Korea Komunista Partio estis fondita en la jaro 1925. Sed, pro la subpremado de la Japana Geneal-gubernatoro en Koreio, ĝia organizo estis detruita en 1928. Tamen, en 1927 aktive agadis 140 filioj de “Singanhoe” (la Asocio de Nova Trunko), unuiĝinta fronto formita de socialistoj kaj naciistoj.

La Asocioj Suiheisha kaj Hyongpyonsa

En Japanio ĝis la fino de la Edo-erao estis diskriminacioj nomataj "Eta". Ankaŭ en Koreio estis diskriminacioj nomataj "Paekĝong", krom gesklavoj. Tiu diskriminacio estis oficiale abolita en Japanio en 1871 tuj post la Meiji-Restaŭro, kaj en Koreio okaze de la "Reformo de la jaro 1894". Sed en la socio restadis severaj diskriminacioj rilate al profesio kaj loĝloko. Pro tio ili fondis la asociojn “Suiheisha” (Samnivela Socio) en Japanio kaj “Hyongpyonsa” (Ekvilibra Socio) en Koreio, kaj komencis movadon por nuligi diskriminacion. Kvankam la du organizoj reciproke interkomunikis kaj kunlaboris, ili tamen neniam atingis la temon pri sendependigo de Koreio, kiel komunan agadtemon.



En 1927, Lee Dong Huan, kiel la reprezentanto de la Asocio Hyongpyonsa, iris al Japanio kaj vizitis diverslokajn filiojn de la Asocio Suiheisha. Lee Dong Huan sidis en la norda filio de Suiheisha en Higashi-Shichijo en Kioto. En la foto li estas dekstre en la antaŭa vico. (De la Fotodokumento de Tutlanda Suiheisha, kompilita de la Centra Oficejo de la Liberiga Unio de Buraku [Kvartalo, loĝloko de diskriminacioj Eta], eldonita de Kaiho Shuppansha)

4. Granda Tertremo de Kantoo kaj Masakro de Koreoj kaj Ĉinoj

En la malordo kaŭzita de la tertremo la polico kaj aliaj instancoj disvastigis falsan rumoron, ke koreoj tumultis, kaj la sekvan tagon, la duan de septembro, la registaro proklamis sieĝostaton en la gubernioj Tokio kaj Kanagawa. En tia situacio multaj koreoj estis masakritaj de la armeo, la polico kaj memgardgrupoj de loĝantoj. Laŭ la esploro de “la Grupo por konsoli koreajn viktimojn en la regiono Kantoo”, la nombro de la viktimoj estis ĉirkaŭ 6.000. Krome, ankaŭ kelkcent ĉinoj estis mortigitaj.

Ankaŭ Osugi Sakae kaj aliaj socialistoj, gvidantoj de laboristaj sindikatoj, estis mortigitaj de soldatoj kaj policanoj, kiuj konsideris, ke ilia ideologio estas danĝera. Eĉ japanoj, kiuj ne bone pronancis la norman lingvon, fariĝis viktimoj. Oni distingas koreojn disde japanoj, igante suspektindajn homojn prononci "ĵuen-ĝoĵissen" (dek enoj kaj kvindek sennoj en la japana lingvo), kiun multaj koreoj pronancis" ĉuen koĵissen".



*Masakro al koreoj en la
malordo de la granda
tertreto de Kantoo
(akvarelo, pentris,
probable, Kawame Teiji)*

Japanaj viktimoj estis tiuj, kiuj devenis de regionoj, en kies dialekto ili prononcis la vorton simile al koreoj.

Rilate al tiu ĉi masakro de koreoj kaj ĉinoj, Yoshino Sakuzo, pensulo en la epoko de Taisho-demokratio, diris, ke tio estas tiel malhonora kaj hontinda afero, ke la japanoj ne povus sin montri antaŭ la mondo.

Kial koreoj kaj ĉinoj estis mortigitaj?

Japanio floris ekonomie en bonega konjunkturo dum la Unua Mondmilito, sed baldaŭ Japanio eniris en ekonomian krizon, kaj intensiĝis sociaj kaj laboristaj movadoj. En la kolonioj de Japanio leviĝis movadoj por sendependigo. Onidire, Mizuno Rentaro, la ministro por hejmaferoj, kaj Akaike Atsushi, la ĉefkomandanto de polico, proponis proklami la sieĝostaton. Ili iam estis en Koreio, tuj post la Movado de la 1-a de Marto, respektive kiel politikprefekto kaj estro de gardistejo de la Oficejo de la Generalgubernatoro en Koreio. Supozeble, ili timis, ke la popolo trafita de la malordo post la tertremo ligiĝos kun aktivuloj de socia movado, kaj intencis forigi la maltrankvilon de la popolo, traktante la koreojn kaj ĉinojn kiel propekajn kaprojn, kaj utiligante jamajn antaŭjuĝon kaj diskriminacion pri la socialistoj, koreoj kaj ĉinoj.

Sin Changbom parolis pri sia mirakla postviviĝo

Mi eliĝis el la hospitalo Nisseki post unu jaro kaj ses monatoj da restado. Reveninte hejmen en Koreion mi eksciis, ke nur en mia hejmloko 12 homoj estis mortigitaj en la malordo de la tertremo. El ili tri estis miaj parencoj. . . Malgraŭ tio, ke ni suferis tiom multe, ni ne povis eĉ protesti kontraŭ Japanio, ĉar ni ne havis nian propran registaron. (El la Dokumento pri la Granda Tertremo de Kantoo)

Kial la mondo reagis al la ĉi taksaj?

Por la viktimoj de la granda tertremo helpmaterialoj kaj helpmono el 41 landoj estis donacitaj al Japanio, inter kiuj estis Usono, Francio, Ĉinio, k.a., sed eksciinte pri la masakro, la mondo komencis kritiki Japanion. Diverslandaj diplomatoj, kiuj rifuĝis en la Hotelon Teikoku, forte protestis kontraŭ la japana registaro.

Ĉar Koreio estis kolonio de Japanio, la kritiko pri la masakro estis neglektita, pretekste ke temas pri japania enlanda afero. Sed la kazo de ĉinoj fariĝis internacia afero. La ĉina registaro ekspedis esploranton de Pekino al Japanio por malkovri la veron pri la masakro al ĉinoj, kaj postulis kompenson al la familioj de la viktimoj. La japana registaro tamen ne respondis pri tio.

En la lasta duono de la 1970aj jaroj, lokaj civitanaj grupoj de diversaj lokoj en la distrikto Kantoo komencis esplori la masakron, elfosi la cindron de la viktimoj kaj funebri ilin. Sed eĉ hodiaŭ, 80 jarojn post la masakro, la japana registaro ankoraŭ ne faris oficialan enketon pri masakro al koreoj kaj ĉinoj, nek petis indulgon kaj donis kompenson.

Peco de Historio



Shin Chae-Ho

Shin Chae-Ho (1880-1936): Studanto pri historia kaj revolucia agado

Shin Chae-Ho [ŝinĉeho] estis tre fama historiisto kaj samtempe revoluciisto de Koreio, kiu dediĉis sin al kontraŭjapana armita batalo. Origine, li estis konfuceano, sed mem tranĉis sian vertharligon kaj deklaris malfermon kaj memfortigon. Li skribis artikolojn en ĵurnaloj, studis historion kaj klopodis planti nacian konscion en koreojn. Post kiam Koreio fariĝis kolonio de Japanio, li dediĉis sian forton al kontraŭjapana ĵurnala agado, kaj al korea prahistoria studo en Rusio kaj Ĉinio.

Shin Chae-Ho senĉese asertis ke, por la sendependiga movado armita batalo pli taŭgas ol diplomatia agado. Li partoprenis en Korea Provizora Registaro sed forlasis ĝin, ĉar lia aserto ne estis akceptita. En 1923, laŭ la peto de la Fidelsango-Trupo, armita trupo kontraŭ Japanio, li skribis Deklaracion de Korea Revolucio. Jen estas la skizo de la enhavo:

La popolo estas la kerno de nia revolucio. Perforto estas la sola armilo. Ni devas iri al popolanoj, manpremi kun ili, detruu la regadon de la rabisto Japanio, per daŭra perforto: murdo, detruo, ribelo, reformi la maltracion en la tuta socio, kaj konstrui idealan Koreion kie homoj ne subpremas homojn, unu grupo ne ekspluatas alian grupon.

En la deklaro, kiun li skribis per sia sango laŭ onidiro, li evidentigis ke ĉiu popolo estas subjekto, kiu povas gvidi revolucion. Krom tio, li deklaris ke ni devas ne nur detruu la japanan regadon sed ankaŭ reformi la maltracian tutan institucion de la socio. Li pensis, ke kiam ni sukcesas reformi la mondon, en kiu ne nur nacio sed ankaŭ ĉiuj popolanoj bone kunvivas, tiam vera paco venos.

Shin Chae-Ho, kiu studis historion kaj firme agadis por la korea sendependiĝo, estis arestita de la japana polico en 1928 kaj mortis en la malliberejo Lüshun en 1936.

Fuse Tatsuji (1880-1953): Advokato kiu sin dediĉis al la batalo por homaj rajtoj

"Mi vivu kun la popolo, mi mortu por la popolo."

Tio ĉi estis la devizo de advokato Fuse Tatsuji, kiu batalis por gardi la homajn rajtojn

de la laboristoj, terkulturistoj kaj revoluciuloj. Fuse agadis ne nur en Japanio, sed ankaŭ en kolonioj de Japanio, kaj li subtenis terkulturistajn movadojn en Koreio kaj Taiwan. Kaj li ankaŭ agadis por gardi homrajtojn de koreoj loĝantaj en Japanio. Estas bone konate, ke li pledis por Pak Yol, koreo loĝanta en Japanio, persekutata pro majestatenca krimo, kaj atestis pri lia senkulpeco en la speciala kortumo de la Supera Tribunalo.

Kiam Kaneko Fumiko, edzino de Pak, kondamnita al mortopuno kune kun Pak Yol, en malliberejo mortis, Fuse akceptis ŝian cindron kaj helpis enterigi ĝin en la tombon en la hejmloko de Pak en Koreio. Tio estas epizodo, kiu rakontas lian personecon.

Aliflanke, ĉar li iam vizitis kamparanajn regionojn de Koreio, li havis ĝustan komprenon pri la kontraŭdiroj de la tiama korea socio: "Ju pli evoluos agrikulturaj instalaĵoj en Koreio, des malpli povas sinvivteni malriĉaj kamparanoj de Koreio, kaj fine ili devos forlasi Koreion." Surbaze de tia profunda kompreno li batalis por la korea popolo.

En 2004 pro la agadoj de Fuse la registaro de Koreio donis al li la Ordenon de Sendependeco. La unuan fojon japano ricevis tiun ordenon, donatan al tiuj, kiuj kontribuis al la sendependiĝa movado.



Fuse Tatsuji

Li Dazhao (1889-1927): Fondinto de la Komunista Partio de Ĉinio

Li Dazhao estis intelektulo, kiu plej frue aktivis por la komunisma movado en Ĉinio, kaj unu el la ĉefaj fondintoj de la Komunista Partio de Ĉinio. Vintre de 1913 li veturis al Japanio por studi ĉe Waseda-Universitato en Tokio, revenis al Ĉinio en 1915 kaj partoprenis la kampanjon kontraŭ Yuan Shikai. En 1918, li laboris kiel direktoro de la Biblioteko de la Pekina Universitato, aktivadis en la novkultura movado kaj fondis kune kun Chen Duxiu [duŝju] la "Semajnan Revuon". Post la eksplodo de la Oktobra Revolucio de Rusio, plivastiĝis lia agadtereno kaj li konsciis, ke socialismo estas historia fluo, firme starigis sian kredon al socialismo kaj kredis, ke Ĉinio devas praktiki socialismon. Sekve li verkis multajn artikolojn pri la rusa revolucio kaj marksismo. Samtempe li proklamis, ke oni devas enkonduki la modernan novan civilizacion en la socion kaj nepre unuigi la intelektularon kaj la laborulan klason kun kamparanoj kiel ĉefaj elementoj. En la Movado de la Kvara de Majo, li organizis kaj gvidis la manifestacion de studentoj, kaj persone partoprenis la peticiadon por liberigi la arestitajn studentojn kiel reprezentanto de la Federacio de Instruistoj kaj Oficistoj de la Pekina Universitato. Somere de 1920, li iniciatis la fondon de la Komunista Rondo de Pekino, partoprenis la preparadon de la fondo de la Komunista Partio de Ĉinio kaj estis elektita kiel membro de la dua, tria kaj kvara Centraj Komitatoj de la Tutlanda Kongreso de KPĈ. Krome li helpis Sun Yat-sen ellabori la politikon "kunlabori kun Rusio kaj la Komunista Partio kaj helpi la kamparanojn kaj laboristojn". En aprilo 1927, li estis sekrete arestita kaj murdita en Pekino fare de la militaristo Zhang Zuolin.



Li Dazhao

Peco de Historio



*Chen Tiejun, dekstre, kaj
Zhou Wenyong antaŭ la
martiriĝo*

Chen Tiejun (1904-1928): Geedziĝo sur la ekzekutejo

Chen Tiejun [tieĝun], origine nomata Chen Xiejun, estis el la Foshan-gubernio de la Guangdong-provinco. En 1925, ŝi eniris en la Universitaton de Guangdong (poste alinomita Zhongshan-universitato). Ŝi estis filino de riĉa ĉina elmigranta komercisto, sed ne volis vivi en lukso. En 1926, ŝi membriĝis al la Komunista Partio de Ĉinio kaj sin dediĉis al la movado por la liberigo de la virinoj, laborante kiel vicprezidanto de la Ligo por Liberigo de la Virinoj de la Guangdong-provinco. Ŝi ofte en vestoj el manteksita kruda ŝtofo vizitis laboristinojn kaj kamparaninojn en ilia hejmo. Ilin helpante en dommastrumado, ŝi klarigis al ili la egalecon inter la viroj kaj virinoj, memrespekton kaj strebado por memstareco. Ŝi estis tre amata de la laborulinoj. Post la splitiĝo de Kuomintang kaj la Komunista Partio en 1927, la kuomintanga registaro komencis aresti kaj buĉadi komunistojn. Ŝi kaj Zhou Wenyong, partopreninto de la Guangzhou-a Insurekcio, persistis en la laboro, ŝajnigante sin kiel geedzoj, spite al vivdanĝero, kaj ili enamiĝis. En februaro 1928, ili estis arestitaj de la registaro. En la prizono, ŝi estis terure torturita sed ne submetiĝis. Kiam ŝi kaj Zhou Wenyong estis portitaj sur la ekzekutejon por pafmortigo, ŝi deklaris, ke ili geedziĝos tie, kun la mortigaj pafoj kiel siaj celebraj krakfajraĵoj. Tiu surekzekuteja geedziĝo kortuŝis multajn homojn, kaj eĉ la japana ĵurnalo Yomiuri Sinbun raportis pri tio. Pri ilia heroaĵo, oni faris poste filmon titolitan “Geedziĝo sur la Ekzekutejo”.



Chung Jong-Myeong

Chung Jong-Myeong (1896~?): Por la liberigo de virinoj pere de socia movado

Chung Jong-Myeong [ĉong ĵongmjung] reprezentas virinajn kaj naciajn movadanojn de Koreio en la subprema periodo de Japanio. Ŝi naskiĝis en malriĉa vilaĝo kaj post diligenta klopodo sukcesis eniri al la lernejo Baehwa-Hakdang en Seulo en 1906. Tamen ŝi ne povis diplomiĝi el la lernejo pro la malriĉeco, kaj spertis doloron kaŭzitan de la morto de sia edzo post 2 jaroj de sia edzineco.

Chung Jong-Myeong komencis oficiale socian agadon farinte mutulhelpan societeton por sin vivtenantaj lernantoj en 1922. Tiu fondo de la societo eble estis motivita de ŝiaj malfacilaj spertoj. Post tio, ŝi aktive agadis en virinaj organizoj de socialisma inklino. Precipe, ŝi iniciatis la organizon Gunuhoe kun socialistoj kaj naciistoj por virina movado kaj aktive rolis kiel prezidanto de la Centra Plenumkomitato.

Kvankam ŝi malfrue komencis la agadon, ŝi ricevis atenton pro la lucida kredo kaj volo pri virina liberigo. Ŝia kredo klare aperis en intervjuo kun ĵurnalisto en 1928.

La afero antaŭe dirita estas solvebla per mono kaj permeso de aŭtoritatularo, sed estas problemo super la povo de homo. Tio estas la neapero de virinaj batalantoj. Tiam virinoj tuj ĉesigis ĝin, kiam ili enamiĝas, eĉ se ili batalas en la unua fronto. Kaj se ili edziniĝas, oni ne povas serĉi eĉ iliajn ombrojn. Virinoj, kiuj pretas dediĉi sin al nur nia movado, preskaŭ ne ekzistas. Mi elkore esperas, ke en la nova jaro multe elverŝiĝos belaj viktimoj, kiuj batalos plej maltime kaj kuraĝe, ne apogante la virinan movadon al viroj.

— El la ĵurnalo Chosunilbo, 19 decembro, 1928

Kaneko Fumiko (1903-1926): Japanino kiu batalis kontraŭ la Tennoa sistemo, lige kun koreoj

Ĉu vi konas Kaneko Fumiko? Dum la Granda Tertremo de Kantoo en 1923 ŝi estis arestita kune kun la koreo Pak Yol, kaj kondamnita al mortopuno pro "majest-atenca krimo", ĉar ŝi intencis mortigi la kronprincon (Hirohito, estonta Tennoo Showa).

Fumiko naskiĝis en Jokohamo. Fumiko en sia knabineco estis tre malfeliĉa. Ŝi ne havis plenan rajton vizitadi lernejon pro tio, ke ŝia patro, kiu fieris pri sia bondevena familio, ne registris ŝin kiel sian filinon je ŝia naskiĝo, ĉar ŝi naskiĝis ekster laŭleĝa geedziĝo, ŝia patrino, forlasita de la patro de Fumiko, poste reedziniĝis. Kiam ŝi estis 9-jara, ŝia patroflanka parenco en Koreio adoptis ŝin. Sed en la aŭtoritateca familio oni turmentis ŝin multe. Kiam ŝi vidis la Movadon de la 1-a de Marto por sendependeco en Koreio, ŝi, kortuŝita, sentis "fortan simpatian" al la koreoj rezistantaj la plifortulojn.

Kiam ŝi estis 16-jara, ŝia adoptiĝo estis nuligita, kaj ŝia patro arbitre decidis ŝian edziniĝon. Kaj tial ŝi eskapis de la premo de la patro, kaj iris al Tokio. En Tokio ŝi lernis en lernejo, mem vivtenante sin, kaj tiam ŝi renkontis socialismon kaj anarkiismon. Tra siaj travivaĵoj ŝi atingis la ideon: "Malaprobante ĉiajn potencojn, la homoj estu egalaj kaj vivu laŭ sia propra volo." Ŝi pensis, ke diversaj leĝoj, tiaj moralaj kiel lojaleco kaj patriotismo, kaj virina obeemo estas "artifiko por intence naski malegalecon kaj obeigi la popolon al la reganta potenco, kies pinto estas ja Tennoo".

Kiam ŝi estis 19-jara, ŝi enamiĝis en kamaradeca amo kaj komencis kunvivi kun Pak Yol, kies celo estis faligi la japanan imperiismon, kaj ili kune fondis la grupon "Futeisha". Celante sendependigi Koreion kaj faligi la tennoismon, ili planis enmanigi bombojn, sed estis arestitaj antaŭ la plenumo de la plano.

La juna paro, ne pensante plu vivi, brave batalis en la kortumo, kiu laŭ ili estas batalejo por la idealo. Post la verdikto je mortopuno, la registaro amnestie malaltigis la punranton al senperioda laborpuno, sed Fumiko disŝiris la dokumenton, kaj post tri monatoj mortigis sin. Ŝi estis 23-jara. Ŝi amis Pak Yol kiel kamaradon super la diferenco de nacioj kaj ŝtatoj, kaj solidaris kun subprematoj. Ŝi vivis sian vivon fidelan al sia ideo. (Pak Yol estis liberigita en 1945.)



Kaneko Fumiko kaj Pak Yol
— El la marta numero
1926 de "La Shufu-no-
tomo"

Ŝanĝiĝo de Socio kaj Kulturo

1. Ŝanĝiĝo de la Koreaj Socio kaj Kulturo

Dum la jaroj 1920-1930 la korea socio kaj kulturo rapide ŝanĝiĝis. Sub la japana kolonia regado de Koreio, la okcidenta kulturo estis enkondukita kaj la korea socio rapide ŝanĝiĝis. Ni vidu kia ŝanĝo okazis en la korea socio kaj kulturo dum la jaroj 1920-1930.

Ŝanĝitaj urboj, neŝanĝitaj kamparoj

Sub la japana kolonia regado, koreaj urboj multe ŝanĝiĝis. La lokoj, kiuj disvolviĝis




kiel urboj, estis havenoj aŭ strategiaj trafikejoj, de kie oni eksportis rizon kaj kotonon al Japanio. Tiuj lokoj, kie fabrikoj fondiĝis aŭ japanaj armeoj garnizonis, fariĝis urboj. Precipe Daejeon, Chongjin, Gunsan, Funnam ktp. rapide kreskis de kamparoj kaj fariĝis urboj.

En la mapo, ni trovas la lokojn, kiujn la Chosun General-gubernatoro, la japana kolonia registaro, destinis "Hu" (urboj). Destininte Hu'on, en la nova urba plano oni ordigis vojojn kaj plibonigis instituciojn de medicino kaj higieno. Iom stranga estas la principo destini la Huon, ne de la tuta loĝantaro sed de la japana loĝantaro.

Tamen kamparo ne multe ŝanĝiĝis. Por la kamparanoj, kiuj ne havis sian bienon, estis plu malfacile vivi. Ekzemple, en 1930-aj jaroj en iu vilaĝo 38 familioj loĝis. Kamparano, kiu havis sian bienon,

estis nur unu kaj tiuj, kiuj ne bezonis maltrankviliĝi pri manko de nutraĵo, estis nur tri. Plejparte infanoj ludis nudpiede sen ŝuoj.

Kampanaroj, kiuj ne havis laboron por agrikulturo, povis nur labori en najbaraj konstruprojektoj aŭ minejo ktp. Gajni laboron estis malfacile. Kampanaroj vole nevole forlasinte sian hejmlokon, iris amase al urboj. Ili sin vivtenadis loĝante en eksterurba aŭ ĉerivera kabano.



Nerekoneble ŝanĝita Seulo

La plej prospera el la urboj estis kompreneble Seulo. La Seula loĝantaro en la 1920aj jaroj rapide kreskis, ĉar kampanaroj venis en Seulon kaj japanaj loĝantoj subite multiĝis.

Multaj novaj konstruaĵoj ekaperis en multaj lokoj en Seulo kaj urbocentroj kiujn homoj amase vizitis prosperis kiel komerca kvartalo. La foto montras "Ĝingogae", komercan centron. Troviĝas tie "Honmaĉi", la ĉefa strato de vendejoj. Malantaŭe troviĝas ĉiovendejo, tajlorejo, fotejo ktp., en kiuj japanoj vendas okcidentaĵojn. Japanaj komercistoj tenis komercopovon en diversaj lokoj de Seulo. Koreaj komercistoj inkluzive tiujn en Ĝongro strato trans la Honmaĉi-strato pene konkuris kun japanaj komercistoj.

Aŭtomobilo de la reĝa familio estis enportita unuafoje en 1903, kaj la nombro de aŭtoj kreskis ĝis 200 en 1920. Ordinartuloj ne posedis ilin. Ŝoforo, kiu kondukis la raran aŭtomobilon rapide kurantan sur strato tra vento, havis altan salajron kaj estis la plej ŝatata kiel edzo. Taksio aperis la unuan fojon en 1928, kaj multiĝis al 700-800 en tri jaroj.

Tramo estas publika trafikilo, kiun la publiko tre ofte uzas. Tramreloj fariĝis duliniaj kaj tramoj fariĝis grandaj kun kapacito de 100 pasaĝeroj. En la 1920aj jaroj malgranda aŭtobuso komencis servon en lokoj, kie tramo ne servis. La buslinio etendiĝis kaj la buso tuj fariĝis la dua populara trafikilo ĉar malalta estis ĝia kosto kompare kun taksio.

Kabano de koreaj malriĉuloj



Ĝingogae, Seulo, 1920-aj jaroj

Kino kaj popolkanto populariĝis

Okcidenta kulturo plenforme venis kaj rapide disvastiĝis. Fine de la 1920-aj jaroj la popolkulturo formiĝis. La filmoj estis senŝonaj. Dum oni rigardis la scenon, kie aktoroj ludis, persono nomata "parolanto" legis la scenaron. Ne nur la aktorado, sed ankaŭ la

Aktoj en la filmo "Arirang", prezentita en 1926. La homo en la cirklo estas Na Un-gyu, la produktinto.



parolado influis la rezulton de la luda entrepreno.

En la foto troviĝas aktoroj, kiuj ludis en la filmo "Arirang", prezentita en 1926. La homo en cirklo estas la fama aktoro Na Ungyu, kiu produktis la filmon "Arirang" kaj ĉefrolis en ĝi. "Arirang" estas filmo pri amo kaj socia konflikto en la tiamaj kamparaj cirkonstancoj. La temkanto "Arirang" estas la titolo de la kanto plej ŝatata de koreoj. La filmo prezentis la senton de Arirang, aludante la malĝojon de la korea popolo sub la japana kolonia regado, kaj ĝi estis varmege ŝatata de la publiko.

En la 1920-aj jaroj, modernaj popolkantoj ankaŭ ekfloris. Populariĝis trokanto, kiun influis la japana "enka". La kantoj, kiuj estas influitaj de okcidenta muziko aŭ kiuj esprimis korean popolan senton, populariĝis. La kanttemo estis amo kaj adiaŭo inter geamantoj, malĝojo de malfacila vivo kaj migrado. Tio estis pro tio, ke kontraŭjapanaj kantoj estis nepermesitaj sub la japana regado. Kune kun la disvastigo de modernaj popolkantoj en la 1930-aj jaroj, diskokompanioj ekfondiĝis.

Laŭ la populariĝo de kino kaj popolkanto, amuza kaj plezura industrio por la popolo pligrandiĝis. En la urbo eŭropecaj drinkejoj multiĝis kaj dancejoj ekaperis. Nature estis kritiko, ke ĝi difektas la korean tradician bonan kulturon.

Modernaj noveloj kaj bildostrioj ekaperis

En la 1920-aj jaroj disvastiĝis moderna novelo, kiu vivovere traktis homan karakteron aŭ socian realecon. Pro la disvolviĝo de preslito kaj presteknologio libroj estis amase presitaj, kaj tial modernaj noveloj populariĝis. Precipe romanetoj, ekz. Ĉunhyangĝeon, reverkita en libreta formo, nomata "ludkarta libro" pro tio, ke la kovrilo estis diverskolore ilustrita simile al infanaj bildkartoj. Bildserio ekhavis sian lokon kiel nova

bildĝenro. Karikaturej kaj komikaĵoj longaj aŭ mallongaj, aperis en ĵurnaloj kaj infangazetoj kaj gajnis popularecon. Afiŝoj kaj bildokartoj aperis. Precipe, kiel en la foto, afiŝoj kaj bildokartoj estis ofte utiligataj rimedoj por informi pri la rezulto, politiko kaj evento de la Chosun General-gubernatorejo.

Virinoj ŝanĝis la harstilon

Antaŭ la malfermo de la haveno koreaj fraŭlinoj havis longan hararon rubande ligita kaj edziniĝintaj sinjorinoj havis hararon mallonge rulita per pinglo. La harformo komencis ŝanĝiĝi post kiam virinoj ekvizitis lernejon kaj vigliĝis eksterhejmaj laboroj. Komence per ligrubando mallonga la unubranĉa hararo estis plektita al dubranĉa, aŭ anstataŭ enmeti ornaman pinglon, estis elegante kovri la hararon per gazo aŭ fiksi ĝin per pingletaro. En la 1930-aj jaroj modiĝis mallonge tondita hararo. Ŝanĝiĝo de harstilo ne estas nura modo. Sed la nova harstilo estas la simbolo de novstila virino kaj virina liberiĝo.

Ke nun vi havas mallonge tonditan hararon estas signo, ke vi definitive adiaŭis "haremo"-n, en kiu kelke da miljaroj vi malliberis, kaj eniris sub la bluan ĉielon. Bonkondute plektita rubande ligita hararo, ĝi ja estas bonkonduta sed en ĝi fluas imago de feŭda erao, kiu malantaŭiĝas de la nuna epoko.

— "Dongwang", septembro, 1932




Afiŝo pri Chosun-Foiro, Seulo, 1929

Ŝanĝiĝo de harstiloj		
Rubande ligita hararo	Pinglita hararo	Tondhararo
Oni disigas, pende plektas posten en unu branĉon kaj ligas per rubando.	Oni meze disigas, torde ligas sur nuko kaj enmetas ornaman pinglon.	Dancistino Choi [ĉoi] Seung-hi, havanta tondhararon.
		

2. Ŝanĝiĝo de la Ĉinaj Socio kaj Kulturo

Post la Revolucio de 1911 ĝis la tridekaj jaroj, profunda ŝanĝiĝo okazis al la socio kaj kulturo de Ĉinio, sekve de serio da sociaj reformoj kaj konstruadoj. Kiaj rimarkindaj ŝanĝiĝoj okazis en la procedo de progresado de la tradicia socio al la moderna socio en Ĉinio?



En marto 1908
ekfunkciis tramo en
Ŝanhajo.

Disvolviĝo de industrio kaj komerco kaj kreskado de urboj

En la komenca periodo post la fondiĝo de la Ĉina Respubliko, multaj ambiciuloj kun la volo “savi la nacion per industrio kaj komerco” aktive sin dediĉis al industrio kaj komerco kaj levis la tajdon en tia entreprenado. De 1912 ĝis 1927 fondiĝis 2 mil fabrikoj kaj minejoj diversspecaj kun kapitalo de pli ol 10 mil juanoj. En 1932, multaj fabrikoj, minejoj kaj komunikado aperis en 13 provincoj kaj 91 urboj kun 1.5 milionoj da laboristoj, kaj unuapaŝe formiĝis modernaj sistemoj de industrio

kaj komerco. La kapitalistoj de fabrikoj kaj komercejoj kaj la vastaj amasoj de laboristoj formis novajn sociajn klasojn.

La urboj estas centroj de la industriaj kaj komercaj entreprenoj. Sekve de la disvolviĝo de industrio kaj komerco, la nombro kaj amplekso de la urboj rapide krekis. Granda nombro da kamparanoj torentis en urbojn. Laŭ statistiko de 1932, la loĝantaro de la ĉinaj urboj jam konsistigis 27% de la tuta loĝantaro de la lando. Ekzemple en Ŝanhajo, kies industrio kaj komerco kreskis plej rapide, la loĝantaro abrupte ŝvelis kaj en 1927 jam atingis 2.64 milionoj. Sekve de la prosperiĝo de industrio kaj komerco kaj la rapida grandiĝo de la loĝantaro, floris ankaŭ la kulturaj aferoj kaj la amuzaj instalaĵoj, sekve de tio pliriĉiĝis la vivo de la urbanoj. Ŝanhajo fariĝis ne nur komerca centro de Ĉinio, sed ankaŭ kultura kaj amuza centro de la lando kaj simbolo de moderneco, prospero, riĉeco, vivĝuado, okcidenteco kaj progresinta civilizacio en la okuloj de la ĉinoj.

Reformado de la eduko kaj populariĝo de la elementa edukado

Post sia fondiĝo, la registaro de la Ĉina Respubliko starigis la principon preni edukadon kiel la bazon de la respubliko, entreprenis reformadon de la edukado, nomumis Cai Yuanpei, kiu ĵus revenis de sia studo en Eŭropo, kiel ministron pri edukado, kaj eldonis serion da dekretoj pri edukoreformo. En septembro 1912, publikiĝis la ordono pri la “Sistemo de Klerigejoj”, kiu difinis, ke la elementa klerigo daŭros 4 jarojn kiel deviga edukado, kaj samtempe starigis la moderna eduka principo de ĝenerala klerigado.

En 1916, la nombro de diversgradaj lernejoj en Ĉinio jam atingis 120 mil kaj en ili lernis 4 milionoj da lernantoj. En 1930, en Ĉinio jam funkciis 280 mil lernejoj, en kiuj lernis 11.5 milionoj da personoj. La unuapasa ĝeneraligo de la elementa klerigo ebligis al konsiderinda nombro da geknaboj vizitadi modernajn lernejojn kaj akcepti nuntempan edukadon, kaj metis fundamenton por la elbakado de la konstruantoj de socia kulturo en la estonteco.

Studi en fremdlandaj lernejoj estis unu el la vojoj por elbaki altkvalitajn kompetentulojn kaj la registaro de la respubliko plenumis serion da aranĝoj por kuraĝigi tion. Post la tajdo iri al Japanio por studado, aperis tajdo studi en Usono kaj Eŭropo. Miloj kaj miloj da studentoj veturis al la okcidento por lerni sciojn pri la progresintaj sciencoj, teknikoj kaj kulturoj. Multaj ricevis la titolon de magistro aŭ doktoro. Aperis granda nombro da talentuloj por la socia reformado kaj konstruado, inter kiuj estis elstaraj sociaj revoluciuloj kiel Zhou Enlai kaj Deng Xiaoping [ŝaoping], elstaraj sciencistoj kiel Li Siguang kaj Ding Wenjiang [ŭenĝiang] kaj ankaŭ elstaraj kulturaj erudiciuloj kiel Hu Shi. La personoj, kiuj studis en fremdaj landoj, fariĝis tre bonvenaj en la ĉina socio kaj adorataj de la junularo.

Disvolviĝo de la kultura afero

En la komenca periodo de la Ĉina Respubliko, jam aperis pli ol 500 ĵurnaloj kaj gazetoj en diversaj lokoj, kaj la Zhonghua-eldonejo kaj aliaj eldonejoj eldonis 10 milojn da verkoj pri literaturo, sciencoj, teknologioj kaj socia scienco. Je la fino de la 1920aj jaroj fondiĝis la Ĉina Scienca Societo, la Ĉina Medicina Asocio, la Edukoreforma Asocio de Ĉinio, la Naturscienca Societo de Ĉinio, la Centra Akademio k. a. organizoj, kiuj eldonis gazetojn kaj partoprenis akademiajn interŝanĝojn kaj kunlaboron kun fremdaj landoj. En la 1920-aj jaroj fondiĝis en Ĉinio 175 filmstudioj, kaj en 1930 Ĉinio eldonis sian unuan sonfilmon. En julio 1912, la Eduka Ministerio fondis en la sidejo de la malnova Ŝtata Ekzamenejo la Ĉinan Historian Muzeon. Laŭ enketado de la Eduka Ministerio, en 1916 fondiĝis 23 bibliotekoj en la provincoj kaj municipoj. Tiuj kulturaj institucioj por la popolamasoj ne nur disvastigis novajn sciojn, sed ankaŭ riĉigis la kulturan vivon, havigis al la popolamasoj de diversaj socitavoloj pli multe da ŝancoj akiri novajn sciojn, ĝui kulturan amuzon kaj altigi la kulturon.

En 1930, la unua sonfilmo "Kantistino Ruĝa Peonio" estis elfarita.



Altiĝo de la socia pozicio de virinoj

Dum tre longa tempo, la ĉinaj virinoj estis katenitaj de principoj de la feŭdisma etiko obei la patron, la pli aĝan fraton kaj la edzon, kaj plenumi la postulojn de virteco, dececo

en paroloj, adekvata sintenado kaj virinaj laboroj, ne povis libere elekti por si edzon, nek ĝui rajton egalan kiel la viroj. Krome ili devis suferi la dolorojn de piedvindado k.a. damaĝojn al la korpo. Post la fondo de la respubliko, la principo de egalrajteco de la viroj kaj virinoj estis starigita, la malbona kutimo de piedvindado nuligita, libera geedziĝo pledata, eksedziniĝo kaj reedziniĝo laŭvole fareblaj, kaj la virinoj ricevis unuapaŝan liberecon ankaŭ en partopreno de sociaj profesiaj laboroj, vizitado de lernejoj kaj ĉeesto en sociaj aktivadoj.

Ĉinaj studentinoj, kiuj studas en Francio sin vivtenante per laborado, kun siaj instruistinoj



La knabinoj en urboj jam povis vizitadi elementajn kaj mezgradajn lernejojn. Kaj krome fondiĝis normalaj kolegioj speciale por eduki studentinojn. En 1920, ankaŭ la Pekina Universitato komencis akcepti vizitantajn studentinojn. Nemalmultaj junulinoj forlasis sian hejmon kaj forveturis al Eŭropo kaj Usono por studado kune kun junuloj. Junulinoj el lernejoj suriris profesiajn postenojn en la socio ĝis tiam monopolitajn de viroj. En lernejoj aperis instruistinoj, en hospitaloj flegistinoj, en redakcioj de ĵurnaloj ĵurnalistinoj, kaj en teatraj trupoj aktorinoj, plivastiĝis la sociaj aktivadaj sferoj de la virinoj, kaj kontaktiĝo inter viroj kaj virinoj ne plu estis rigardata kiel malmorala ago. Granda ŝanĝiĝo okazis en la pensoj de la virinoj kaj en la atmosfero de la socio. Virinoj ekvigliĝis en diversaj sociaj aktivadoj kiel ekzemple fondi gazetojn, fari paroladojn, publike esprimi siajn opiniojn pri socia reformo kaj liberigo de la virinoj. Iuj ankaŭ partoprenis sociajn movadojn kune kun junuloj, kiel ekzemple studentinoj de la Virina Normala Kolegio partoprenis la Movadon de la Kvara de Majo.

Pro la edukado, virinoj surpaŝis la socian scenejon kaj komencis manifesti sian spiriton longe subpremitan, montrante siajn talentojn, kaj la intelektulinoj fariĝis avangardoj en la liberiga movado de la virinoj.

Ŝanĝiĝo de la sociaj moroj

Post la fondiĝo de la respubliko, serio da gvidlinioj estis praktikataj por ŝanĝi la malnovajn morojn, ke la socio ricevis novan aspekton. Antaŭ ĉio la civitanoj estis ordonitaj forigi la harligon, kiu simbolis la submetiĝon al la superregado de la manĉuroj, la kortegaj kostumoj estis abolitaj kaj anstataŭitaj de novstilaj kostumoj, la ŝtataj oficistoj devis porti novajn uniformojn faritajn laŭ reformitaj okcidentaj kostumoj, la suna kalendaro anstataŭis la malnovan lunan kalendaron, novaj festoj kun novaj sociaj signifoj estis difinitaj, kaj krome malpermesataj estis piedvindado de virinoj, vetludoj, fumado de opio k. a. malbonaj aferoj. Por defendi la rajtojn de la popolo, malpermesita estis vendo kaj aĉeto de homoj, torturado en esplordemando en juĝaj aferoj, anstataŭ genuiĝi por saluti kaj respekti oni komencis riverenci per kapklino, la funebraj ceremonioj kaj nupto estis simpligitaj, novaj ceremonioj estis adoptitaj en geedziĝo en la urboj kaj en funebrado oni aplikis girlandojn anstataŭ bruligi oferpaperojn, inter la intelektuloj oni komencis uzi la titolon sinjoro



Post la Revolucio de 1911, oni fortendis la harligon surstrate.

anstataŭ la malnovajn honorajn titolojn moŝto, ekscelenco k.s.


Sekve de la disvolviĝo de novaj aferoj, oni komencis preferi la profesiojn de ĵurnalisto, kuracisto, verkisto, instruisto, advokato, eldonisto, industriisto, komercisto, militisto k.a. Pro la multiĝo de teatroj, parkoj kaj amuzejoj, la kulturaj aktivadoj kaj amuzoj de la homoj fariĝis pli variaj kaj kolorriĉaj.

Leviĝo de la Movado de Nova Kulturo

Post la renverso de la imperiestra regado, en la ideologio de ĉinoj ankoraŭ postrestis intensaj tradiciaj feŭdismaj pensoj, kiuj forte bremsis la progresadon de la socia reformado. Tial la fruaj pioniraj vekiĝintoj kiel Chen Duxiu [duŝju], Li Dazhao, Lusin, Hu Shi k. a. defiis la feŭdisman tradician kulturon reprezentatan de konfuceanismo kaj levis la Movadon de Nova Kulturo por kritiki la feŭdisman malnovan kulturon kaj establi modernan novan kulturon. En septembro 1915, Chen Duxiu fondis la gazeton “Junularo” (poste alinomita kiel “Nova Junularo”), kaj unuafoje elmetis la devizon “Por Demokratio kaj Scienco”. En decembro 1916, Cai Yuanpei fariĝis rektoro de la Pekina Universitato kaj difinis la principojn de la universitato “Libereco en Pensado” kaj “Tolero al Ĉiuj Skoloj”, kaj tiu universitato rapide fariĝis la ĉefa bastiono de la movado. Granda nombro da progresemaĵoj entuziasmaĵoj batalantoj por la nova kulturo kaj kulturaj junuloj fondis gazetojn unujn post aliaj, verkis artikolojn kontraŭ la feŭdisma malnova kulturo, malkaŝis la hommanĝan naturon de la malnova etiko, kiu subpremis la homecon kaj homajn talentojn, pledis por la novaj pensoj pri demokratio, libereco, egalrajteco kaj scienco. Kaj la novaj pensoj rapide disvastiĝis tra la lando per ĵurnaloj, gazetoj, libroj, surstrataj paroladoj kaj aliaj kanaloj. La junularo de la tuta lando senescepte estis influita kaj forte skuata.

3. Ŝanĝiĝo de la Japanaj Socio kaj Kulturo

Dum la periodo ĉirkaŭ la Unua Mondmilito, Japanio spertis rapidan industriiĝon. Urboj grandiĝis, kaj plialtiĝis ankaŭ la vivnivelo de salajruloj kaj parto de la laboristoj. Ni vidu la ŝanĝon de tiu tempo de alveno de amasa socio kaj amasa kulturo.



Urboplana desegnaĵo de Kunitachi, Tokio. Ĉirkaŭ la stacidomo kaj la placo, stratoj estas desegnitaj en perfekta ordo, kaj loĝkvartaloj, regule dislokita, estis partovenditaj. En tiuj ĉirkaŭurbaj loĝkvartaloj, oni ŝatis modernan vivstilon.

Urbiĝo kaj formiĝo de urbegoj

Dum la jaroj de la Japana-Rusa Milito kaj la Unua Mondmilito, la produkta kvanto de la japana industrio rapide pligrandiĝis ĉefe en pez-kemia industrio, kaj ĝi superis la agrikulturan produkton. Dum tiu tempo, homoj koncentriĝis en urbojn. En la urbegoj Tokio, Osako kaj aliaj, la loĝantaro rapide kreskis, kaj la loĝantaro de la grandaj urboj kun pli ol dek mil loĝantoj atingis proksimume trionon de la tuta loĝantaro de la lando.

En grandaj urboj, disvastiĝis provizado per elektro, gaso, akvokonduko, kloakoj k.a. Laŭ la evoluo de fervojaj linioj kaj aŭtobusaj servoj, estis konstruitaj grandaj magazenoj, butikumaj stratoj kaj amuzejoj ĉe trafike gravaj lokoj. Laborejoj kaj loĝejoj disiĝis, kaj ankaŭ la nova kutimo manĝi eksterhejme disvastiĝis en tiu tempo. En manĝejoj tiaj novaj menuoj kiel kareo kun rizo kaj porkokotleto populariĝis.


En la 1920aj jaroj, privataj fervojaj kompanioj sinsekve konstruis trakojn, kiuj etendiĝis de urbocentro ĝis ĉirkaŭurboj, kaj samtempe konstruis loĝkvartalojn apud la fervojaj linioj. Eskapinte el la malbona vivmedio de la urboj industriigitaj, homoj kun pli altaj enspezoj transloĝiĝis ekster la urbojn. En Tokio, la Granda Tertremo de Kantoo (1923) akcelis tiun tendencon. Tiamaniere, la nuntempa vivstilo de japanaj urbanoj, t.e. loĝi en ĉirkaŭurbo kaj vizitadi sian laborejon per trajno, formiĝis en tiu tempo.

Disvolviĝo de mez- kaj altgrada edukado

La proporcio de lernantoj en la deviga baza edukado atingis ĉirkaŭ 100% en 1910. Kvankam la proporcio de lernantoj en mez- kaj altgrada lernejoj ankoraŭ restis en malalta nivelo, la nombro de lernantoj en mezgrada eduko tamen kreskadis.

Mezgrada eduko por knaboj ĉefe promesis eniron al altgrada lernejo, sed male, mezgrada eduko por knabinoj celis akiri scion kaj kapablon necesan por hejma vivo. Tie la idealo estis "Bona Edzino, Saĝa Patrino", nome, bona edzino servanta sian edzon, kaj saĝa patrino kapabla por eduki siajn idojn. Ankaŭ la lernantoj en la plialtgradaj edukaj institucioj plimultiĝis, sed la nombro de knabinoj restis malgranda.

Laŭ la disvastiĝo de mez- kaj altgrada eduko, ekestis emoj respekti klercon eĉ en kamparaj urbetoj kaj vilaĝoj. Aliflanke ekde 1925, armeaj oficiroj en aktiva servo estis postenigitaj en mezgradaj kaj pli altaj lernejoj, kaj milita trejnado fariĝis deviga lernobjekto. Post tio, militarismo de la lerneja eduko estis iom post iom plifortigita.



Prospero de popola kulturo

Laŭ la disvastiĝo de eduko, la popolo havis pli da intereso pri kulturo, kiu komencis fariĝi apartenaĵo al la vasta popolamaso. Abonantoj de ĵurnaloj draste plimultiĝis, kaj sinsekve estis eldonitaj monataj kaj semajnaj gazetoj por intelektuloj kaj la popolo. Same ĉi-tempe gazetoj por infanoj komencis eldoniĝi, kaj naskiĝis majstraj verkoj de fabeloj kaj infanaj kantoj.

La laborkondiĉoj de laboristoj kaj salajruloj estis plibonigitaj iom post iom kaj oni ekhavis liberan tempon. Kino (tiam nomata "moviĝantaj fotoj"), teatraĵo k.a. populariĝis kiel popularaj amuzaĵoj. Oni prezentis ne nur filmojn el Usono kaj Eŭropo sed ankaŭ filmojn enlande faritajn. En 1925 radio-elsendo komenciĝis en Tokio.

Pere de abono de ĵurnaloj kaj gazetoj, inter la popolo kreskis la tendenco konscii la individuecon kaj respekti la homan personecon. Laboristoj, kamparanoj kaj virinoj, ĝis tiam submetitaj en la socia ĉirkaŭaĵo, komencis aktive eldiri siajn opiniojn. Ankaŭ la movado akiri politikajn rajtojn disvolviĝis, kaj en 1925 estis enkondukita la sistemo de "ĝenerala elektado", kiu donis politikajn rajtojn al la popolo, kvankam nur al ĉiuj viroj pli-ol-25-jaraj, nuligante tamen la limon de pagita impostosumo.

Tiu relative libera politika atmosfero dum la 1910-1920aj jaroj estas nomata "Taisho-demokratio" laŭ la nomo de la tiama japana tennoa erao "Taisho". Sed en 1925 estis promulgita la "Leĝo de Publika Ordo" por subpremi la organizojn kaj movadojn celantajn "reformon de la reĝimo (detruon de la Tennoismo)" kaj socialismon. La celo subpremota unue estis komunistoj, sed baldaŭ pligrandiĝis ĝis liberalistoj kaj religiuloj, kaj la leĝo furiozis kiel leĝo por subpremi ĉiujn pensojn kaj movadojn, kiuj kontraŭis al la militpolitiko de Japanio.



Ruĝa Birdo, periodaĵo por fabeloj kaj infanaj kantoj, fondita en 1918



*Konduktorinoj de
Osaka Municipa
Aŭtobuso.*

*Unu el la tipaj profesioj
de virinoj. Tiutempe
profesiaj virinoj
plejparte ankoraŭ vestis
sin en tradicia kimono.*

Apero de la novaj virinoj

En 1918, tuj post la Unua Mondmilito, bona konjunkturo kaŭzis inflacion, kaj tiuj, kiuj antaŭvidis "ekspedicion de soldatoj al Siberio", akaparis rizon, el kio rezultis surpriza altiĝo de la rizprezo. Tio rekte influis la ĉiutagan vivon de malriĉuloj. Somere de la jaro, virinoj de fiŝkaptistaj vilaĝoj en la gubernio Toyama kolektiĝis en la haveno kaj baris la ekspedon de rizo. Tiel komenciĝis kaj disvastiĝis tra la tuta lando la "Insurekcio pro Rizo". La insurekcio fine estis subpremita en diversaj lokoj eĉ helpe de la armeaj fortoj.

Post tio, popolaj movadoj aktiviĝis en diversaj kampoj, kaj samkiel en la "Insurekcio pro Rizo", virinoj plenumis pozitivajn rolojn en tiuj movadoj.

Pli frue ol tiu tempo, jam en la 1910-aj jaroj elpaŝis "novaj virinoj" Hiratsuka Raicho k.a., kiuj intencis ŝanĝi la paternalisman socion. En 1920, Hiratsuka kaj Ichikawa Fusae fondis "Asocion de Novaj Virinoj", kaj postulis rajtojn de virinoj partopreni en politikaj parolkunvenoj kaj aliĝi al politika partio. Nur la unuan rajton ili sukcesis

akiri en 1922. Ili daŭrigis la movadon por akiri politikajn rajtojn de virinoj (balotrajto kaj elektiĝrajto), kiujn ili elkore deziradis (Plenaj politikaj rajtoj de virinoj fine realiĝis en 1945 post la Dua Mondmilito). Krome, aperis virinoj, kiuj aktivis en la movado por abolicii publikan prostituon oficiale agnoskitan, en la socialista movado, kaj en laboristaj strikoj kaj agrikulturistaj konfliktoj.

En la urboj etaj familioj plimultiĝis kaj aperis plentempaj dommastrinoj kun edzoj laboristaj kaj salajrulaj. Aliflanke, krom tiaj profesioj de laborantaj virinoj jam aperintaj fine de la 19-a jarcento, kiel ŝpinistino, flegistino kaj instruistino, virinaj profesioj plimultiĝis en diversaj kampoj kaj aperis ankaŭ tiaj profesioj kiel telefonistino, buskonduktorino, tajpistino, stenistino, komizino, ĵurnalistino, radio-anoncistino, kuracistino, ktp. Oni nomis ilin "profesiaj virinoj" kaj ili vigle laboris en la socio. Ili devis labori kun malalta salajro kaj en multaj okazoj estis regulo ekŝiĝi okaze de edziniĝo, sed la fakto, ke ili havis siajn proprajn enspezojn, fariĝis faktoro, kiu malfortigis la paternalisman familisistemon.

Aperis ankaŭ tiel nomataj "modernaj knabinoj" kun mallongaj haroj en eŭropeca kostumo, kiuj aspektis, kvazaŭ ili elirus el filmo de Eŭropo.

Unu el la tiamaj opinioj, kiuj kontraŭas al la politikaj rajtoj de la virinoj:

"Virino estas fiziologie malsupera al viro, kaj ĝi estas eŭropeca malbonaĉa leĝprojekto, kiu kompromitas la virton de nia nacia familisistemo." (Kontraŭopinio de Ida Iwakusu, ano de la Ĉambro de Nobeloj, kontraŭ la "Leĝpropono por la Publikaj Rajtoj de la Virinoj",

februaro 1931.)

Teorie mi agnoskas la belon de sana knabino en kampara vilaĝo, sed kiam mi vidas la belon de virino civilizita en Ginza (tipa butikuma kvartalo en Tokio), mi sentas ion ne neigeblan en urba civilizacio...(el Shibuya Teisuke, "Mizera Historio de Kamparanoj")

La Vivo en kampara vilaĝo

En kamparaj vilaĝoj, sub la kruela farmosistemo (duono de la rikolto estis forprenata kiel farmopago) kamparanoj suferis pro malriĉeco. Sed, kiam la nova kulturo kaj la novaj pensoj de urbanoj atingis kamparajn vilaĝojn, kamparanoj diversloke komencis ne nur sociajn movadojn pri farmokonfliktoj kaj kooperativismo, sed ankaŭ kulturajn movadojn pri edukado, arto k.a.

Shibuya Teisuke (1905-1989) naskiĝis en ĉirkaŭurbo de Tokio kiel la unua filo de malriĉa kampara familio. Fininte altgradan bazlernejon, li iris al Tokio por plu lerni, sed revenis hejmen pro malkonsento de la familianoj. Poste li agadis kiel kamparana aktivulo, samtempe laborante kiel agrikulturisto. En lia taglibro el 1926 troviĝas jena priskribo: La koro de kampara junulo ŝanceliĝis inter la du pensoj, sopiro al la urba kulturo kaj volo fari sanan vivadon en kamparo.

Malgraŭ la klopodo de kamparanoj, ne nuliĝis la ekonomia kaj kultura diferenco inter urbaj kaj kamparaj regionoj. Male, de post la fino de la 1920aj jaroj, en kamparaj vilaĝoj regis ekstrema mizero kaŭzita de la ekonomia depresio. Solvi la depresion de kamparaj vilaĝoj fariĝis unu el la sloganoj de la japana armeo, kiu intencis invadi la Ĉinan kontinenton.



La monda ekonomia krizo kaj malvarma klimato pelis kamparajn vilaĝojn en senfundan malriĉecon. Tiu ĉi foto montras, ke la kamparanoj en la Nordoriento de Japanio manĝas maldensan kaĉon kun nuksoj kaj herboburĝonoj. (En Aomori, decembro 1931)

Peco de Historio

Okcidentigo kaj ŝanĝigo de la virina vivo

Sekve de la enkonduko kaj populariĝo de la okcidenta kulturo, ŝanĝigo okazis al la vivo de la virinoj en la Orienta Azio. Malsame de la antaŭaj virinoj, kiuj sin okupis pri dommastrumado, nun la virinoj debutis en la sociaj aktivadoj. Ili aktive klopodadis por nuligi la diferencon inter la viroj kaj virinoj kaj altigi la socian pozicion de la virinoj.



Memportreto de Na He-Seok

Na He-Seok (1896-1948): La unua feministo en Koreio

Na He-Seok (1896-1948), la unua korea pentristino, estis atentinda novstila virino. Na He-Seok malakceptis la tradician moron: "saĝa patrino kaj bona edzino". Ŝi pensis ke la tradicia moro de virino estas por la bono de la viro. En 1920 Na He-Seok publike proklamis sian geedziĝan kondiĉon, kaj kreis sensacion tiam. La tri kondiĉoj estis: "Unue, amu min dumvive", "Due, ne malhelpu min pentri", "Trie, nur duope loĝu malproksime de patrino kaj filino naskita kun eksedzino". Post la edza akcepto de la kondiĉoj Na He-Seok edziniĝis. Poste, ŝi okazigis ekspozicion de siaj olepentraĵoj en Seulo, kaj en 1927 revenvoje de monda rondvojaĝo gajnis premion en publika varbekspozicio en Japanio. Post 2 jaroj ŝi eksedziniĝis, sed konstante ŝi pentris kaj sinsekve gajnis kvinfoje premion en korea belarta ekspozicio. Ŝi rifuzis la tradician socian moron de virino kaj aktive partoprenis en la socian vivon. Sed ŝi ne sin okupis por socia agado por la bono de la virino.



Hiratsuka Raicho

Hiratsuka Raicho (1886-1971): La novgeneracia virino kiu gvidis pacmovadon

Hiratsuka Raicho estis unu el la tipaj novaj virinoj en Japanio. En 1911 ŝi eldonis virinan gazeton "Seitoo" (Blua Ŝtrumpo), la unuan gazeton faritan de virinoj en Japanio. En la gazeto, Hiratsuka deklaris la liberigon de la virinoj. La simbolo de la deklaro estis la frazo: "En pratempo la virino estis la suno", kaj tio surprizis la homojn. Pro tio oni donis

al Hiratsuka diversajn sociajn kalumniojn, sed tamen ŝi ne cedis.

Por altigi la socian pozicion de la virinoj, ŝi aktive agadis en tiaj sociaj movadoj kiel la movadoj por protektado de patrineco kaj por la politikaj rajtoj de la virinoj, ktp. Ŝi komencis "aman kunvivado" kun viro 14 jarojn pli juna, per kio ŝi montris sian propran ideon rifuzi la ĝisnunan socian sistemon kaj kutimon, kiu subpremadas virinojn.

Dum la Azia-Pacifika Milito ŝi portempe kunlaboris por milito, sed post la milito, ŝi dediĉis sin al kontraŭmilita pacmovado kaj virina movado. Ŝi simpatiis al la spirito de pacismo, kiun la nova Konstitucio de Japanio fiere diktas, kaj ŝi gvidis pacmovadon ne nur enlande, sed ankaŭ internacie, apelacianta al abolo de la nukleaj armiloj.

He Xiangning (1878-1972): Pentristino kaj revoluciistino

He Xiangning estis reprezentanto de la ĉinaj revoluciulinoj en la ĉina historio. En 1902, kun la revo fariĝi pentristino, He Xiangning iris al Japanio por studado. Sed iom post iom ŝi komencis atenti pri la socio kaj la liberigo de la virinoj. Ŝi partoprenis la Ĉinan Revolucian Ligon gvidatan de Sun Yat-sen kaj fariĝis la unua membrino de la ligo. Post la eksplodo de la Revolucio de 1911, ŝi sin okupis pri revoluciaj aktivadoj sub la gvido de Sun Yat-sen kaj estis nomumita kiel membro de la Centra Plenuma Komitato de Kuomintango kaj estro de la Departemento de Virinaj Aferoj. En tiu periodo, ŝia edzo Liao Zhongkai estis murdita de Kuomintango. En 1927, Chiang Kajshek [Ĉjang Kajŝek] faris puĉon, kaj ŝi rezignis ĉiujn oficojn,

sin forigis de la politika kampo kaj sin okupis pri pentrado. Post la fino de la Dua Mondmilito, ŝi denove elpaŝis por revolucia aktivado. Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949, ŝi prenis sur sin gravajn oficojn. Ŝi funkciis kiel honora prezidantino de la Federacio de Virinaj Asocioj kaj prezidantino de la Ĉina Ligo de Belartistoj. Ŝi persistadis en pentrado kaj eldonis sian poemaron.

Ŝia filo Liao Chengzhi laboris kiel membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj kiel prezidanto de la Asocio por Amikeco inter Ĉinio kaj Japanio, kaj longe klopodis por la normaligo de la rilatoj inter Ĉinio kaj Japanio.



*He Xiangning kaj ŝia
edzo Liao Zhongkai
kun la filo Liao
Chengzhi kaj filino
Liao Mengxing en
Tokio*

Resumo

En la ĉapitro 2, ni vidis kiel Ĉinio kaj Koreio rezistis kontraŭ la invado de Japanio. Ni vidis la aspekton de tri-landa moderniĝo. Ni trarigardis grandparte 4 faktojn.

Tra kiu proceso Japanio invadis la orientazian kontinenton post la Ĉina-Japana Milito kaj la Japana-Rusa Milito?

Japanio, kun sia armeo regadis Taiwan kaj Koreion, kaj invadis Ĉinion.

Kiel Japanio regadis Koreion en la 1910-aj kaj 1920-aj jaroj?

En la 1910-aj jaroj Japanio perforte regadis Koreion per milita ĝendarmo kaj polico. En la 1920-aj jaroj, por mildigi la rezistadon de la koreaj popoloj, Japanio efektivigis tiel nomatan "kulturan regadon", kun la celo disdividi la popolojn.

Kiel ĉinoj kaj koreoj rezistadis kontraŭ la japana regado?

En 1919, la Movado de la Unua de Marto en Koreio kaj la Movado de la Kvara de Majo en Ĉinio okazis kaj rezistadis kontraŭ la japana invado. Poste en Ĉinio kaj en Koreio okazis diversaj kontraŭjapanaj movadoj, naciisma, socialisma, ktp. Ankaŭ en Japanio nova socia movado disvastiĝis.

Kiel ŝanĝiĝis la ĉina, japana kaj korea socioj dum la moderniĝa proceso?

De post la Revolucio de 1911 en Ĉinio, ĉirkaŭ la Unua Mondmilito en Japanio, kaj de post la Movado de la 1-a de Marto en Koreio, rapide disvastiĝis nova soci-kultura fenomeno, malsame de la ĝistiamaj moroj. Precipe la pensmaniero kaj socia movado de la virinoj grandioze ŝanĝiĝis.

Kiel ni vidis, la japana invado al Orientazio ŝanĝis politikan ordon de Orientazio. Tamen la japana ekspansia politiko ne finiĝis ĉi tie. En 1931, Japanio konkeris Manĉurion kaj daŭre invadis la ĉinan nordregionon. Por la invadmilito, ne nur japanoj sed ankaŭ la junuloj de la kolonio kaj okupita regiono estis mobilizitaj. Pri ĉi tiu temo ni vidos detalojn en la ĉapitro 3.

Ĉapitro III

Invadmilito kaj la Damaĝo al la Popolo

Enkonduko

Post la Evento de la 18-a de Septembro (Manĉuria milito) kaj okupo de la Nordorienta Ĉinio, Japanio komencis plenampleksan militon kontraŭ Ĉinio en 1937 kaj ĝin plivastigis al Azia-Pacifika Milito en 1941. Dume, Japanio faris la plej grandskalan militon en la moderna historio de la Orienta Azio.

La plej grava karakterizaĵo de tiu agresiva milito far Japanio estas, ke ĝi mobilizis ĉiujn fortojn militajn kaj ekonomiajn de la tuta Japanio kaj faris la tiel nomatan “tutfortan militon”. Kaj krome, Japanio ankaŭ enmetis la riĉfontojn, energiajn fontojn, laborfortojn kaj militajn fortojn de Koreio, Taiwan kaj siaj aliaj kolonioj kaj la teritorio okupita en Ĉinio kaj Sudorienta Azio en tiun militon, farante tiujn regionojn bazlokoj por tiu agresiva milito. Sekve Japanio fariĝis unu el la ĉefaj malamikoj de la kontraŭfaŝisma fronto de la mondo.

Por plenumi la sistemon de tutforta milito, la japana militarisma registaro ne nur plifortigis la regadon super sia popolo, dronigante ĝin en militaj suferoj, sed ankaŭ plifortigis sian regadon sur la kolonioj Koreio kaj Taiwan, ŝanĝante ilin en bazojn por plivastigi la agresan militon, kaj ankaŭ dronigante la popolojn de tiuj regionoj en militaj suferoj. Japanio starigis en la Nordorienta Ĉinio kaj aliaj regionoj serion da pupreĝimoj por plenforte subpremi la popolanojn rezistantajn kontraŭ la agreso. Al la ĉina registaro kaj la popolamasoj kiuj persistis en la rezistado, la japana armeo faris serion da krimoj per sendistinga bombado, militado de “tri neniigoj” (t. e. neniigi la konstruaĵojn per incendio, neniigi la loĝantojn per masakro kaj neniigi la havaĵojn de la loĝantoj per rabado), masakrado, perforta varbado de laboruloj kaj “konsolvirinoj”, t. e. prostituitinoj en la japana armeo.

Sed la popoloj de la landoj en Orientazio ne submetiĝis al la agresantoj, kaj faris organizitajn rezistadojn, faris kontraŭagresan militon por naciliberigo kaj nacia sendependeco. Kaj la kontraŭjapana rezistmilito en Ĉinio en tre malfacilaj kondiĉoj fariĝis grava parto de la kontraŭfaŝisma milito de la mondo.

Japania Invado en la Nordorientan Regionon de Ĉinio

1. La Evento de la 18-a de Septembro

En 1931, Japanio manipulis la Eventon de la 18-a de Septembro kaj okupis la Nordorientan Ĉinion, kio farigis prelude de la plenampleksa agresa milito kontraŭ Ĉinio. En kia situacio kaj pro kio okazis la Evento de la 18-a de Septembro?

Se eventuale tumulto influos Manĉurion kaj Mongolion kaj socia malordo el iu ajn direkto atencos la specialajn poziciojn kaj interesojn de nia lando en tiu regiono, ni devas fari defendon – kaj ni devas esti pretaj por alpreni necesajn rimedojn.

— El <Politiko pri Ĉinio> de la Orienta Konferenco

La Nordorienta Ĉinio antaŭ la Evento de la 18-a de Septembro

Post la Japania-Rusa Milito, Japanio ĉiam konsideris la Nordorientan Ĉinion kiel sian “vivlinion”. En la “Orienta Konferenco” okazigita en junio 1927, la “Politiko pri Ĉinio” estis decidita por plenumi fortan politikon apartigi la Nordorienton disde la ĉina teritorio.

Dume, la influo de la Ĉina Nacia Revolucia Armeo disvastiĝis al la norda regiono de Ĉinio dank’ al la Norda Ekspedicio, kaj Japanio timis, ke ĝi influos la Nordorienton, kaj ĝi pli urĝe efektiviĝis sian apartigan planon. En la 4-a de junio 1928, Kawamoto Daisaku, altnivela stabano de la Japania Kantoo-armeo kreis akcidenton, en kiu oni mortigis ĉe Huanggutun-stacio, Zhang Zuolin, la ĉefmilitaristo-reganton de la Nordoriento, por kaŭzi malordon kaj okupi la Nordorienton en ĥaoso. Sed Zhang Xueliang, heredinte la potencon de sia patro, male deklaris rekonon de la Nankina Nacia Registaro sub la gvido de Ĉjang Kajŝek, kaj bankrotoigis la intrigon de Japanio por apartigi la Nordorienton de Ĉinio.

Post la sinturno al la Nacia Registaro, Zhang Xueliang konstruis fervojojn, pligrandigis la havenon kaj unuigis la monsystemon kaj plenumis en la Nordoriento politikojn kontraŭ Japanio. Timante ke Zhang Xueliang fortiĝos post ricevo de la subteno de la Nacia Registaro, Japanio sekrete sin preparis por okupi tiun regionon. La Kantoo-armeo sekrete faris skoltadon kaj kolektis informojn, elmetis planon okupi la Nordorienton per milita forto kaj samtempe kreadis pretekstojn por la intrigo.

Trupo de la Kantoo-armeo atakas Shenyang.



La Evento de la 18-a de Septembro kaj la Enketa Grupo de Redon

Nokte de la 18-a de septembro de 1931, altrangaj stabanoj de la Kantoo-armeo Itagaki Seishiro, Ishihara Kanji k.a. faris eksplodigon sur la Sudmanĉuria Fervojo ĉe Liutiao-lago de Shenyang, atribuis la respondecon al la ĉina Nordorienta Armeo, kaj surprizatakis la ĉinan garnizonon en

Shenyang kaj sekve plivastigis sian aktivadon por okupi urbojn laŭlonge de la fervojo. Kvankam ĉinaj trupoj de tiuj lokoj rezistis al la atakantoj, la Nacia Registaro praktikis politikon unue pacigi enlande kaj poste rezisti eksterlande kaj retiris la armeon el la Nordoriento, tial la japana atako ne estis haltigita. En malpli ol kvin monatoj la japana armeo jam okupis la ĉefajn urbojn kaj zonojn laŭlonge de la fervojoj en la Nordoriento.

Post la Evento de la 18-a de Septembro, la ĉina registaro plendis pri tio al la Ligo de Nacioj. Kaj tiu internacia organizo sendis enketan grupon kun brito Redon kiel ĝia gvidanto por fari enketadon en Japanio kaj la Nordoriento de Ĉinio. En la 4-a de septembro, 1932, tiu grupo prezentis raporton pri la enketado, laŭ kiu Ligo de Nacioj opiniis, ke Japanio malobservis la nemilitan kontrakton en la internacia leĝo kaj decidis postuli, ke Japanio retiru sian armeon el la nordorienta Ĉinio kaj restarigu la staton antaŭ la evento. Sed Japanio rifuzis la decidon kaj sin eksigis el la Ligo de Nacioj en 1933.

La Evento de la 28-a de Januaro

La okupo de la Nordoriento de Ĉinio far Japanio estis riproĉata de la internaciaj opinioj, kaj la intenco de Japanio fondi pupreĝimon en la Nordoriento renkontis obstaklon. Por deturni atenton de la internacia socio, la Kantoo-armeo kaj armea ataŝeo de la japana konsulejo en Ŝanhajo kune aranĝis atakon al japana bonzo far perfortuloj. La japana mararmeo subtenate de tri infanteriaj korpusoj komencis ataki la ĉinan garnizonon en Ŝanhajo. La 19-a-voja Armeo brave rezistis kontraŭ la malamikoj kaj mortigis kaj vundis pli ol dek mil japanajn soldatojn. Poste pro paciga aktivado de Britio, Ĉinio kaj Japanio komencis intertrakti en la 4-a de marto kaj subskribis en la 5-a de majo la Armistitan Interkonsenton de Ŝanhajo.



Japana politiko por apartigi la nordan Ĉinion

Post la okupo de la Nordoriento de Ĉinio, Japanio turnis sian okulon al la Norda Ĉinio. En la komenco de 1933, la Kantoo-armeo invadis la Rehe-provincon kaj la zonon laŭlonge de la Granda Muro. Kvankam ĝi renkontis rezistadon de la ĉina armeo, tamen Japanio devigis la reprezentanton de Ĉinio subskribi la Interkonsenton ĉe Tanggu, ke la ĉinaj trupoj retiriĝu el la “Senarma Zono” kun larĝeco de 100 kilometroj. Tio malfermis enirejon por la japana armeo al la Norda Ĉinio. En majo 1935, la Kantoo-armeo transpasis la Grandan Muron kaj invadis la Nordan Ĉinion kaj komplotis kun sia garnizono en la Norda Ĉinio por la “Movado de Sendependiĝo de la Kvin Nordaj Provincoj”, kaj starigis pupan reĝimon kun la intenco forpuŝi la forton de la Nacia Registaro el tiu regiono. Jen plenumiĝis la preparo por invadi la tutan Ĉinion. En tiu procedo, la riĉfontoj de karbo kaj fero de la Norda Ĉinio falis sub la disponadon de Japanio.

- La Nordoriento ĉiam estas parto de Ĉinio.
- “La aktivado de Japanio ne povas esti konsiderata kiel laŭleĝa memdefenda rimedo.
- La gvidanto de la ‘Manĉuria Respubliko’ nominale estas manĉuro, sed la efektiva regpotenco estas en la manoj de la japanaj oficistoj kaj konsilantoj; en la okuloj de lokaj ĉinoj, li estas nur instrumento de la japanoj.” – el la Redon-Raporto.

*Cai Tingkai,
komandanto de la
19-a-voja Armeo gvidas
batalon.*

2. Naskiĝo de la "Manĉuria Respubliko", la Pupa Reĝimo

Por konfirmi sian okupon de la Nordoriento kiel establitan fakton, la Kantoo-armeo proklamis en marto 1933 la fondon de la Manĉuria Respubliko en la Nordorienta Ĉinio, kaj starigis Pu Yi, la detronigitan imperiestron de la Qing-Dinastio, kiel nominalan suverenen. Kia ŝtato efektive estis tiu Manĉuria Respubliko kreita de la Kantoo-armeo?

La imperiestro de la Manĉuria Respubliko surtroniĝis laŭ la volo de la Ĉielo, t. e. laŭ la sankta volo de Tennoo. Tial li nepre devas servi al Tennoo, centro de la Tennoa Federacio, kaj preni la sanktan volon de Tennoo kiel la sian. Kiel kondiĉo por la surtroniĝo...tio similas al tio, ke la luno brilas per la radioj de la suno.

(El la Enkonduko de la <Manĉuria Historio> ellaborita de la Ĉefstabo de la Kantoo-armeo en la 18-a de septembro 1936, p. 578)

Kia reĝimo estis la Manĉuria Respubliko ?

Japanio proklamis, ke fondiĝis "respubliko" de japanoj, manĉuroj, hanoj, koreoj kaj mongoloj en la Nordoriento de Ĉinio. Sed efektive ĝi estis pupa reĝimo manipolata de la Kantoo-armeo, kiu prenis ĝin nur kiel bazon por fari plenamplersan militon kontraŭ Ĉinio kaj Sovetunio. La povo de la ŝtata konsilio kaj la ministerioj efektive estis en la manoj de la japanaj generaloj kiel estroj de burooj, kiuj direktis la japanajn vicestrojn de diversaj departementoj, kaj tiuj personoj okupis pozicion super la nominalaj estroj de la ministerioj, provincoj kaj urboj kaj formis komandan

sistemon kun la plena potenco. Kaj plejparto de la politikoj estis kopio de tiuj de Japanio. Kaj Pu Yi, la t. n. Imperiestro de Manĉurio, estis tute senpova. Tial oni komparis la Manĉurian Respublikon kun ĥimero en greka mito, kun leona kapo, t. e. la Kantoo-armeo, ŝafa trunko, t. e. la lando kun Tennoo kaj draka vosto, t. e. la pupa imperiestro Pu Yi.

La komandanto de la Kantoo-armeo kaj reprezentanto de la Manĉuria Respubliko subskribas Interkonsenton de Japanio kaj Manĉurio.

Kiel la Kantoo-armeo establis la kolonian regadon?



Kiam Japanio provis okupi la Nordorienton, ĝi renkontis fortan rezistadon. Parto de la ĉina garnizono kaj la popoloj unue sin organizis en Volontuloj Rezistantaj kontraŭ Japanio, kaj poste fondis la organizon Unuiĝa Rezista Armeo kontraŭ Japanio kaj pene faris longdaŭran batalon. Por subpremi la armitajn trupojn kontraŭ Japanio, la Kantoo-armeo mobilizis la armeon, policianojn, ĝendarmojn kaj spionojn por senĉese ataki la lokojn kie aktivis armitaj kontraŭjapanaj fortoj, kaj samtempe persekutis la loĝantojn de tiuj lokoj kaj kreis multajn masakrojn al



*Memorhalo de la
Pingdingshan-Masakro*

senarmaj popolanoj. Por izoli la rezistantojn, la japana-pupreĝima aŭtoritato perforte kunigis vilaĝojn kaj transloĝigis la vilaĝanojn en “komunajn tribojn” ĉirkaŭitaj per altaj muroj kaj profundaj tranĉeoj. La “triboj” estis gardataj de soldatoj kaj policianoj kaj al la loĝantoj estis malpermesite eliri aŭ eniri laŭvole, por rompi la interligon de la popolamasoj kun la ĉinaj kontraŭjapanaj trupoj. La popolanoj, kiuj ne volis forlasi sian hejmlokon estis murditaj, iliaj domoj forbruligitaj kaj iliaj kampoj dezertigitaj. La japana-pupreĝima aŭtoritato enkondukis “respondan sistemon de najbargrupo”, por devigi la loĝantojn superrigardi kaj respondeci unuj pri aliaj; se unu malobservas leĝon, dek najbaroj devas ricevi punon.

Masakro en Pingdingshan, ĝenerala aresto kaj denunco

Post la okupo de la Nordoriento, Japanio faris multajn masakrojn al la rezistantaj popolanoj de tiu regiono, kaj tiu en Pingdingshan estis unu el ili.

En la 16-a de septembro, 1932, por venĝi sin pro la eksplodigo de karbominejo de Fushun far Kontraŭjapanaj Volontuloj, la japana garnizono de tiu urbo kaj ĝiaj ĝendarmoj sendis pli ol 200 soldatojn en la vilaĝon Pingdingshan en la ĉirkaŭaĵo de Fushun, pelis la pli ol 3,000 vilaĝanojn inkluzive de virinoj, infanoj kaj maljunuloj en basenon kaj ilin masakris per maŝinpafiloj. Okazis multe da similaj masakroj, kiel tiuj de Laoheigou kaj Tulongshan. La japanaj ĝendarmoj faris ĝeneralajn denuncojn kaj arestojn, ĉiuj suspektatoj estis torturataj kaj persekutataj kaj plejparto de tiuj kiuj estis rigardataj kiel oponantoj de la Manĉuria Respubliko kaj Japanio estis murditaj, kaj multaj senkulpaj popolanoj estis implikitaj kaj eĉ perdis sian vivon pro kruela torturado.

Konfeso de Tsuchiya Yoshio, Serĝento de la Ĝendarma Branĉo en Qiqihar

Kiel asistanto de kaporalo, ankaŭ mi partoprenis pridemandadon al krimuloj, ilin torturadis per bastonadoj en pluraj tagoj kaj enverŝis akvon en ilin. La ĉambro plenis je krioj de la ĝendarmoj kaj korŝiraj krioj de la torturatoj. Iu ĝendarmo bate disŝiris la karnon de la dorso de la torturato, ke ĝi purpuriĝis kaj senĉese sangadis, li tamen ne ĉesigis la batadon.

— El <Konfeso de Ĝendarmo>, Asahi Ĵurnalo

3. Socio kaj Ekonomio de "Manĉurio"

Kiel Japanio, rekte aŭ pere de la pupa registaro, superregis la politikon, ekonomion, kulturon, sciencan, edukon kaj ĉiujn aliajn kampojn de la Nordoriento, kaj kiel ĝi faris tiun regionon efektiva kolonio de Japanio."

Japania kapitalo monopoligis la ekonomion de la Nordoriento

Ĉiuj ĉefaj industrioj de la Nordoriento estis monopoligitaj de la japana duonregistara organizo Sudmanĉuria Fervoja Kompanio (SFK) kaj la japana industria magnata Kompanio por Disvolvo de Manĉuria Peza Industrio (KDMPI). Ili superregis la specialajn kompaniojn pri financo, karbo, ŝtalo, trafikado, ekspluatado de metalaj minoj, elektro k.a., kaj malpermesis, ke ĉina nacia kapitalo eniru en tiujn kampojn. En la kvardekaj jaroj de la 20-a jarcento, multaj ĉinaj naciaj industriaj entreprenoj estis bankrotontaj pro limigo de materialoj kaj disvendado.

Rememoro de studento de la Altgrada Civitana Lernejo de Yilan-Gubernio:

La unua viclernejestro Nakahara, eksa soldato kun militarisma stilo, ofte skoldis instruistojn kaj batis lernantojn, vere estis centprocenta superreganto. La dua viclernejestro Koga Ono estis ŝajne milda kaj bonkora, sed efektive insidema kaj ruza. Li kaŝe superrigardis la instruistojn kaj lernantojn kaj ricevis la kromnomon "Malnova Plastro" (signifanta "neforskuebla"). Ankaŭ la tria viclernejestro Takeda estis ekssoldato. Li kaptis la tutan povon de la lernejo kaj gvatadis kaŝe kaj publike la instruistojn kaj lernantojn, faris notojn pri iliaj agoj kaj listigis la suspektatojn.

— El la 14-a volumo de la "Elektitaj Historiaj Materialoj de la Heilongjiang-Provinco", 1984.


Japanaj enmigrintoj en la Nordoriento

Por teni la superregan ordon en la Nordoriento kaj mildigi la loĝantaran premon en Japanio, kaj samtempe sin prepari por milito kontraŭ Sovetunio, Japanio komencis enmigrigi siajn popolanojn al la norda parto de la Nordoriento, uzante ekssoldatojn kaj "kamparajn soldatojn" (t.e. estontajn soldatojn) kiel kadrojn kaj tion nomis armita enmigra eksperimento. En 1936, la japana registaro ellaboris la Planon por Enmigro de Miliono, kaj kolektive enmigrigis kamparanojn de lokoj en Japanio kie estis tro multe da loĝantoj kun malmulte da kampoj, en la Nordorienton. En la Nordoriento fondiĝis vilaĝoj samnomaj kun tiuj en Japanio, kiuj nomiĝis branĉ-vilaĝoj. Kaj krome Japanio ankaŭ translokiis grandan nombron da japanaj gejunuloj en la Nordorienton por fondi "Ekspluatkorpuson de Junaj Volontuloj". Ĝis sia kapitulaco post la malvenko, Japanio enmigrigis 290,000 loĝantojn en la Nordorienton. Krom japanoj, ankaŭ nombro da koreoj estis devigate enmigrintaj en tiun regionon. Por havigi teron al la enmigrintoj, Japanio ordonis la pupan registaron de Manĉurio perforte forpreni aŭ malkare aĉeti kampojn de la lokaj kamparanoj.

Koloniisma edukado

Post la okupo de la Nordoriento, la Kantoo-armeo unue arestis la patriotajn instruistojn kaj lernantojn, subpremis la batalojn kontraŭ la pupa manĉuria reĝimo kaj Japanio, kaj

fermis la lernejojn. Nur post la establo de la koloniisma superregado komenciĝis restarigo kaj konstruado de lernejoj. Tiam la elementaj lernejoj estis alinomataj kiel civitanaj lernejoj. La lernoperiodo de la mezlernejoj estis mallongigita de 6 jaroj al 4 jaroj, kaj la mezlernejoj de tiu periodo estis nomataj altgradaj civitanaj lernejoj. Samtempe la instruado de fundamentaj scioj en la lernejoj estis reduktita, kaj la edukado pri industriaj praktikoj estis emfazita, efektive por la bezono de la milita politiko. Kaj ĉiugradaj lernejoj faris devigan edukadon por lojaleco al la Tennoo, kio efektive estis sklaviga edukado al la popolamasoj, nome ĉiutage “riverenci al la oriento” al la japana Tennoo kaj la pupa imperiestro de Manĉurio, kanti la nacian himnon, reciti la Instrukcion por Civitanoj de Pu Yi, lerni la japanan lingvon kaj kurson pri moralo (poste nomata “kurso pri spirito landkonstrua”), akcepti la ideologion pri unueco de Japanio kaj Manĉurio, lojaleco kaj patriotismo. En Ĉinio, oni nomis la edukadon dum la japana regado “sklaviga eduko”.



“Sklaviga Eduko”, de Zhang Ting, aperigita en La Rotaria Jurnalo, 1937

Perforta rekvizicio de greno

En 1939, pro la bezono de la agresa milito, la pupa registaro elmetis la politikon perforte rekvizicii 5 milionojn da tunoj da greno. Tiu kvanto estis pligrandigita ĉiujare kaj en 1945 jam atingis 9 milionojn da tunoj. Ĉiujare post la aŭtuna rikolto, la japana pupa registaro dissendis trupojn al la kamparo por superrigardi la rekvizicion. Premate de la armitaj trupoj, la kamparanoj devis liveri eĉ grenon por sia propra manĝo aŭ reproduktado. Granda kvanto da greno estis forprenita fare de la armeo, la monata gren-porcio por urbanoj reduktiĝis al 5 kilogramoj, kaj oni devis sin satigi per glanoj. La japana pupa registaro malpermesis al la ĉinoj manĝi rizon. Kiu malobservis tion kaj estis malkaŝita, estis punata kiel ekonomia krimulo.



Trejnejo de japana Ekspluatkorpuso de Junaj Volontuloj.

Suferoj de laboruloj

Por ŝanĝi la Nordorienton en militan bazon kontraŭ Sovetunio, ekde 1939 Japanio komencis efektivi la t.n. “Planon por Prosperigi la Nordon”, kaj komencis grandskalan militan konstruadon ĉe la norda limregiono. Pro manko de laborfortoj en la Nordoriento, la japana pupregistaro ĉiujare varbis laborulojn en la Norda Ĉinio. Laŭ registroj en la aktoj de la Nordĉinia Laborula Ligo, en 1941 kaj 1942, ĉirkaŭ miliono da laboruloj estis varbitaj, inter kiuj troviĝis ankaŭ ĉinaj militkaptitoj. La laboruloj eskortitaj de soldatoj al la Nordoriento estis traktataj malhomece kaj suferis de serioza manko de greno, laboris en tre malbonaj kondiĉoj, sen dikaj vestoj kontraŭ frostego kaj granda nombro el ili perdis sian vivon.

4. Unuiĝinta Rezistado de la Ĉinaj kaj Koreaj Popolanoj

Kiel la diversnaciaj kaj diversklasaj popolamasoj en la Nordorienta Ĉinio batalis kontraŭ la agresantoj dum la invado kaj superregado de la japana armeo? Ni iom legu el la historio pri tio.

Generalo Ma Zhanshan kaj batalo kontraŭ la invadantoj

Post la Evento de la 18-a de Septembro, la Kantoo-armeo okupis sinsekve la provincojn Liaoning kaj Jilin. Kiam ĝi invadis la Heilongjiang-Provincon, ĝi renkontis obstinan rezistadon de la armeo kaj popolo sub la gvido de Ma Zhanshan, la aganta prezidanto de tiu provinco ĉe la Ponto trans la Nenjiang-rivero, kaj nur post kiam la japana armeo alsendis sian ĉefan trupon kun plejparto de la ekipaĵoj kaj intensa batalado ĝi sukcesis eniri en la urbon Qiqihar.

La Unuiĝinta Kontraŭjapana Armeo

Ĉirkaŭ la jaro 1935, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, la kontraŭjapanaj armitaj fortoj en diversaj lokoj de Nordorienta Ĉinio unuiĝis kaj formis la Popolan Revolucian Armeon de la Nordoriento, kiu poste alinomiĝis al Unuiĝinta Kontraŭjapana Armeo (UKA) de la Nordoriento, kiu disvolviĝis ĝis 11 armeoj kun pli ol tridek mil homoj. Sed la Kantoo-armeo kaj la pupa registaro koncentris siajn fortojn por ĝin subpremi, plenumis Pacigan Ordigan Planon, kaj senĉese atakis UKA-n. Pro ekstrema manko de greno, salo, medikamentoj kaj aliaj vivbezonaĵoj martiriĝis multaj elstaraj komandantoj kaj batalantoj de UKA. Por konservi siajn fortojn, trupoj de UKA iris en Sovetunion por reorganizigo kaj trejnado. Post 1942, UKA en Sovetunio komencis senĉese sendi taĉmentojn en la Nordorienton por kolekti informojn en la malfronto de la malamiko kaj persistis en batalado. Post deklaro de milito far Sovetunio kontraŭ Japanio,

UKA revenis en la Nordorienton por fari rezistadon ĝis la fina venko.

Ma Zhanshan en la fronto, kun ĵurnalistoj



Rezistado de diversklasaj popolamasoj kontraŭ Japanio

Ankaŭ popolamasoj de diversaj klasoj en la Nordoriento sin ĵetis en la batalon kontraŭ la japanaj

invadantoj. Ĉirkaŭ 1939, en la regiono de Dalian sub rekta regado de Japanio, la popolamasoj organizis kontraŭjapanan bruligan taĉmenton, forbruligis japanajn fabrikojn kaj entreprenojn de militaj provizaĵoj. Subteraj organizoj de Kuomintango disvastigis sekretajn batalojn en diversaj lokoj. Ekzemple, la patrioto Yi Zuoheng interligis siajn kamaradojn en la urboj Jinzhou, Harbino kaj Changchun, kaj movis popolamasojn por kaŝaj bataloj kontraŭ la manĉuria pupa registaro kaj Japanio. Post la arestiĝo, li restis nesubigebla kaj heroe martiriĝis en 1943. Soldatoj en la armeo de la manĉuria pupa registaro ribelis. En 1941, 85 soldatoj de la Tria Stirista Grupo de la Manĉuria Aer-Armeo pafmortigis la superrigardan japanan oficiron kaj volis aliĝi al la kontraŭjapanaj trupoj. Sed ili estis subpremitaj. Krome, nombro da koreaj, manĉuraj, mongolaj kaj oroĉen-naciaj nacimalplimultanoj batalis ŝultro-ĉe-ŝultre kun han-naciaj popoloj en la rezistado.



*Yang Jingyu,
komandanto de la 1-a
Unuiĝinta Armeo,
batale mortis en 1940.*

Koreaj popoloj batalantaj ŝultro-ĉe-ŝultre kun ĉinaj popoloj

Post la Evento de la 18-a de Septembro, ankaŭ koreoj loĝantaj en la Nordoriento prenis armilojn por batali kontraŭ la japanaj agresantoj. La Korea Sendependiga Armeo* kaj la Korea Popola Armeo** agadis en la norda kaj suda partoj de la Nordoriento. La Korea Popola Armeo aktivadis ĝis 1938 kaj bataladis kune kun la Popola Sindefenda Armeo de Liaoning kaj la Unuiĝinta Kontraŭjapana Armeo gvidata de la Komunista Parto de Ĉinio. Han Jianqiu estis unu el ĝiaj gvidantoj.

Iuj koreoj aliĝis al la gerila trupo gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio, precipe al la Unuiĝinta Kontraŭjapana Armeo de Nordoriento. Ili batalis kune kun ĉinoj. Ili kredis, ke forpelo de japanoj el la Nordoriento de Ĉinio heroldas baldaŭan sendependiĝon de Koreio.

La koreaj gerilanoj ne nur faris armitajn batalojn, sed ankaŭ unuiĝis kun aliaj kontraŭjapanaj koreoj kaj organizis ekde 1936 la Korean Asocion por Restaŭri la Patrujon en la Nordoriento en multaj lokoj. Tiu organizo disiĝis pro subpremado fare de Japanio en 1938, sed ĝia batalvolo ne estis estingita.

* La Korea Sendependiga Armeo, armita trupo fondita en 1931 de la Korea Sendependiga Partio, aktivanta en la Nordorienta Ĉinio. Ĝia ĉefkomandanto estis Chi Chungchon.

** La Korea Popola Armeo, armita trupo sub la gvido de la Korea Revolucia Partio, aktivanta en la suda parto de la Nordorienta Ĉinio en la tridekaj jaroj de la dudeka jarcento. Ĝia ĉefkomandanto estis Yang Sehbong.

Marŝo de Ĉinio kaj Koreio

Ja sampatrianoj ĉinoj, koreoj,
Alvenas la tago por batalo,
Alvenas kontraŭjapana finalo,
Popola memdefendarmeo,
Chosun revolucia armeo,
Ni estas ligita kunbatalantaro.

Peco de Historio

Zhang Hanhui kaj la kontraŭjapana kanto "Ĉe Songhua-Rivero"



Zhang Hanhui

Post la Evento de la 18-a de Septembro, la ĉinaj popoloj de diversaj klasoj indigniĝis kaj amase sin ĵetis en la grandiozan movadon kontraŭ Japanio por savi la nacion. En majo 1936, Zhang Hanhui (1902-1946, el Dingxian-Gubernio de Hebei-Provinco), instruisto de la Dua Xi'an-a Mezlernejo de Shaanxi-Provinco (nun la Mezlernejo ligita al la Shaanxi-a Normala Universitato) verkis kontraŭjapanan kanton "Ĉe Songhua-Rivero". Tiu kanto plena je patriotismo kaj sopiro al la invadita hejmloko estis tre kortuŝa, kaj ĝi cirkulis el la lernejo en la armeon, rapide disvastiĝis tra la tuta lando kaj fariĝis la plej fama verko inter la naciŝavaj kantoj dum la kontraŭjapana rezistmilito. Tiu kanto ludis historian rolon por kuraĝigi la ĉinan popolon al gajno de la fina venko en la kontraŭjapana rezistmilito.

Krom "Ĉe Songhua-Rivero" Zhang Hanhui verkis ankaŭ aliajn pli ol 70 kantojn, inkluzive de "Produktado de la Armeo kaj Popolo". En la 11-a de marto, 1946 li mortis de malsano en Yan'an. Li estis honorita per la titolo de Popola Artisto, kiel la same renomaj muzikistoj Nie Er kaj Xian Xinghai.


Ĉe Songhua-Rivero

Mia hejmo estas ĉe Songhua-Rivero.
Tie estas kaj arbaroj kaj karbminoj,
Kaj sojfab- kaj sorg-plantoj tra la vasta tero.
Mia hejmo estas ĉe Songhua-Rivero.
Tie estas miaj samlandanoj,
Tie estas miaj kadukaj gepatroj.
Ho, la 18-a de septembro!
Ho, la 18-a de septembro!
En la tragika tago,
Ho la 18-a de septembro!
Ho la 18-a de septembro!
En tiu tragika tago
Mi forlasis mian hejmlokon,
Mi forlasis la senmezurajn trezorojn.
Migris, migris!
Ĉiutage, ĉiutage sude de la Granda Muro migras!
Sed en kiu jaro, en kiu monato
Mi povos reiri al mia kara hejmloko?
Sed en kiu jaro, en kiu monato
Mi povos repreni la senmezurajn trezorojn?
Ho gepatroj,
Ho gepatroj,
Kiam ni povos ĝoje rekuniĝi en nia hejmo?

Yun Bong-Gil (1908-1932): Heroa ago en Ŝanhajo

En la 29-a de aprilo 1932 Yun Bong-Gil (1908-1932) legis la ĵuron post la matenmanĝo kun Kim Gu, estro de la Korea Patriota Grupo: "Mi membriĝas al la Korea Patriota Grupo por reakiri la sendependecon kaj liberecon de nia patrujo kaj tutkore ĵuras masakri oficirojn de la malamiko, kiu invadis Ĉinion."

En tiu tago ĉirkaŭ la 13a horo aŭdiĝis terskua eksploda bruoj el la parko Hongkou. Surprize, en la eksploda loko okazis la solena festo de la imperiestra naskiĝtago, kiun organizis la japana armeo okupanta Ŝanhajon. Mortis aŭ vundiĝis pluraj altrangaj aŭtoritatoj, kiuj sidis sur la podio, inkluzive de la japana generalo Shirakawa Yoshinori. En la terura tumulto troviĝis iu homo, kiu kriegis: "Vivu! Korea sendependeco!" La homo estis ĝuste Yun Bong-Gil, kiu matene ĵuris masakri oficirojn de la malamiko.



Yun Bon-Gil, la dekstre staranta, kaj Kim Gu, la sidanta, la estro de la Korea Patriota Grupo.

Yun Bong-Gil surloke arestita estis mortkondamnita de la milittribunalo kaj estis mortigita en la unua de decembro samjare. Antaŭ sia morto li testamentis al siaj du filoj:

"Se ankaŭ vi havas sangon kaj ostojn,
nepre iĝu bravaj batalantoj por Koreio.
Alte levante la nacian standardon Taegeuk,
venu al mia malplena tombo
kaj plenigu glason da vino.
Ne malĝoju pro la foresto de via patro.
Ĉar ĉe vi estas via amata patrino..."

La popolo kaj registaro de Ĉinio tre admiris lin pro tiu triumfa elpaŝo kaj komencis aktive subteni la sendependigan movadon de Koreio. Tio konfirmis, kiom multe koreoj indignis pro la japana invado.

Japania Invadmilito

1. Ĉina-Japana Totala Milito

Invadinte Manĉurion (la nordorientan regionon de Ĉinio), Japanio komencis militon en la tuta Ĉinio ekde 1937. Kiamaniere tiu ĉi totala agresmilito evoluis en la Azia-Pacifikan Militon?

Komenciĝo de la totala milito en Ĉinio

Ceremonio de la japana armeo eniranta al Nankino en la 17a de decembro 1937. La unua ĉevalrajdanto estis vicgeneralo Yanagawa Heisuke, komandanto de la japana 10a Armeo.


Nokte la 7an de julio 1937, okazis la Lugouqiao-Incidentoj en la suburbo de Pekino. Pretekstante, ke la ĉina armeo kelkfoje pafis maljuste direkte al la japana armeo apud la ponto Lugouqiao, la japana registaro sendis trupojn por okupi la tutan nordan Ĉinion per unu bato. En Ŝanhajo, la 13an de aŭgusto, ĉefe la japana mararmeo komencis militon (la dua Ŝanhajo-Incidentoj, aŭ la Batalo de Songhu) kaj la 14an la mararmea aerfloto bombadis Ŝanhajon, Hangzhou k.a. kaj en la 15a Nankinon, tiaman ĉefurbon de Ĉinio.

La japana registaro kun ĉefministro Konoe sendis grandan armeon ankaŭ al Ŝanhajo, kaj post tri monatoj da severaj bataloj okupis ĝin. Supozante, ke Ĉinio kapitulacos kaj agnoskos la japanan regadon, se Japanio okupos la ĉefurbon Nankino, la japana registaro kaj la armeo sendis sian armeon kun 200 mil soldatoj por okupi ĝin, kaj la 13an de

decembro 1937 Japanio sukcesis. Dume la japana armeo okazigis fifaman masakron de Nankino, pro kio Japanio estis kritikita de la tuta mondo.

Longdaŭra milito

Malgraŭ la sukcesa okupacio de Nankino, Japanio malsukcesis kapitulacigi la registaron de Ĉjang Kajŝek, la ĉinan registaron de Kuomintango. La 16an de januaro 1938, la ĉefministro Konoe deklaris, ke de tiam



Japanio "ne negocos kun la registaro de Kuomintango", kaj ke Japanio daŭrigos la militon, ĝis ĝi pereigos la registaron de Ĉjang Kajŝek.

Kiam la Kuomintang-registaro translokis siajn armeon kaj registaran institucion al Wuhan, Japanio denove sendis grandan armeon al Wuhan. Japanio ankaŭ komencis Guangdong-operacon por malhelpi la transporton de helpomaterialoj de Hongkongo kaj Kantono al la Kuomintang-registaro.

Kiam en oktobro 1938 la japana armeo okupis Wuhan kaj Guangdong, la registaro de Ĉjang Kajŝek translokis sian ĉefurbon pli profunden al Chongqing por plu kontraŭbatali Japanion. Ĉar Japanio devis plenumi longdaŭran agresmiliton en Ĉinio, ankaŭ Koreio, tiama japana kolonio, kuntreniĝis en la militsistemon kaj tio plisuferigis koreojn.



Japania aerfloto konsistanta el 69-tipaj teratakaj aviadiloj celas bombardi la urbon Hankou. Fotita la 25an de marto 1938

Du batalkampoj

Ĝis la jaro 1939 Japanio sendis al Ĉinio 850 mil piedsoldatojn kaj okupis preskaŭ ĉiujn ĉefajn urbojn kaj fervojajn liniojn, sed tio ne sukcesis sufoki la kontraŭbatalon de Ĉinio. Japanio manipulis Wang Jingwei, vic-prezidanton de Kuomintango, eskapi el Chongqing kaj helpis lin starigi la duan Kuomintang-registaron (la registaron de Wang Jingwei), sed preskaŭ neniuj subtenis tiun ĉi pupan registaron, kaj la japana provo finiĝis fiaske.

Dume la armeoj: la Oka-voja Armeo kaj la Nova Kvara Armeo, gvidataj de la Ĉina Komunista Partio, rekrutis popolanojn, liberigis vilaĝojn kaj urbojn okupitajn de la japana armeo, kaj tie starigante kontraŭjapanajn bazojn, disvastigis sian influon. Ŝokita de tiuj movoj, la japana armeo komencis ekstermajn batalojn por tute detruigi la liberigitajn regionojn. La japana armeo havis du batalkampojn, nome ĝi devis alfronti la armeon de la Kuomintang-registaro kaj malantaŭe devis batali kontraŭ la kompartia armeo.

De la totala milito en Ĉinio al la Azia-Pacifika Milito

La Kuomintang-registaro, kiu sidis en Chongqing, daŭrigis la kontraŭjapanan militon, helpate de Usono kaj Britio, kiuj sendis municiojn de Birmo (la nuna Mjanmaro) laŭ la Vojo por Helpi Ĉjang Kajŝek. Kiam Usono kaj Britio komencis forte subteni Ĉinion kaj samtempe fortigi siajn ekonomiajn sankciojn kontraŭ Japanio, tiu ĉi direktis sin al la sudorienta Azio por rezervi al si municiojn.

2. Azia-Pacifika Milito

Kiamaniere Japanio, kiu stumblis en la Ĉina-Japana Milito, sin ĵetis en la Azia-Pacifikan Militon? Sube ni pripensu la kaŭzojn.

Por defendi la Japanan Imperion, ĝi preparu sin unue por la militoj kontraŭ Sovetunio kaj Usono, kiuj posedas fortegan militpovon kaj havas eblecon kolizii kontraŭ Japanio, kaj due por la militoj kontraŭ Ĉinio kaj Britio. Por tiu celo la armea potenco estu sufiĉe granda por plenumi la gvidprincipon milite regi la orientasian kontinenton kaj la okcidentan Pacifikon.

— El la <Principo de Nacidefendo de la Imperio>


Preparado por milito fare de Japanio

En junio 1936, antaŭ ol Japanio komencis la totalan militon kontraŭ Ĉinio, ĝi decidis jenan “gvidprincipon por defendo de la Imperio”, kiu fariĝis poste militplano de la Azia-Pacifika Milito. Laŭ ĝi, Japanio komencis ekspansii armadon, por ke la terarmeo povu militi kontraŭ Sovetunio kaj la mararmeo kontraŭ Usono kaj Britio.

Japanio profitis de la milito de Hitlero


La 1-an de septembro 1939, kiam la naziista Germanio gvidata de Hitlero invadis Pollandon, Britio kaj Francio tuj deklaris militon kontraŭ Germanio, kaj tiel komenciĝis la Dua Mondmilito. Poste en majo 1940 Germanio komencis sian fulmorapidan militon per invado al Nederlando, kaj en junio okupis Parizon kaj kapitulacigis Francion, kaj tuj poste ĝi komencis aeratakon al Britio.

Japanaj militgvidantoj volis profiti de la venko de Germanio por akiri naturajn



riĉfontojn kiel petrolo, stano, gumo ktp., okupante senmastrajn koloniojn en la sudorienta Azio. Krome, barante la Vojon por Helpi Ĉjang Kajŝek, ili volis kapitulacigi Ĉinion, kaj tiamaniere solvi la problemon de la longdaŭra malfacila milito kontraŭ Ĉinio.

En septembro 1940 la japana armeo invadis la nordan parton de Franca Hindoĉinio (tiam franca kolonio, nuna norda parto de Vjetnamio), kaj preskaŭ samtempe Japanio sin aliancis kun Germanio kaj Italio por fortigi sian rilaton kun Germanio. Kiam Germanio invadis Sovetunion en junio 1941, la japana armeo invadis la sudan parton de Franca Hindoĉinio, kaj komencis konstrui ĉirkaŭ Sajgono (la nuna urbo Ho-Chi-Minh) aerarmean kaj mararmean militbazojn kaj terarmean bazon por transporto.



Frumatene la 8an de decembro 1941, aerfloto de la japana mararmeo aŭdaciis surprizan atakon al la militbazo de la usona Pacifika Floto en Perlo-Haveno, Havajo. La foto montras la militŝipon Arizona kliniĝantan en flamoj.

Invado en la Malajan Duoninsulon kaj atako al Perlo-Haveno

Kiam Japanio komencis invadi la sudorientan Azion, Usono ĉesis eksporti ŝtalon kaj rubferon kaj poste petrolon al Japanio. Britio kaj Nederlando kunagis kun Usono kaj fortigis la ekonomian sankcion kontraŭ Japanio. Japanaj militgvidantoj konsideris tion tre kriza, kaj komencis propagandi al la popolo, ke por kontraŭbatali la ABCD-sieĝon (America, Britain, China, Dutch / Usono, Britio, Ĉinio, Nederlando) ne ekzistas alia elekto krom milito kontraŭ tiuj landoj.

Frumatene de la 8a de decembro 1941, la japana terarmeo aŭdaciis surprizan atakon al la brita armeo, komencinte operacion surlandiĝi sur la Malajan Duoninsulon, tiaman britan kolonion. Sekvante aerfloto de la japana mararmeo faris surprizan atakon al la usona Pacifika Floto en Perlo-Haveno en Havajo, kaj poste Japanio deklaris militon kontraŭ Usono kaj Britio. Tio estis la komenco de la Azia-Pacifika Milito.

Implikiĝo en la Duan Mondmiliton

Ĉar Germanio kaj Italio, sekvante Japanion, deklaris militon kontraŭ Usono, la militoj en diversaj lokoj implikiĝis en la Duan Mondmiliton.

Japanio jam antaŭlonge planis kaj preparis militon, sukcesis forpeli el Azio armeojn de Usono kaj Britio, kiuj ĉefe okupiĝis pri militoj en Eŭropo kaj ne bone preparis sin en Azio. En duonjaro Japanio okupis kaj militregis grandajn partojn de la sudorienta Azio kaj suda Pacifiko, nome britajn Malajan Duoninsulon, Hongkongon, Singapuron kaj Birmon, nederlandan orientan Hindion (la nunan Indonezion), la usonajn Filipinojn k.a.

3. Iluzio de "Kunprospera Sfero de la Granda Orientazio"

La japana registaro, kiu komencis la Azia-Pacifikan Militon, decidis nomi ĝin "la Granda Orientazia Milito". Kio estis la celo de la milito?

Konstruo de la nova Granda Orientazia Ordo

La ĉifoja milito kontraŭ Usono kaj Britio, inkluzive de la Ĉina-Japana Milito, estis nomata "La Granda Orientazia Milito". Tiu ĉi nomo signifas, ke la milito celas starigi "novan grandan orientazian ordon", sed ne signifas, ke la milita areo estas nur en Azio. (skize)

"Konstruo de nova granda orientazia ordo" estis anoncita kaj propagandita de la japana registaro fare de la ĉefministro Konoë Humimaro en julio 1940. Ĝi celis realigi "Kunprosperan Sferon de la Granda Orientazio", kie ĉiuj aziaj popoloj kunprosperos sub la "granda animo de la tuta mondo en unu familio" (spirito unuecigi la tutan mondon en unu familion sub la japana imperiestro), kunlabore kun Germanio kaj Italio, disfaliginte la regadojn de Usono kaj Eŭropo en Azio kaj liberiginte koloniitan Azion.

Ĉie, kie Japanio okupis, ĝi konstruis ŝintoismajn sanktejojn kaj al la loĝantoj ĝi trudis ŝintoismon kaj adoron al la Tennen kiel vivanta dio. En lernejoj ĝi trudis la japanan lingvon kiel la komunan lingvon de Orientazio.

Kunvoko de la Granda Orientazia Konferenco

En novembro 1943, la japana ĉefministro Tojo Hideki kunvokis Grandan Orientazian Konferencon, kolektante registarajn reprezentantojn en "Kunprospera Sfero de la Granda Orientazio" al Tokio por manifesti al la mondo, ke la nova ordo jam estas starigita en Azio. Ili estis reprezentantoj de pupaj registaroj starigitaj en landoj kaj regionoj okupitaj de Japanio, kiel Manĉurio, la Ĉina Nankina Registaro de Wang Jingwei, Tajlando, Birmo, Filipinoj kaj la provizora registaro de Libera Hinda Unio. La konferenco aprobis kaj publikigis "Grandorientan Kunprosperan Deklaracion" jenan:

Usono kaj Britio, por sialanda prospero, subpremias aliajn popolojn, kaj invadis, ekspluatis kaj sklavigis la Grandan Azion kaj provis renversi ĝian stabilecon. Tio estas la kaŭzo de la Granda Orientazia Milito. Ĉiuj landoj en la Granda Orientazio kunlabore venku en la milito, liberigu Azion de la kateno de Usono kaj Britio kaj konstruu kunprosperan sferon, kie oni ĝuu kunekziston, kunprosperon kaj sendependecon sen rasa diskriminacio, kaj ni esperas, ke tio kondukos al la monda paco. (skize)

Realo de "Kunprospera Sfero de la Granda Orientazio"

Sed la vera celo de "la granda orientazia milito" estis jene skribita en "La maniero administri la okupitajn teritoriojn en la suda Azio", decidita la 20an de novembro 1941: "La okupataj teritorioj estu dumtempe regataj militiste por restabligi la socian ordon, materialoj gravaj por la defendo de Japanio estu senprokraste akiritaj, kaj la garnizonaj trupoj sendepende sin vivtenu." En "La Maniero" estis skribite, ke la materialoj gravaj por la defendo de Japanio estas petrolo, stano, volframo, gumo ktp. "Memstaro" signifis, ke la armeo akiru tiajn necesaĵojn kiel nutraĵon por sin vivteni kaj aktivigi en la okupata loko.


En la konferenco kun ĉeesto de Tennoo en majo 1943, okazigo de la Granda Orientazia Konferenco estis decidita. Estis decidite ankaŭ, ke "Malajzio, Sumatro, Javo kaj Borneo estu teritorioj de la Imperio, kaj por ke ili estu ekspluatataj kiel provizejoj de gravaj materialoj, tie oni strebu gajni la koron de la popolo".

Anstataŭ Usono kaj eŭropaj landoj, Japanio koloniis aziajn landojn. Tamen, kiel oni jam bone komprenis, la japana okupado de aziaj landoj celis nur nome "konstrui la Kunprosperan Sferon de la Granda Orientazio", sed reale akiri materialojn kaj laborfortojn por plenumi sian militon. En la okupataj teritorioj en la sudorienta Azio multe da loĝantoj estis perforte mobilizitaj por konstruado de trajnlinioj, militvojoj kaj aerodromoj kaj por minlaboro. En Singapuro kaj Malajzio multaj ĉindevenaj loĝantoj estis murditaj pro la suspekto de kontraŭjapana ago. Sub tia situacio baldaŭ aperis kontraŭjapanaj organizitaj movadoj diversloke.

Partoprenantoj de la Granda Orientazia Konferenco.

De maldekstre:

Ĉefministro Ba Maw (Birmo), Ŝtata ĉefministro Zhang Jinghui (Manĉurio), Administrejestro Wang Jingwei (Nankina Kuomintang-reĝimo), Ĉefministro Tojo Hideki (Japanio), Anstataŭa Ĉefministro Wan Waihayakon (Tajlando), Prezidento Raurel (Filipinoj), Ĉefrepresentanto Chandra Bose (provizora Libera Hinda Unio)



4. Tutforta Militsistemo

Post la Unua Mondmilito, militoj ŝanĝiĝis, ne nur la armeoj, sed ankaŭ la ŝtatoj mem devis plenumi militon per sia tuta forto. Kiel en Japanio tia sistemo por totala milito estas establita?

De teroro al milita diktatoreco


Post la Evento de la 18a de Septembro ("Manĉuria Incidento") ŝtormis en Japanio teroro fare de junaj oficiroj de la ter- kaj mararmeo. La 15an de majo 1932 oficiroj de la mararmeo mortigis la ĉefministron en la oficiala loĝejo (la Incidento de la 15a de Majo). Tion sekvis komplotoj fare de kadraj oficiroj de la terarmeo, kaj finfine la 26an de februaro 1936 junaj oficiroj de la terarmeo intencis puĉon, mobilizante ĉirkaŭ 1,500 soldatojn. Ribelantoj okupis la oficialan loĝejon de la ĉefministro, la ministrejon de la terarmeo kaj ĉefpolicejon, kaj mortigis tri gravulojn inkluzive la ministron pri financo (La Incidento de la 26a de Februaro).

Tiutempe ene de la terarmeo daŭris severa batalo inter du grupoj por akiri hegemonion, nome inter "Koodooha" (radikala tennoisma grupo), kiu celis starigi militistan diktatoran

registaron per puĉo kaj restaŭri la tennoan regadon kaj "Tooseiha" (reguliga grupo), kiu celis starigi totalan militadsistemon per la gvido de la armeo, implikante politikajn partiojn. Tiu ribelo fare de la Koodooha-grupo estis subpremita de la Tooseiha-grupo en tri tagoj. Poste ĉi lasta grupo ekhavis pli fortan influon al la politiko per la minaco de armita forto, kaj en la sekva jaro ĝi sukcesis trioblighi la militan buĝeton. Kaj fine Japanio komencis implikiĝi en la totalan militon kontraŭ Ĉinio, okaze de la Lugouqiao-Incidento en julio 1937.

"Totala mobilizo de la popola animo" kaj la Leĝo de Ĝenerala Mobilizo

En septembro 1937, tuj post la komenco de la totala milito kontraŭ Ĉinio, la registaro komencis "Movadon por totala mobilizo de la popola animo", kun la sloganoj "La tuta nacio estu unuanima" kaj "Lojalon al la imperiestro kaj servon por la patrujo". En ĉiu gubernio



estis organizitaj komitatoj por tio, kaj tuj sekve en ĉiu urbo kaj vilaĝo, urbaj aŭ vilaĝaj komitatetoj, kaj fine en ĉiu distrikto estis organizitaj najbargrupoj tra kiuj la registaro trudis al la loĝantoj monŝparon, mondonacojn, laborservon ktp.

La sekvantan jaron, en aprilo 1938, "La Nacia Leĝo por Ĝenerala Mobilizo" estis proklamita. La leĝo ebligis reguligi kaj utiligi materialojn necesajn por plenumi la militon nur per la ordono de la Tennoo sen aprobo de la parlamento. Laŭ tiu leĝo la registaro povis mobilizi ankaŭ "homprovizon same kiel materialojn", laŭbezone. Kaj por certigi la provizon de tiu "homforto", la ministro de bonfarto fondita en la sama jaro enkondukis ekzamenon pri la sanstato de la popolo kiel sian gravan taskon en la milita sistemo.

Sistemo mobilizi la tutan popolon en militon

Ravite de la "fulmorapida venko" de la naziista Germanio en 1940, aperis en Japanio movo krei tian socion kun "unu partio en unu ŝtato", kiel en Germanio, kaj ĉiuj politikaj partioj estis malfonditaj sinsekve, ĝis la fino en oktobro, kaj fondiĝis la unusola politika partio "Asocio Subtena al la Granda Reĝimo". Tio signifis morton de la parlamentismo bazita sur plurpartiismo.

En la sama jaro, la registaro malfondis laboristajn sindikatojn kaj anstataŭe fondis "Tutjapanan Industrian Asocion por Servi la Patrion". Striko estis tute malpermesita.

Jam tiam vivnecesaĵoj, kiel nutraĵoj, vestaĵoj, hejtaĵoj ktp, estis ne libere aĉeteblaj sed porciumitaj pere de la urbaj aŭ vilaĝaj komitatoj kaj najbargrupoj. Pro tio la popolo ne povis eliri el la sistemo por sendepende sin vivteni. La sistemo efikis ankaŭ por reciproka gardobservado de la loĝantoj.

Ĉiuj amasinformiloj — gazetoj, ĵurnaloj, filmoj, radioelsendoj, romanoj — estis sub la cenzuro, kaj nur al tiuj, kiuj laŭdis kaj aprobis la militon, estis permesitaj eldoniĝi, publikiĝi aŭ dissendiĝi. La registaro adoris pliiĝantajn militfalintojn kiel "heroajn spiritojn" kaj sendis pli da novaj junuloj kiel soldatojn al la batalkampoj, honorante ilin per la esprimo, ke morti por la Tennoo estas gloro.

Tiel, sub la armea regado kun la Tennoo ĉe la pinto, ĉio — politiko, ekonomio, militaj aferoj, kulturo, komunikado, edukado, vivo — estis reguligita kaj mobilizita por la milito. Ĉi tiel la japana faŝisma reĝimo firme establiĝis.



Granda afiŝo kun slogano "Ekstermu malamikojn" sur la muro de la ronda konstruaĵo de Nichigeki, Yurakucho, Tokio. Okaze de la 38a terarmea memortago, la terarmeo komencis grandan movadon aperigi tiun sloganon sur la fronta paĝo de ĉiuj gazetoj.

Peco de Historio


Gvido de la milito fare de la Showa-Tennoo

Ĝis la Dua Mondmilito Tennoo estis rigardata en Japanio kiel dio, kiu aperis en la figuro de homo. La Konstitucio de la Granda Japania Imperio preskribis, ke la Tennoo regas kiel suvereno ĉion en la regno. La Tennoo havis la rajton de la supera komando al la armeo, kaj ankaŭ la rajton decidi komenci kaj fini militon. La japana armeo estis nomata "la imperiestra armeo", kio signifas "la armeo de la Tennoo".

Aliflanke estis preskribite, ke la Tennoo estas sankta kaj neniuj rajtas profani ties sanktecon (la artikolo 9 de la Konstitucio), kaj pro tio estis neeble ŝargi la Tennoon per respondeco pri politikaj kaj militaj aferoj. Anstataŭe ĉiuj ministroj sur sin prenis kiel asistantoj la respondecon pri politiko, kaj ĉiuj superaj komandantoj (la ĉefstabo por la terarmeo kaj la ĝenerala komandantaro por la mararmeo) sur sin prenis la respondecon pri militaj aferoj.

Kiam la Ĉina-Japana Milito komenciĝis en 1937, "Daihon'ei" estis instalita en la imperiestra palaco por gvidi la plivastiĝantan militon. Daihon'ei signifas la ĝeneralan stabon de la Tennoo, kiu estis la generalisimo, la plej supera komandanto de la terarmeo kaj la mararmeo. Kaj do Daihon'ei fariĝis la plej supera komandorgano por direkti la militon. Daihon'ei estis konferenco konsistanta nur el aŭtoritatoj de militaj aferoj, t.e. la ĉefstabestro de la terarmeo kaj la ĝenerala ĉefstabestro de la mararmeo kiel staboficirestroj, kaj la ministro de terarmeo-aferoj kaj la ministro de mararmeo.

La konferenco kun ĉeesto de la Tennoo, en kiu ĉeestis ĉefoj de la terarmeo kaj la mararmeo, estis nomata "Daihon'ei Gozenkaigi" (la Supera Konferenco de Daihon'ei kun Ĉeesto de la Tennoo). Kiel oni vidas en la foto, en la mezo malantaŭe sidas la Tennoo, kaj ĉe la tablo, dekstre kaj maldekstre, sidas la ĉefoj de la terarmeo kaj la mararmeo. En



"La Supera Konferenco kun Ĉeesto de la Tennoo", la 27an de aprilo 1943

la konferenco ili ekzamenis kaj decidis gravajn strategiojn kaj operacojn de la milito. En ĝi superaj komandantoj de la terarmeo kaj la mararmeo prezentis raportojn kaj opiniojn al la Tennenoo, kaj li demandis pri tio kaj donis konsilon. Tiele la Tennenoo estis profunde implikita en la gvidadon de la milito kaj direktadon de operacoj.


Krom tio la Showa-Tennenoo ludis pozitivan rolon en la ekzaltado de la moralo de la popolo kaj en la altigo de la imperia prestiĝo, donante Tennoan mesaĝon kaj laŭdvortojn al venkoj en bataloj kaj sukcesoj de militaj agoj.

La milito en propagandaj folioj

En batalkampoj oni faris diversajn propagandajn flugfoliojn kaj disŝutis ilin en malamikajn poziciojn por perdigi al la malamikoj la volon por batali kaj alvoki ilin ne batali sed kapitulaci. Ni pripensu, kion la flugfolioj celis, kaj kian efikon ili havis.

① Flugfolio de la japana armeo al ĉinoj


Kiun vojon vi elektos? Vidu! Se vi elektos la vojon al banditoj kaj daŭre rezistos, vi estos tiel mizeregaj! Vidu! Se vi elektos la vojon al bona popolo, vi atingos surteran paradizon kun feliĉo!



Flugfolio de la japana armeo al ĉinoj

② Flugfolio de la japana armeo al usonaj soldatoj

Malantaŭ vi, jen tiuj virinprodigistoj, tiuj konskripcievituloj! Jes! la malbonuloj estas riĉaj, belaj kaj potencaj. Eble nun via amatino estas en liaj manoj. Li okulumas kaj diras: "Ni en la postfronto dankas tiel."



That slick fellow. That slacker. Of course, the villain is rich and handsome. Well-groomed and full of influence, he might be having your girl right now. He winks and says, "Yes. We thank you for all this and heaven knows for more."

Flugfolio de la japana armeo al usonaj soldatoj

③ Flugfolio de Ĉinio al japanaj soldatoj (sen desegnaĵoj)

Vi ĉiuj en la fronto! Ne malŝparu vian vivon! Rememoru vian mizeran vivon kaj viajn familianojn! Kiu enfaligis vin en profundon de mizerego? Malfermu la okulojn, karaj japanaj soldatoj! Ĉiuj fratoj de Japanio kaj Ĉinio! Ni kunlaboru por faligi la agresantojn kaj la subpremantojn kaj kune marŝu amike cele al vera justa liberigo!

④ Flugfolio de la usona armeo al japanaj soldatoj (sen desegnaĵoj)

Senutila morto! Kio estas signifoplena vivo? Kio estas honora morto?

Honora morto certe estas morti per kuraĝa konduto por la patrolando. Senutila morto ne estas honora morto. Kio estas honora vivo? Honora vivo estas vivi kaj klopodi plej bone por la patrolando. Honora vivo estas pli malfacila kaj kuraĝplena ol honora morto.

La Kruele Agado al la Ĉina Popolo Fare de Japania Armeo

1. Popolanoj kaj Rifuĝintoj en Batalkampoj

Kian vivdanĝeron alvizaĝis ordinariaj ĉinoj post kiam Japanio lanĉis la agresan militon? Kia damaĝo okazis al iliaj familiaj havaĵoj? Kaj en kia medio ili vivis?



Rifuĝantoj laŭlonge de la fervojo de Pekino al Ŝanhajo

Rifuĝi diversflanken

Post la Evento de la 18-a de Septembro, milionoj da kamparanoj kaj urbanoj de la Nordorienta Ĉinio devis migri suden por eviti la militan fajron kaj ne fariĝi regatoj de la aŭtoritatoj de la japana armeo. Sekve de ekspansio de la agresa milito de Japanio al Ĉinio, ĉie sur la teritorio de Ĉinio torentis fuĝantoj. Granda nombro da ĉinoj fariĝis rifuĝintoj. Pro manko de trafikiloj, plejparto de la fuĝantoj povis nur piediri kaj sennombraj el ili perdis la vivon pro malsato, frosto, malsano kaj bombardo de japanaj aviadiloj.

Perforta rekvizicio de japanaj trupoj

La japana armeo neglektis provizadon de militaj necesajoj, kion sekvis serioza manko de nutraĵo, brulaĵo kaj aliaj materialoj. Tial la japanaj trupoj aplikis la politikon rekvizicii grenon kaj aliajn militajn necesojn sur batalkampoj. Ili senbride sin trudis en privatajn domojn, forrabis objektojn, bruligis konstruaĵojn kaj sovaĝe perfortis virinojn. Tiuj, kiuj iom malobeis ilin, estis mortigitaj.

Perforta laborigo

En la komenca periodo de la plenamplaksa invado de Japanio al Ĉinio serioze mankis laborfortoj al Japanio. Tion solvis la japanaj registaro, armeo kaj entreprenoj per forprenado de laboruloj el Ĉinio. Ili forprenis, per trompado, rekvizicio aŭ kaptado per armiloj, grandnombrajn laborulojn en Ĉinio, iuj el kiuj estis eskortitaj al Japanio kaj aliaj pli multaj al la Nordoriento de Ĉinio. Post la eksplodo de la Azia-Pacifika Milito, Japanio plenumis la sistemon “deviga laboro” en la okupitaj regionoj de Ĉinio, akcelante

eksploatadon de riĉfontoj en diversaj lokoj kaj konstruadon de militaj instalaĵoj per ĉinaj laboruloj. La milita situacio pli kaj pli serioziĝis, kaj granda nombro da japanaj junuloj kaj plenkreskuloj estis senditaj al la militfrontoj, kaj pro tio pli kaj pli serioziĝis la manko de laborfortoj al Japanio. De 1943, Japanio transportis laborulojn rekviziiciitajn en Ĉinio al Japanio, Koreio kaj eĉ la sudorienta Azio.

La ĉinaj laboruloj en diversaj lokoj estis foje kruele traktataj kaj brutale persekutataj. La laboruloj eskortitaj al la Nordorienta Ĉinio sin okupis ĉefe pri min-eksploatado kaj konstruado de defendaj fortikaĵoj sub bajonetoj de japanaj soldatoj. Pro ege malbonaj kondiĉoj, multaj laboruloj mortis. La lokoj, kie oni enterigis kadavrojn de ĉinaj laboruloj, estis nomitaj "fosoj de dek mil homoj". Ĉirkaŭ 40 mil ĉinaj laboruloj alportitaj al Japanio laboris en 135 laborejoj en 35 entreprenoj. Laŭ statistiko de la Ministerio de Eksteraj Aferoj de Japanio, intensaj laboroj kaj malbonaj vivkondiĉoj kaŭzis morton de almenaŭ 6,800 ĉinaj laboruloj en Japanio. Ekzemple, ĉirkaŭ mil ĉinaj militkaptitoj kaj civitanoj eskortitaj al Hanaoka en la gubernio Akita de Japanio devis labori por Kagoshima-grupo (hodiaŭa konstrua kompanio Kashima). Ne povante elteni la kruegan traktadon, tiuj ĉinaj laboruloj ribelis kaj kolektive forkuris nokte de la 30-a de junio 1945, sed sieĝite kaj subpremite de militpolicianoj de Japanio, 418 el ili perdis la vivon en la insurekcio. Tio estis la vaste konata "Hanaoka Evento".

Memornotoj de Ding Guohua, kamparano de la vilaĝo Bailu en la Zanhuang-gubernio de Hebei-provinco:

Foje, preterpasanta japana trupo tranoktis en mia vilaĝo... Ili okupis 2 ĉambrojn de mia hejmo, pelinte mian tutan familion en unu ĉambron. Ili kaptis dikan porkon bredatan de Ding Xilai, ĝin buĉis kaj formanĝis. En la sekvanta tago, kiam ili forlasis la vilaĝon, ili forprenis la azenon de mia familio kaj mian pliaĝan fraton kiel laborulon. Tre bone konante vojon al Shanxi, mia frato sekure forkuris kaj baldaŭ revenis hejmen. Sed mia kuzo Qi Yinchuan ne estis tiel feliĉa kaj li ne revenis hejmen ĝis nun.

El la "Memornotoj pri barbaraĵoj de japanaj trupoj" kompilitaj de Wang Zhijian



Ĉinaj laboruloj konstruas ŝoseon sub bajonetoj de japanaj soldatoj.

2. Masakro en Nankino

Post la okupado de Nankino de Ĉinio, decembre de 1937, la japana armeo faris buĉadon, incendion, seksperfortadon kaj prirabadon al senkulpaj soldatoj kaj civitanoj. Tio estas poste konata kiel la "Masakro en Nankino". Kiel tio okazis?



De Ŝanhajo al Nankino

Post la Evento de la Ponto Lugouqiao, la 13-an de aŭgusto 1937 japanaj trupoj atakis Ŝanhajon kaj faris sendistingan bombadon al Nankino de la 15-a de aŭgusto ĝis decembro por complete detruui la rezistmilitan volon de Ĉinio.

Sur la batalkampo en Ŝanhajo la japana armeo renkontis fortan rezistadon de la ĉina armeo kaj konkeris Ŝanhajon nur post 3-monata batalado. Poste, ili, laŭ tri vojoj, marŝis al Nankino en konkurso.

Intertempe, la japanaj trupoj faris buĉadon, incendion, seksperfortojn kaj rabadon survoje al Nankino, kaj plenumis la militan ordonon "rekvizicii surloke militprovianton".

Ĉe la Orienta Strato Sun Yatsen en Nankino japanaj trupoj arestis loĝantojn kaj ilin eskortis al antaŭurbo por masakrado.

Falo de Nankino

La unuan de decembro, la plej alta komandanto de Japanio ordonis al la japana armeo en la Meza Ĉinio, kun Matsui Ishine kiel ĉefkomandanto, inkluzive de trupoj en Ŝanhajo kaj la Dekaj Armeo de Japanio en Ĉinio: "La ĉefkomandoro de la armeo en la Meza Ĉinio kunagu kune kun la mararmeo kaj okupu Nankinon, la ĉefurbon de la malamika lando." Laŭ tiu ordono la japana armeo komencis marŝi al Nankino. Kvankam la registaro de la Ĉina Respubliko dispoziciis pli ol 100 mil soldatojn por defendi la urbon, tamen la japanaj trupoj baldaŭ okupis la sudan kaj orientan antaŭurbojn de Nankino kaj bombardis ĝiajn kvartalojn per aviadiloj kaj kanonoj. Fine, en la 13-a de decembro Nankino falis.

Ĉi tiu 18-jaraĝa knabino estis forprenita kaj tenita de japanaj soldatoj dum 38 tagoj kaj perfortita de ili 7-10 fojojn ĉiutage. Grave infektita de veneraj malsanoj, ŝi estis ellasita.



Starigo kaj forigo de la kvartalo por la rifuĝintoj en Nankino

Konsiderante la situacion, ke la japanaj trupoj atakas Nankinon, kaj por helpi la urbanojn, kiuj ne sukcesis forlasi la urbon, ke ili havu rifuĝejojn en plej danĝera momento, fremdlandaj reprezentantoj en la urbo decidis starigi en novembro 1937 internacian helpinstitucion, kun la nomo "Internacia Komisiono de Sekura Kvartalo (por rifuĝintoj) en Nankino". En la kvartalo estis 25 rifuĝejoj, kiuj

iam akceptis 250 mil homojn. Sed post la falo de Nankino, la japana armeo ordonis malorganizi la komisionon februarde de 1938 kaj elpelis la popolanojn el la rifuĝejoj.

Masakrado

Konkerinte Nankinon, la japanaj trupoj faris grandskalan “balaon” en kaj ekster la urbo por priserĉi ĉinajn soldatojn en civilaj vestoj, kiuj sin kaŝis en la urbo. Plejparto de la ĉinaj soldatoj, kiuj ne sukcesis retiriĝi, estis arestitaj. Dum la priserĉado la japanaj soldatoj faris, laŭ signo de ĉapela ringo sur la kapo, kaloj sur la ŝultroj kaj manoj, juĝon kaj certigon, ĉu oni estis soldatoj. Multe da ordinaraĵoj estis forkaptitaj, kaj eĉ rifuĝintoj en la sekura kvartalo ne povis eviti la malfeliĉon.

La japanaj soldatoj pelis la arestitojn al la bordo de Yangzi-rivero kaj antaŭurbo de Nankino por ilin masakri. Krome, ili senbride mortigis homojn ĉie en Nankino, sur grandaj kaj malgrandaj stratoj, en loĝdomoj, temploj kaj vilaĝoj. Laŭ la enketo farita de la Nankina Milita Tribunalo por Juĝi Japanajn Militkrimulojn en 1946, oni konstatis, ke la japanaj trupoj kolektive masakris 190 mil homojn kaj neniigis iliajn kadavrojn, kaj filantropiaj institucioj en Nankino enterigis pli ol 150 mil kadavrojn de ĉinoj mortigitaj de japanaj soldatoj.

La verdikto farita de la tribunalo en Tokio notis: “Dum la unuaj 6 semajnoj, post kiam la japanaj trupoj konkeris Nankinon, pli ol 200 mil civitanoj en kaj ekster la urbo kaj ĉinaj militkaptitoj estis masakritaj.”

Rabado kaj perfortado

Konkerinte Nankinon, la japanaj soldatoj faris rabadon kaj incendion. Tion plej multe suferis komercaj kvartaloj plej prosperaj kaj loĝkvartaloj plej dense loĝataj en la suda parto de Nankino kaj preskaŭ ĉiuj tieaj ĉefaj stratoj estis ruinigitaj. Samtempe, la japanaj soldatoj kolektive kaj senbride perfortis virinojn, ne preterlasante eĉ virinojn en rifuĝejoj. John Rabe el Germanio skribis la 14-an de januaro 1938 al W. Meyer, prezidanto de la Ŝanhaja Konsilio: “Ĉirkaŭ 20 mil virinoj kaj knabinoj estis seksperfortitaj.”

La japanaj registaro kaj armeo blokis raportojn pri tio al la japana popolo. Sed la masakro farita de la japanaj trupoj en Nankino estis riproĉita de la publika opinio de la tuta mondo.

Tagnoto de Makihara Nobuo, soldato de la 20-a Regimento de la 16-a Divizio:

La 28-a de novembro

Post kiam ni bruligis domojn de 12-13 familioj, la tuta vilaĝo iĝis maro de fajro. Tie estis 2-3 maljunuloj kompatindaj, sed tio estis ordono, mi povis nenion fari kontraŭ ĝi. Post tio, ni forbruligis aliajn 2-3 vilaĝojn kaj pafmortigis 5-6 vilaĝanojn. Ni estis en tre bona humoro kaj granda entuziasmo.

— El “Kolekto de materialoj pri rilatoj inter la Evento de Nankino kaj kiota korpuso”, kompilita de Iguchi Kazuki, Kisaka Junichiro kaj Shimozato Masaki, p. 135, eldonita en 1989 de la librejo Aoki Shoten

Tagnoto de Nakajima Kesago, komandanto de la 16-a Divizio:

La 13-an de decembro


Laŭ la principo, ĝenerale ni mortigis ĉiujn arestitojn. Poste, mi informiĝis, ke la trupo de Sasaki sola mortigis 15 mil homojn kaj la estro de iu trupo gardanta la Pacan Pordegon buĉis ĉirkaŭ 1,300 homojn. Kaj ĉirkaŭ 7-8 mil militkaptitoj estis kolektitaj ĉe la Grua Pordego...

— El la “Kolekto de Historiaj Materialoj pri la Milito en Nankino” kompilita de la Redakta Komitato pri la Historio de la Japana Milito en Nankino, p. 326, eldonita en 1989 de Kaikosha, Tokio.

3. Sendistinga Bombado, Tri-neniiga Operaco kaj Starigo de Senhoma Zono

Kiujn novajn militmanierojn prenis la japanaj trupoj, post kiam la agresa milito de Japanio al Ĉinio fariĝis longdaŭra?

Sendistinga bombado



La viktimoj de la tragedio en la 5-a de junio, en tunelo. Multaj rifuĝintoj sufokite mortis.

Por ŝanceli la rezistmilitan volon de la ĉina registaro kaj devigi ĝin kapitulaci, de 1938 ĝis 1943 la japana armeo sendis multe da aviadiloj por strategia bombado al Chongqing, la politika kaj milita centro de la Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio. Tio kaŭzis morton de multnombraj popolanoj. La 4-an de junio 1941 la japana armeo sendis 24 aviadilojn en tri grupoj por laŭvice bombadi Chongqing kaj la aeratako daŭris 5 horojn. Pro la tromulteco de la rifuĝintoj kaj ege malbona aerumado, 1,200 rifuĝintoj mortis de sufokado en la tunelo Shibati. Tiu tragedio ege afflktis la tutan mondon.

Krom malmulte da foraj regionoj, preskaŭ ĉiuj provincoj de Ĉinio estis bombitaj de japanaj aviadiloj. Tiuj sendistingaj bombadoj al celoj kaj militaj kaj civilaj alportis katastrofan mizeron al la vivo de la popolanoj kaj ĵetis ilin en longdaŭran teruron.

Tri-neniiga Operaco

La japanaj trupoj faris “balaan” batalon kontraŭ la regionoj okupitaj de la ĉina armeo, precipe kontraŭ la rezistmilitaj bazlokoj kreitaj de la armeo gvidata de la Ĉina Kompartio en nordĉiniaj regionoj. Por komplete detruai la vivkondiĉojn de la rezistantoj kaj popolanoj, la japanaj trupoj faris “operacon de tri neniigoj”, t.e. neniigi la konstruaĵojn per incendio, neniigi la loĝantojn per masakro kaj neniigi la havaĵojn de la loĝantoj per rabado. Tion la japanaj trupoj nomis “ruiniga operaco”.

La tragedio en la vilaĝo Beitong estas unu el la plej kruelaj kazoj de “tri-neniiga operaco” de la japanaj trupoj en la norda Ĉinio. Maje de 1942, pli ol 500 soldatoj de la 110-a Divizio de la Japana Armeo en la norda Ĉinio subite lanĉis forbalaan atakon al la Beitong-vilaĝo 50 km sudoriente de la gubernia urbo Dingxian meze de la Hebei-provinco. En la vilaĝo estis 220 familioj kun 1,227 homoj. Por sin ŝirmi kontraŭ japanaj

soldatoj, lokanoj fosis subterajn tunelojn tra la tuta vilaĝo. Dum la forbalaa atako, japanaj agresantoj blovis venengason en la tunelojn. De tio mortis pli ol 1,100 vilaĝanoj. Plejparto de virinoj, kiuj ne mortis de venengaso, estis perfortitaj de japanaj soldatoj. 36 domoj estis bruligitaj kaj la greno de la vilaĝo estis tute forrabita.

Starigo de senhoma zono

Por rompi la rilatojn inter la popolanoj kaj la kontraŭjapana armeo de Ĉinio, la japanaj trupoj establis “triban kunloĝejon”, aliforman koncentrejon, kie ili perforte loĝigis grandajn arojn da popolanoj, kaj per tio senhomigis multajn lokojn.

La japana armeo starigis pupan Manĉurion en la Nordorienta Ĉinio kun la Granda Muro kiel limo inter ĝi kaj la Norda Ĉinio. De la aŭtuno de 1941 ĝis la sama sezono de 1942, la Okavoja Armeo gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio starigis zonojn de kontraŭjapana bazloko laŭlonge de la Granda Muro. Timante tiun aktivadon, la japana armeo kune kun la trupoj de la marioneta Manĉurio perforte translokis la lokanojn en tian “koncentrejon”, forbruligis la tieajn vilaĝojn, mortigis tiujn, kiuj ne volis transloĝiĝi, kaj starigis senhoman zonon laŭ longe de la Granda Muro kun totala longeco de pli ol 500 km. Pro tio multaj lokanoj perdis la hejmon kaj eĉ la vivon pro malsato kaj malsano.

La japana armeo rigore malpermesis al la lokanoj loĝi kaj terkulturi en la senhoma zono, praktikis en la “koncentrejo” la politikon pri gren-regado kaj konfiskis la privatajn grenprilaborilojn de la kamparanoj. La japana armeo ordonis, ke la tieaj kamparanoj fordonu siajn grenon kaj fruktojn al la granda tenejo kaj privata konservado kaj komercado pri tio estis rigore malpermesitaj, kaj la malobeantojn atendis severa punado. La popolanoj vivantaj en la “koncentrejo” komplete perdis la personan liberecon.

Ĉinaj armeanoj kaj popolanoj okupis la fuorton de japana trupo, ebenigis la fosojn por fiaskigi la konspiron de la japanaj agresantoj kontraŭ interligo de popolanoj kun kontraŭjapanaj rezistantoj.



4. Bakteria Milito, Gasmilito kaj Homkorpa Eksperimentado

Dum la Dua Mondmilito Japanio malobservis la internacian konvencion, senbride ekspluatita, produktis kaj uzis bakteriajn kaj kemiajn armilojn. Kian damaĝon tio alportis al la ĉina popolo?

Starigo de kemiaj kaj bakteriaj trupoj

Post la Unua Mondmilito, la japana terarmeo sekrete ekspluatita kemiajn armilojn kaj fondis specialan fabrikon por produkti gason. Post la eksplodo de la agresa milito kontraŭ Ĉinio, la japanaj kemiaj trupoj estis senditaj al Ĉinio. Estis kemia trupo de Japanio en la Nordorienta Ĉinio, kiu funkciis speciale por prepari kemian militon kontraŭ Sovetunio. Ĝi estis la 516-a Trupo en Qiqihar.


En 1932, Ishii Shiro (kuracisto kaj oficiro de la japana terarmeo) ekpreparis bakterian militon en la medicina lernejo de la japana terarmeo en Tokio. En 1936, laŭ la Sepa Ordono de la japana armeo oficiale fondiĝis en Pingfang de Harbin bakteria trupo, nome la Epidemio-Preventa kaj Akvo-provizita Trupo en la nordorienta Ĉinio. Ishii Shiro funkciis kiel ĝia estro. En 1941, la bakteria trupo ekportis la nomon 731-a Trupo de Manĉurio kaj starigis siajn filiojn sinsekve en Hailar, Hailin, Linkou, Suwu kaj aliaj lokoj.

*Rompado de la
kaldronejo de la 731-a
Trupo*

“Speciala transportado” kaj homkorpa eksperimentado

La ĝendarmoj de la japana armeo en la nordorienta Ĉinio sekrete eskortis al la Trupo 731 la de ili arestitajn kontraŭjapanajn personojn kaj spionojn de Sovetunio kiel materialojn por la bakteria eksperimento. Tiu procedo estis nomata “speciala transportado”. En 1999 kaj 2001, dokumentoj pri la “speciala transportado” estis malkovritaj en la arkivoj de la provincoj Heilongjiang kaj Jilin.

La Trupo 731 enkarcerigis la personojn speciale transportitajn en sekretaj malliberejoj, faris sur ili eksperimentojn pri pesto, tifo, paratifo, ĥolero, antrakso kaj aliaj dekoj da specoj de bakterioj, pri



frostovundoj, interŝanĝo de sangoj homa kaj ĉevala, pendado de homo kun la kapo malsupren, anatomiado sur vivaj homoj, kaj eĉ pri gaso kune kun kemiaj trupoj. Gravulo de la Trupo 731 konfesis, ke almenaŭ 3 mil homoj estis kruele mortigitaj tie.

Uzo de kemiaj kaj bakteriaj armiloj


Laŭ ordono de la ĝenerala stabestro, la japana armeo fondis la 27-an de julio 1937 kemiajn trupojn por sendi ilin al la batalejoj en Ĉinio, kaj post tio ĝi trejnigis soldatojn el diversaj trupoj pri kemia milito kaj uzis kemiajn armilojn sur batalejoj en Ĉinio. Laŭ statistiko, la japanaj trupoj pli ol 2,000-foje uzis kemiajn armilojn en Ĉinio, pli ol 90 mil ĉinaj soldatoj kaj civitanoj estis vunditaj kaj mortigitaj, inter kiuj 47 mil vunditoj kaj 6 mil mortigoj estis armeanoj de Kuomintango, 37 mil vunditoj kaj 1,500 mortigoj — soldatoj de la Okcidenta Armeo de la Ĉina Kompartio kaj 10 mil vunditoj kaj mortigoj — popoloj kaj militkaptitoj.

En 1939, la Trupo 731 unufoje uzis bakteriajn armilojn en la batalo ĉe la landlimo inter Ĉinio kaj Mongolio. Sekve de disvastiĝo de sia agresa milito kontraŭ Ĉinio, la japana armeo en la nordorienta Ĉinio kaj ĝiaj trupoj en la norda, meza kaj suda Ĉinio sinsekve fondis bakteriajn trupojn portantajn la nomon “Epidemio-Preventa kaj Akvo-Proviza Trupo”, grandskale uzis bakteriajn armilojn dum bataloj en Zhejiang, Hunan, Shandong kaj aliaj lokoj de Ĉinio, vundis kaj mortigis multajn ĉinajn popolojn. Sole en gubernio Changde de Hunan-provinco, la nombro de mortigoj registritaj estis 7,463.

Damaĝo de kemiaj armiloj forlasitaj

La Ĝeneva Protokolo aprobita en 1925 malpermesas uzon de kemiaj kaj bakteriaj armiloj. Tial, antaŭ ol retiriĝi pro malvenko, la Trupo 731 masakris ĉiujn militkaptitojn, detruis konstruaĵojn por tia krimago kaj kunportis al Japanio gravajn materialojn. La ratoj kaj aliaj bestoj kun bakterioj diskuris, pro kio pesto furiozis en antaŭurbo de Harbin. La epidemio estis bridita nur en la 50-aj jaroj de la 20-a jarcento.

Krome, la japana armeo postlasis en Ĉinio grandan kvanton da kemiaj armiloj. Eĉ en la lastaj jaroj, kemiaj armiloj enterigitaj sisteme de la japanaj trupoj en Ĉinio ankoraŭ estis malkovritaj de tempo al tempo kaj kaŭzis senĉese damaĝojn. Laŭ postuloj de la konvencio pri defendo kontraŭ kemiaj armiloj, Ĉinio kaj Japanio kune subskribis en 1999 memorandon pri traktado de kemiaj armiloj postlasitaj de la japana armeo kaj komencis ilin detru.



Sidejo de la Trupo 731 en Pingfang, Harbin

5. Seksa Perfortado de Japanaj Soldatoj

Kian skandalan perfortadon faris la japanaj trupoj al ĉinaj virinoj dum sia agresa milito kontraŭ Ĉinio? Ilia bruta agado profunde damaĝis ne nur la korpon de tiuj virinoj, sed ankaŭ ilian spiriton.

Seksperfortaj agoj

La japanaj soldatoj plejparte kantonmentis en ĉina kamparo, kaj facile trovis ĉinajn virinojn kaj ofte ilin seksperfortis. Dume, la japanaj oficiroj ofte toleris tiun agadon por batalmoraligi la soldatojn kaj eksciti ilian batalspiriton. Malgraŭ tio, la japanaj soldatoj ofte mortigis la virinojn, kiujn ili seksperfortis, por eviti pridemandon de ĝendarmoj pro tia fiago. Ekzemple, post kiam la 18-a Divizio de la japana armeo invadis Wuhu de Anhui-provinco, en decembro 1937, la tieaj virinoj plejparte estis seksatencitaj, ĉu junaj ĉu maljunaj. La virinoj brutale perfortitaj estis serioze damaĝitaj, iuj eĉ ne povis plu naski infanon, kaj aliaj ricevis lezon de la menso.

Konsolejoj de la japanaj trupoj



*Zhu Qiaomei
(1910-2005), ĉina virino
forprenita de
la japana armeo kiel
konsolvirino.*

Ĉe la fino de 1931 la japana mararmeo decidis, ke 4 japaneskaj folklorejoj en Ŝanhajo servu kiel specialaj konsolejoj, kun la celo kontentigi seksbezonojn de japanaj soldatoj. Marte de 1932 la vicstabestro de la japanaj trupoj en Ŝanhajo Okamura Yasuji venis al

Ŝanhajo. Li decidis sekvi la ekzemplon de la japana mararmeo kaj disvastigi konsolejojn, por preventi venerajn malsanojn kaj eviti kritikojn pro grandskala seksperfortado. Do, la japanaj trupoj varbis unue en Japanio konsolvirinojn kaj funkciigis seksservejojn por japanaj soldatoj. Sekve de la disvastiĝo de la milito, rapide kreskis la nombro de infektitoj de veneraj malsanoj en la japanaj trupoj, kio serioze reduktis ilian batalkapablon. Pro tio la japanaj trupoj grandskale kaj rapide starigis ene sekssklavan sistemon. La konsolejoj por japanaj soldatoj funkciis unue en la Nordorienta Ĉinio kaj poste en diversaj aliaj lokoj de Ĉinio. Post okazo de grandskala perfortado de japanaj soldatoj al ĉinaj virinoj en Nankino decembre de 1937, la japana armeo decidis popularigi konsolejojn en la orienta Ĉinio. Kun la preteksto eviti disvastiĝon de veneraj malsanoj pro senbrida seksperfortado de japanaj trupoj al virinoj, la reganta klaso de Japanio esperis, ke japanaj soldatoj “laŭleĝe” kaj sekure frekventos la konsolejojn. Sed fakte, la perfortado de japanaj armeanoj al virinoj ne reduktiĝis, kvankam funkciis por ili konsolejoj.

La seksaj sklavinoj de la japanaj trupoj sur batalkampoj plejparte estis virinoj ĉinaj kaj koreaj. Kun helpo de ĉinaj nacioperfiduloj, la japanaj trupoj varbis konsolvirinojn aŭ trompe, aŭ perforte, kaj eskortis la arestitajn kontraŭjapanajn militistinojn en konsolejojn. Post la eksplodo de la Pacifika Milito, la japanaj registaro kaj armeo perforte varbis virinojn el Filipinoj, la Orientindia Insularo de nederlanda kolonio kaj aliaj regionoj de la Sudorienta Azio al konsolejoj de la japanaj trupoj. Ĉiuj virinoj, kiuj devigite servis kiel konsolvirinoj al japanaj armeanoj, estis katastrofe damaĝitaj kaj je la korpo kaj je la menso, iuj el ili havas eĉ hodiaŭ seriozan psikan malsanon. La sistemo pri konsolvirinoj estas militkrimo farita de la japanaj trupoj kaj registaro al virinoj de Ĉinio kaj aliaj aziaj landoj.

La japanaj trupoj respondecis pri instalado, administrado kaj superregado de la konsolejoj. La varbadon kaj transportadon de konsolvirinoj partoprenis la Ministerio de Enlandaj Aferoj de Japanio, Ministerio de Eksteraj Aferoj de Japanio kaj la Gubernatoraj Administrejoj de Koreio kaj Taiwan. Tial, la sistemo de konsolvirinoj estis kolektiva krimo de la japanaj registaro kaj armeo, kaj la konsolvirinoj sen ajna persona libereco, kiuj devigite faris seksservon al japanaj armeanoj, estis seksaj sklavinoj de la japana armeo.

“Mi rememoras mian perfortan agadon en vilaĝoj sur la marbordo de la Bohai Golfo, dum unu monato en 1943. Kiam ajn mi vidis virojn, mi batis aŭ mortigis. Al virinoj mi diris: “Obeu min, kaj mi savos vian vivon” kaj seksperfortis. Se ŝi rifuzis, mi diris: “Vi, aĉulino! Mi ofertis al vi la simpaton de samurajo, sed vi rifuzas!!” kaj batis aŭ mortigis ŝin per bajoneto.”

— El la noto de Tomishima Kenji, serĝento de 110-a bataliono, 54-a brigado, 59-a divizio de la japana armeo.

Peco de Historio

Feng Yiping: Atesto pri perforta laborado



Feng Yiping

Aŭguste de 1944, 14-jara mezlerneĵano Feng Yiping, kiu pasis preter la ponto de Sichuan-strato en Ŝanhajo, estis arestita pro tio, ke li ne riverencis al japana gardostaranto. Poste li estis sendita al la minejo Tsunoda de Kuriyamacho en Hokkaido kiel punlaborulo. Ĉiumatene, je la 5-a, li estis vekita de japana ĉefo per bastono kaj vipo. Li laboris de frumatenado ĝis la 22-a, kaj dum la tuta tago li prenis nur malmulte da rizaĵo kaj pecetojn de terpomo kaj rafano. En malpli ol unu jaro, 90 el 290 ĉinaj laboruloj mortis, kaj li postvivis hazarde ĝis la japana kapitulaco. En novembro 1945 li revenis al Ŝanhajo. Nur post tio, li informiĝis, ke lia patrino forpasis pro troa maltrankviliĝo pri li post lia subita malapero. En aŭgusto

1949 Feng Yiping ekstudis en la medicina fakultato de la Jiangsu-a Nacia Medicina Instituto, poste fariĝis profesoro pri urinologio de la Kantona Medicina Instituto, kaj nun li jam emeritiĝis. Hodiaŭ li ankoraŭ konservas la nomkajeron pri la ĉinaj laboruloj mortintaj en la karbominejo Tsunoda.

Atesto de eksa japana soldato

La 17an de novembro 2003, Kondo Hajime, japana eksa soldato 83-jara, staris en la kortumo de la Tokia Altjuĝejo kaj atestis la fakton de kruela barbaraĵo, kiun li mem faris al ĉinaj popolanoj dum la Ĉina-Japana Milito. La akuzantoj de tiu ĉi proceso estis ĉininoj, kiuj suferis pro seksperfortado fare de japanaj soldatoj dum la "tri-neniiga operaco" al bazpozicio de kontraŭjapana agado en la norda parto de la provinco Shanxi. Ili postulis, ke la japana registaro agnosku la fakton, petu pardonon kun sincereco, kaj faru necesan kompenson. Jen estas parto de la tiama atesto de Kondo Hajime:

Ni estis instruitaj, ke ĉinoj estas raso pli malalta ol homo, kaj pro tio ni pensis, ke mortigi ĉinon ne estas krimo pli ol mortigi porkon aŭ kokon, kaj eĉ estas fidela ago por Tennoo kaj mia patrolando. Ĉirkaŭ septembro 1941, ni iris al la norda parto de la provinco Shanxi por forbalai la bazpozicion de kontraŭjapana agado. Tuj kiam ni informiĝis, ke soldatoj de la Okavoja Armeo troviĝas en iu vilaĝo, ni direktis nin al la loko. Kaj tiam ili tuj fuĝis. Post kiam ili forfuĝis, ni eniris en la vilaĝon, kaj rabis monon, provizojn kaj vestaĵojn, kaj kelkope seksperfortis virinojn trovitajn sin kaŝantaj, kiujn poste ni kutimis mortigi.

En la printempo de 1943, ni iris en montaran regionon inter la provincoj Shanxi kaj Hebei

por forbalaa operaco. Ni detruis domojn de kelkaj vilaĝoj, tiel ke la kamparanoj ne povu loĝi tie, kaj tiel senhomigis vastan regionon. Uzante brikojn de la detruitaj domoj, ni laborigis ĉinajn virojn por konstrui dekkelkajn fuortetojn. Sed post la finkonstruo ni ĉiam mortigis la ĉinajn virojn.

Mi ne povas dormi trankvile, pensante pri la multaj homoj, kiujn mortigis la japanaj soldatoj inkluzive min, kaj pri la virinoj, kiujn ni post seksperfortado mortigis. Kvankam niaj pezegaj krimoj kaj doloroj de la suferintoj neniam malaperos, tamen, se Japanio, kiel ŝtato, estus preta pardonpeti kaj kompensi elkore kaj sincere, nia peza koro iom malpeziĝus.

Kondo diris: "Mi daŭre parolos pri la fakto de la milito ĝis mia morto." Li ankoraŭ daŭrigas la atestadon en diversaj lokoj tra la tuta lando.



Kondo Hajime atestas sian sperton kiel atencinto.

Koreio kiel Militbazo kaj la Damaĝo al la Popolo

1. Japaniga Politiko

La japaniga politiko estis iniciatita, por ke koreoj estu anoj de la japana imperio, nome, por fari kore-devenajn japanojn lojalajn al la japana Tennoo. La celo estis ja mobilizi koreojn por la invada milito. Ni eksciu pri la ideoj kaj konkretaj rimedoj por la "japaniga politiko".

Ĵuro de la Imperiestra Regato (por infano)

1. Ni estas regatoj de la granda japana imperio (Tennoo).
2. Ni unuanime lojale al la imperiestro.
3. Ni forte trejnas nin mem kaj fariĝos bonaj kaj fortaj regatoj de la imperiestro.

"Japanio kaj Koreio estas unuo"

"Unuigo de Japanio kaj Koreio estas la plej ĉefa celo de la duoninsula regado. Formo, menso, sango, korpo, ĉi ĉio devas esti sama." Tio estas diraĵo de Minami Jiro. Kial li diris tion? Japanio ekspansiigis sian invadon al Ĉinio kaj plene eniris en milittempan sistemon, sed malfacilis militi nur per japanoj. Tial necesis mobilizi koreojn al la milito. Bone estus kiel eble plej partoprenigi koreojn kun propra volo en la milito. Do estis emfazite, ke Japanio kaj Koreio estas unuo. En lernejoj oni emfazis tion ĝis oreldoloro, en vilaĝoj estis fiksitaj afiŝoj kun la surskribo, ke Japanio kaj Koreio estas unuo. La slogano troviĝis ĉie ajn.

*Riverenco al la Palaco:
La tuta familio en
vilaĝo haltigas sian
laboron ĉe la tagmezo
kaj, kolektiĝinte en la
korto, profunde klinas
la kapon al la direkto de
la japana imperiestro
en Tokio.*



Parkerigi la ĵuron de imperiestra regato

Ĉiutagmeze koreoj devis haltigi sian laboron kaj profunde riverenci en la direkto al Tokio, kie rezidis Tennoo, la japana imperiestro. Ĉiutage ĉiuj lernantoj kolektiĝis en la lerneja korto kaj riverencis al la orienta direkto, kie troviĝis la imperiestra palaco. Kaj ili devis parkere deklami la ĵuron de imperiestra regato. Koreoj, kiuj ne estis japanoj, devis ripeti, ke ili lojals kiel regato de la japana imperiestro. Eĉ en la geedziĝa ceremonio novgeedzoj kaj ĉiuj ĉeestantoj devis parkere deklami la ĵuron de imperiestra regato.

La plej urĝa tasko por atingi la celon de la unuiĝo de Koreio al Japanio estis instrui ĉiujn koreojn paroli japane. En lernejoj oni ne plu instruis la korean lingvon. Ekde 1942 disvastiĝis la movado por uzi la japanan lingvon en la ĉiutaga vivo. Lernantoj spionis unu la alian pri la uzo de la japana lingvo en kaj ekster la lernejo. Punita estis tiu lernanto, kiu estis kaptita pro la uzo de la korea lingvo. En la ŝtataj oficejoj oni devis nepre uzi la japanan lingvon dum la laborhoroj. Malobservanto devis pagi punmonon. Venis malfacila tempo al koreoj por vivi ne uzante la japanan lingvon.



Japanio kaj Koreio estas Unuo: propaganda afiŝo por stimuli la spiriton de unuiĝo de Koreio al Japanio. Vidiĝas la frazo: "Ni altigu la japanan spiriton!"

Ŝanĝi familian nomon en japanan formon

Plie, ekde 1940 Japanio devigis koreojn ŝanĝi sian nomon. Korea familia nomo antaŭ la persona nomo respondas al japana "si". Korea familia nomo esprimas sangan rilaton, dum japana "si" signifas "ies hejmo". Japanoj ŝanĝas sian "si" pro geedziĝo aŭ pro adoptiĝo, sed koreoj neniam ŝanĝas sian familian nomon.

Devige aldoni "si"-n al koreoj nomiĝis la kreo de "si". Ŝanĝi nomon en japanan formon nomiĝis "nomŝanĝo". Ĉi tiun sistemon enkondukis la japana gubernatoro Minami Jiro, ĉar li konsideris militkonskripcion en Koreio. Li plenumis tian politikon, kiu neglektis la korean kutimon por peli koreojn al la milito, rabante de ili nomojn kaj perforte farante ilin japanoj. La General-gubernatorejo de Chosun diversmaniere trudis al koreoj nomŝanĝon. "Si" estis devige aldonita al koreoj, kiuj eĉ ne petis ĝin. Lernejon ne povis viziti tiu lernanto, kiu ne ŝanĝis nomon. Eĉ ne eblis peti ŝtatan oficejon doni dokumentojn al tiu, kiu ne ŝanĝis la nomon.

Kompreneble estis homoj, kiuj ĝisfine rifuzis nomŝanĝon, kaj estis ankaŭ klano, kiu obstine malakceptis nomŝanĝon pro konscio pri prapatra kulto. Okazis, ke iu mortigis sin por apologio al siaj prapatroj, kiam lia tuta klano faris nomŝanĝon, subpremite de la General-gubernatorejo.

2. Milita Industrio en la Milittempo

Kiam ekspansiis la invada milito de Japanio, Koreio rolis kiel militbazo, kiu liveris materialojn kaj laborfortojn necesajn por la milito. Do progresis industrioj surbaze de milita industrio. Ĉu koreoj efektive ricevis utilon de tia industria disvolviĝo?

Progresis milita industrio

Japanio ek militbazigis Koreion post la “Manĉuria Milito”. Kaj ĝi klopodis pligrandigi la militan industrion, sub la milittempa sistemo post la Ĉina-Japana Milito. Minami, la General-gubernatoro de Chosun substrekiis, ke Chosun havas mision esti avancbazo por la japana invado al la kontinento, kaj strebis al la progresigo de milita industrio, por ke Koreio liveru sufiĉajn militajn materialojn.

Sub tiu celo la japana registaro fervore subtenis kompaniojn, por ke ili aktivu en la Korea Duoninsulo. La politiko estis aplikita en 1938 laŭ la leĝo pri la ŝtata ĝenerala mobilizado. La leĝo rajtigis la registaron mobilizi laŭvole homajn kaj materialajn rimedojn necesajn por la milito. Laŭ ĉi tiu leĝo la General-gubernatorejo difinis kotonon, feron, karbon kaj aliajn kiel militindustriajn materialojn kaj rekte mem prenis ilin de la produktintoj kaj malmultkoste liveris ilin al japanaj kompanioj enirintaj en Koreion. Ankaŭ per financaj instancoj la General-gubernatorejo pruntedonis monon kun malalta interezo. Danke al tio multaj japanaj kompanioj eniris en la Korean Duoninsulon kaj

*Hungnam Nitrogena
Sterko- Fabriko, 1927.*




formis la bazon de peza kaj kemia industrio. Tiaj japanaj kompanioj kiel Mitsui, Mitsubishi kaj Sumitomo eniris en Chosun kaj pligrandigis la militan industrion. El la militindustria politiko profitis ankaŭ koreaj kompanioj, kiel Gyeonseong-Teksado, Daeheung-Internacia Komerco, Chosun-Aviadiloj.

Strukturo fokusita je peza kaj kemia industrioj

Tiel progresis la industrio, ke jam en 1938 la industria produkto estis pli granda ol la agrikultura produkto. Okulfrappe progresis precipe metala, kemia kaj energetika industrioj. En 1939 malpeza industrio okupis 73% kaj peza kaj kemia industrioj 27%, sed en 1940 malpeza industrio malkreskis al 48% kaj peza kaj kemia industrioj okupis 52%. Peza kaj kemia industrioj koncentriĝis sur la nordan parton kun abundaj naturaj riĉaĵoj. Teksa industrio kaj maŝina industrio, kiuj povas doni grandan profiton per malmultekostaj materialoj kaj laborfortoj, progresis en la suda parto, precipe en Seulo. Tamen, kiel vidate en la tabelo, grandskalajn fabrikojn posedis japanoj, kaj iliaj produktoj estis plejparte militkoncernaj varoj eksportataj al Japanio.

Kapitala proporcio laŭ nacieco en la fino de 1944
(Kapitalo de pli ol miliono da enoj)



Disfalantaj komercistoj kaj industriistoj, suferanta popolo

Prosperis la milita industrio, sed la ĝeneralaj komercistoj kaj industriistoj bankrotis unu post la alia. Ĉar ĉiu banka mono koncentriĝis sur militan industrion, mezskalaj kaj malgrandskalaj komercistoj kaj industriistoj ne povis akiri la necesan monon krom privata prunto kun alta interezo. La popolo devis suferi en la vivo. Ĉiuj materialoj estis mobilizitaj por la milito, tial varoj, ĉu agrikulturaj, ĉu industriaj estis sub la kontrolo de la Gubernatorejo. Sekve terure mankis vivnecesaĵoj. Oni devis aĉeti necesajn en nigra merkato kaj la prezo daŭre saltis. Pro la industria disvolviĝo naskiĝis novaj urboj kaj vigliĝis havenoj, sed la porcion de la progreso ricevis ne koreoj, kiuj perdis sian patrujon, sed la okupantoj, Japanio kaj japanoj.

3. Mobilizado de Milita Materialo

Japanio kolektis en Koreio materialojn necesajn por la milito. Diversaj materialoj estis kolektitaj. Japanio forprenis preskaŭ ĉion produktitan en Koreio, oron, karbon, feron, rizon, hordeon, bovojn, porkojn, lignon, lignokarbon, fiŝojn, algojn. El tio plej multis precipe subteraj riĉaĵoj kaj nutraĵoj.

Trovi minejojn

La General-gubernatorejo de Chosun entreprenis trovi minejojn por liveri militajn materialojn. Por tio, en la nomo de subvencio aŭ premio, ĝi donis malavare monon por trovi minejojn al japanaj kompanioj en la korea duoninsulo. Oro estis mineralo plej interesa al Japanio, ĉar oro estis uzata kiel pagrimedo por internacia komerco. En 1944 japanaj ministoj okupis 90% de la tuta produktokvanto de oro en la Korea Duoninsulo. Japanoj forte interesiĝis ankaŭ pri stano, grafito, magnezito, fluorito kaj glimo. Ili estis nepre necesaj por fari armilojn, sed apenaŭ produktataj en Japanio.

Kiam komenciĝis la milito kontraŭ Usono, ne nur subteraj riĉaĵoj, sed ankaŭ ĉiuj bovloj faritaj el metaloj estis uzurpitaj. Japanio perforte forprenis agrikulturajn instrumentojn, manĝbovlojn, ceremoniajn bovlojn, preĝejajn sonorilojn kaj budhajn statuojn kaj faris el ili armilojn.

*Perforta oferliverado
de latuna manĝilaro,
ŝatata de koreoj*




Oferliverita nutraĵo, malsata popolo

La vivon de la koreoj plej serioze damaĝis la uzurpado de nutraĵoj. La General-gubernatorejo de Chosun tutforte penis akiri rizon necesan por la armeoj militantaj kaj do malmultekoste prenis rizon de terkulturistoj. Tio nomiĝis oferliverado. Ĉe la milita kulmino ĝi prenis ne nur rizon, sed ankaŭ aliajn grenojn kiel hordeo, eĉ terpomojn kaj batatojn. Ankaŭ kotono kaj kanabo, el kiuj oni faris vestojn por soldatoj, estis objektoj de uzurpado.

La vivo dum la milito estas peniga kaj malfacila por ĉiu homo. Tamen, kompare kun la japanoj, la koreoj havis pli suferigan vivon. Sub la kolonia regado koreoj estis multe pli malbone traktataj ol la japanoj dum porciolimigo. La registaro donis rizon al japanoj. Sed ĝi donis al koreoj miksitaĵn grenojn el Manĉurio kaj rizon el Vjetnamio. Ĝi donis tiajn nutraĵojn kiel fiŝoj kaj ovoj nur al japanoj. Krome la porcio tute ne sufiĉis. La korea po-persona konsumkvanto de rizo estis nur kvinono de la japana. Ĉe la milita kulmino oni ricevis tiel malgrandan porcion, ke oni ne povis elteni la malsaton. Ĉie okazis ŝtelo de nutraĵoj. En printempo montoj kaj kampoj plenis de malsataj homoj, kiuj kolektis herbojn aŭ arboŝelojn. Pasha A. Shabsina priskribis la siatempan situacion en sia libro "En la Kolonia Koreio (Chosun)".

Tagon post tago Seulo iĝis obskura kaj morna. Fermiĝis la plejparto de la vendejoj kaj riparejoj. Ĉirkaŭ la distribuejo estas vicoj de sennombraj homoj. Suferantaj homoj ne nur pro malsato, sed ankaŭ pro malvarmo. En 1944 kaj 1945 preskaŭ ĉiuj loĝejoj ne povis esti hejtataj. Same estis ankaŭ publikaj instalaĵoj. Sako da karbo kostis 40 ŝonojn kaj sufiĉis apenaŭ por unu tago. Aliaj urboj alfrontis la saman situacion.



Ordono de la liverado de kanabo, indikanta kion, kiom kaj ĝis kiam.

4. Mobilizado de Homforto

Mobilizitaj por la milito estis ne nur materialoj. Japanio forpelis koreojn al la batalo kiel soldatojn, laboristojn, seks-sklavinojn. La sufero kaj vivo de la koreoj estis des pli mizeraj, ĉar ili estis devigitaj riski sian vivon por la malamikoj, kiuj prirabis ilian patruon. Ni studu kia estis la mobilizado.

Uzitaj kiel ŝildoj en la batalekampo


Koreoj ne estis konskriptataj dum Japanio regadis Koreion kiel sian kolonion. Sed laŭ la longiĝo de la milito Japanio mobilizis koreajn junulojn al la militkampoj por anstataŭigi malmultiĝantajn japanajn soldatojn. Ekde 1938, Japanio mobilizis por “volontulaj soldatoj” koreajn junulojn kun 17 jaroj, finintajn lernadon de elementa lernejo.

Sed “la voluntula sistemo” agitata de la ŝtataj oficistoj kaj la policistoj fakte jam enhavis perforton. Laŭ la malfaciliĝo de la milita situacio en la jaro 1943 Japanio forkondukis koreajn studentojn en la nomo de studenta trupo al la batalo. Ekde la jaro 1944 rekrutsistemo, laŭ kiu ĉiu viro atinginta difinitan aĝon estis konskriptata, estis aplikata ankaŭ en Koreio.

Tiel ĝis la japana malvenko en la milito pli ol 200,000 koreaj junuloj estis devigitaj batali ne por sia patruo, sed por Japanio fordonante sian vivon. Iom da koreoj rekrutitaj al la japana armeo eskapis el la trupo kaj aliĝis al la sendependiga movado.

Tute mobilizi koreojn al la batalo

La Oficejo de General-gubernatoro disvastigis kampanjon por mobilizi koreojn al




milito, kaj plenumis “dummilitan tutmobilizon” en la tuta Korea Duoninsulo. De la oficejo de General-gubernatoro ĝis vilaĝoj ĉiuj estis ligitaj al la ordono. En ĉiu vilaĝo sub la vilaĝa ligo fondiĝis patriota sekcio el dek familioj kunligitaj. En la patriota sekcio estis metita subsekcio de kunlaborado kaj tie oni devis komune uzi agrikulturilojn kaj dombestojn, fari komunan infanvartejon kaj kunlabore kuiri rizon. Tio estis sufoka kontrolrigardo. La ordono mobilizis ne nur materialojn sed ankaŭ kontrolis kaj mobilizis homfortojn.

Kiel vidite en la bildo, koreoj estis mobilizitaj ĉefe por la laborado. La mobilizo de la laborforto en la komenco estis en la maniero de publika varbado, sed poste ŝanĝiĝis la maniero al la iniciato de ŝtataj instancoj. Ĉe la proksimiĝo de la milita fino rekvizicio estis enkondukita por laŭbezone mobilizi iam ajn.

La laboristoj forkondukitaj al Japanio estis dislokitaj al la danĝeraj laborejoj, nome: mino, aviadilejo, havena konstruado, tunela konstruado, municia fabriko ktp. Ilia vivo estis tre mizera. Ili ne povis sufiĉe manĝi, ne povis ricevi taŭgan pagon, kaj devis plenumi vivriskajn danĝerajn laborojn eltenante nacian diskriminacion, timante vivperdon. Kvankam multaj homoj perdis la vivon en tia sufero, neniuj kompenso estis donita pro la perditaj vivoj. Al tiuj koreaj laboristoj sufokitaj pro la doloroj korpa kaj mensa, la nura espero kaj celo estis senmorte reveni al la hejmlando. La doloro kaj aflikto de iliaj familianoj, kiuj en la hejmlando atendadis siajn nerevenantajn edzojn kaj patrojn sen informo dum kelkdek jaroj, tamen ankoraŭ ne estas kompensitaj.

La ĉiutaga laborado alterniĝis nur kiam la taskita laborkvanto plenumiĝis. Se ĝi ne plenumiĝis, la laboristoj devis labori pli ol dek horojn. La vestaĵoj ne estis liveritaj kaj la vestaĵo estis ĉiutage portata senŝanĝe. La laboristoj en la tunelo estis aspekte almozuloj. En la dormejo eĉ en la malvarma vintro donita estis nur la pordorma ligna planko kaj unu tapiŝtuko. Eĉ tie oni ne povis bone dormi pro multaj puloj. Pro la malsato oni prenis iajn ajn trovitajn manĝeblaĵojn, kiel forĵetitaj rafanaj pecoj en la manĝaj-forĵetejo, ĉar plej malfacile eltenebla estis malsato. Eskap-provinto kaptite estis batita preskaŭ ĝismorte. Tial oni ne povis eĉ intenci eskapi. Tiel dum du jaroj ripetiĝis la vivo de malsato, kiel sciuro en kaĝo.

— El “La kazo de Bak No-sik”, korea laboristo en la Onoura-minejo de la Minkompanio Kajjima.



Supre:
Virina amasa laboro:
Chosun General-
gubernatoro
proklamis mobilizadon
de virinoj por labori en
municiaj fabrikoj.

Malsupre:
Trejnejo de milit-
volontuloj


5. Koreaj Virinoj Forprenitaj kiel la Japanarmeaj Konsolvirinoj

Konsolvirinoj en japana armeo signifas la virinojn, kiuj estis forkondukitaj kaj travivis en "konsolejoj" en la japana armeo seks-perfortadon. Ni studu kian suferon koreaj virinoj travivis pro la militkrimo de seksa perforto de japana armeo.

Virinoj forkondukitaj en armeon kiel konsolvirinoj

Inter la konsolvirinoj troviĝis ankaŭ japaninoj, sed grandnombre mobilizitaj estis koreinoj. Koreaj konsolvirinoj estis forkondukitaj ĉien, kie rezidis japana armeo, nome

al Ĉinio, Filipinaj Insuloj, la Sudorienta Azio ktp. Japanio mobilizis lokajn virinojn el siaj kolonioj nome Ĉinio, Filipinaj Insuloj, Indonezio ktp. La nombro de la virinoj forkondukitaj kiel seks-sklavinoj en japana armeo estas divenata minimume 80,000-150,000. La koreinoj forkondukitaj al japanarmeaj konsolejoj estis plejparte en siaj dekaj jaraĝoj needziniĝintaj. Iom da virinoj estis jam edziniĝintaj. El ili ankaŭ multaj estis forkondukitaj al armea konsolejo trompite de varbistoj, kiuj diris, ke ili havos laborojn en fabrikoj kaj gajnos multan monon. En la proksimiĝo de la milita fino multiĝis la okazoj de forkondukiĝo per trompa konduko, homaĉeto kaj perforta konduko.



Infera vivo en armea konsolejo

Armea konsolejo ekzistis ne nur en Japanio sed ĉie kie japana armeo rezidis. La seks-sklavinoj en la komenco rezistis kontraŭ japanaj soldatoj aŭ cerbumis eskapi. Sed baldaŭ ili forlasis la esperon pro terura kontrolrigardado, kaj plendis nur sian sorton. Eĉ la nomoj estis kontraŭ-

vole ŝanĝitaj al japanaj nomoj, Hanako, Yoshiko ktp. Iuj estis eĉ indikitaj sennome sed nur per numeroj. La korea lingvo estis malpermesita. La koreinoj perdinte siajn nomojn kaj lingvon devis plorante pasigi la tempon.



Kazo de Bak Duri

Ni vidu la kazon de avino Bak Duri, kiu naskiĝis en Miryang Gyeonsangnam-do.

Ŝi, en la aĝo de 17, estis trompita de japana varbisto, kiu vizitis ŝian vilaĝon kaj diris, ke oni donos al ŝi laboron en japana fabriko, kaj estis forkondukita al Japanio, kaj tie komenciĝis ŝia vivo de seks-sklavino. En la konsulejo ŝi kunvivis kun pli ol 20 koreinoj dum ĉirkaŭ kvin jaroj. Tie ŝi estis nomita Fujiko kaj ĉiutage estis devigita akcepti ĉirkaŭ dek soldatojn. Ŝi estis devigita uzi la japanan lingvon kaj ofte estis malsata ne ricevante manĝaĵojn. Eĉ kiam ŝi havis menstruon, ŝi ne povis ripozi. En la konsulejo ŝi estis operaciita, ĉar ŝi havis specon de seksmalsano kio montris, ke la dekstra fermuro ŝvele dikiĝis. Aldone pro la terura batado de la mastro kaj la administranto de la konsulejo ŝi surdiĝis.

4 koreaj konsolvirinoj fotitaj de usona armea fotisto en septembro 1944, en la Yunnan provinco, Ĉinio. La gravida virino estas Bak Young-Sim, kiu atestis ĉe la internacia tribunalo pri la japanarmejaj konsolvirinoj, en 2000.

La suferado ne finiĝis

Kiam Japanio malvenkis en la milito, la seks-sklavinoj estis forlasitaj. Eĉ aperis kazo, ke ili estis masakre mortigitaj ĉe la forkuro de la japana armeo. Ankaŭ estis homoj, kiuj pasigis iom da tempo en la malliberejo de la alianca armeo, apenaŭ povis reveni al la hejmvilaĝo. Estis tre domaĝe, ke ne malmultaj homoj estis mortigitaj miskomprenite ke ili estas japaninoj. Pli multaj ne revenis al la hejmlando dum la tuta vivo pro la honto al la familianoj kaj hejmvilaĝaj najbaroj. La koreinoj kiuj estis forkondukitaj kiel seks-sklavinoj estis viktimoj de la terura vundo kiun postlasis la japana kolonia regado. Ili dum la vivo ĝis nun travivas en doloro suferante la teruran memoron kaj malsanon.

Peco de Historio

"Porjapaniulo" kaj naciperfidulo



La "Pac-Portego" de
Wang Jingwei

La milito finiĝis en 1945 kun la malvenko de Japanio. Dum la milito, tiuj, kiuj intime kunlaboris kun japanoj, portis la nomon "porjapaniulo" en Koreio kaj "naciperfidulo" en Ĉinio. Puni tiujn homojn estis sendube grava afero.

Post la sendependiĝo de Koreio, la plejparto de la koreoj esperis, ke oni punos tiujn, kiuj gloris la rekrutigon kaj rekviziciadon kiel patriotan agadon fidelan al Tennen, kaj intime kunlaboris kun japanoj dum la milito. Sed la armeaj kaj administraj aŭtoritatoj de Usono daŭre uzis oficistojn kaj policanojn de la General-gubernatorejo de Chosun kaj laŭeble evitis la problemon pri la porjapaniuloj. Post sia fondiĝo en 1948, la Korea Respubliko speciale ellaboris "Leĝojn por Puni Kontraŭnaciajn Agojn" kaj starigis Komisionon de Enketo pri

Kontraŭnaciaj Agoj, por solvi kiel eble plej baldaŭ la problemon pri porjapaniuloj laŭ la publika deziro de Koreio. Sed la afero ne povis glate iri pro malhelpo de porjapaniuloj en la tiama reĝimo de Rhee Seung-Man. Nur en 2004, 60 jarojn post la liberiĝo, oni povis subigi la forton malhelpantan kondamni la porjapaniulojn kaj ellaboris "Specialan Leĝon por Esploro pri la Vera Stato de Kontraŭnaciaj Agoj de Porjapaniuloj dum la Okupado de Japanio". Nun la esplorado estas en progreso.

Post la Evento de la 18-a de Septembro, Japanio starigis pupajn registarojn en la nordorienta, norda kaj orienta Ĉinio, kiuj, helpate de ĉinaj naciperfiduloj, kunlaboris kun Japanio kaj staris kontraŭ la registaro de Kuomintango kaj la ĉina popolo. En la moderna historio de Ĉinio oni nomas tiujn registarojn "la registaro de ĉinaj naciperfiduloj". Kvankam ili portis belajn nomojn, ekz., "Kvinnacia Respubliko" de Manĉurio kaj "Registaro por Paca Konstruado" de Wang Jingwei, fakte ili estis marionetoj dependantaj de la japanaj regantoj. Post la triumfo de la kontraŭjapana rezistmilito ĝis la jaro 1947, sur la ĉeftero de Ĉinio oni akuzis dek milojn da ĉinaj kunlaborintoj por japanoj. Ankaŭ post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, oni levis amasan movadon por likvidi la naciperfidulojn de Ĉinio.

Avino Kang Duk-Kyung, kiu denunciis la damaĝon de la konsolvirinoj

Kang Duk-Kyung, per pentrado, akuzis Japanion pro la seksasklava sufero en la japana armeo.

Kang Duk-Kyung naskiĝis en Jinju Gyeongsangnam-do, Koreio, en 1929 kaj kreskis en la familio de la patrino post la frua morto de ŝia patro. En la jaro 1944, kiam ŝi estis 16-jara kaj estis en la 1a jaro de la alta klaso de elementa lernejo, ŝi obeis al sia japana instruisto kaj aliĝis al la Virina Laborvolontula Trupo kaj iris al la aviadila fabriko Fujikoshi en la gubernio Toyama, Japanio. Ĉiusemajne alterniĝis taga kaj nokta laborado. La ĉiutaga laborado de 12 horoj estis tro peza. Tamen pli suferiga estis la malsato. Pro la mizera vivo nur kun manĝaĵo de rizo, sojsaŭca supo kaj dolĉa rafano, ŝi provis eskapi en iu nokto, sed estis arestita de gardisto. De tiam ŝi estis devigita akompani japanan armeon kaj fariĝis seks-sklavino. Post la liberiĝo pro la militfino ŝi revenis al la hejmvilaĝo en Koreio kaj dum la tuta vivo restis sola sen edziniĝo.

Dum la jaroj inter 1993 kaj 1997 Kang Duk-Kyung montris talenton en pentrado, kiu komenciĝis kiel kuracmaniero al la militaj viktimoj. Ŝi lasis kelkdek pentraĵojn, kiuj bildigas la vivon de seks-sklavinoj. Ŝiaj pentraĵoj atestas la vivon de milit-viktimoj kaj fariĝis diskoniga rimedo de ŝia propra sperto al la tuta mondo. Ĝis sia morto, ŝi per pentrado postulis de Japanio pardonpetan konfeson. En nia memoro, ŝi restos kiel historia viktimo, kiu dignoplene malkovris seks-sklavan viktimiĝon.



Punu la respondeculojn!

(Pentraĵo de Kang Duk-Kyung)

Damaĝo kaj Damaĝiĝo de la Japana Popolo

1. Dum milita Ĝenerala Tutmobilizado kaj Kunlaboro de la Popolo por Milito

La japana agresmilito progresis trude foroferante la popolan vivon. Ni vidu konkrete la situacion.


Ĉion por la milito

El la fora gubernio Iwate, studentinoj de la kvara lernojaro de la Alta Knabinlernejo de Tono estis mobilizitaj al la mararmea aeronautikejo en Yokosuka. Ili grupe tranoktis en dormejo kaj laboris en fabriko. Ĉiuj surhavis ĉirkaŭ la kapo fruntotukojn kun unu vorto "Kamikaze" (Dia vento).

Kiam la Azia-Pacifika Milito ekmalhavis laboristojn en la municifabrikoj, ĉar ili devis iri al la batalfronto. Anstataŭ ili, la finintoj de teknikaj lernejoj kaj laboristoj, kiuj faris laborojn sen rilato al la milito, estis pelataj al la municifabrikoj. Ankaŭ fraŭlinoj, lernejaninoj kaj studentoj vole-nevole estis mobilizitaj en municifabrikoj (labormobilizo). En la lasta militfazo preskaŭ ne plu okazis lecionoj en lernejoj krom la baza nivelo; lernantoj kompreneble ne povis elekti sian profesion, kaj eĉ lerni fariĝis neeble.

Tamen ankoraŭ mankis laborfortoj, kaj koreoj kaj ĉinoj estis devige mobilizitaj.

La armeo subpremis la popolon



Tiuj kiuj estis mobilizitaj kiel soldatoj laŭ milita bezono, estis nomataj "rezervsoldatoj". La Asocio de Rezervsoldatoj, sub kiu ili estis grupigitaj, organizis diversajn aktivaĵojn sub gvido de la armeo por kunlaborigi la popolon al la milito, kaj gvidis militotrejnadon en lernejoj. Tiamaniere kreiĝis sistemo, en kiu ĉiu viro, ekde bazlernejaninoj ĝis aktivaj soldatoj kaj rezervsoldatoj, ekde lerneja aĝo

ĝis 45-jaraj, estis regataj de la armeo.

En 1931, la jaro de “la Evento de la 18-a de Septembro” (Manĉuria Incidento), la nombro de la soldatoj estis 310,000. Kun la milita plivastiĝo daŭre kreskis la nombro kaj je la malvenko en 1945 la nombro estis ŝvelinta ĝis 7,190,000. Dum la lasta periodo de la milito, la aĝo de militservo ampleksis ekde 19-jara ĝis 45-jara kaj ankoraŭ pli ol 100,000 studentoj devis soldatiĝi. Sed ankoraŭ ne sufiĉis, kaj do per konskripcio junuloj el Taiwan kaj Koreio estis pelitaj batalkampen kiel “japanaj soldatoj”.

Strukturo de kunlaborigo por la milito

Gvidate de la ŝtato kaj polico estis organizitaj t.n. “Najbargrupoj” kun la celo kunlaborigi la popolon al la milito kaj reciproka gardobservo. La najbargrupo konsistis el ĉirkaŭ 10 familioj kaj tutlande formiĝis 1,300,000 grupoj. Ili diversmaniere kunlaboris por la milito, ekz. adiaŭi frontirajn soldatojn, kolekti mondonacojn por la nacia defendo kaj metalojn, laborservi, ekzerci sin kontraŭ aeratako k.a. Ĉar la najbargrupoj ankaŭ peris por ricevi nutraĵojn kaj ĉiutagajn necesaĵojn, la popolo devis aliĝi al ili por vivi.

La edukado instigis al la milito

En la lernejo, la studentoj lernis, ke “la Tennoo estas profilo de Dio”. La misio de la popolo estas partopreni en la granda entrepreno “hakkoo ichiu” (la tuta mondo sub unu domo) unuigante la mondon sub la Tennoo.

Estis tute malpermesite dubi, kiu decidis pri tio. En lerneja ceremonio la lernantoj devis plej respektate kapklini antaŭ la foto de la tennoa paro, voĉlegi la “Tennoan Dekreton pri Eduko”, kiu instruas, “urĝokaze por la Tennoo vi faru ĉion eblan fordonante la propran vivon”, kaj grupe kanti la nacian himnon “Kimi-ga-yo”, kiu glorie laŭdas, ke la mondo regata de la Tennoo eterne daŭru.

Japanio estas bona lando, pura lando, kaj ununura lando de Dio en la mondo. Japanio estas bona lando, forta lando, kaj elstara lando brilanta en la mondo.
(El lernolibro de etiko, tiam uzata por la duagrada lernojaro de elementa lernejo)

Tiel altrudante la senton de la japana nacia supereco rilate la aliajn azianojn, la lernejo instruis, ke estas natura afero, ke Japanio, la “lando de Dio”, regas la ceterajn popolojn de Azio.

La tuta eduko estis kolorigita nur per milito. Ekzemple kalkulekzerco en la lernolibro pri aritmetiko tekstis: “En ĉiu militŝipo troviĝas po sep kanonoj. Kiom da kanonoj sume havas sep militŝipoj?”

La japana registaro edukis la popolon pri la “lando de Dio”, kaj propagandis per ĵurnaloj kaj radioelsendoj: “Ni punu la brutalan Ĉinion”, “Ekstermu Usonon kaj Brition, kiuj estas similaj al demonoj kaj bestaĉoj”. Pro la forto de edukado, informado, armeo, najbargrupo k.s., rezultis, ke la popolo aktive kunlaboris por la agresmilito.

2. La Vivo kaj Rezistado de Popolo

Kian vivon havis la popolo dum la ĉirkaŭ 15-jara milita periodo? Kaj kial la japana popolo ne kontraŭagis la malprudentan militon? Ĉu ne ekzistis kontraŭantoj de la milito?

Dummilita vivo de la popolo

Por progresigi la militon disvastiĝintan ĝis la Azia-Pacifika regiono, la japana registaro provis pliampleksigi la municia-industrion kaj pormilitigi la ekonomion. La Leĝo de Nacia Ĝenerala Mobilizo de aprilo 1938 celis, ke la ŝtato plene regu la enlandajn ekonomian aktivecon kaj popolan vivon, por mobilizi la tutan nacion por la milito.

Ekde 1940 nutraĵoj, vestoj kaj preskaŭ ĉiuj vivnecesaĵoj estis porciumitaj kaj kun la malboniĝo de la militostato malmultiĝis la kvanto de distribuataj varoj. La popolo, kiu sen la porcio eĉ unu tagon ne povis sinvivteni, estis trudpremata al suferplena mizera vivo pro la manko de nutraĵoj kaj varoj.

Iam mi estis tiel malsata, ke mi ronĝis panpecon konservitan kiel trezoron. Sur ĝi jam estis ŝimo, do mi tion forigis kaj ĝin manĝis; ĉar oni diris "pensu pri la soldatoj en batalkampo; ili batalas kun kota trinkakvo kaj manĝante herbojn". Akiri rizon pli malfaciliĝis... oni ne plu povis vidi ĝin. Batatoj kaj sojfaboj estis bonaj manĝaĵoj, sed oni manĝis eĉ rostitajn semojn de kukurbo aŭ sunfloro. (el kroniko pri spertoj, skribita de tiama kvina-klasa lernanto de elementa lernejo, 1941)

Dum la Azia-Pacifika Milito, la popolo estis postulata ĉion foroferi por helpi la militon. Per la slogano, "Ŝtat-obligacioj estas la sango de la batalanta patrio", moviĝanta poŝtoŝtanco propagandas dummilitan ĉepoŝtan monŝparon. Junio 1942



Tamen la japana registaro, per sloganoj "Lukso estas malamiko!" kaj "Mi deziras nenion ĝis nia venko", postulis plian ŝparadon. Trovinte eĉ nur iom bele vestitajn virinojn surstrate, virinorganizanoj k.a. avertis ilin truĉdonante presitan faldfolio kun tekstoj kiel "Ni hezitu pri pompaj vestoj". Viroj devis vesti sin per "nacia kostumo", simila al soldata uniformo, kaj virinoj per farmistina pantalono "mompe". Urbanoj apenaŭ tenis sin vivaj per kaŝkomerco en nigra merkato, aĉetoj en kamparo kaj interŝanĝo de varoj. Ankaŭ al kamparanoj mankis nutraĵoj, ĉar la produktado falis pro manko de laborforto kaj ili tamen devis transdoni rizon al la registaro.

Popolo rezistado

Ĝis la Manĉuria Incidento, kiun Japanio okazigis en 1931, la antaŭmilita periodo estis tiu kun la plej aktivaj kontraŭmilitaj agadoj. En Japanio fondiĝis filio de la Internacia Kontraŭ-Imperiisma Unio, kiu postulis solidarecon kun la koreaj kaj ĉinaj popoloj, kaj en la tuta Japanio disvastiĝis propagando kontraŭ milito kaj la japana invado en Ĉinion. Sed la registaro plifirmigis la utiligon de la Leĝo de Publika Ordo, kaj forte subpremis militkontraŭulojn. Multaj japanoj estis ekde infanaĝo stampitaj per la devizo, "Estu fidela al la Tennoo, amu la ŝtaton", kiu instruis spiriton de lojaleco kaj submetiĝo al la Tennoo kaj ŝtato, por ke ili eĉ ne havu la ideon kontraŭi militon. Plie ne ekzistis libero de ideologio, kredo, esprimo, publikigo, informiĝo ktp. kaj do la plejmulto de la homoj senkritike akceptis la agitadon al milito.

Tamen la japana branĉo de la usona kristana grupo Watch Tower deklaris rifuzon de militservo, "ĉar milito estas murdo". En 1939 ĝiaj kelkcent membroj estis arestitaj pro delikto kontraŭ la Leĝo de Publika Ordo. Tiel, iuj homoj, kiel religiuloj, socialistoj k.a., kontraŭagis la militon, eĉ poste enkarcerigite. Kiam la milito daŭris pli kaj pli longe, plimultiĝis inter la popolo sento de abomeno al la milito, inter laboristoj kreskis forkurado kaj foresto, kaj en municifabrikoj eĉ okazis intencaj rompoj de armiloj kaj konscia farado de fuŝaĵoj. Kvankam nur tre malmultaj, en la ĉeftero de Ĉinio ankaŭ estis kelkaj japanoj kaj japanaj soldatoj, kiuj kiel Hasegawa Teru kontraŭagis la militon. Ankaŭ en la armeo estis homoj, kiuj starigis kontraŭmilitan organizaĵon kaj aktive propagandis kontraŭ la milito.

Hasegawa Teru (en Ĉinio ŝi nomis sin Midorikawa Eiko, Verda Majo estas ŝia Esperantonomo) estis studentino de la Virina Alta Pedagogia Lernejo de Nara, kiam ŝi, lerninte Esperanton (rilatan al kultura kontraŭmilita movado), estis arestita en 1932, kaj poste estis forpelita de la lernejo. En 1936 ŝi, 24-jara, edziniĝis kun Liu Ren, ĉina studento en Japanio. Kiam li reiris al sia hejmlando por la kontraŭjapana movado, ŝi sekvis lin al Ŝanhajo en printempo 1937, kaj okupis sin pri kontraŭmilitaj radioelsendoj direktitaj al Japanio. En septembro 1937 ŝi alvokis de Ŝanhajo, dirante, "Plenvoĉe mi anoncas al vi, fratoj en Japanio: Ne erare sangon fluigu. Transmare ĉi tie, ne troviĝas via malamiko." En 1947, ŝi forpasis 35-jaraĝa.



*Geedzoj Hasegawa Teru
(Verda Majo) kaj Liu
Ren*

3. Granda Aeratako al Tokio kaj Aliaj Urboj


Japanio disvastigis la agresmiliton kaj venis al ĝi la vico suferi de kontraŭatakoj de la alianca armeo. En la lasta fazo de la Azia-Pacifika Milito, la tuta lando estis bombita de usonaj militaviadiloj. Kiajn suferojn havis la popolo?

Aeratakoj al la tuta Japanlando

Kiam la usona armeo tute ekstermis la japanajn trupojn sur Saipan, Guam kaj aliaj Marianaj Insuloj somere de 1944, ĝi komencis bombardi la tutan japanan teron, uzante la aviadilbazojn konstruitajn tie, per aerflotoj de bombaviadiloj B29. Unue estis atakitaj aviadil-fabrikaj, armeaj instalaĵoj, fabrikoj kaj trafikrimedoj.

Sed en 1945 komenciĝis sendistinga bombado al urboj, kaj multaj ordinaraj civitanoj fariĝis viktimoj. Ekde la marta granda aeratako al Tokio, estis bombatakitaj ĉirkaŭ 150 ĉefaj urboj tra la tuta lando, inkluzive Osako kaj Jokohamo. Pro la aeratakoj kaj atombomboj mortis ĉirkaŭ 380,000 civiluloj, kaj onidire pli ol 2.4 milionoj da domoj

La komplete ruinigita Tokio post la granda aeratako (nuntempa Nihonbashi-Hamacho, Chuo-ku; ĉirkaŭ Shin-Oohashi)



forbrulis.

Kiam la aeratakoj komenciĝis sur lokaj urboj, la registaro transloĝigis bazlernejanojn el la urboj al la kamparo. Tio estis t.n. "lernejana evakuo". Infanoj ekde la tria klaso (poste la dua) for de la gepatroj polerneje devis loĝi komunan vivon en lokaj gastejoj aŭ temploj, suferante malsaton.

Granda aeratako al Tokio

Ekde la vespero de la 9a ĝis la 10a de marto tra la loĝkvartaloj de Tokio (la nunaj kvartaloj Sumida-ku, Kotoo-ku, k.a.) blovis sezona ventego kutime nomata "la unua de printempo". Tie 334 bombaviadiloj B29 plenumis dum du horoj "sendistingan tapiŝ-bombadon" per brulbomboj (bombo celanta forbruligon per varmego). Per tia atako oni provis komplete forbruligi la celitan distrikton, kvazaŭ flama tapiŝo kovris la teron.

Unue oni bombis ĉirkaŭ la celdistrikto en formo de pasto-ringo, kaŭzante fajregon, por ke la loĝantoj ne povu eskapi, kaj sekve ene de la ringo oni dense ĵetis brulbombojn. Pro la tiama forta vento, la tuta loĝdistrikto fariĝis "maro de fajro". Dum tiu du-hora bombatako mortis ĉirkaŭ 100,000 homoj, kaj ĉirkaŭ miliono da homoj perdis siajn domojn en la flamoj aŭ suferis vundojn. Multaj infanoj orfiĝis, ĉar, dum ili estis for de siaj domoj pro la lernejana evakuo, ĉiuj familianoj en Tokio restintaj pereis.

Hashimoto Yoshiko rakontas pri siaj suferigaj travivaĵoj dum la granda aeratako al Tokio:

Dorse portante mian suĉaĝan filon, mi forkuris kune kun la gepatroj. Kiam ni atingis sub la ponto, iu deponejo estis brulanta, kaj flagrigita de la ventego ĝi aspektis kvazaŭ flamo de giganta brulilo. Mia filo surdorsa subite ĝemkriis, kaj kiam mi rigardis malantaŭen, li havis fajropolvon en sia buŝo kaj tial lia gorĝo estis brulanta tutruĝa. Per fingro mi elgratis la flamon kaj brakpremis la plorkriantan bebon al mia brusto. Aŭdinte "Yoshiko, plonĝu", mi saltis haste en la riveron, firme brakumante mian filon. Tio estis la adiaŭo al miaj gepatroj.

Por kio la sendistingaj bombatakoj?

La Azia-Pacifika Milito fare de Japanio estis totala agresmilito, por kiu mobiliziĝis kaj kunlaboris la tuta japana nacio. Tial ankaŭ la japana popolo, subtenanta la sistemon de totala milito, fariĝis celo de la usonaj bombatakoj. Ankaŭ la japana armeo bombatakis sendistinge al ĉinaj urboj, kaŭzante grandan suferadon.

Sed, kial okazis tiaj sendistingaj bombatakoj al la ĝenerala nemilitista loĝantaro? Ĉar la strategia celo de la totala milito estis detruo la militpotencon, homforton kaj produktokapablon, detruo la vivon de la popolo, perdis la batalvolon, kaj premi por kapitulaco.

4. Batalo en Okinavo

La Batalo en Okinavo estis la lasta kaj la plej granda definitiva batalo dum la Azia-Pacifika Milito. La japana armeo batalis kontraŭ la usona sur la sudaj insuloj de Okinavo, Japanio. En la batalo partoprenis la plej multaj "kamikazoj" sinmortigaj aviadatakoj, kies pilotoj sin ĵetis kun bombo. Kiel do iris la batalo?

Furioza batalo sur la malgranda insulo dum tri monatoj


La batalo en Okinavo komenciĝis per kanonado kaj bombado de la usona mararmeo la 23an de marto 1945, kiam la malvenko de Japanio estis evidenta, ĉar la japanaj armeaj bazpozicioj tra la vasta okcidenta Pacifiko estis jam konkeritaj unu post alia. La unuan de aprilo la usona armeo surteriĝis sur la marbordon de la meza parto de la insulo Okinavo. Kaj la batalo daŭris tri monatojn ĝis la 23a de junio, kiam la japana armeo finis sian organizitan batalon.

La ĉefinsulo Okinavo estas malgranda insulo kun 120-kilometra distanco inter la nordo kaj la sudo. La usona armeo sieĝis ĝin per 1,500 batalŝipoj kaj atakis per grandskala forto de 540,000 personoj, inkluzive de 180,000 sturmantoj. Kontraŭe la japana defensivo konsistis el 110,000 soldatoj, inkluzive de rekrutoj mobilizitaj surloke.

Malgraŭ tio, ke la japana armeo estis evidente malsupera sur la malvasta insulo, ĝi rezistadis dum tri monatoj laŭ japana plano de "la longdaŭra batalo". En la meza kaj suda regionoj de la ĉefinsulo Okinavo, kiu konsistas el korala kalkoŝtono, troviĝas multaj stalaktitaj kavernoj. La japana armeo daŭrigis batalon defensiva en tiuj kavernoj kaj nove faritaj subteraj bazpozicioj.

Kial la japana armeo alprenis "la longdaŭran operacon"? Tiutempe la japana registaro

kaj ties militista gvidantaro jam planis "la definitivon batalon sur la japana ĉefinsularo" kontraŭ la usona armeo. Sed ili tamen bezonis pli da tempo, ĉar ili ankoraŭ ne estis pretaj por la batalo. Tial ili decidis daŭrigi la operacon por restigi la usonan armeon kiel eble plej longe sur Okinavo. Pro tio la tuta loĝantaro de la insulo, tiutempe ĉirkaŭ 600,000, estis implikita en la batalon kaj ties kvarono perdis sian vivon.



La nombro de mortintaj civiluloj superis tiun de la soldatoj

La mortintoj en la batalo sur Okinavo nombriĝis je ĉirkaŭ 200,000, el kiuj 94,000 estis tieaj loĝantoj. Dum aliaj ĉirkaŭ 94,000 mortintoj estis japanaj soldatoj, la nombro inkluzivas ankaŭ 28,000 rekrutojn el la insulanoj kiel anojn de defendotrupoj kaj lernantotrupoj. Se oni

enkalkulas ĉi tiujn, la nombro de la mortintoj el Okinavo estas 122,000. Krom ili mortis ne malmultaj homoj pro malario, malsato k.a. Oni do supozas, ke la entuta nombro de la viktimoj el la loĝantoj en Okinavo estas ĉirkaŭ 150,000.

Tiu nombro inkluzivas ne nur mortintojn en bataloj sed ankaŭ multajn mortintojn fare de la japana armeo truditajn en "kolektivajn sinmortigojn" pro la ideo de "kunmorte de armeanoj kaj loĝantoj", mortigitajn de la japana armeo, suspektite kiel spionoj, elpelitajn el la ŝirmejoj, en kiujn ili rifuĝis, ktp.

Pro tiaj amaraj spertoj dum la batalo, la leciono, ke "Armeo ne defendas loĝantojn", kaj la deziro al la paco gravuriĝis en la koroj de la popolo de Okinavo.



La loĝantoj kunigitaj kun la milito, 21 junio, 1945, foto de la usona armeo. Laŭ usona armeo, la mortintoj estis pro aviadilbombado. Sed la foto indikas probable "grupsinmortigon".

"Ŝtono de Paco"

Oni trovas la monumenton "Ŝtono de Paco", konstruitan memore de la 50a datreveno de la Dua Mondmilito ĉe Mabuni en la urbo Itoman, proksime al la suda ekstremo de Okinavo. Sur ĝi estas gravuritaj la nomoj de 239,092 mortintoj dum la batalo (junie 2004) sendistinge de amikoj kaj malamikoj, suferintoj kaj suferigintoj.

Krom la nomoj de la ordinaraj loĝantoj de Okinavo, japanaj armeanoj kaj armelaboristoj, kaj usonaj armeanoj, ankaŭ la nomoj de 341 sudkoreaj mortintoj pro la batalo estas gravuritaj sur la monumento (samtempe kiel supre skribite, gravuriĝis la nomoj de 82 nordkoreoj kaj 28 Taiwan-anoj). Kial tie troviĝas la nomoj de koreoj? Ĉar 10,000 (supozata nombro) koreoj estis eltenitaj el Koreio kiel "armelaboristoj" por la batalo en Okinavo. Ilin oni laborigis por konstrui batalpoziciojn kaj por transporti municiojn. Krom tio laŭ la esploro de lokaj studentoj, evidentiĝis, ke antaŭ la batalo estis en Okinavo pli ol cent "konsolejoj" por armeanoj, kaj en tiuj ejoj troviĝis ankaŭ multaj koreoj eltenitaj el Koreio kiel "konsolvirinoj" por la japanaj soldatoj.

Lastatempe ĉiujare vizitas Okinavon pli ol 400,000 lernantoj de mezlernejoj kaj altmezlernejoj el la ĉefinsulo de Japanio por lerneja studvojaĝo. Kial tiom multe? Ĉar tie ili povas lerni ne nur la unikajn historion, naturon kaj kulturon de Okinavo sed ankaŭ ĝisprofunde povas lerni la realaĵojn de la milito.

5. Atombombo al Hiroŝimo kaj Nagasako

La 6an de aŭgusto 1945, Usono faligis la unuan atombombon en la mondo al Hiroŝimo, kaj la duan en la 9a sammonate al Nagasako. Usono hastis ĵeti la ĵus produktitajn atombombojn por plifruigi la kapitulacon de Japanio kaj tiel superi Sovetunion en la postmilita mondo. Kia do estis la damaĝo de la atombomboj ?

La unua atombombo en la historio de la homaro

La atombombo eksplodis 500-600 metrojn super la tero kaj fariĝis granda fajroglobo. La homoj sub ĝi estis damaĝitaj tiel grave kiel neniu spertis en la pasinteco. Tio konsistis el tri faktoroj.

La unua faktoro estis varmoradiado. Je la eksploda momento la temperaturo atingis kelkmilionojn da gradoj. Post unu sekundo surface de la fajroglobego la temperaturo estis 5,000 gradoj samkiel sur la surfaco de la suno. Homoj proksimaj al la eksploda centro estis bruligitaj ĝis la ostomedolo. Ankaŭ homoj, situantaj tri-kvar kilometrojn for de la centro, grave brulvundiĝis.

La dua estis eksploda blovego. Samtempe kun la eksplodo la ĉirkaŭa aero ŝvelis kaj fariĝis terura blovego. Ĝia rapideco ĉe loko 0.5 kilometrojn for de la eksploda centro estis 280 metroj sekunde, kaj 2.6 kilometrojn for de la centro estis 36 metroj sekunde. La eksploda blovego homojn forblovis aŭ ĵetfaligis. Estas ekzemplo, ke forbloviĝis vitroj de domoj, kiuj situis sep kilometrojn for de la centro.

La tria estis radioaktiveco. Elmetite sub multe da radioaktiveco, multaj homoj mortis pro akutaj lezoj kaŭzitaj de radioaktiveco; sangado ĉe la gingivo, sangado el nazo, sangovomo, lakso, alta febro, purpuraj makuloj sur haŭto, defalo de haroj k.a.

Jen estas rakonto de iu patrino atombombita. Multe da homoj perdis siajn karajn familianojn same kiel ŝi.

Samtempe de la fulmego mia domo komencis detruigi kun bruegoj. Mi forkuris eksteren panike, ĉirkaŭprenis miajn du infanojn, kiuj estis ludintaj eksterdome, sed mi ŝtoniĝis surloke. "Panjo!", la krio de la unua filino min rekonsciigis. El la detruita domo leviĝadis densa terpolvo. Fendante tegolojn, forprenante lignotabulojn, forigante dikajn lignojn, mi fosadis la lokon, el kiu la voĉo aŭdiĝis. Neniu estis por helpi min, kaj nenian ilon mi havis. Dume la krio de la filino ŝanĝiĝis je "Aj!" "Varmege!", kaj pli kaj pli ŝia voĉo malfortiĝis. Fajreroj alŝprucis kaj ekbruligis la lignojn premantajn la filinon. En nigra fumo kaj varmega fajro mi neniel povis elteni, kaj forkuris kriante al la filino, "Pardonu min, Kara!" "Ho, varmege, panjo!" ŝia krio persekutas min por ĉiam.

Por malpermesi atombombon kaj hidrogenbombon

Ĝis la fino de 1945 pro la atombomboj mortis ĉirkaŭ 140,000 homoj en Hiroŝimo kaj ĉirkaŭ 70,000 en Nagasako. Ne nur japanoj sed ankaŭ devige alportitaj koreoj kaj alianclandaj militkaptitoj estis treege damaĝitaj. Postvivintoj suferis pro leŭkemio aŭ aliaj malsanoj, kaj ĉagreniĝis perdinte familianojn, sed devis vivi en maltrankvilo pro

nevideblaj radioj, kiuj damaĝadas iliajn korpojn interne.

Post la milito la atombombitoj leviĝis en la movado kontraŭ la atombombo kaj hidrogenbombo, apelaciante la aktualajn cirkonstancojn kaŭzitajn de la malhumanaj damaĝoj de la atombomboj. Dume atombombitaj alilandanoj, el kiuj onidire estis ĉirkaŭ 70,000 koreoj, ne rajtis ricevi helpon de la japana registaro dum longa tempo, kaj tial ilia sufero estis duobla.

Sasaki Sadako estis atombombita en Hiroŝimo, kiam ŝi estis 2 jaraĝa. Tiam ŝi tamen tute ne vundiĝis, kaj en la bazlernejo ŝi estis tiel vigla kiel ŝi partoprenis elektite en stafetkurado. Sed en la aĝo de 12 jaroj abrupte ŝin atakis leŭkemio, unu el la atombombaj malsanoj. En hospitalo Sadako deziris resaniĝi kiel eble plej frue kaj lerni kun siaj geamikoj en la lernejo. Aŭdinte, ke farado de mil papergruoj ŝin resanigos, ŝi ade faris papergruojn faldante paperon. Sed bedaŭrinde ŝi forpasis, kiam ŝi elfaris 644 papergruojn, post naŭ monatoj de malsano.

Aŭdinte tion, la geamikoj de Sadako alvokis tra Japanio konstrui statuon de "Infano de la atombombo" kun la deziro, ke "oni absolute ne ripetu militon por ĉiam". Nun antaŭ la statuo "Infano de la atombombo" en la Pacparko en Hiroŝimo, ni ĉiam povas vidi "mil papergruojn", senditajn el multaj landoj tra la mondo kiel simbolon de la deziro al la mondpaco.

Hiroŝimo, tuj post la atombombado (foto de usona armeo). Dekstre malantaŭe estas la "Atomdomo", registrita ĉe Unesko kiel "monda heredaĵo".



Peco de Historio

Kamikaze: Atakoaviadiltrupo kaj junaj studentoj

La japana mararmeo malvenkis al la usona mararmeo en grandaj marbataloj kaj perdis multajn aviadilŝipojn, kiuj necesis por ekflugigi kaj surŝipigi aviadilojn. Poste oni prenis specialan taktikon nomatan "kamikaze", t.e. sinmortiga aersturmado kun bomboŝarĝitaj aviadiloj, forflugintaj de terbazoj por kraŝe sturmi malamikajn militŝipojn. La terarmeo kaj la mararmeo perdis entute 2,443 aviadilojn kaj 3,940 pilotojn pro la kamikaze-aeratakoj. Nur 12% de la atakaviadiloj povis trafi la celon, tial plejmulto de ili alflugis al usonaj militŝipoj nur por esti paffaligitaj.

Multaj pilotoj de kamikaze-militaviadiloj estis studentoj mobilizitaj el universitatoj. Ne malmultaj el ili estis skeptikaj aŭ malaprobaj pri la japana agresmilito. Ankaŭ kelkaj koreaj junuloj mortis mobilizite en kamikaze-atakoj.

Postlasita testamento de Uehara Ryoji, studento de la Ekonomika Fakultato de Universitato Keio. Li mortis en batalo en Okinavo kiel kamikaze-ataka piloto en majo 1945, 22-jaraĝa.

"Surbaze de mia konvinko, kiun mi akiris dum mia longa studenta tempo, klaras, ke libereco nepre venkos. Aŭtoritatisma ŝtato finfine malvenkos, eĉ se ĝi prosperas dum kelka tempo. Tion jam atestas la malvenkoj de la itala faŝismo kaj la germana naziismo. Piloto kamikaza de la speciala sturma trupo estas stirstange manipulanta maŝino, kiu estas altiriĝanta al malamika aviadilŝipo kiel nura fera molekulo de magneto sen personeco, sento kaj racio. Ne eblas pripensi tion per racio. Tio estas kiel sinmortigo kaj troviĝas nur en spiritisma Japanio. Se mi ekirus en ĉi tia mensostato, mia morto neniel utilis. Morgaŭ mi ekflugos por ataki. Morgaŭ malaperos unu liberalisto for de tiu ĉi mondo."



*Uehara Ryoji, studenta
kamikaze-piloto*

La japana totala milito kaj virinoj

Tio estas ilustraĵo por la artikolo titolita "la roloj de virinoj en la reĝimo de la totala milito", kiu publikiĝis en porvirina gazeto dum la milito. Ĝi instruas kaj propagandas virinajn rolojn.

Meze troviĝas slogano: "Nasku homan riĉfonton" kune kun bildo de bebo. Tio signifis, ke la unua rolo de virinoj estis fariĝi "patrino por la militisma ŝtato", kiu amase produktas "homfortojn por la milito".

La japana registaro urĝis plimultigon de la popolnombro por konstrui "Kunprosperan Sferon de la Granda Orientazio", kaj akcelis politikon instigi fruan geedziĝon kaj havigi po kvin infanojn al ĉiu paro, honorante la familion, kiu havis pli ol dek infanojn. Estis ĝuste tiel, kiel la titola slogano de la ilustraĵo diras: "Nasku kaj plimultigu infanojn por la patrio."

"La ŝtato" estis konsiderata kiel la pligrandigita "familio". Geedziĝo, naskado kaj familia amo, kiuj devus esti privataj, estis tiel rekte kunligitaj al la politiko de la ŝtato, ke morto en batalo estis rigardata kiel honoro de la familio.

La dua rolo de virinoj estis fariĝi laborforto kiel "industria batalanto", anstataŭante virojn malplimultiĝantajn. En la lasta periodo de la milito ankaŭ needziniĝintaj knabinoj estis devige mobilizitaj ne nur el Japanio sed ankaŭ el la kolonioj.

Krom tiuj roloj, virinoj devis defendi sian hejmon, aparteni al la "najbargrupo", prepari sin por la eventuala batalo sur la ĉefinsularo, partopreni en la aktiveco de la "Nacidefenda Virina Societo de la Granda Japanio" k.a. por fortikigi "la postfrontan defendon". Ili ja subtenadis la militon kiel ĝiaj radikoj.

Ironie estas, ke oni tiele donis eblon por sociaj agadoj al la virinoj, kiuj ne havis balotrajton kaj estis katenitaj nur al domlaboro kaj infanzorgado. Kelkaj virinoj trovis vivcelon pro tio. Multaj el la gvidantoj de virinaj movadoj ekhavis publikajn postenojn kaj kunlaboris por la politiko de la ŝtato.

Kial virinoj kunlaboris kaj estis kunlaborigitaj por la agresmilito? Ni pripensu tion el diversaj anguloj por kontribui al nia estonteco.



Ilustraĵo en la Virinoj Postfrontaj, junio, 1941, kun slogano "Nasku! Multigu bebojn!"

Lamento de "Patrino por la militisma ŝtato"

Aoki Toki havis sep filojn. Kvin el ili estis rekrutigitaj al milito. Kiam unu filo mortis en batalo, oni honoris ŝin kiel "la patrino de kvin bravaj soldatoj". La ĵurnalo "Tokyo-Nichinichi" raportis ŝian parolon: "Nenio estas pli ĝojinda por mi ol tio, ke kvin filoj miaj servas por la ŝtato. Sed, mi aŭdacas diri, ke mi bedaŭras pro tio, ke ne ĉiuj sep filoj miaj estas soldatoj." Sed tamen, kiam atingis ŝin la postlasaĵoj de la mortinta filo, ŝi furioze flaris la postlasitan ĉemizon, frotante ĝin per la nazo. "Ve! Certe tio estas la ĉemizo de Soichi." Ŝi ploris, metante sian vizaĝon profunde en la ĉemizon. (La ĵurnalo Asahi, la 7an de septembro 1976)

Malsukceso de la Japana Invadmilito

1. Kontraŭjapana Milito Fare de Ĉinio

De la jaro 1931, sekve de la invado de Japanio al Ĉinio, la ĉina popolo brave rezistmilitis kontraŭ la japanaj agresantoj por savi la nacion. Kiel la ĉina popolo rezistis kontraŭ Japanio? Kaj kiel Ĉinio venkis ?


Japano plano “rapida batalo, rapida venko” malsukcesis

En la komenca periodo de la milito, Japanio, potenca kaj milite kaj ekonomie, planis batalpolitikon pri rapida batalo kaj rapida venko kaj eĉ fanfaronis, ke ĝi pereigos Ĉinion en 3 monatoj. Vizaĝe al la forta atakado de japanaj trupoj, Ĉinio formis la Kontraŭjapanan Nacian Unuecfronton surbaze de la kunlaboro de la ĉinaj Komunista Partio kaj Kuomintango, ellaboris tutlandan kontraŭjapanan militprincipon kaj starigis politikan kaj militan sistemojn de tutnacia rezistmilitado. En la komenca periodo de la milito, la japanaj trupoj kun siaj avangardaj militekipaĵoj, sinsekve okupis Pekinon, Ŝanhajon, Nankinon kaj aliajn urbojn kaj superregis gravajn trafikajn liniojn kaj staciojn. Ekipita per postrestintaj armiloj, la ĉina armeo adoptis defensivan militprincipon, utiligante la vastan teritorion de la lando por forkonsumi iom post iom la japanajn trupojn, kaj malsukcesigis la batalplanon de la japana armeo.

*La ĉina trupo
garnizonanta en
Wanping kuras al batalo
okaze de la Evento de la
Ponto Lugouqiao.*

Longedaŭra milito de la tuta nacio

Vizaĝe al la invado de Japanio, la ĉina armeo obstine bataladis kontraŭ la atakado



de la japanaj trupoj surfronte. La ĉinaj armeo kaj popolo montris fortan batalvolon sur la batalkampo de Songhu kaj en la defendado de la urboj Wuhan kaj Changsha. Post la fronto, ĉinaj soldatoj kaj popolanoj vaste faris “minan militon”, “tunelan militon”, “paseran militon (tiraljoran militon)” kaj aliajn gerilspecojn, detenis kaj forkonsumis fortojn de la japanaj trupoj. En 1940 la ĉina armeo lanĉis la “Cent-regimentan Kampanjon”. La longedaŭra milito sur la du batalkampoj plilongigis la batalliniojn.

Kvankam la japana armeo okupis vastan teritorion de Ĉinio, tamen ĝi ne povis plenumi sian plenampleksan atakon al Ĉinio nek realigi sian celon milite subigi Ĉinion. Do, ĝi faris limigitajn atakojn surfronte por devigi la Kuomintangan armeon kapitulaci kaj lanĉis kun aparta akcento plej furiozan “balaadon” al la postfrontaj kontraŭjapanaj bazlokoj. Post la eksplodo de la Pacifika Milito en 1941, Ĉinio, Usono, Britio kaj aliaj landoj fondis en Ĉinio aerarmean bazon, kaj Ĉinio sendis sian armeon al Birmo por batali kune kun la alianca armeo kontraŭ Japanio.

Ofensivo de la ĉina armeo

Printempe de 1944 la ĉina armeo lanĉis ofensivajn atakojn sur la postfrontaj batalkampoj en la norda, centra kaj suda Ĉinio. Ĝis la somero de 1945 la ĉina armeo ekstermis 470 mil japanajn kaj marionetajn armeanojn kaj reprenis pli ol 70 urbojn kaj vastan teritorion. En la 9-a de aŭgusto, 1945, la armeanoj kaj popoloj en postfrontaj bazlokoj komencis grandskalan ofensivon kaj akiris grandiozan triumfon. En 1944 ankaŭ la



ĉina armeo sur la frontaj batalkampoj akiris grandan venkon en la ofensiva batalado en la norda parto de Birmo kaj okcidenta parto de Yunnan-provinco de Ĉinio kaj ellaboris ofensivan planon post repreno de la urbo Liuzhou. Pro tio la japana armeo devis mallongigi sian batallinion.


Soldatoj de la Okavoja Armeo en la “Cent-regimenta Kampanjo”

Fina venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito

La 8-an de aŭgusto 1945, laŭ la Yalta sekreta interkonsento, Sovetio deklaris militon kontraŭ Japanio, sekve de tio ĝi sendis armeon al la nordorienta Ĉinio kaj poste okupis la nordan parton de Koreio. La 6-an kaj 9-an de tiu monato Usono sinsekve ĵetis atombombojn al Hiroŝimo kaj Nagasako. Sub la atako de la ĉina armeo kaj aliancaj armeoj de Sovetio kaj Usono, Japanio perdis la povon daŭrigi la militon kaj deklaris kapitulacon senkondiĉan en la 15-a de aŭgusto. La 9-an de septembro okazis en Nankino la subskriba ceremonio de la kapitulaco de Japanio, kaj la ĉina popolo finfine gajnis la triumfon de la Kontraŭjapana Rezistmilito. Dum la milito mortis kaj vundiĝis 35 milionoj da ĉinaj armeanoj kaj popoloj kaj perdiĝis ĉinaj propraĵoj kun totala valoro de 600 miliardoj da usonaj dolaroj. La ĉina popolo multege elspezis por la sendependeco kaj liberiĝo de la nacio. La Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio detenis pli ol 60% de la forto de la terarmeo de Japanio kaj grandan parton de tiu de ĝia mararmeo kaj faris grandan kontribuon al la monda kontraŭfaŝisma milito. Kaj pro tio altiĝis la internacia pozicio de Ĉinio.

2. Rezistado de Koreoj kaj Preparado por Nacia Sendependiĝo

Kiam Japanio fortigis la sistemon de dumilita tutforta mobilizo kaj daŭrigis venkon en bataloj, inter koreoj aperis homoj, kiuj rezignis fidon al la sendependiĝo de Koreio. Sed kontraŭe ankaŭ multiĝis homoj, kiuj pensis, ke venis la tempo ekprepari la ŝtatan konstruon atendante la liberiĝon. Ni ĉi tie pristudu pri la preparo de la ŝtata konstruo fare de la organizoj de la korea sendependiĝa movado.



Korea Restariga Armeo sendota al Hindio en aŭtuno 1943, petite de la brita armeo por helpi en Birmo kaj Hindio.

Interkonsento pri la principo de la establo de la ŝtato

Japanio ju pli vastigis la militon, des pli la venkipovo de la aliancoj, kies plenumkapablo de la milito estis rigardata pli alta, estis antaŭvidita. Koreaj sendepend-movadanoj antaŭvidante, ke la situacio ŝanĝiĝas favore al Koreio, des pli aktive agadis por pli frue akiri sendependiĝon per sia propra kapablo. La tiamaj ĉefaj organizoj de la sendependiĝa movado estis la Korea Provizora Registaro, la Korea

Sendependiĝa Unio, la Orient-Norda Kontraŭjapana Armea Unio, kaj la Unio de Korea Ŝtata Konstruo. El la du organizoj Korea Provizora Registaro kaj la Korea Sendependiĝa Unio (kiuj agadis ĉefe en Chongqing kaj Yan'an, Ĉinio, antaŭ 1941 kaj post 1944) proklamis la platformon de ŝtata konstruo.

La Platformo de la Korea Provizora Registaro

4. Rajto kaj devo de ŝtatanoj: El la ĝenerala baloto geviroj de la aĝo ekde 18 jaroj havas la rajton voĉdoni, sendiference pri religio, edukiĝo, loĝjaroj, socia deveno, financa situacio kaj pasinteca agado.

6. Ekonomia sistemo: la instrumentoj kaj rimedoj de grandproduktaj instancoj apartenas al la ŝtato. Tereno, minejoj, marindustrio, agrikulturo kaj arbokulturo, akvoduktado, lagoj, kaj surakva, surtera, fluga transportaj industrioj, kaj bankoj, telegrafado, trafikado ktp., kaj agrikultura, industria, komerca entreprenoj kaj publikaj ĉefaj ŝtatdefendaj industrioj en la provinca kaj urba industria fako apartenas al la ŝtato. Malgrandaj kaj mezgrandaj industrioj apartenas al privata administrado.

7. Edukado: Ĉiun elspezon de elementa baza edukado por la aĝoj inter 6 kaj 12 jaroj, kaj alta baza edukado por la aĝoj de 12 jaroj kaj pli la ŝtato prenas sur sin.

La Platformo de Korea Sendependiĝa Unio

1. Starigas demokratian reĝimon pere de tutlanda ĝenerala baloto.

6. Konfiskas la propraĵojn kaj terenon de la japana imperio en Koreio, kaj al la ŝtata

administrado apartenigas grandajn entreprenojn, kiuj havas intimajn rilatojn kun la japana imperio, kaj realigas terenon disdonon al terkulturistoj.

8. Praktikigas ŝtatanan devigan eduksistemon, kaj la ŝtato prenas bezonatan elspezon sur sin.

La Platformo de la Ligo de Korea Ŝtata Konstruo

3. Ĉiu administrado en la fako de konstruado estas laŭ la demokratia principo, precipe atentante pri la liberigo de la laborista popolamaso.

Vidante la platformojn de ambaŭ organizoj oni trovas, ke ili en ĝeneralaj trajtoj havis samajn opiniojn pri tio, ke ili post la liberigo konstruos demokratian respublikon kaj starigos sistemon de demokratia ekonomio prenante la meritaĵojn de la demokratiisma kaj socialisma sistemo. La Unio de Korea Ŝtata Konstruo havis saman rigardon malgraŭ manko de konkreta enhavo.

Interkonsenti pri la principo de la ŝtata konstruo signifas, ke ĉiuj potencoj amasigas la forton por la sendependiĝo malgraŭ la diferenco de la ideologio. Kompreneble organizi la komunan fronton ne estis facile.

Tamen pro la komuna kompreno, ke la forto devas esti unuigita por akiri sendependiĝon, vigliĝis la provoj unuigi multajn organizojn.

Plie ĉiu organizo komencis klopodojn ligi ĉiujn potencojn tra la koncernaj teritorioj. Tiaj klopodoj bedaŭrinde ne efikis, ĉar Japanio kapitulacis pli frue ol oni supozis. Tamen tio, ke oni interkonsentis pri la principo de la ŝtata konstruo kaj klopodis ligi potencojn, povas esti grava sperto.

Grava fakto krom kunlaboro estas, ke tiuj organizoj fortigis la armitan sendependiĝ-movadon. La Korea Provizora Registaro oficiale deklaris militon kontraŭ Japanio en decembro 1941, kaj fortigis armforton de la Korea Suverenec-reakira Armeo. La registaro sendis Korean Suverenec-reakiran Armeon al la birma fronto kaj ankaŭ faris specialajn ekzercojn kun usona armeo por surprizataki en la internon de Koreio.

La Korea Sendependiga Unio kun ĉina Okavoja Armeo partoprenis en grandaj kaj malgrandaj kontraŭjapanaj bataloj, interalie en Hujiashuang-batalo. Ankaŭ la Unio de Korea Ŝtata Konstruo planis organizi laborista-terkulturistan armeon kaj partizanan trupon kaj komenci milit-agadon, kvankam tio ne realiĝis.

En 1945 Germanio deklaris kapitulacon kaj Okinavo estis okupita de la usona armeo. Ankaŭ la koreaj trupanoj en Soveta Unio organizis Korean Manovro-trupan Komitaton. Tio estis por partopreni en la laboro konstrui novan nacian ŝtaton en Koreio post la japana malvenko.

La korea sendependiĝo povas esti nomata "donaco de la venko de la alianco". Tamen ĝi ne povus esti prenita, se sendependiga movado ne daŭrigus la agadon kunlabore kaj arde en granda malfacilo.



3. Rezistado de la Popolo en la Okupita Sudorienta Azio

Kontraŭ la okupacio de Japanio, rezistmovado vigliĝis en la sudorienta Azio. Kiel do la popoloj de la sudorienta Azio vidis la ideon de "Kunprospera Sfero de la Granda Orientazio"? Ni vidu tion laŭ la vidpunkto de la popoloj, kiuj vivis en la sudorienta Azio.

Longan tempon postuladis sendependiĝon la popoloj de la sudorienta Azio

Antaŭ la japana agreso la plejparto de la sudorienta Azio estis kolonioj de eŭropaj potencaj ŝtatoj dum longa tempo. Pro tio la popoloj sub kolonia regado rezistadis multajn jarojn por akiri fruan sendependiĝon kaj pacan mondon sen konfliktoj.

Tien sin trudis la japana armeo por okupacii la regionon, emfazante la liberigon de Azio el la eŭropa kolonia regado kaj azian kunekziston kaj kunprosperon. La popolo, kiu arde deziris "sendependiĝon kaj liberiĝon", ekhavis esperon en Japanio. Sed kiam ili efektive vidis la alvenintan japanan armeon, tiam ilia granda espero tuj forvaporiĝis.

La reala stato de okupaciita regado kaj rezistmovado

La japana armeo rekte regis la okupitajn teritoriojn per militista regado. Por milito ĝi ĉiuloke forrabis nutraĵojn kaj riĉfontojn, petrolon kaj aliaĵojn, kaj por konstrui flughavenojn kaj fervojojn rekviziciis loĝantojn kiel laborforton. En Indonezio ĉirkaŭ kvar milionoj da laboristoj estis perforte severe laborigitaj kiel "romusha" (japana vorto por "laboristo", kaj nun la vorto "romusha" fariĝis indonezilingva vorto). Plie la japana armeo malpermesis al ili naciajn standardon kaj himnon, kaj trudis la japanan standardon kaj la japanan himnon. Kaj la japanaj regantoj konstruis nove ŝintoismajn sanktejojn, devigis la loĝantojn adorviziti, kaj antaŭenpuŝis la politikon de "tennoanigo" (fari fidelan popolon de la Tennoo, la japana imperiestro).

Por la loĝantoj en la sudorienta Azio la regado de la japana armeo estis nenio alia ol nova agreso anstataŭ tiu de la okcidentaj potencaj ŝtatoj. Ĝi forrabis de ili la ĉiutagan vivon, posedaĵojn, eĉ kulturon kaj lingvon. Pro tio en la sudorienta Azio la kontraŭjapana movado plivigliĝis. Precipe por Filipinoj, al kiuj jam Usono promesis la sendependiĝon, la japana agreso estis la komenco de nova kolonia regado. Tial kontraŭjapana popularmeo kaj aliaj estis organizitaj en multaj regionoj, kaj forte rezistadis.

Kaj ankaŭ ĉinoj en Singapuro kaj la Malaja Duoninsulo, kiuj, estante samnaciaoj, malsimpatiiis kontraŭ la japana agreso al Ĉinio, rifuzis provizi la japanan armeon per siaj posedaĵoj, kaj ekstaris volontulaj batalantoj kontraŭ la japana armeo. La japana

armeo senkompatate subpremis kaj murdis ilin, kio tamen nur plifortigis la kontraŭjapanan movadon en la sudorienta Azio.

Japanio malvenkis pro la aziaj rezistoj

La organizoj por rezisti kontraŭ la japana regado estis fonditaj en multaj regionoj en la sudorienta Azio. “Libera Tajlando” en Tajlando, “Malaja Kontraŭjapana Popolarmeo” en Singapuro kaj la Malaja Duoninsulo, Kontraŭfaŝista Popol-libera Ligo en Birmo k.a. En Vjetnamio “Vjetnama Sendependiga Ligo” estis organizita por rezisti kontraŭ la duobla regado de Francio kaj Japanio.

Ili batalis gerile en diversaj lokoj en la sudorienta Azio kaj turmentis la japanan armeon. Kaj rezistante kontraŭ la japana politiko de “Tennoanigo” (japanigo), ili instruis al la loĝantoj malnovajn kantojn kaj la historion de la regiono, kaj eldonis ĵurnalon por la loĝantoj, tiel, ke ili vigligu en la kontraŭjapana etoso.

Dezirante senmilitan pacan vivon kaj sendependiĝon de la kolonia regado, la popoloj en la sudorienta Azio organizis kontraŭjapanajn movadojn, kiuj baziĝis en la profundo de ĉiu regiono. “Kunprospera Sfero de la Granda Orientazio”, kiun Japanio lanĉis, malaperis pro la malvenko de Japanio, kaj baldaŭ la nacioj en sudorienta Azio sinsekve efektivigis al si sendependiĝon unu post alia.



*Membroj de
Fukbalahap
(Kontraŭjapana popola
armeo) en
Filipinoj, kiuj gerile
batalis kontraŭ la
japana armeo.*

4. Venko en la Kontraŭfaŝisma Milito kaj Japana Kapitulaco

La Dua Mondmilito havis karakterizon malsaman ol la Unua Mondmilito, kaj tio grave influis la postmilitan socion. Kie troviĝas la diferenco? Ni pripensu tion.

La Dua Mondmilito kiel kontraŭfaŝisma milito

La Komuna Deklaro de la Aliancaj Regnoj (Subskribita en Vaŝingtono, la unuan de januaro 1942).

Ĉiu registaro estas konvinkita, ke la perfekta venko kontraŭ la malamikaj regnoj estas necesa por protekti la vivon, liberecon, sendependecon kaj religian liberecon, kaj ankaŭ por teni homajn rajtojn kaj justecon en siaj kaj alilandaj teritorioj, kaj ĉiu registaro nun okupos sin pri komuna batalo kontraŭ la sovaĝaj kaj brutecaj armeoj, kiuj celas konkeri la tutan mondon.

La Dua Mondmilito estis milito, en kiu multaj aliancaj regnoj, kiel Usono, Britio, Sovetunio, Ĉinio, batalis kontraŭ la agreso de faŝismaj regnoj, nome Germanio, Italio kaj Japanio. La venkitaj tri landoj kapitulacis en malsamaj cirkonstancoj. Pro tio la postmilitaj sociaj formoj de la tri landoj estis malsamaj.

Italio: En julio 1943, la reĝo kaj la militista gvidantaro kune forpelis la ĉefministron Mussolini de lia posteno kaj lin malliberigis, kaj disfaligis la faŝisman reĝimon. La nova registaro deklaris militon kontraŭ Germanio, kaj Italio fariĝis unu el la aliancaj regnoj. En aprilo 1945 Mussolini, savita de germana trupo, provis fuĝi al Svislando. Sed li estis arestita kaj ekzekutita de partizanoj.

Germanio: En julio 1944 la atenco al Hitlero planita de germanaj superaj oficiroj malsukcesis. En aprilo 1945, kiam la sovetunia armeo eniris Berlinon, Hitlero mortigis sin kaj la nazia registaro falis. La 7an de majo la germana armeo senkondiĉe kapitulacis al la aliancaj fortoj. Germanio estis divide okupita kaj regata senpere de la kvar aliancanoj, Usono, Britio, Francio kaj Sovetunio.

Japanio: La 15an de aŭgusto 1945 la japana Tennoo proklamis en radioelsendo, en la formo de "Suverena Dekreto pri la Fino de la Milito", ke Japanio akceptis la Deklaracion de Potsdam, en kiu Usono, Britio kaj Ĉinio postulis, ke Japanio senkondiĉe kapitulacu. En la fino de aŭgusto la usona armeo alvenis sur la japanan ĉefinsularon. La 2an de septembro okazis ceremonio por subskribi la kapitulacan dokumenton sur la usona militŝipo Missouri en la Golfo de Tokio. La alianca armeo lasis la japanan registaron daŭre ekzisti, kaj nerekte regis la okupitan landon.

La Potsdam-Deklaracio

La kondiĉoj de la japana kapitulaco

La Deklaracio de Potsdam (la 26an de julio 1945, Komuna deklaro de Usono, Britio, Sovetunio kaj Ĉinio):

Por forpeli la senrespondecan militismon el la mondo, kaj konstrui pacan, sekuran kaj justan ordon en la mondo, ni poreterne forigos la potencon kaj forton, kiu trompis la japanan popolon kaj kuraĝis agi por konkeri la mondon. La alianca armeo daŭrigos la okupadon, ĝis ĝi rompos la kapablon de Japanio por efektivi militon. La japana registaro devas revivigi kaj fortigi la demokration de la japana popolo kaj devas firmigi la liberecon de parolo, religio, penso kaj fundamentajn homajn rajtojn. (resumo)

Ĉar la Dua Mondmilito estis kontraŭfaŝisma milito, Japanio povis akiri sendependecon, sekurigi siajn suverenecon kaj teritorion, kaj reviviĝi kiel demokratia regno, establinte la Konstitucion de Japanio, kiu deklaris malarmadon kaj rezignon de milito.

Absolvo al la Tennoo fare de Usono

Por trankvile okupi Japanion, preventante la ribelon de soldatoj kaj dekstruloj, kaj ankaŭ revolucion agadon de la japana popolo por komunismigi Japanion, Usono decidis la gvidprincipon, ke la aliancaj landoj ne juĝu la Tennoon kiel militkrimulon en la Tokia Tribunalo, kaj decidis, ke la Tennoo fariĝu simbolo de la rekonstruota demokratia regno Japanio. Tiu kondiĉo de la kapitulaco donis grandan influon al la postmilita japana socio, inkluzive la problemon de militrespondeco.



*Tennoo Showa vizitis
MacArthur, septembro
1945.*

Peco de Historio

Provizora Registaro de la Korea Respubliko

En 1919, post la eksplodo de "La Movado de la 1-a de Marto" kontraŭ la japana kolonia regado, en Ŝanhajo stariĝis Provizora Registaro de la Korea Respubliko. Ĝi estis respublika registaro konsistanta el tri rajte sendependaj organizoj: ŝtata konsilio, provizora politika asembleo kaj kortumo.

La suvereneco de la Korea Respubliko apartenas al la tuta korea popolo.

Ĉiuj koreaj popoloj estas senescepte en egalrajteco.

La leĝdona rajto de la Korea Respubliko apartenas al la politika asembleo, la administrada rajto apartenas al la ŝtata konsilio, kaj la juĝa rajto apartenas al la kortumo.

<Provizora Konstitucio de la Korea Respubliko>

Komence, inter la gvidantoj de la Korea Respubliko estis malakordoj pri la rimedoj por la sendependiga movado. Iuj opiniis, ke la sendependiga movado devas esti kondukata ĉefe pere de diplomatio, tamen aliaj pledis por tio ĉefe pere de armita batalo. Por akordigi tiujn du malsamajn starpunktojn, en 1923 okazis nacia kongreso, sed ne akiriĝis unuanima voĉo. Tial la Provizora Registaro de la Korea Respubliko estis atakata forte.

Post tio, la registaro apenaŭ povis sin subteni kaj jam neniel povis daŭre aktivigi movadon. Poste, dank' al la agado de korea patriota grupo la provizora registaro revigliĝis. La korea patriota grupo estis societo por batalo sub la komando kaj organizado de Kim Gu. Iam li estis prezidanto de la Provizora Registaro de la Korea Respubliko. La grupanoj Li Bong-chang kaj Yun Bong-Gil ĵetis bombon al japanaj gvidantoj, kio estis priatentita de vastaj amasoj. Sekve, la Provizora Registaro de la Korea Respubliko, subtenata de la Kuomintanga registaro de Ĉinio, akiris bonŝancon por restariĝo.

Kun la plivastigo de la milito, la Provizora Registaro de la Korea Respubliko fondis sian armitan forton, "Armeo por Korea Liberigo". Internacie, ili laboris aktive en diplomatio por akiri alilandajn agnoskojn. Por renkonti la liberiĝon, la provizora registaro serioze faris preparojn.

Tamen, en aŭgusto 1945, Japanio subite deklaris sian kapitulacion, kio malpraktikigis la enlandan milit-atan planon de la Armeo por Korea Liberigo. La usona registaro ne agnoskis la Provizoran Registaron de la Korea Respubliko, kaj tial Kim Gu kaj aliaj gvidantoj revenis al sia patrujo, ne



La domo, uzita kiel la oficejo de la Provizora Registaro de la Korea Respubliko, dum aprilo 1944 – decembro 1945.

povante funkcii kiel registaraj gravuloj, sed nur kiel simplaj personoj. Tamen, koreoj ilin varme bonvenigis. Tiuj gvidantoj de la Provizora Registaro de la Korea Respubliko suferis je multaj seriozaj malfacilaĵoj eksterlande dum kelkdekoj da jaroj por la patruja liberiĝo.

Kontraŭmilita Ligo de Japanaj Soldatoj

La japana armeo dum la milito malpermesis al siaj soldatoj fariĝi militkaptitoj. Ĝi havis regulon, ke soldato mortigu sin antaŭ kaptiĝo. Malgraŭ tio ne malmulte da japanaj kaptitoj, post la ricevo de edukado, ekkonsciis, ke tiu milito estas agresmilito, kaj je risko de sia vivo komencis partopreni kontraŭmilitan movadon, alvokante japanajn soldatojn kapitulaci aŭ dizerti for de la frontlinio.

Estis du rimarkindaj japanoj, kiuj organizis kaj direktis kontraŭmilitan movadon inter tiaj japanaj kaptitoj. Unu el ili estis nomata Kaji Wataru, gvidanto de japana proleta kulturmovado. Sub la flago de la Ĉina Kuomintanga Registaro (Chongqing), li organizis la "Sudokcidentan Filion de la Kontraŭmilita Ligo de la Japana Popolo" (fondita en novembro 1939). La alia estis komunisto nomata Nozaka Sanzo. Li estis en agado ĉe Kominterno en Moskvo (Internacia Kominterno), kaj estis sendita al Yan'an responde al la peto de la Ĉina Komunista Partio. Li fondis "Yan'an-an Filion de la Kontraŭmilita Ligo de Japanaj Soldatoj" (fondita en majo 1940). Krome li starigis "Japana Laborista kaj Kamparana Lernejo" por la edukado de japanaj kaptitaj soldatoj.

"Senjinkun" [senĵinkun] (Instrukcio al la Soldatoj en la Fronto) estis devige donita kiel devizo al ĉiuj armeanoj en 1941 fare de Tojo Hideki, la tiama terarmea ministro, por pli streĉi la armean disciplinon. La kontraŭmilita ligo presis sian parodian folion sub la sama kovrilo, kaj disdonis ĝin sekrete en la japana armeo.



Kaji Wataru, la fondinto de la Kontraŭmilita Ligo de la Japanaj Soldatoj (en la mezo).

Parodia flugfolio de "Senjinkun" (Instrukcio al la soldatoj en la Fronto)

Ĉefa Instrukcio:

1. La Tennoa Regno

La Granda Japana Imperio estas la regno de la Tennoo. Malantaŭ la kurteno de la Tennoo, la unika heredanto de miljara linio, fakte tenas regpotencon la militistaj burokratoj, lakeoj de plutokrataroj kaj bienuloj, kaj ili eterne dominas super la popolo.

2. La Tennoa Armeo

La armeo estas sub gvido de la Tennoo kaj estas libera disde politika interveno. Kontraŭe la armeo estas motoro, kiu intervenas en la politikon por konduki la Tennoan regnon al milito. Ĝi direktas perforton al la justo, despotismon al la malfortuloj. Jen estas la spirito de Dio kaj armita forto, kiu kontraŭiras la mondan tajdon.

3. La Armea Disciplino

La kremo de armea disciplino estas la sublima spirito praktiki absolutan obeon al la militista estraro, kiu estas sub la ombrelo de la superega generalisimo Tennoo.

Resumo

En la 3-a ĉapitro ni legis, ke la agresa milito lanĉita de Japanio kaŭzis al la popoloj de Ĉinio kaj aliaj aziaj landoj grandan perdon de vivoj kaj portis al la popolanoj de Koreio, Taiwan kaj aliaj koloniaj regionoj grandan katastrofon. Kiel vizaĝi al la agadoj faritaj de la japanaj trupoj dum la agresa milito, al la gigantaj perdoj, humiliĝoj kaj suferoj de Ĉinio kaj aliaj aziaj landoj estas aferoj malfacilaj, sed ne eviteblaj, por la ĉinaj, japanaj kaj koreaj junuloj. Kiujn historiajn lecionojn oni devas ĉerpi el la milito lanĉita de Japanio kaj el ĝia kolonia regado? Kaj kiel atingi komunan konon pri la historio por la paco de la Orienta Azio?

Unue, dum la agresa milito Japanio, sin pretendante alianca gvidanto de Azio, invadis kaj regadis aliajn aziajn landojn, kaj alportis gigantajn suferojn kaj katastrofojn al la popoloj de diversaj landoj de Azio. Post la fino de la milito oni devas pripensi el la historio de la Orienta Azio, kiel naskiĝis la japana militarismo kaj kiamaniere oni devas oponi militarismon kaj eviti eksplodon de nova milito.

Due, la japanoj kiel unu tuto kunagadis kun la japanaj militaristoj dum ilia agresa milito. Kial do la japanoj povis perdi sian prudenton kaj tutenergie helpi la militon? Kiel formiĝis la koncepto de la japanoj pri siaj etna supereco kaj antaŭjuĝoj pri aliaj nacioj? Pri tio oni devas konsideri la politikajn sistemojn de la Tennoo kaj diktaturo de la militreĝimo de Japanio, kaj ankaŭ pri ilia edukado pri militarismo al la popolanoj.

Trie, la popoloj de Ĉinio, Koreio kaj aliaj aziaj landoj faris penigan kaj bravan bataladon kontraŭ la agresantoj. La rezistmilito de la popoloj de la invadataj kaj subpremataj landoj havis gravan signifon al la venko super la japana militarismo kaj estis grava konsistiga parto de la monda kontraŭfaŝisma milito. Ni devas taksi la signifon de tiu batalado el la vidpunkto de la historio de la Orienta Azio.

Kvare, ni devas ekzameni la militon lanĉitan de Japanio el la vidpunkto de la tuta homaro. Precipe la japanoj devas tion pripensi, el la starpunkto de la popoloj suferintaj, kunigante sian sperton de la ricevita sufero kaj la tiaman atencon de la japana militarismo. Nur tiel, la japanaj popolanoj povos paciĝi kun la popoloj de la Orienta Azio kaj konstrui novan situacion de paco kaj prospero en la Orienta Azio.

Ĉapitro IV

Orientazio post la Dua Mondmilito

Enkonduko

La 15an de aŭgusto 1945, ĉiu nacio en Orientazio spertis sian propran "15an de aŭgusto".

La 15an de aŭgusto en Japanio, la popolo estis informita pri la kapitulaco de Japanio per radie elsendita voĉo de Tennoo. Por la japanoj tiu ĉi tago estis ja tago de kapitulaco. Japanoj prefere nomas ĝin "la tago de militfino".

Multaj aziaj nacioj akceptis la saman tagon tute alie.

En Koreio la popolo hurais pri la sendependiĝo, liberigite de la kolonia regado de Japanio. Tie la 15a de aŭgusto estas nomata "la tago de relumiĝo" aŭ "la tago de liberiĝo", ĉar tiun tagon la lumo revenis post la malluma regado de Japanio, kiu daŭris 35 jarojn ekde 1910 ĝis 1945.

En Ĉinio, kie la batalo daŭris 15 jarojn, la popolo bonvenigis la 15an tagon de aŭgusto kiel triumfon en la kontraŭjapana milito. Kaj oni akceptis la 3an de septembro kiel "la tagon de triumfo en la kontraŭjapana rezista milito", kaj celebris en la sekva tago sian venkon kaj liberiĝon de la milito.

Aliflanke, Usono kaj Sovetunio, kiuj kunlabore bataladis kiel aliancanoj dum la Dua Mondmilito, komencis kontraŭstari unu al la alia fine de la milito koncerne al la postmilita traktado. Je la militfino la kontraŭstaro inter Usono kaj Sovetunio disvolviĝis en konflikton inter la kapitalismaj landoj gvidataj de Usono unuflanke, kaj la socialismaj (aŭ komunismaj) landoj gvidataj de Sovetunio aliflanke. Tion oni nomis "malvarma milito". La malvarma milito signifas streĉitan staton, en kiu oni ne fakte militas, sed akre konfliktas reciproke. Disvastiĝante mondscale, la malvarma milito grande influis al la evoluo kaj reciprokaj rilatoj de orientaziaj nacioj. Kiel ili disvolviĝis?

En la ĉapitro IV ni lernu, kiel ekmarŝis orientaziaj landoj en la "postmilito", kiu komenciĝis la 15an de aŭgusto 1945, kiajn vojojn ili iris, kaj kiaj estis la rilatoj inter ili.

Nova Komenco de la Tri Landoj

1. Malvenko de Japanio kaj Postmilita Reformado

Japanio, kiu malvenkis en la Dua Mondmilito, estis metita sub la okupadon de la alianca armeo, kiu havis kiel siajn celojn de postmilita reformo, la dissolvon de la japana armeoforto (senarmeigo) kaj enladikigon de demokratio. Tiel oni celis malebligi al Japanio ripeti tian invadimiliton, kiu multe suferigis aziajn popolojn. Kiel do ŝanĝigis Japanio per tia reformo?

Homaj rajtoj	Liberigo de politikaj krimuloj Abolicio de la Leĝo por Publika Ordo
5 reformadoj	1. Liberigo de virinoj 2. Subteno al laborist-sindikata movado 3. Liberigo kaj demokratiigo de edukado 4. Nuligo de subpremaj soci-sistemoj 5. Demokratiigo de ekonomia sistemo
Disigo de financaj konglomeraĵoj	Disdivido de gigantaj korporacioj
Agrikultura reformo	Limigo de terposedo de bienuloj
Ŝintoismo	Apartigo de Ŝintoismo for de la ŝtato
Forpelo de publikaĵoj	Forpelo de malnovaj burokratoj

Ekiro al demokratia ŝtato

La bildo estas titolita "Donaco falanta de la ĉielo". La paraŝutantaj objektoj ne estas bomboj, sed oleobareloj kun literoj "demokratia revolucio". Ilin donas Usono, kaj japanoj estas ĝoje ilin ricevontaj. Efektive GHQ (Supera Stabejo de la Alianca Armeo) sinsekve donis instrukciojn. Tamen, ili ne estis simple truditaj desupre. Multaj el la postmilitaj reformoj koincidis kun la deziro de la popolo kaj kun la postuloj de reformmovadoj antaŭ la milito. Jen kial la reformoj efektiviĝis tiel rapide.

Ses Principoj de la Japana Reformado, fare de "GHQ"

Adopto de Japana Konstitucio

La nuna Konstitucio de Japanio estis adoptita en tia cirkonstanco. Ĝi estis promulgita en novembro 1946, kaj validigita en la sekva majo. Malsame ol la antaŭmilita malnova konstitucio, la nova konstitucio estas rimarkinda en tio, ke ĝi agnoskas la suverenecon de la popolo, ke ĝi rezignis militon, kaj ke ĝi vaste garantias fundamentajn homajn rajtojn. La ilustraĵo klarigas la enhavon de la artikolo 9a de la Konstitucio de Japanio kaj ĝi bone montras ties karakteron. Ni pripensu, kia deziro enmetiĝas en ĝi.

Kio okazis al la Tennoo Showa (Hirohito), kiu estis la plej alta respondeculo de la

milito? Kiel ni jam lernis, en la malnova konstitucio (de 1889), la Tennō havis potencon komandi la tutan armeon. En la Ekstrem-Orienta Internacia Milita Tribunalo (Tokia Juĝado) post la milito, oni ne kulpigis lin pro lia respondeco pri la milito, kaj male, laŭ la nova konstitucio li restis kiel la simbolo de la unuiĝo de la japana popolo. Ni pripensu pri la signifo de la afero, referencante la ĉapitron pri la Tokia Juĝado.

Postmilita reformo kaj la ombro de la "malvarma milito"

La postmilita reformo de Japanio fariĝis granda turnopunkto por direkti ĝin al demokratio kaj paco. Ĝi tamen havis ankaŭ limojn.

Ekzemple la situacio de Okinavo estis tute malsama ol tiu de la ĉefinsularo de Japanio. En Okinavo komenciĝis senpera regado fare de la usona armeo jam monatojn antaŭ la kapitulaco de Japanio. Ĝis la reveno de Okinavo al Japanio (1972), la regiono estis sub la administrado de Usono. Transveturado inter Okinavo kaj la ĉefinsularo estis sub severa regado de la usona armeo, kaj por tio oni bezonis pasporton kaj permeson. La mono, kiun oni uzis en Okinavo, estis militaj monbiletoj emisiitaj de la usona armeo kaj usonaj dolaroj. Multe da militbazoj estis konstruitaj tie kaj ankoraŭ nun ili okupas dekonon de la tuta areo de Okinavo. La nombro egalas al tri kvaronoj de la tuta nombro de la usonaj militbazoj en Japanio. Tiel ĉi, la postmilita Okinavo estis tre malproksima de demokratiigo kaj senarmeigo.

Kaj la postmilita reformo ne daŭris longe. Sekvis kontraŭstaro inter Usono kaj Sovetunio, enlanda milito de Ĉinio, kaj divido de Koreio en la sudon kaj la nordon. Kaj dum akriĝas la malvarma milito inter la orienta kaj okcidenta flankoj, Usono ŝanĝis sian politikon al Japanio post 1948, kaj provis fari Japanion "fortikaĵo kontraŭ komunismo". La postmilita reformo perdis iom post iom la elanon de la komenco, kaj plifortiĝis la influo de la malvarma milito. Tion simbolas la Deklaro de Krizostato okaze de la "Batalo por eduko en la regiono Hanshin" (ĉirkaŭ Osako kaj Kobeo).

Malgraŭ tiaj limoj, la postmilita erao de Japanio komenciĝis. Ni pripensu pri la signifo kaj problemoj de la postmilita reformo de Japanio, komparante ĝin kun la postmilitaj Koreio kaj Ĉinio.



"Donaco falanta de la ĉielo", desegnita de Kato Etsuro



La artikolo 9a de la Konstitucio de Japanio difinas, ke Japanio eterne rezignas militon kaj cele al tio Japanio ne posedas teran, maran nek aeran militforton. Tiu ĉi ilustraĵo estas citaĵo el la lernolibro "Rakonto pri la Nova Konstitucio", kiun la ministrejo pri eduko disdonis al la lernantoj de la unua-klasa lernejoj de mezlernejo. La ilustraĵo klarigas la enhavon de la artikolo 9a. El la fornego, kien oni enĵetis tankojn, kanonojn ktp, aperas fajrobrigadaj kamionoj, vagonaroj ktp.

2. Liberiĝo kaj Dividiĝo de Koreio

La 15-an de aŭgusto 1945, Japanio kapitulacis al la Alianco, kaj la Korea Duoninsulo finfine estis liberigita de la kolonia regado. Sed post tri jaroj, la suda kaj norda partoj de Koreio aparte starigis siajn registarojn. Kial la liberiĝo venis, sed ne rekte iris al la sendependiĝo, kaj fine dispartiĝis la lando?

La 38a-grada linio fariĝis la divida linio

La foto montras la mejloŝtonon de la 38a-grada linio de la norda latitudo. La linio estis dividlinio por senarmiligi la venkitan japanan armeon, fare de la usona kaj soveta armeoj. Sed laŭ la evoluo de la malvarma milito, la linio fariĝis dividlinio de la Korea Duoninsulo.

Fondo de aŭtonoma organizo por restarigi la registaron

Post la liberiĝo, la korea popolo esperis socian stabilecon kaj restarigon de la ŝtato. Komence de la liberiĝo, en Seulo kaj diversaj lokoj enlande fondiĝis "Korea Ŝtato-restariga Prepar-komitato". La partoprenantoj de la organizo respondecis pri la sekureca kaj administra funkcioj por socia stabileco. Poste ĉiuj regionaj filioj de la aŭtonoma organizo alinomiĝis "popola komitato".

Sed, la usona armeo, okupinta Sudan Koreion, ne agnoskis la de koreoj mem fonditan aŭtonoman organizon "popola komitato", tamen male, Sovetunio agnoskis ĝin, kaj samtempe subtenis ilin starigi la reĝimon de la komunista partio.

Daŭra politika kontraŭstaro


Malsamaj opinioj estis esprimitaj pri tio, kia ŝtata reĝimo devas esti starigita por la novnaskita Koreio. Iuj aprobis kapitalisman sistemon. Iuj subtenis la socialisman, iuj kunlaboris por usona milita regado en suda Koreio kaj aliaj kontraŭis. Estis movado por unuigi la du grupojn, sed ĝi malsukcesis.



Mejloŝtono de la 38a-grada linio de norda latitudo. Usona armeo okupis la sudon, kaj soveta armeo okupis la nordon de la linio.

En decembro 1945, en Moskvo okazis kunveno de la ministroj de eksteraj aferoj de tri landoj, Usono, Britio kaj Sovetunio, kaj poste la koreaj sociaj kontraŭstaroj pliakriĝis. En la komenco, estis samopinio pri la starigo de la Provizora Registaro en Koreio. Krome, estis decidite, ke antaŭ ol Koreio kapablos esti sendependa, ĝi devas esti en protektorato de Usono, Britio, Ĉinio kaj Sovetunio en la tempodaŭro de malpli ol 5 jaroj. La decido iuj koreoj aprobis, dirante, ke la starigo de la provizora registaro kunportos al Koreio sendependecon. Male, aliaj kontraŭis, dirante, ke la protektorato subtakas la regkapablon de la koreoj.

Por plenumi la decido de la “Tri-ministra Kunveno en Moskvo”, la Usona-Sovetunia Komuna Komitato kunvenis dufoje en 1946 kaj 1947, sed ne atingis konsenton, nur ripetante proprajn poziciojn.



Apartaj registaroj en Suda Koreio kaj Norda Koreio

Post la malsukceso de la Usona-Sovetunia Komuna Komitato, Unuiĝintaj Nacioj decidis, ke la Korea registaro estu establita laŭ la popolbalotado de la koreoj en proporcio de la loĝantoj en Sudo kaj Nordo.

Tamen Norda Koreio kaj Sovetunio opiniis, ke la decido de UN favoras al Suda Koreio kun pli granda loĝantaro. Se oni agas laŭ la decido de UN, Suda Koreio kaj Usono havos pli fortan politikan superecon. Tial Norda Koreio kaj Sovetunio rifuzis la decido de UN. Post la rifuzo de Norda Koreio kaj Sovetunio, UN decidis unue starigi la registaron en Suda Koreio.

Se la plano realiĝas, do la lando disdividiĝos. Tial, en Pyongyang okazis konsulta konferenco de politikaj partioj kaj sociaj organizoj de Suda kaj Norda Koreioj. Tiam eksplodis en Jeju Insulo armita ribelo kontraŭanta elekton nur en Suda Koreio. Sed ĉio ĉi tio neniel povis malhelpi la starigon de sola registaro. Dum la subpremado de la ribelo multaj estis mortigitaj fare de armeanoj, policianoj kaj dekstraj junuloj.

Sekve, en la 15-a de aŭgusto 1948, tri jarojn post la liberiĝo, en Suda Koreio fondiĝis Korea Respubliko, kaj en Norda Koreio fondiĝis Korea Popoldemokratia Respubliko. Pro la monda malvarma milito kaj enlanda interkontraŭstaro, starigo de unuiĝinta registaro en la Korea Duoninsulo malsukcesis, kaj Koreio dividiĝis en la Sudon kaj la Nordon. La kontraŭstaro de Suda kaj Norda Koreioj kaj pliintensiĝanta malvarma milito puŝis la korean duoninsulon al milito.

3. Fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko

En 1949 la Ĉina Popola Respubliko fondiĝis en Pekino. Tio estis granda evento en la monda historio post la finiĝo de la 2-a Mondmilito. Kiel naskiĝis la nova Ĉinio? Kiel ĝi influis la internacian situacion?

Fondiĝo de la nova Ĉinio

Post la venko en la Kontraŭjapana Rezistmilito, kun ŝanĝiĝo de la internacia situacio, precipe kun la komenciĝo de la situacio de malvarma milito, finiĝis la kunlaborado inter Kuomintango kaj la Komunista Partio de Ĉinio (KPĈ). La reganta Kuomintango, helpate de Usono, levis internan militon kontraŭ KPĈ, sed fine komplete fiaskis pro manko de subteno de la popolo, precipe tiu de la kamparanoj. Ĉjang Kajŝek, la ĉefo de Kuomintango, kaj liaj armeoj retiriĝis al la insulo Taiwan, kaj la Komunista Partio de Ĉinio gvidata de Mao Zedong fariĝis la reganta partio.

En la 1-a de oktobro, 1949, sur la turo de Tian'anmen-pordego en Pekino, Mao Zedong proklamis la fondiĝon de la Ĉina Popola Respubliko. Por esprimi sian ŝaton al tiu ĉi nova sendependa lando, oni titolis ĝin "nova Ĉinio". La ĉefurbo de la nova Ĉinio estas Pekino (Beijing). Mao Zedong elektiĝis kiel ŝtata prezidanto, dum Zhou Enlai ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro. La tera areo de Ĉinio estas 9.6 milionoj da kvadrataj kilometroj, kaj la tiama loĝantaro estis 460 milionoj.

Post sia fondiĝo la nova Ĉinio aliĝis al la socialisma tendaro kun Sovetunio kiel la ĉefo, kaj tio grandamezure ŝanĝis la rivaladon de la mondaj politikaj fortoj, naskis profundan influon al la internacia politika strukturo kaj alportis esperon al la popoloj de la tria mondo, subpremata de imperiismo.

*Mao Zedong
proklamas la fondiĝon
de la Ĉina Popola
Respubliko.*

Disvolviĝo de konstruado

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio la kamparanoj, per la agrara reformado, akiris la



aspiratan kulturteron kaj la laboristoj fariĝis mastroj de la fabrikoj. Ilia socia pozicio radikale ŝanĝiĝis kaj ilia labora entuziasmo fariĝis ege alta. La ŝtato faris investadon por grandskala konstruado de bazaj instalaĵoj kaj konstruis multe da fabrikoj, minejoj kaj elektraj stacioj. Pro siaj fido kaj subteno al la nova ŝtato,

ĉinaj patriotaj intelektuloj, tiam troviĝantaj en aliaj landoj, forlasis komfortajn viv- kaj labor-kondiĉojn, rompis ĉiajn obstaklojn kaj revenis al la patrolando el Eŭropo, Usono, Japanio kaj aliaj landoj, kio formis tajdon de reveno de intelektuloj al la patrolando. Inter ili troviĝas famaj sciencistoj Qian Xuesen, Li Siguang kaj Hua Luogeng. Ili faris eminentajn kontribuojn por la konstruado kaj evoluigo de la nova Ĉinio.

La Konstitucio de la Ĉina Popola Respubliko

En 1954 la Ĉina Popola Respubliko promulgis sian konstitucion, kiu difinas la principon, ke “ĉiuj civitanoj estas laŭleĝe egalaj”. La civitanoj ĝuas vastajn rajtojn kaj liberecon. La konstitucio speciale difinis la nacian regionan aŭtonoman politikon en lokoj de naciminoritatoj. La ĉinaj naciminoritatoj,

kvankam ege malmultaj kompare kun la hanoj, ĝuas la saman pozicion kiel la hanoj rilate al la kondiĉoj de materia vivado kaj ŝanco akiri kulturen edukadon. La lingvoj, folkloroj kaj aliaj kulturoj de la naciminoritatoj estas protektataj kaj disvolvataj. La konstitucio klare difinas protekton de la virinaj rajtoj, ekzemple partopreni en politikaj aferoj, akiri edukadon kaj laborrajton, por ke la virinoj povu plene ĝui la rajtojn partopreni en sociajn aktivadojn, kaj iliaj ŝancoj por edukado kaj ofico evidente multiĝis. En Ĉinio cirkulas la diro, ke “virinoj subtenas duonon de la mondo”.

Difinoj de la Konstitucio de Ĉinio promulgita en 1954:

La Ĉina Popola Respubliko estas unuigita multnacia ŝtato.

Ĉiuj nacioj estas egalrajtaj. Diskriminacio kaj subpremo al ĉiu ajn nacio estas malpermesataj. Ĉiu ajn agado detruanta la solidarecon inter ĉiuj nacioj estas malpermesata.

Ĉiuj nacioj havas la liberecon uzi kaj disvolvi sian propran lingvon kaj la liberecon teni aŭ reformi siajn proprajn morojn kaj kutimojn.

En ĉiuj naciminoritataj lokoj praktikiĝas regiona aŭtonomeco. Ĉiuj naciaj aŭtonomaj lokoj estas neapartigeblaj partoj de la Ĉina Popola Respubliko.

Principoj de Paca Kunekzisto

La nova Ĉinio fondiĝis ĝuste en la epoko, kiam la kapitalisma kaj socialisma ideologioj troviĝis en serioza antagonismo. La okcidentaj grandaj potencoj izolis kaj blokis Ĉinion. La ĉina registaro aktive kontaktiĝis kun diversaj aziaj landoj kaj partoprenis en la internaciaj aferoj. En 1954, la ĉina ĉefministro Zhou Enlai, profitante de la paŭzo en la konferenco okazanta en Ĝenevo por solvi la korean problemon, vizitis Hindion kaj publikigis komunan deklaron kune kun la hinda ĉefministro Jawaharlal Nehru. En la deklaro estas 5 principoj por trakti la rilatojn inter landoj kun malsamaj sociaj sistemoj, t.e., reciproka respekto al la suvereneco kaj teritoria integreco, reciproka neagresado, reciproka neinterveno en aliulajn internajn aferojn, egaleco kaj reciproka utilo, paca kunekzisto. La 5 principoj estis konfirmitaj en la Manifesto pri Akcelo de Mondpaco kaj Kunlaboro aprobita en la Bandung-Konferenco (alinome Azia-Afrika Konferenco) okazinta en 1955, kaj iom post iom fariĝis unu el la bazaj normoj de la internaciaj rilatoj.



Zhou Enlai ĉe la Bandung-Konferenco

Peco de Historio

Du vizaĝoj de D. MacArthur

Douglas MacArthur (1880-1964), usona militisto, donis grandan influon al Orientazio. Dum la Dua Mondmilito li fariĝis terarmea generalo kaj post la milito enoficiĝis kiel la supera komandanto de la alianca armeo, la plej alta respondeculo por la regado de Japanio kaj Sud-Koreio. Oni malsame taksas lian laboron post la milito. Ni vidu du kontrastajn taksojn pri li jene:

"MacArthur, la liberiginto"

Kiel ni jam lernis, li havis fortan volon malarmi Japanion kaj efektivigis reformojn. Pro tio en la komenco de okupado formiĝis publika opinio pri li kiel liberiginto. Meznombro po 50 leteroj tage venis al li de japanoj, el kiuj plejmulto estis dankleteroj. Tiaj vortoj, kiel "Generalo MacArthur estas kvazaŭ Dio", "Grandanima generala moŝto" troviĝis en ili. Kelkaj eĉ adoris la foton de MacArthur anstataŭ tiun de la Tennoo.

"MacArthur, ekstrema kontraŭkomunisto"

Dum la korea milito, MacArthur inspektas la fronton en jipo.

Li tamen havis tute alian severan vizaĝon. Li havis tre fortan konvinkon pri kontraŭkomunismo, kaj en la pli akriĝanta malvarma milito, li ekagis laŭkonvinke kiel

komandanto. Lia konvinko plej draste aperis okaze de la Korea Milito. Je la eksplodo de la milito li fariĝis komandanto pri ĉiuj manovroj, kaj ekspedis la usonan armeon al Koreio el Japanio. Por plenigi la vakuon en Japanio, li ordonis organizi Polican Rezervokorpuson.

Komence li fanfaronis frakasi la nordkorean armeon, sed kiam la batalo enmarĉiĝis, li insistis pri la uzo de atombombo kaj atako al la ĉina ĉefteritorio. Oni diras, ke pro la ripetado de malmoderaj insistoj, li estis eksigita de la pozicio de komandanto fare de la usona prezidento.

Liaj du vizaĝoj, kvankam parte pro lia individua karaktero, tamen respegulis la "du vizaĝojn" de la usona politiko al Orientazio.



Fora patrujo

Dum la milito Japanio devige forkondukis 720 mil koreojn kaj 40 mil ĉinojn por labori en Japanio. Multaj koreoj estis senditaj al Saĥaleno, al Manĉurio (Nordorienta regiono de Ĉinio) kaj al la sudaziaj landoj. Aliflanke 6 milionoj da japanoj estis ekster la ĉefinsularo de Japanio, inkluzive de armeanoj. El ili 770,000 estis en Koreio kaj 1,550,000 estis en Manĉurio. Post la Dua Mondmilito ĉiuj ĉi homoj samtempe provis hejmeniri. Sed multaj el ili ne sukcesis atingi sian hejmlandon. Multaj mortis survoje.



La unua vizito al Japanio de "postlasitaj japanaj orfoj", en marto 1988. La "orfoj" veturas al Kioto per Shinkansen (rapidtrajno).

Tragedio de setlintoj en Manĉurio kaj Mongolio

Antaŭ la milito laŭ la ŝtata politiko, multaj japanaj kamparanoj ("Ekspluata Brigado al Manĉurio kaj Mongolio") kaj japanaj junuloj kaj knaboj ("Ekspluata Brigado de Junaj Volontuloj al Manĉurio kaj Mongolio") setlis en Manĉurio kaj (suda) Mongolio. Kiam Sovetunio deklaris la militon kontraŭ Japanio la 8an de aŭgusto, 1945, nemalmultaj el ili estis devigitaj morti, jen postlasitaj kiel ŝildo por la japana armeo, jen pro malsato kaj malvarmego dum forkurado. Krome pli ol 3,000 infanoj, disigitaj disde siaj gepatroj, restis en Ĉinio, kiujn nutris ĉinaj adoptogepatroj ("postlasitaj japanaj orfoj").

Akcidento de la ŝipo Ukishima-maru

La 24an de aŭgusto, naŭ tagojn post la japana kapitulaco al la Alianco, la ŝipo Ukishima-maru subite eksplodis kaj subakviĝis en la haveno Maizuru, gubernio Kioto, Japanio. La ŝipo estis survoje de Aomori al Busan, Koreio. La ŝipo portis ĉirkaŭ 4,000 homojn, kiuj estis plejparte koreoj, mobilizitaj dum la milito, kaj iliaj familianoj.

La kaŭzo de la eksplodo estis, supozeble, flosanta mino de Usono. Kelkaj suspektas, ke tion kaŭzis la japana armeo. Tiam mortis 549 (laŭ la japana registaro), sed mankas informo pri la ceteraj.

Forĵetitoj en Saĥaleno

Ĝis la japana kapitulaco, multaj japanoj kaj ankaŭ mobilizitaj koreoj loĝis en la suda Saĥaleno, kiu estis teritorio de Japanio. Post la milito, Saĥaleno fariĝis sovetunia teritorio, kaj tie restis ĉirkaŭ 300,000 japanoj kaj 42,000 koreoj. Poste tamen hejmenrevena ŝipo servis nur al japanoj, kaj koreoj estis devigitaj resti tie kvazaŭ forĵetaĵo.

"Likvido de la Pasinteco" de Japanio

1. La Tokia Juĝado

"La Tokia Juĝado" estas oficiale nomata "Ekstrem-Orienta Internacia Milita Tribunalo". La Nurenberga Juĝado en Germanio kaj la Tokia Juĝado estis starigitaj de la Alianco por juĝi la nazi-germanajn kaj la japanajn ŝtatgvidantojn, kiuj komencis la Duan Mondmiliton. Ĝis la Unua Mondmilito venkintaj ŝtatoj postulis de la venkitaj monan kompenson kaj teritorian koncedon, sed tio ankaŭ kaŭzis sekvan militon. Tial ekestis la nova ideo ekzameni la respondeculojn en internacia juĝejo kaj ilin juĝi. Krom la "ĝenerala militkrimo", estis aldonitaj la novaj krimkategorioj: "krimo kontraŭ paco" kaj "krimo kontraŭ humaneco". Tiel estis starigita la internacia juĝejo por juĝi la kriminalan respondecon de ŝtatgvidantoj kaj ties malhumanecajn agojn.

Tokia Juĝado

<i>Krimo kontraŭ paco</i>	<i>Invadmilito, aŭ preparado kaj plenumo de milito kontraŭ pakto</i>
<i>Krimo kontraŭ humaneco</i>	<i>Masakrado de ne-batalantoj aŭ kontraŭ-humaneca agado antaŭ la milito, aŭ politika, religia, nacia premo</i>
<i>Krimo kontraŭ ordinara milito</i>	<i>Difinitaj agadoj kontraŭ aliaj landoj fare de batalantoj kaj ne-batalantoj</i>

Krimo kontraŭ paco:

Agresmilito aŭ plano, preparo, komenco, plenumo, aŭ komuna konspiro de kontraŭleĝa milito, malobeinte traktatojn.

Krimo kontraŭ humaneco:

Malhumanaj agoj tiaj, kiel masakro, ekstermo al civiluloj, inkluzive de antaŭmilitaj agoj; aŭ persekuto pro politika, rasa kaj/aŭ religia kialoj.

Ĝenerala militkrimo:

Kontraŭleĝaj agoj fare de batalantoj kaj ne-batalantoj al la kontraŭbatalanta lando. (Manlibro pri Tokia Juĝado, eldonita de Libro vendejo Aoki, 1989)

Juĝitoj

La Tokia Juĝado estis tribunalo por 28 A-klasaj militkrimuloj (tri el ili mortis pro malsano kaj iliaj kazoj estis nuligitaj dum la juĝado), kiuj estis akuzitaj pro "la krimo kontraŭ paco" kaj estis juĝotaj de juĝistoj el 11 aliancaj landoj. Ĝi okazis en la ĉefstabejo de la iama Terarmea Ministrejo en Ichigaya, Tokio (la nuna loko de Sekretariato por Nacia Defendo), dum du kaj duona jaroj ekde majo 1946. Estis malfacilaĵo ĉefe pro tio,

ke la atestaĵoj konsistis nur el eldiroj de la atestantoj, ĉar, tuj post la malvenko, monto da atestaj materialoj estis forbruligitaj de la registaro kaj la armeo por nuligi ilin.

Sed la juĝado havis tre valorplenan signifon, ĉar, se ne estus la juĝado, la japana popolo neniam povus scii, kiel komenciĝis la Azia-Pacifika Milito, kaj ankaŭ pri tiaj tre ŝokaj faktoj, malkaŝitaj de la juĝado, kiel torturo, seksperforto, masakro en Nankino, malhumanaj agoj al militkaptitoj k.a., kiujn la japana armeo faris. En novembro 1948, laŭ la verdikto, estis kondamnitaj al mortpuno: Tojo Hideki (la ĉefministro kaj terarmea ministro ĉe la komenco de la Azia-Pacifika Milito), Itagaki Seishiro (la terarmea ministro, kiu iniciatis la Manĉurian Incidenton kaj plenumis la starigon de la "Manĉuria Respubliko"), Matsui Iwane (la komandanto de la Mezĉinia Regiono, ĉefrespondeculo de la Nankina Masakro), kaj aliaj sume sep personoj. Kaj estis kondamnitaj al dumviva malliberigo Minami Jiro (la terarmea ministro, iama Korea General-gubernatoro) kaj aliaj 15 personoj.



A-klasaj militkrimuloj starantaj en la juĝejo de la "Ekstrem-Orienta Internacia Milita Tribunalo" aŭ Tokia Juĝado.

Nejuĝitoj

Usono, kiu preskaŭ sola okupis Japanion, havis grandan influforton al la juĝado. Laŭ sia politiko glate plenumi la okupadon utiligante la Tennoon, Usono kontaktis kun la tennoaj korteganoj kaj politikistoj, kaj intencis senkulpigi la Tennoon Hirohito, dirante, "la respondeco de la milito apartenas al Tojo kaj aliaj terarmeanoj". Nek burokratoj nek plutokrataroj estis kondamnitaj. La ĉefjuĝisto Webb el Aŭstralio esprimis neordinare sian apartan opinion, dirante, "la permeso de la Tennoo estis necesa por fari la militon. Se li ne dezirus la militon, li devus deteni la permeson". Sed tiu opinio ne efikis al la verdikto.

La juĝo koncernis ĉefe la militon kontraŭ Usono kaj Britio, sed ne la koloniadon de Taiwan kaj Koreio. Nek estis rekte traktata la seksperfortado de la sistemo de "konsolvirinoj" de la japana armeo. Nek kondamnitaj estis la respondeculoj de la Trupo 731 kaj tiuj de la bakteria-kemia milito, kondiĉe ke ili transdonis studmaterialojn al Usono.

Japanio akceptis la verdiktojn de la Tokia Juĝado per la Sanfranciska Pacpakto (la artikolo 11). Pro la usona politiko por la malvarma milito, la juĝado estis interrompita jam post la unua sesio, kaj ĉiuj militkrimuloj estis liberigitaj poste. El la 25 A-klasaj militkrimuloj, escepte de la sep jam mortpunitaj, ĉiuj aliaj estis liberigitaj. Unu el la suspektitoj kiel A-klasa militkrimulo, Kishi Nobusuke, kiu estis la komerc-industria ministro de la Tojo-kabineto, fariĝis poste ĉefministro. Tute nebuliĝis la militrespondeco al Azio, kaj ankoraŭ nun restas la problemo prilumigi la militrespondecon kaj la postmilitan respondecon.

2. La Sanfranciska Pacpakto kaj la Problemo de Kompenso

Kontraŭ la damaĝo fare de la japana armeo en la Azia-Pacifika Milito ankoraŭ nun leviĝas voĉoj de damaĝitoj el aziaj landoj, dirantaj, ke ĝis nun ili ricevis neniom da kompenso. Sed la japana registaro diras, ke ĉiuj problemoj pri kompenso estas jam solvitaj. Kial tia malakordo okazis? Ni pensu pri tio pere de la Sanfranciska Pacpakto.

Sanfranciska Porpaca Konferenco kaj la Pacpakto

La Sanfranciska Pacpakto estas oficiale nomata "La Pacpakto kun Japanio". Ĝi estis aranĝita por fini oficiale la Azia-Pacifikan Militon, trakti la kompencon pro la damaĝo kaŭzita de la milito, kaj plibonigi la rilatojn kun la aliancaj landoj. Por tio 52 landoj, inkluzive de Japanio, partoprenis en la Sanfranciska Porpaca Konferenco, kiu okazis en septembro 1951.

Sed en la najbaraj Ĉinio kaj Koreio, oni levis voĉon kontraŭ ĝi. La korea prezidento Rhee Sung-man diris: "Ni tute ne komprenas, kial ni koreoj, kiuj plej longe batalis kontraŭ la japana imperiismo, estis ekskluditaj el la subskribintaj de la pacpakto." Kaj la

ĉina ĉefministro Zhou Enlai, kiu samtempe estis ministro pri eksteraj aferoj, forte protestis, ke "Usono propravole antaŭenpuŝis la konferencon kaj ekskludis Ĉinion kaj aliajn landojn, kiuj batalis kontraŭ Japanio. Tio detruas la aranĝon por vera porpaca pakto."

Kaj eĉ en Japanio, la Kunsido por Pacaj Problemoj, kiu estas grupo de famaj intelektuloj, Nanbara Shigeru, la rektoro de Tokia Universitato, k.a. esprimis komunikon, ke "Japanio ne aranĝu pacpakton nur kun unuflankaj landoj de la mondo, sed kun ĉiuj landoj, konforme al la pacisma spirito de la konstitucio".

Ĉinio kaj Koreio, ne invititaj al la konferenco

Kial do tiaj kontraŭopinioj estis prezentitaj? Fakte, al la porpaca konferenco ne estis invititaj Ĉina Popola Respubliko, Taiwan (Ĉina Respubliko), Sud-Koreio (Korea Respubliko) kaj Nord-Koreio (Korea Popoldemokratia Respubliko). Usono kaj Britio ne akordis pri la partopreno de Ĉinio aŭ Taiwan, kaj finfine ambaŭ ne estis invititaj.

*Japania ĉefministro
Yoshida Shigeru
subskribas la
Sanfranciskan
Pacpakton, la 8an de
septembro 1951.*



Ankaŭ Sud-Koreio postulis partoprenon, sed tio ne estis akceptita, interalie je la preteksto, ke la estinta kolonio de la venkito ne apartenas al la Alianco. Pri Nord-Koreio oni dekomence eĉ ne surtabligis la diskuton. Kaj inter la partoprenantaj landoj, Sovetunio kaj du aliaj landoj ne subskribis la pakton.

En la sama tago, kiam la Sanfranciska Pacpakto estis subskribita, ankaŭ la Traktato pri Sekureco inter Japanio kaj Usono estis subskribita. Tio simbolis, ke Japanio revenis al la internacia socio je la okcidenta flanko, kies gvidanto estas Usono, dum la rilatoj kun Ĉinio kaj Koreio tamen restis neplibonigitaj.

En nebulo restis la problemo de kompenso

La pakto konsistas el 27 artikoloj kaj pri kompenso estis jene decidite:

La artikolo 14: Japanio devas kompensi la damaĝon de la milito al la aliancaj landoj, sed la nuna stato de la japana ekonomio malfaciligas la plenumon. Tiuj el la aliancaj landoj, kiuj deziras kompenzon, komencu intertrakti pri kompenso tiel, ke japanoj ofertu laborforton (ne monon kaj aĵon). Alie, la aliaj aliancaj landoj rezignu kompenzon. (resumo)

Kiel oni vidas en la malsupra tabelo, laŭ tiu ĉi artikolo preskaŭ ĉiuj aliancaj landoj rezignis kompenzon. La kompenso efektiviĝis nur al la sudorientaziaj kvar landoj, sed fakte ĝi estis ekonomia helpo aŭ komerco sub la nomo de kompenso, kaj Japanio neniel plenumis kompenzon al la individuaj viktimoj.

Kaj sekvante la pakton, Japanio oficiale rezignis sian apartan rajton kaj profitrajton pri Ĉinio, konsentis la sendependiĝon de Koreio, kaj rezignis teritorian rajton pri Taiwan. Sed la pakto preskribis nenion pri kompenso al Koreio kaj Taiwan, kiuj estis ekskolonioj. En ĝi estis decidite nur, ke ili rekte konsiliĝu kun Japanio por trakti la propraĵojn. Unuvorte, la porpaca pakto ne aprobis la kompenzon al la damaĝo en Koreio kaj Ĉinio kaŭzita de la koloniado kaj milito, sed nur lasis la aferon al la dulandaj intertraktadoj.

Tiel la Sanfranciska Pacpakto postlasis multajn problemojn nesolvitajn rilate al la repaciĝo en Orientazio.

Partoprenis	46 aliancaj (Usono, Britio, ktp.)	Rezignis kompenzon
	Filipinoj, Indonezio, Sud-Vjetnamio	Akceptis kompenzon, ekonomie
	Sovetunio, Pollando, Ĉeĥoslovakio	Rifuzis subskribon
Ne partoprenis	Birmo	Rifuzis partoprenon. Poste konsentis ekonomian kompenzon.
	Ĉina Popola Respubliko	Rezignis kompenzon laŭ la Ĉina-Japana Komuna Deklaro de 1972 (Taiwan rezignis kompenzon laŭ la Taiwan-Japana Traktato en 1952)
	Korea Respubliko	Akceptis ekonomian helpon laŭ la Japana-Korea Fundamenta Traktato de 1965
	Korea Popoldemokratia Respubliko	Ne realiĝis la diplomtiaj rilatoj kun Japanio

3. Sociaj Problemoj, Postlasitaj de la Kolonia Regado kaj la Milito

Sub la kolonia regado de la antaŭmilita Japanio, multaj koreoj kaj Taiwan-anoj, kiuj tiam havis japanan civitanecon, vole-nevole ekloĝis en Japanio, inkluzive de tiuj perforte alportitaj. Kaj dum la milito ankaŭ ĉinoj estis perforte alportitaj al Japanio. Kio do okazis al ili post la milito?

Koreoj kaj Taiwan-anoj loĝintaj en Japanio

Kiam Japanio malvenkis, estis pli ol 2 milionoj da koreoj loĝantaj en Japanio. Tio egalas al iom malpli ol 10% de la tiama tuta nombro de la koreoj. Se ne estus la kolonia regado, neniel transloĝiĝus tiom multe da koreoj trans la maron. Unu jaron post la malvenko tri kvaronoj el ili revenis hejmlanden per siaj propraj rimedoj. Sed la ceteraj ĉirkaŭ 650 mil koreoj devis kontraŭvole resti en Japanio, parte pro la severa limigo al elportotaj propretoj, kaj parte pro la neantaŭvideblaj malfacilaĵoj por vivi en la patrio pro la konfuzo, kaŭzita de la duiĝo de la Korea Duoninsulo. Ili kaj iliaj idoj estas la nunaj japanaj koreoj (inkluzive de tiuj, kiuj havas japanan civitanecon). Ankaŭ Taiwan-anoj restis en Japanio pro la sama situacio.

De "japano" al "alilandano"

Dum Japanio estis okupata de la alianca armeo, la koreoj kaj Taiwan-anoj en Japanio oficiale estis rigardataj kiel "japanoj, kiuj havas civitanecon de Japanio", sed malgraŭ tio, ili reale estis arbitre traktataj kiel "alilandanoj". Ekzemple, la japana registaro subpremis la naciecan edukon de koreoj, dirante, ke ili estas japanoj, dum la registaro devigis ilin registri sin kiel "alilandano", aplikante la Dekreton pri Registro de Alilandanoj de majo 1947. Kaj tuj kiam Japanio reakiris sian sendependecon ĉe la Sanfranciska Pacpacto en aprilo 1952, la japana registaro nuligis ilian japanan civitanecon, kaj komencis rigardi ilin kiel ordinarajn alilandanojn, al kiuj estis aplikata la Dekreto por Kontroli El- kaj Enmigradon. Krome ili estis diskriminaciataj pro la civitaneco en aferoj pri sociaj asekuroj, nacia pensio kaj monhelpo al familioj kun infanoj, kaj en dungigo, loĝado k.a.

	Malmobilizitoj el armea servo	Mortintoj dum milito	Totalo
Taiwan	176,877	30,306	207,183
Koreio	220,159	22,182	242,341
Totalo	397,036	52,488	449,524

La nombroj de soldatoj kaj militlaboristoj el la kolonioj

Forgesita postmilita kompenso

Laŭ la Ministerio de Socia Bonfarto de la japana registaro, ĉirkaŭ 450,000 koreoj kaj Taiwan-anoj estis mobilizitaj kiel soldatoj aŭ militlaboristoj en armeo, sub la kolonia regado kaj 52,488 el ili mortis.

Kaj multaj estis amase alportitaj al Japanio kiel laboristoj en karbominejoj, fabrikoj aŭ terkonstruejoj k.a., al diversaj lokoj en Japanio kaj Saĥaleno. Eĉ la koreoj solaj, alportitaj al la ĉefinsularo de Japanio, nombras je ĉirkaŭ 720,000.

En aprilo 1952, la japana registaro komencis kompensi al japanaj eks-soldatoj kaj eks-militlaboristoj, sed ne kompensis al koreoj kaj Taiwan-anoj, pretekste, ke ili ne havas japanan civitanekon. Proteste, koreaj eks-soldatoj kaj eks-militlaboristoj en Japanio ek-movadis por postuli kompencon en 1952. Kaj tio estis la plej frua movado por postuli postmilitan kompencon.

En la 1970aj jaroj la japana registaro estis akuzita al japana tribunalo por kompenso al koreoj atombombitaj en Hiroŝimo kaj Nagasako (ĉirkaŭ 43,000), koreoj forlasitaj en Saĥaleno (ĉirkaŭ 43,000), kaj Taiwan-ano-eks-soldatoj k.a., sed multaj japanoj ne interesiĝis pri tio.

Kaj dum la milito, Japanio perforte alportis ĉirkaŭ 40 mil ĉinojn el la okupataj zonoj al diversaj lokoj en Japanio, kaj ilin perforte devigis laboregi. Post la milito ili revenis Ĉinion. Sed estis esceptaj homoj kiel Liu Lianren, kiu eskapis tuj antaŭ la fino de la milito, kaj kaŝe vivadis en montaro en Hokkaido dum 13 jaroj, kaj estis "eltrovita" de ĉasisto en 1958.

La postulo pri postmilita kompenso altiris atenton nur en la 1990aj jaroj, kiam la problemo de "konsolvirinoj" de la japana armeo fariĝis internacie preparolata temo.



En 1948 sub la kontraŭkomunisma politiko de GHQ (Supera Stabejo de la Alianca Armeo), la japana registaro instrukiis al la guberniestroj la "Ĉefajn punktojn por Trakti Korean Lernejojn". Ili ne permesis al la koreoj instali siajn proprajn koreajn lernejojn sed devigis iliajn infanojn eniri japanan lernejojn. Koreodevenaj japanoj ekbatalis diversloke kontraŭ tio. Precipe en Kobo la batalo akriĝis tiel, ke pli ol 300 personoj estis arestitaj. Tiu ĉi estas foto de la kunveno je la unuajara datreveno de "Batalo por Eduko en la Regiono Hanshin", aprilo 1949.

Restanta socia diskriminacio

Je la fino de 2003 ĉirkaŭ 1,910,000 alilandanoj loĝis en Japanio (1.5% de la tuta loĝantaro). La plej multaj el ili estis koreoj (ĉirkaŭ 610 mil) kaj sekvis ĉinoj. La plejmulto de la koreoj en Japanio estas 2a-5a-generaciuloj, naskiĝintaj kaj kreskintaj en Japanio. Ankaŭ en Japanio validiĝis en 1982 la Konvencio pri la Statuso de Rifuĝintoj, kiu priskribas la egalecon inter en- kaj eksterlandanoj, kaj do malplimultiĝis nacieca diskriminacio en sociaj asekuroj. Sed la problemo de la postmilita kompenso kaj socia diskriminacio ankoraŭ restas nesolvita.

Peco de Historio

Aliaj militaj tribunaloj

Ni vidu la aliajn tribunalojn krom la Tokia Juĝado, kiuj juĝis militkrimojn de la Dua Mondmilito.

Germanio: Nurenberga Juĝado

La Nurenberga Juĝado estas internacia milita tribunalo, en kiu la kvar landoj (Usono, Sovetunio, Britio kaj Francio) juĝis la ĉefajn naziajn militkrimulojn kaj ties organizon. Pli frue ol la Tokia Juĝado, ĝi okazis en la Nurenberga Municipla Juĝejo en Germanio dum unu jaro ekde novembro 1945, kaj donis verdiktojn inkluzive mortpunon. En la juĝado oni adoptis la novajn krimkategoriojn: "krimo kontraŭ la humaneco" kaj "krimo kontraŭ paco", kaj laŭ ili juĝis unuafoje en la historio la kriminalan respondecon de la individuoj, kiuj iniciatis la militon. La Nurenberga Juĝado donis gravan influon al la Tokia Juĝado kaj aliaj postaj militotribunaloj.

En Germanio, post la Nurenberga Juĝado, leĝo estis proklamita por juĝi plu tiujn burokratojn, entreprenistojn, juristojn, kuracistojn ktp, kiuj partoprenis en naziismo kaj helpis ĝin. En 1979 la preskripto de la militkrimoj estis nuligita, kaj eterna persekutado pri naziisma militkrimo fariĝis ebla.

Japanio: Juĝado de B- kaj C-klasaj militkrimuloj

Krom la Tokia Juĝado, ankaŭ juĝado de B- kaj C-klasaj estis establita por juĝi la japanajn militkrimulojn. Dum la Tokia Juĝado oni juĝis A-klasajn militkrimulojn gvidintajn la militon, en B- kaj C-klasaj juĝejoj oni juĝis ordinarajn militkrimojn, kiel masakro kaj kruela trakto al militkaptitoj kaj ĝeneralaj civiluloj. La juĝadojn organizis sep aliancaj landoj, Usono, Britio, Aŭstralio, Filipinoj kaj Ĉinio (Kuomintanga registaro) k.a. en 49 tribunaloj en diversaj lokoj, de oktobro 1945 ĝis aprilo 1951. En la juĝadoj estis akuzitaj 5,700 ekssoldatoj kaj eksmilitlaboristoj, el kiuj 948 estis kondamnitaj al mortpuno. En la Manila Juĝado en Filipinoj Generalo Yamashita Tomoyuki estis kondamnita je mortpuno pro sia respondeco kiel komandanto pri la "Granda masakro en Manilo".

Ne estas bone konata la fakto, ke inter tiuj B- kaj C-klasaj militkrimuloj troviĝis 148 koreoj kaj 173 Taiwan-anoj, kiuj estis kondamnitaj kiel "eksaj japanaj soldatoj". Plejmulto el ili estis militlaboristoj, kiuj estis gardistoj de koncentrejoj de militkaptitoj. Tiuj ĉi koreoj kaj Taiwan-anoj estis punitaj kiel "japanoj" (la nombro de tiuj mortpunitaj estis respektive 23 kaj 26), sed post ilia elprizonigo la japana registaro rifuzis ilian postulon de postmilita kompenso, pretekste, ke ili "ne estas japanoj". Dume la japanaj eksmilitkrimuloj povis ricevi kompenson (emerituron por eksmilitisto).



*Nurenberga Internacia
Milita Tribunalo*

Internacia komparo de la postmilita kompenso

Japanio donis postmilitan kompencon nur al japanaj ekssoldatoj kaj eksmilitlaboristoj k.a. kaj estis ekskluditaj japanaj civiluloj (escepte atombombitojn), ne-japanoj el ekskolonioj de Japanio, kaj aziaj individuoj suferintaj en la milito. Kiel oni do efektivigis la postmilitan kompencon en diversaj aliaj landoj?

Germanio

Germanio (eksa okcidenta Germanio), farinte Federacian Leĝon por Subteno en 1950, subtenis militviktimojn sendistinge de militistoj aŭ civiluloj. En 1956 estis proklamita Federacia Leĝo por Kompenso, laŭ kiu oni donas kompencon en formo de pensio k.a. al la viktimoj de pogromo kaj aliaj naziaj krimoj.

Pli malfrue fonduso kaj regularo estis fonditaj por la viktimoj ne elsavitaj per la Federacia Leĝo por Kompenso. La pagota monsumo de kompenso dum la periodo de post la milito ĝis 2030 estas antaŭkalkulita je 120 miliardoj da markoj. Dum la interlanda jura respondeco de Germanio estis jam finplenumita, tamen en julio 2000 komenciĝis kompenso al individuoj, kiuj estis trude laborigitaj, per la fonduso "Memoro - Respondeco - Estonteco".

Francio

La franca registaro daŭrigas ekde 1919 kompensadon al vunditaj soldatoj kaj postlasitaj familianoj ne nur de francoj sed ankaŭ de ekskolonianoj. Ekzemple, kvankam Senegalio en Afriko, iama franca kolonio, sendependiĝis en 1960, tamen ankaŭ post ĝia sendependiĝo, Francio daŭre donas pension al tiuj vunditaj ekssoldatoj kaj postlasitaj familianoj de mortintaj soldatoj, kiuj servis en la franca armeo en la kolonia tempo sed nun havas senegalian naciecon.

Usono kaj Kanado

Dum la Dua Mondmilito, la usona registaro devige enmetis en koncentrejojn 120 mil japandevenajn usonanojn kiel "malamikcajn fremdulojn". Post la milito, en la 1970aj jaroj, iliaj dua- aŭ tria-generaciuloj starigis movadon por postuli kompencon, kaj en 1988 "la Leĝo por Civitana Libero" estis proklamita. La letero en la foto estas oficiala pardonpeto de la usona prezidento, sendita de post 1990 al ĉiuj postvivintoj de la persekuto. Samtempe al ĉiu estis pagitaj 20 mil dolaroj kiel individua kompenso. Kvankam la celatoj de la kompenso kalkuliĝis je 60 mil, tamen kun la sinteno, ke kulpas la usona registaro kaj ĝi devas preni sur sin la respondecon trovi la celatojn, estis kompensitaj ĉiuj celatoj, kiun ajn naciecon ili havas, kie ajn ili loĝas.

Ankaŭ en Kanado, sekvante Usonon, la registaro plenumis la samajn pardonpeton kaj kompencon, kaj subvenciis la komunumon de japanoj.

Atesto de Li Hang-Nae, unu el la eksaj B- kaj C-klasaj militkrimuloj

(Li haskigis en Koreio en 1925, laboris en koncentrejo de militkaptitoj en Tajlando, estis kondamnitaj al mortpuno en Aŭstralio Jagojor. Poste la puno estis reduktita, kaj li organizis la Asocion "Doshinsha" (1955), kiu ankoraŭ nun ekzistas, postulante kompencon kaj subtenon.)

"Ni ne estas almozuloj. Ni nur deziras, ke la japana registaro pardonpetu mallevi la kapon kun unu vorto 'Pardonon'. Mi kredas, ke tio estas respondeco de Japanio, kiu rekviziis nin kaj eĉ laŭ nin militkrimuloj."

(el Utsumi Aiko, "Dokumento pri Korea B- kaj C-klasaj Militkrimuloj")



Letero de la usona prezidento George Bush, kiu pardonpetas de japandevenaj usonanoj pri la enkoncentrejo dum la Dua Mondmilito.
— El "Manlibro de Postmilita Kompenso", Nashinokisha

Dividiĝo de Orientazio kaj Normaligo de Diplomatiaj Rilatoj

1. Malvarma Milito de Orientazio kaj la Korea Milito

Post la fino de la Dua Mondomilito, en la orientan Azion ankoraŭ ne venis paco, sed male pliprofundigis malpacaj kontraŭstaroj. Post la milito la mondo rapide iris en la direkto al la strukturo de la malvarma milito. En Orientazio la kontraŭstaro pliprofundigis, ĝis fine ĝi eksplodis kiel la Korea Milito.

La Korea Milito

La mapo montras, kiaj movoj estis en Orientazio post la mondomilito.


Post la milito furioze moviĝis la internaciaj rilatoj ĝis 1953. Post la fino de la Dua Mondomilito, en Orientazio ankoraŭ plu daŭris granda skuigo kaj finfine denove eksplodis milito.

En la Korea Duoninsulo fondiĝis du registaroj, kaj poste inter tiuj suda kaj norda registaroj daŭris kontraŭstaro. Tamen la kontraŭstaro transpaŝis la "malvarman militon", kaj fariĝis "varma milito", nomata la Korea Milito, la 25an de junio 1950, kiam la Popola Armeo de Nord-Koreio komencis avanci suden kun la celo "liberigi" la sudan parton de

la duoninsulo.

La milito ne restis milito nur inter la norda kaj la suda registaroj. Unue UN-armeo gvidata de Usono partoprenis al la milito, starante sur la flanko de Sud-Koreio. Ĝi ne nur reprenis Seulon kaj la 38-gradan linion, sed eĉ forpelis la nordan armeon ĝis la landlimo de Ĉinio, celante unuigon de la duoninsulo fare de Sud-Koreio. En tiu momento ĉifoje la Ĉina Popola Volontula Armeo partoprenis en la milito ĉe la norda flanko. Kvankam Japanio ne partoprenis la militon pro la pacisma konstitucio, ĝi tamen helpis Usonon kiel milita postbazo. La Korea Milito tiel fariĝis internacia milito, kies centro estis en Orientazio.

Poste la batalfronto daŭre moviĝis jen norden jen suden ĉirkaŭ la 38a grada linio. Sed fine la 27an de julio 1953,



armistico estis subskribita inter la du flankoj, sed ĝis nun pactraktato ne estis efektivigita.

Kion alportis la Korea Milito?

La damaĝo de la Korea Milito estis tre granda, ĉar bataloj okazis preskaŭ tra la tuta regiono de la Korea Duoninsulo. Kvankam la preciza nombro de la mortintoj estas neklara, tamen oni supozas, ke almenaŭ pli ol du milionoj da homoj aŭ mortis aŭ estis perditaj, el kiuj multaj estis civiluloj. Pro la milito ankaŭ multaj familioj estis disŝiritaj kaj kelkaj milionoj da homoj ne plu povis loĝi kune kun siaj familianoj.

En la Korea Duoninsulo, rezulte de la milito fiksiĝis la divido en la sudon kaj la nordon ĉe la armistica linio. Kaj la usona armeo restis plu post la milito en Sud-Koreio, kio donis grandan influon al la korea socio.

La Korea Milito multe influis ne nur al Koreio, sed ankaŭ al Ĉinio kaj Japanio.

Ĉinio aliĝis al la milito tuj post la fondo de la Ĉina Popola Respubliko. Ankaŭ Ĉinio suferis de multe da viktimoj, inter kiuj troviĝis multaj ĉinaj koreoj, loĝantaj en la nordorienta regiono de Ĉinio. Aldone, dum la milito Usono komencis havi pli fortan influon al Taiwan, kaj tio pliakrigis la kontraŭstaron inter la du flankoj de la markolo de Ĉinio kaj Taiwan.

La influo al Japanio estis tute alia. Unue, ĉar Japanio fariĝis bazo por provizi la usonan armeon per militaj bezonaĵoj, ĝi rapide ekprosperis ekonomie per produktado de militprovizoj. Tio tiam estis nomata "konjunkturo pro la koreaj specialaj mendoj". Aldone, tuj kiam la milito komenciĝis, la japana registaro fondis laŭ la instrukcio de MacArthur la Polican Rezervan Brigadon (origino de la nuna Memdefenda Korpuso). Mallonge dirite, okaze de la Korea Milito Japanio restarigis sian ekonomion kaj samtempe ekpaŝis en la direkto al rearmado, kaj tiel nun komencis transiri la limon de la principo "rezigno de milito", kiun preskribas la japana konstitucio. Japanio konkludis, ĝuste dum la Korea Milito, la Sanfranciskan Pacpakton kaj la Japan-Taiwanan Traktaton, kaj komencis aranĝi la Japan-Korean Traktaton por la normaligo de diplomaciaj rilatoj. Kaj tial la influo de la malvarma milito estis tiel forta, ke la problemoj pri kompenso de Japanio fariĝis nebula.

La Korea Milito tiel plifirmigis la strukturon de la malvarma milito en Orientazio. Kvankam oni diras nuntempe, ke la malvarma milito jam finiĝis en la mondo, tamen ankoraŭ restas kiel antaŭe la divido de la Korea Duoninsulo en la sudon kaj la nordon kaj la kontraŭstaro de Kontinenta Ĉinio kaj Taiwan. Kaj do Orientazio ankoraŭ ne liberiĝis el la strukturo de la malvarma milito. Tiom profundan influon donis la malvarma milito al la socio de Orientazio.



Japana polica rezerva brigado, aŭgusto 1952

2. Normaligo de Diplomatiaj Rilatoj inter Koreio kaj Japanio

En julio 1965, kvankam Korea Respubliko kaj Japanio subskribis traktaton normaligi la diplomatiajn rilatojn, tamen la malsamaj opinioj pri la problemoj de la pasinteco inter la du landoj ankoraŭ daŭras. Kial la problemoj daŭre ekzistis post la normaligo de la diplomatiaj rilatoj?

Fono de la starigo de la diplomatiaj rilatoj inter la du landoj

Por preventi la ekspansion de socialisma forto en Orientazio, Usono esperis, ke Korea Respubliko kaj Japanio restarigos amikajn rilatojn, kaj rolos kiel "ondorompilo" de socialismo. Kun la influo de Usono, dum la Korea Milito, t.e. komence de septembro 1951 la du landoj jam intertraktis pri normaligo. Sed la traktado ne progresis pro la diferencoj de opinioj pri ekzistantaj problemoj.

En 1961, la reĝimo de Park Jong-Hee [Jonghi], kiu kaptis la potencon pere de ŝtatrenverso, nomata "La revolucio de la 16-a de majo", haste starigis la diplomatiajn rilatojn kun Japanio por akiri kapitalon por antaŭenpuŝi la ekonomian disvolviĝon. Kaj Japanio volis penetrigi sian ekonomion al Koreio kaj disvastigi tie sian influon.

Malsamaj komprenoj pri la Korea-Japana Traktato

Post kelkfojaj kunsidoj, Koreio kaj Japanio subskribis fundamentan traktaton pri starigo de diplomatiaj rilatoj. La du landoj deklaris, ke "la Japana-Korea Aneksiĝa Pakto de 1910 kaj ĉiuj antaŭaj traktatoj estas jam senvalidaj". Pri la kompenso, Japanio promesis senkompanse liveri al Koreio 300 milionojn da usonaj dolaroj kaj longatempe kaj malaltaintereze alprunti al Koreio 200 milionojn da usonaj dolaroj. Pere de la fundamenta traktato kaj samtempe kontraktita interkonsento kaj per la 500 milionoj da usonaj dolaroj la problemo de "kompensrajto" estis "finfine kaj tute" solvita. Krome, dum la interkonsenta plenumado, Japanio liveris al la korea popolo ankoraŭ pliajn 300

Disputpunktoj	Korea aserto	Japana aserto
Japana-Korea Aneksiĝa Pakto.	Ekde komence nevalida. La pakto estis kontraŭleĝa.	Ne valida post starigo de nova Korea registaro, 1948.
\$300,000,000 de Japanio al Koreio.	Kompenso por la kolonia regado.	Kapitalo por ekonomia kunlaboro. Donaco okaze de korea sendependiĝo.

milionojn da usonaj dolaroj.

Sed la kompreno pri la traktato estis malsama inter Koreio kaj Japanio.

Problemoj pri starigo de diplomatiaj rilatoj



Pri la starigo de la diplomatiaj rilatoj inter Koreio kaj Japanio estis opinioj en ambaŭ landoj kiuj kontraŭis ĝin.

En Koreio, multaj opiniis, ke establi diplomatiajn rilatojn antaŭ la oficiala pardonpeto de Japanio pri la pasinta invado kaj kolonia regado en Koreio estas humiliga diplomatado.

En Japanio, oponentoj diris, ke la normaligitaj diplomatiaj rilatoj kondukos al intensigon de la milita alianco inter Usono, Japanio kaj Koreio, kiu minacos la pacon en Japanio.

La "Traktato" ne menciis la respondecon de la pasinta kolonia regado, nek pardonpeton. La problemoj pri kompenso al la suferintoj estis intence evitita kaj ankoraŭ restas nesolvita. Pro la diplomatiaj rilatoj sen solvi la pasintajn problemojn, daŭras konfliktoj inter la du landoj. Pri tio ĉi, ankaŭ la korea registaro havas sian respondecon.

Post la normaligo de la diplomatiaj rilatoj inter Koreio kaj Japanio, sub la malvarma-milita situacio en Orientazio, Koreio, Japanio kaj Usono alianciĝis triangle, izolante nordan Koreion, kio konfirmas la norda-sudan dividon.

*Maldekstre:
Manifestacio kontraŭ
establo de japana-
koreaj diplomatiaj
rilatoj, en Japanio*

*Dekstre:
Manifestacio kontraŭ
establo de japana-
koreaj diplomatiaj
rilatoj, en Koreio*

La vojo al vera normaligo

Post la starigo de diplomatiaj rilatoj, la japana Tennoo kaj ĉefministro kelkfoje esprimis sian bedaŭron pri la pasintaj "malfeliĉaj rilatoj". En 1995, la japana ĉefministro Murayama Tomiichi diris: "En la pasinteco, la japanaj kolonia regado kaj agresado alportis al la diversaj nacioj en Azio grandajn vundojn kaj dolorojn. Pri tio ĉi, mi esprimas mian profundan introspektadon kaj elkoran pardon-petadon." Tamen, tio tuŝis respondecon nur moralan, sed ne politikan nek leĝan. La registaroj de la du landoj ja klopodis por normaligi la interrilatojn. En 1998, la korea prezidanto Kim Daejung kaj la japana ĉefministro Obuchi Keizo kune publikigis "Deklaracion pri Korea-Japana Partnereco", en kiu ili emfazis politikan kaj ekonomian kunlaboron kaj kulturan kaj personan interŝanĝojn. Tamen, oni timis, ke sen klarigo pri la vero de la pasintaĵoj kaj pri la respondecoj, la simpla emfazo de interŝanĝaj rilatoj nur portempe kovros la problemojn.

3. Normaligo de Diplomatiaj Rilatoj inter Ĉinio kaj Japanio


En la 1970-aj jaroj, Ĉinio kaj Japanio finfine restarigis la diplomatiajn rilatojn. Tiu ĉi evento multe akcelis la pacon kaj evoluadon en Azio. Do, kiel Ĉinio kaj Japanio normaligis la diplomatiajn rilatojn inter si?

Fono de restarigo de diplomatiaj rilatoj inter Ĉinio kaj Japanio

Ĉinio kaj Japanio havas longan historion de amika interfluo. Tamen la amikaj rilatoj spertis grandegan malfacilon pro la agreso de Japanio al Ĉinio. Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, la japana registaro diplomatie sekvis Usonon kaj prenis malamikan politikon kontraŭ Ĉinio. La rilatoj inter Ĉinio kaj Japanio ĉiam troviĝis en nenormala stato kaj la du registaroj neniam havis oficialan kontakton. Tamen en la komenco de la 50-aj jaroj la du popoloj komencis komercadon inter si kaj ankaŭ la kultura interfluo estis ofta. En 1965 okazis granda renkontiĝo de ĉinaj kaj japanaj gejunuloj en 15 urboj de Ĉinio.

En la komenco de la 70-aj jaroj, forta antagonismo regis inter Sovetunio, Usono kaj Ĉinio. Usono esperis plibonigi siajn rilatojn kun Ĉinio por stari kontraŭ Sovetunio kaj reguligi sian politikon al Azio, kiuj jam alfrontis diversajn obstaklojn. Ankaŭ Ĉinio deziris sin liberigi el la granda minaco de Sovetunio kaj plibonigi la periferian medion. En februaro 1972, la vizito de la usona prezidento Richard Nixon al Ĉinio malfermis la pordon de la rilatoj inter Ĉinio kaj Usono kaj realigis la historian paciĝon inter la du landoj longe starantaj unu kontraŭ la alia. Tiu ŝanĝiĝo alportis ege grandan baton al Japanio. La neregantaj partioj kaj la entreprenistoj de Japanio urĝe postulis normaligon de diplomatiaj rilatoj inter Ĉinio kaj Japanio. Vizaĝe al la senĉese laŭtiĝantaj voĉoj por normaligo de diplomatiaj rilatoj, la nove elektita japana ĉefministro Tanaka Kakuei decidis sekvi la fluon de la epoko, ŝanĝi la malamikan politikon kontraŭ Ĉinio kaj normaligi la diplomatiajn rilatojn inter la du landoj. Por Ĉinio, plibonigo de la rilatoj kun Japanio ne nur utilis al la sekureco kaj stabileco de Ĉinio kaj Azio, sed ankaŭ povis grandamezure rapidigi la iradon de Ĉinio al la mondo. Tial, la ĉina registaro prenis aktivan sintenon rilate tiun ĉi problemon.

Ĉina-Japana Paca kaj Amikeca Traktato, subskribita 12 aŭg. 1978



Normaligo de diplomatiaj rilatoj

En septembro 1972, la japana ĉefministro Tanaka Kakuei unuafoje vizitis Ĉinion kaj la du registaroj subskribis Komunan Deklaron de Ĉinio kaj Japanio,

proklamante finon al la nenormala stato de la du landoj. Japanio nuligis la “Pacan Traktaton inter Japanio kaj Taiwan”, subskribitan en 1952, kaj tiel finis siajn “diplomatiajn rilatojn” kun Taiwan. Ĉinio kaj Japanio realigis la normaligon de la diplomatiaj rilatoj. Pri la milita kompenso de Japanio, kvankam la instanco de Taiwan, sub la premo de Usono, jam proklamis rezigni la postulon al Japanio pri kompenso, kio kaŭzis malfavoran influon al la ĉina registaro por elmeti postulon al Japanio pri la milita kompenso, tamen la ĉina registaro, konsiderante la amikecon inter Ĉinio kaj Japanio kaj ankaŭ tion, ke oni ne pezigu la ekonomian ŝarĝon al la japana popolo, rezignis sian postulon al Japanio pri milita kompenso.



Mao Zedong kaj Zhou Enlai bonvenigas Tanaka Kakuei, la japanan ĉefministron, sept. 1972.

En aŭgusto 1978, Ĉinio kaj Japanio oficiale subskribis la Pacan Amikecan Traktaton. En novembro 1998, surbaze de la traktato la du landoj publikigis Komunan Manifeston. La fundamentaj principoj difinitaj en tiuj 3 dokumentoj fariĝis la bazo de rilatoj de amikaj najbaroj de la du landoj.

La normaligo de la diplomatiaj rilatoj inter Ĉinio kaj Japanio ne nur konformas al la bazaj interesoj de la du landoj, sed ankaŭ faris grandan kontribuon por la prospero de la Azia-Pacifika regiono kaj la monda paco. Post la normaligo de la diplomatiaj rilatoj, la du landoj plioftigis la ekonomiajn kaj kulturajn interfluojn inter si kaj tagon post tago oftigis popolajn renkontiĝojn de la du landoj. Kelkdek mil ĉinaj studentoj studis en Japanio, kaj ankaŭ pli kaj pli multaj japanaj studentoj venis al Ĉinio. Dank’ al la helpo de la ĉina registaro, miloj da japanaj orfoj glate revenis al Japanio. De 1979, la japana registaro liveras al Ĉinio “oficialan helpon por disvolviĝo”, kiu inkluzivas malalt-interezan krediton de japanaj enoj, senpagan kapitalan donacon kaj teknikan kunlaboron, por helpi Ĉinion en ekspluatado de oleo, konstruado de bazaj instalaĵoj, mediprotektado kaj aliaj flankoj. Tio ludis pozitivan rolon por la reformado, pordomalfermo kaj ekonomia konstruado de Ĉinio. Granda nombro da japanaj entreprenoj faris rektan investadon en Ĉinio, kaj tio rapidigis la disvolviĝon de la ĉina ekonomio, kaj samtempe akcelis la kreskon de la komercado kun Ĉinio. La Oficiala Disvolva Helpado havas gravan signifon por Japanio celanta teni sian pozicion de monda ekonomia potenco.

Ekstrakto de la Komuna Deklaro de Ĉinio kaj Japanio (resumo)

Prefaco: La japana flanko, dolore sentante la respondecon pri tio, ke la de ĝi levita milito kaŭzis grandegajn damaĝojn al la ĉina popolo, esprimas profundan introspektion.

Artikolo 1: En la tago de la publikiĝo de tiu ĉi deklaro, la Ĉina Popola Respubliko kaj Japanio proklamis la finiĝon de la ĝisnuna nenormala stato inter la du landoj.

Artikolo 2: La japana registaro agnoskas, ke la registaro de la Ĉina Popola Respubliko estas la unika laŭleĝa registaro de Ĉinio.

Artikolo 5: La registaro de la Ĉina Popola Respubliko proklamis rezigni sian postulon al Japanio pri milita kompenso por la amikeco inter la ĉina kaj japana popoloj.


4. Establo de Diplomatiaj Rilatoj inter Ĉinio kaj Koreio

Pro la intensa malvarma milito post la Dua Mondmilito, Ĉina Popola Respubliko kaj la Korea Respubliko ne havis diplomatiajn rilatojn. Sed laŭ la malfortiĝo de la malvarma milito, la rilatoj inter Ĉinio kaj Koreio pliboniĝis. Do kia ŝanĝo okazis inter Koreio kaj Ĉinio, post la starigo de la diplomatiaj rilatoj?

Interrompo kaj restarigo de la rilatoj inter Ĉinio kaj Koreio

En 1949, la Ĉina Popola Respubliko fondiĝis kaj starigis diplomatiajn rilatojn kun la Korea Popoldemokratia Respubliko, kaj en la 1970-aj jaroj starigis diplomatiajn rilatojn ankaŭ kun Japanio kaj Usono. La Korea Respubliko kaj Ĉinio ambaŭ rekonis la necesecon por la restarigo de la normalaj rilatoj.

En 1983, la evento de la urĝa surterigo de kidnapita ĉina pasaĝera aviadilo en Koreion fariĝis la komenco de la dulanda neoficiala kontakto. Por solvi la eventon, altrangaj ĉinaj funkciuloj vizitis Koreion, kaj Koreio ja afable donis al Ĉinio helpon. Kun tio ĉi kiel ŝlosilo, ekde 1984, koredevenaj ĉinoj en Ĉinio kaj koreoj en Suda Koreio povis reciproke viziti siajn familianojn aŭ amikojn. Ankaŭ ĉina sporta delegitaro partoprenis aparte la Azian Sportkunvenon en Seulo en 1986 kaj Olimpikojn en Seulo en 1988. Kaj koreoj povis vojaĝi al Ĉinio. Do, dulandaj popoloj reciproke havis favoran senton.





Starigo de diplomatiaj rilatoj inter Ĉinio kaj Koreio

De post sia fondiĝo, la nova Ĉinio ĉiam havis intimajn kontaktojn kun la (norda) Korea Popoldemokratia Respubliko kaj (suda) Koreio alte taksis kontaktojn kun Taiwan, pro la jam starigitaj "diplomatiaj rilatoj". Krome, la Korea Duoninsulo estis ĉirkaŭe influita de la malvarma milito, kiu malfaciligis la starigon de diplomatiaj rilatoj inter Koreio kaj Ĉinio, malgraŭ tio, ke senĉese disvastiĝis la dulandaj interŝanĝo kaj kunlaboro. Tamen Koreio kaj Ĉinio jam konstatis, ke la starigo de la diplomatiaj rilatoj povas kunporti al si ekonomiajn avantaĝojn kaj ankaŭ helpas al la ŝanĝo de kontraŭstara stato de la Korea Duoninsulo kaj al la paciĝo en Orientazio. Sekve, finfine stariĝis la diplomatiaj rilatoj inter la du landoj en aŭgusto 1992.

Post la starigo de la diplomatiaj rilatoj kun Ĉinio kaj laŭ la principo de "unu Ĉinio", Koreio rompis la diplomatiajn rilatojn kun Taiwan. Lastatempe, inter Koreio kaj Taiwan la kontaktoj plimultiĝis en neregistara interŝanĝo, kaj en 2004 aerveturado rekomenciĝis. La starigo de la diplomatiaj rilatoj inter Koreio kaj Ĉinio pacigis la atmosferon ĉirkaŭ la Korea Duoninsulo.

Disvolviĝo de la rilatoj inter Ĉinio kaj Koreio

Post la starigo de la diplomatiaj rilatoj inter Koreio kaj Ĉinio, la internacia komerco kaj interŝanĝo kreskis inter la du landoj, kaj fariĝis unu el "la 5 grandaj partneroj de internacia komerco". En 2000 1.3 milionoj da koreoj vojaĝis al Ĉinio, la plej granda nombro de vizitantoj al Ĉinio, post japanoj. En 2000 320 mil ĉinoj vojaĝis al Koreio, okobla kresko kompare kun 1993. Krome, en 1992-2002, pli ol 180 urboj kaj lokaj aŭtonomaj registaroj de Koreio kaj Ĉinio ĝemeliĝis. Pro la seninterrompa disvolviĝo de la rilatoj kun Ĉinio, en Koreio oni diras, ke jam alvenis "la epoko de la okcidenta marbordo". (La maro inter la okcidenta Korea Duoninsulo kaj Ĉinio.)

Lastatempe, la rapide disvolviĝanta Ĉinio instigis koreojn lerni la ĉinan lingvon kaj studi en Ĉinio ("Ĉina modo"), kaj koreaj filmoj kaj muzikoj tre populariĝis en Ĉinio ("Korea modo"). Utiligi la amikecan atmosferon por fortigi la kunlaboron inter la du landaj estas nia tasko.

*Maldekstre:
Koreaj turistoj sur
ferponto de la Yalu-
rivero, la landlimo inter
Ĉinio kaj Norda Koreio*

*Dekstre:
Afŝo de korea filmo ĉe
sondisko-vendejo por
junuloj en Ĉinio*

Peco de Historio

Batalo por la rajtoj de la koreoj en Japanio

Post la milito japanaj koreoj persiste agadis por gardi la rajton de nacieca eduko kaj por nuligi diskriminacion.

Tuj post la milita malvenko de Japanio, koreoj en Japanio fondis naciajn lernejojn por reakiri la korean lingvon, kulturon kaj historion de Koreio, kiuj estis forrabitaj dum la kolonia tempo. Sed en 1948 la japana registaro kun subteno de la GHQ (Supera Stabejo de la Alianca Armeo) avizis, ke "ili bezonas ricevi japanan edukadon, ĉar ili estas civitanoj de Japanio", kaj provis fermi koreajn lernejojn.

Kontraŭ tio arde protestis koreoj en Japanio diversloke por gardi siajn lernejojn. Dum tiuj protestoj 16-jaraĝa korea knabo estis pafmortigita fare de la japana polico (batalo por eduko en la regiono Hanshin, regiono ĉirkaŭ Osako kaj Kobeo). Fine la plejmulto de la lernejoj estis devigitaj fermiĝi aŭ malfondiĝi. Sed la batalo por gardi naciecan edukon daŭris kaj naciaj lernejoj estis poste rekonstruitaj propramane. En julio 2000 ekzistis 131 koreaj lernejoj, de bazlernejo ĝis universitato, en kiuj lernas ĉirkaŭ 20 mil lernejanoj kaj studentoj.

Aliflanke, la generacia ŝanĝo de la koreoj en Japanio progresis, sed daŭris diskriminacio pro civitaneco je dungigo, loĝloko, pensio, monhelpo al la familio kun infanoj kaj postmilita kompenso. Kontraŭ tiaj tendencoj en 1970 procesis koreo de la dua generacio en Japanio kontraŭ kompanio, kiu nuligis la decidon dungi lin pro tio, ke li havas sudkorean civitancon. Li postulis la retiron de tia dunga diskriminacio. Diversloke en Japanio naskiĝis movadoj por subteni lin, kaj en 1974 li plene venkis en la proceso

(Juĝafero pri Dunga Diskriminacio de Kompanio Hitachi).

En la 1980aj jaroj ĉefe koreoj kaj ankaŭ aliaj alilandanoj en Japanio rifuzis fingropremon por atestilo de registro de alilandano, devigatan nur al alilandanoj, kaj en 2000 tiu sistemo estis nuligita (Movado Rifuzi Fingropremon). En tiuj movadoj aktive partoprenis ankaŭ multaj japanoj, kiuj konstatis la diskriminacian sistemon kaj konscion en Japanio kiel "problemon de la japanoj", kaj kune tenis la movadojn.

Jung [jung] Hyang-gyu, koreino de la dua generacio en Japanio (dua de dekstre) procesis kontraŭ diskriminacio pro civitaneco ĉe ekzameniĝo por akiri direktoran postenon en la gubernia oficejo de Tokio. La 26an de januaro 2005, ŝi malvenkis en juĝo de la plej supera juĝejo.



Sed ankoraŭ problemoj restas. Ne sufiĉe ekzistas ebloj lerni la naciajn lingvon, kulturon kaj historion por koreaj infanoj de la dua ĝis kvina generacioj en Japanio (inkluzive de tiuj kun sudkorea, korea kaj japana civitanecoj), kies plejparto frekventas japanajn lernejojn. Kaj diplomitoj de koreaj lernejoj suferas pro malavantaĝo, kiel ekzemple limigo de rajto ekzameniĝi por eniri japanajn ŝtatajn universitatojn. La japanaj koreoj ankaŭ devas ĉiam kunporti atestilon de registro de alilandaneco, kaj kvankam ili pagas imposton same kiel japanoj, ili ne havas politikajn rajtojn partopreni en elektado. Tial ankoraŭ daŭras movadoj por gardi kaj stimuli naciecan edukon, por nuligi la diskriminacian sistemon, por postuli rajton partopreni en regiona politiko, kaj por postuli postmilitan kompenson.

Japanoj revenintaj el Ĉinio

En militkrimulejojn en Fushun kaj Taiyuan en la Ĉina Popola Respubliko fondita en 1949, estis enmetitaj entute 1,109 japanaj soldatoj kiel militkrimuloj. La registaro de la Ĉina Popola Respubliko, malsame ol ĉe aliaj juĝadoj de militkrimuloj fare de la aliancaj landoj, ne juĝis nek mortpunis ilin, sed traktis ilin humane kaj aliflanke kondukis longdaŭran homan edukadon. Dum tiu edukado iamaj japanaj soldatoj spertis akuzojn de ĉinaj viktimoj, por ke ili konsciiĝu pri siaj militkrimoj kaj repripensu siajn agojn.

En 1956 la plejparto de tiuj militkrimuloj estis liberigitaj kaj povis reveni al Japanio. Kaj en la sekva jaro ili fondis la "Kontaktejon de Revenintoj el Ĉinio". La membro-ekssoldatoj atestadis pri la mortigoj, disrabo, seksperfortoj, bruligoj kaj malkonstruoj, kiujn ili faris en Ĉinio. Kial ili daŭrigas tiajn aktivaĵojn? Ilian konvinkon ni povas legi sur la vidbendo, kiu surbendigas iliajn atestojn, "Atesto – agresa milito, de homo al diablo kaj ree al homo", kiu diras jene:

Homo, kiu ĉe sia infaneco eĉ insekton ne kuraĝis mortigi, fariĝis diablo en batalkampo. Tiuj ĉi kulpintoj de kruelaj agoj retrorigardas kun doloro siajn spertojn. Sekve de la humana traktado en militkrimulejoj en Ĉinio ili reakiris homecon kaj post reveno al Japanio ili konsekvence elparolis siajn atencajn agojn. Profunde en ilia koro kuŝas la forta konvinko, ke neniam oni ripetu la samajn fifarojn.

La homoj de la Kontaktejo de Revenintoj el Ĉinio eldonis rememorojn kaj atestojn, partoprenis en filmoj, televidaj elsendoj kaj vidbendaj filmoj, atestis en civitanaj kunvenoj kaj aliaj okazoj. Ili tiel elparoladis dum la tuta vivo pri tio, kial kaj kiamaniere ili kiel japanaj soldatoj kruele agis kontraŭ ĉinoj. Danke al ilia atesto klariĝis la ruiniga "Tri-Neniiga Operaco" de la japana armeo.

Japanaj eks-soldatoj aŭskultas la verdikton en milita juĝejo en Shenyang, Ĉinio.



Resumo

En ĉapitro IV ni lernis pri la historio en Orientazio post la Dua Mondmilito. Precipe jenaj tri punktoj estis la temo de tiu ĉi ĉapitro:

(1) Kiamaniere Japanio, Koreio kaj Ĉinio konstruis novan ŝtaton post la Dua Mondmilito?

En Japanio okazis postmilitaj reformoj, Koreio estis dividita, kaj en Ĉinio fondiĝis Ĉina Popola Respubliko. Tiel la tri landoj spertis malsaman historion.

(2) Kiel iris "la likvido de la japana pasinteco"?

La Tokia Juĝado juĝis la militkrimulojn de la invada milito kaj per la Sanfranciska Pacpakto repaciĝis Japanio kun la aliancaj landoj. Sed restis nesolvitaj diversaj problemoj, kiel la rilatoj kun Ĉinio kaj Koreio, la kompenso de individuaj viktimoj, diskriminacioj kaj antaŭjuĝoj al koreoj en Japanio.

(3) Kiajn rilatojn Japanio, Sud-Koreio kaj Ĉinio havis post la milito?

En Orientazio la kontraŭstaroj de la malvarma milito forte influis, kion plej klare montris la Korea Milito. Japanio kaj Sud-Koreio, Japanio kaj Ĉinio starigis diplomatajn rilatojn fone de la malvarma milito, Sud-Koreio kaj Ĉinio fone de la disfalo de la malvarma milito. Tamen ankoraŭ restas profundaj kontraŭstaroj en Orientazio.

Tiel la malvarma milito havis profundan influon al la postmilita Orientazio. La malvarma milito influis ne nur la dividon de Koreio en la nordan kaj la sudan aŭ kontraŭstaron inter la kontinenta Ĉinio kaj Taiwan. Pro la malvarma milito, persekuto pri respondeco de la japana koloniismo kaj agresa milito same kiel politiko por kompenso ne sufiĉe plenumiĝis. Tiusence, la "antaŭmilitaj" problemoj restas nesolvitaj ankaŭ en la "postmilita" tempo ĝis hodiaŭ.

Mondskale oni diras, ke la malvarma milito finiĝis, sed en Orientazio ankoraŭ restas ĝia strukturo. Ankaŭ la vundoj de la "antaŭmilita" koloniismo kaj agresa milito restas. Nun, en la postmilita periodo, kiuj problemoj estas solvitaj, kiuj problemoj restas solvotaj, kion ni devas fari por vera interkompreno kaj paco? Ni pripensu en la sekvanta ĉapitro.

Fina Ĉapitro

Taskoj por Paco en Orientazio en la 21a Jarcento

Enkonduko

La pasintajn 19an kaj 20an jarcentojn makulis invadoj, militoj, detruoj kaj ekspluatadoj. Ankaŭ en Orientazio ne ĉesis disputoj pri diversaj punktoj; la kolonia regado kaj invadmilito fare de Japanio, la strukturo de malvarma milito, landdivido kaj konfliktoj, ktp.

La popoloj deziras, ke la 21a jarcento fariĝu paca erao, kiam ĉiu homo sur la tergloba ĝuos kunhelpon, kunlaboron kaj pli riĉan vivon. Ankaŭ en Orientazio oni deziras, ke oni finu disputojn kaj konfliktojn, kaj realigu novan kunlaboron kaj solidarecon. Por tion fari, ni rekomendas reordigi la nekomfortan rilaton de pasintaj tagoj, kaj starigi la dezirendan rilaton por estontaj tagoj. Antaŭ ĉio koloniismo kaj invadmilito devas esti introspektataj, kaj la problemoj de kompenso kaj monkompenso por la viktimoj pro tio devas esti solvitaj; ekzemple la problemoj de la atombombitoj aŭ de la japanarmeaj konsolvirinoj estas nepre solvendaj taskoj. Kiam tiuj problemoj solviĝos la vera likvidado de la estinteco atingos sian celon.

Oni povas fari likvidadon de la estintaj aferoj surbaze de ĝusta kompreno pri la pasinta historio. Sed lastatempe, male la sinteno senkulpigi tiujn kolonian regadon kaj invadan militon plifortiĝas. Jen estas similaj ekzemploj: Diservo al la sanktejo Yasukuni, la distorda prezento de historia lernolibro fare de Japanio. Por paca Orientazio, konsciante, kio estas la problemoj de tiu sinteno, oni devas klopodi agi kontraŭ tiu sinteno.

Unu el la plej gravaj punktoj estas, ke ni devas havi firman konvinkon, firmigi la pacon de Orientazio, kaj pere de tio, ni kontribuu al la mondpaco. Gravaj ne nur registaroj, sed ankaŭ la solidareco kaj klopodo de ne-registaraj organizaĵoj. Eventuale, la konstruo de esperplena estonteco dependas de vi, junaj legantoj, kiuj legas tiun ĉi libron.

1. Kompenso al la Forlasitaj Homoj

Post la 2-a Mondmilito, solviĝis la problemoj pri kompenso kaj postula rajto inter la registaroj de Japanio kaj Ĉinio kaj inter tiuj de Japanio kaj Korea Respubliko. Tamen, kial la problemoj de individuaj postuloj pri kompenso al la viktimoj de la kolonia regado kaj agresa milito ankoraŭ ne estas solvita?

Komenco de popola procesado kontraŭ Japanio

En 1972 Son Jindu de Korea Respubliko elmetis postulon al la japana registaro pri milita kompenso pro la eksplodigo de la atombomboj kaj tiel komencis la individuan postulon al Japanio pri kompenso. Li estis viktimo de la eksplodo de la atombombo en Hiroŝimo. Por kuraci la malsanon kaŭzitan de la eksplodo, li kaŝe penetris en Japanion, sed estis arestita pro malobservo al la administra regularo de en- kaj el-landiĝo. Post kiam li estis liberigita, li procesis kontraŭ la japana registaro kaj gajnis la proceson. Post tio, multaj viktimoj de la milito el Ĉinio, Korea Respubliko kaj multaj aliaj landoj unu post alia elmetis postulon al la japanaj registaro aŭ entreprenoj pri milita kompenso. Krome, ankaŭ la Hongkong-aj civitanoj faris proceson al la japana registaro pro perdo kaŭzita de troa emisio de militaj monbiletoj dum la okupado de la japana armeo. Ĝis nun jam estis preskaŭ 80 kazoj de elpeto de milita kompenso al japanaj tribunaloj fare de diverslandaj viktimoj. Krome, estis aliaj procesoj en la tribunaloj de la propraj landoj de la viktimoj.

Elpeto de la individua postulo pri milita kompenso fare de viktimoj de la milito estas rezulto de la disvolviĝo de la postmilitaj internaciaj rilatoj, kaj ankaŭ rezulto de tio, ke la homrajta konscio de la postvivantaj viktimoj plifortiĝas, t.e., la homrajta problemoj estas ĝenerale atentata de la internacia socio. Ili opinias, ke kvankam la problemoj pri kompenso inter la registaroj jam estis solvita, tamen estas tute necesa la kompenso al individuaj viktimoj de la milito. La signifo de la popola procesado por kompenso estas ne nur ekonomia, ke oni “faru likvidon al la pasinteco”, sed ankaŭ humanisma, ke oni

La koreaj viktimoj de la atombombo, kiuj ricevis unuafoje kompencon de la japana registaro pere de la Korea Ruĝa Kruco en 2003.



determinu la militan respondecon de Japanio kaj la japanaj entreprenoj per la procesado kaj ebligigado, ke la viktimoj de la milito aŭdigu en la tribunalo sian voĉon por restarigi sian dignon, ke la juna generacio de Azio serioze konsideru kaj eliru historiajn lecionojn por kune vizaĝi al la estonteco.

La kazo de Liu Lianren (devigita laborulo)

En 1944 Liu Lianren kaj multaj aliaj ĉinoj estis forkaptitaj de la japana armeo al Hokkaido por perfortita laboro. Pro turmentado neeltenebla, Liu Lianren forfuĝis profunden en la montaron

de Hokkaido en 1945 kaj de tiam vivis 13-jaran sovaĝulan vivadon, ĝis 1958, kiam li estis trovita de lokaj ĉasistoj kaj revenigita al la patrolando. En la 90-aj jaroj de la 20-a jarcento li kvinfoje iris al Japanio por malkovri la krimojn de la japanaj militaristoj. En 1996 li elmetis proceson kontraŭ la japana registaro, sed li forpasis en 2000. En 2001 la loka tribunalo de Tokio verdiktis, ke la japana registaro faru kompenson al Liu Lianren je 20 milionoj da japanaj enoj. Sed la japana registaro faris apelacion al la Supera Tribunalo de Tokio. Liu Huanxin, filo de Liu Lianren, laŭ la postlasita volo de sia patro, daŭre faras procesadon kontraŭ Japanio. Post klopodo de japanaj amikaj personoj, oni starigis monumenton por Liu Lianren en Hokkaido.

Rezulto de popola procesado por kompenco

Ĝis nun la procesantoj kontraŭ Japanio por kompenco inkluzivas konsolvirinojn de diversaj landoj kaj regionoj de Azio kaj viktimojn de seksatenco, viktimojn de bakteria milito kaj ĥemiaj armiloj postlasitaj de la japana armeo, devigitajn laborulojn kaj viktimojn de "sendistinga bombado". Ili postulas, ke la japana registaro agnosku la historiajn faktojn de milita damaĝo, agnosku la militan respondecon kaj donu kompenson. Plejparto de la akuzantoj de la popolaj procesoj ankoraŭ ne akiris kontentigan rezulton. Oni atingis paciĝon nur en tre malmultaj procesoj.

Plejparto de la procesoj ne akiris sukceson pro tio, ke la tribunalo elmetis 2 kialojn. La unua estas "preskriptiĝo". Laŭ la japana Civila Leĝo, la plej longa tempolimo de la rajto por peti kompenson pro damaĝo estas 20 jaroj. Se pasis 20 jaroj, la rajto nature malaperis. La dua estas la tiel nomata "ŝtata senrespondeco". Japanio opinias, ke la tiama leĝo dum la milito ne preskribis, ke la ŝtato havas la respondecon fari kompenson al militaj viktimoj. Tamen, lastatempe iuj lokaj juĝejoj kaj superaj juĝejoj en sia juĝo jam negis la kialojn de "preskriptiĝo" kaj "ŝtata senrespondeco". Ekzemple, en iuj verdiktoj oni opinias, ke la principo de "preskriptiĝo" ne estas justa por procesoj de serioza damaĝo al homaj rajtoj. Sed la japana Plej Alta Juĝejo ankoraŭ rifuzas akcepti la postulon de la viktimoj de la milito pri kompenco. Nuntempe tiuj du problemoj ankoraŭ estas grandegaj leĝaj obstakloj.

Por esti fidinda al la internacia komunumo, Japanio devas serioze trakti la kazojn de milita kompenco al la aziaj popoloj kaj kuraĝe preni la militajn respondecojn.

Klopodo por solvi la problemon de milita kompenco

En la 1990-aj jaroj fondiĝis multaj civitanaj grupoj, kiuj subtenas la procesadon de militaj viktimoj por kompenco. Ankaŭ en Japanio troviĝas multaj civitanaj grupoj, kiuj donas helpon al la militaj viktimoj en ilia procesado. Kun "Asocio de Subtenado al Procesado de Ĉinaj Militaj Viktimoj", advokatoj kaj civitanaj grupoj subtenantaj la procesadon de diverslandaj viktimoj kune faris senlacan klopodadon kun la viktimoj de la milito. Ankaŭ erudiciuloj, advokatoj kaj civitanoj de Ĉinio, Japanio kaj Korea Respubliko faris vastan enketadon kaj esploradon por sekvi la verajn faktojn de la historio kaj liveris abundajn materialojn por la procesado de la militaj viktimoj.

2. Japanarmejaj Konsolvirinoj kaj la Virinaj Homaj Rajtoj

Ankoraŭ ne estas solvitaj diversaj problemoj de pasintaj tagoj inter Ĉinio, Japanio kaj Koreio. Inter ili, japanarmejaj konsolvirinoj estas unu el la simbolaj problemoj solvendaj por solvi konfliktojn kaj kontraŭstarojn de la 20-a jarcento, kaj por bonvenigi la 21an jarcenton de la paco. Ni pensu, kiuj klopodoj estas bezonataj por solvi ĉi tiujn problemojn, kaj kiun direkton ni iru por la paco inter la tri landoj de Orientazio.

Merkreda manifestacio postulas pardonpeton kaj kompenson de la japana registaro

En ĉiu merkredo antaŭ la japana ambasadorejo en Koreio okazas manifestacio postulanta la solvon de la problemo de japanarmejaj konsolvirinoj, kaj la tiel nomata Merkreda Manifestacio daŭras ĝis la nuna momento ekde la 8a de januaro, 1992. Kial tiu ĉi manifestacio daŭras pli ol dekon da jaroj?

La merkreda manifestacio fariĝis unu el la edukaj lokoj, kie partoprenas ne nur la viktimoj sed ankaŭ civitanaj organizoj, civitanoj kaj studentoj. Plie tiu evento fariĝis internacia ligilo pro la partopreno de homoj de diversaj landoj inkluzive japanojn.

En ĉiu merkreda manifestacio la viktimoj kaj helporganizaĵoj, por solvi la problemon de eksaj japanarmejaj konsolvirinoj, postulas de la japana registaro la jenon:

Agnosku la fakton de perforta aresto

Montru la veron, punu la respondeculojn

Enmetu tiun fakton en historiajn lernolibrojn, kaj eduku laŭ tio

Oficiale pardonpetu

Kompensu nome de la japana registaro

Konstruu dokumentejon

Socia atentigo de la problemo de japanarmejaj konsolvirinoj



En la 1970aj jaroj, la problemo de eksaj japanarmejaj konsolvirinoj ektiris atenton, sed tiam tiu afero ne evoluis kiel grava soci-koncerna afero. En la mezo de 1980aj jaroj seksviolento kaj seksmolestado fare de la nacia aŭtoritatularo tiris socian atenton, kaj samtempe la problemo de la eksjapanarmejaj konsolvirinoj tiris publikan atenton. De post tiam, en la 1990-aj jaroj, virinaj organizaĵoj agadis, postulante de la japana registaro malkaŝon de la vero, ktp. Tiu movado plivastiĝis ne nur

En Koreio, sed ankaŭ en la tuta Azio: Japanio, Norda Koreio, Filipinoj, Taiwan kaj Ĉinio. Sed la japana registaro asertis, ke la varbo de konsolvirinoj dum la milito estis farita de neregistaraj kompanioj, tial rilatas nek la registaro, nek la armeo.

De silento al atesto

La japana registaro plurfoje diris, ke la registaro ne respondecas je la problemo. Tiam Kim Hak-Sun kuraĝe atestis publike, ke ŝi estis konsolvirino de la japana armeo dum la Dua Mondmilito. Sekvante tiun ateston, multaj eksaj konvolviroj kiuj loĝis dum la pasintaj 50 jaroj kaŝe en la socia indiferenteco, publike atestis pri konsolvirineco. Dokumento trovita montras, ke la japana armeo establis konsolejojn kaj administris ilin. La japana registaro ne plu povis eviti la respondecon.

Daŭris kunvenoj de internacia solidareco kaj simpozioj, en kiuj oni postulis de la japana registaro oficialan pardonpeton kaj juran kompenson. La Komisiono pri Homaj Rajtoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj aliaj internaciaj homrajtaj organizaĵoj adoptis rezoluciojn, ke la problemo de la japanarmejaj konsolvirinoj estas militkrimo, kaj la japana registaro devas agnoski la aferon, kaj la registaro devas konfesi sian respondecon.

Por forigi militon kaj militkrimon

Kiam la fakto malkovriĝis kaj internacia premo plifortiĝis, Kono Yohei, ministro de internaj aferoj, en sia oficiala anonco en 1993, agnoskis, ke "varbado, transporto, administrado de konsolvirinoj estis faritaj kontraŭ la voloj de la koncernataj virinoj", "sub la kontrolo de la tiama armeo, tiu evento difektis profunde la dignon de multaj virinoj", kaj esprimis "elkoran pardonpeton kaj bedaŭron".

Sed la japana registaro, neglektante la rezolucion de internaciaj organizaĵoj, provis solvi la problemon en civila nivelo, doni konsolmonon nome ne de oficiala kompenco, sed de neregistara organizo nomata "Azia Pacama Popola Fonduso por Virinoj". Multaj konsolvirinoj rifuzis la monon kiel "konsolmonon".

Kontraŭ la respondo de la japana registaro, aziaj virinaj organizaĵoj kaj civitanaj organizaĵoj el Japanio, Filipinoj kaj Usono ekprocesis, postulante oficialan kompenson de la japana registaro. En 2000 en Tokio, Japanio, civitana tribunalo okazis, en kiu japanaj altnivelaj oficiroj, inkluzive la japanan Tennoon Hirohito estis akuzitaj. Tiuj klopodoj internacie daŭras, pro la konvinko, ke similaj krimoj ankoraŭ suferigas virinojn kaj similaj krimoj ne plu ripetigu.



Merkreda manifestacio

Raporto de Radika Kumarswami, UN Komisiono pri Homaj Rajtoj, 1996.

La japana registaro devas oficiale kaj dokumente pardonpeti al la viktimoj kiel la konsolvirinoj.

La japana registaro devas malkaŝi la tutan dokumentaron pri la administrado de la armeaj konsolejoj.

La japana registaro identigu la krimulojn pri la konsolvirinoj kaj punu ilin.

3. Lernolibro de Historio

Jam pasis 60 jaroj de post la fino de la Dua Mondmilito. Malplimultiĝas la homoj, kiuj memoras la kolonian regadon kaj la agresan militon en la pasinteco kiel sian propran sperton. Por ne ripeti la tragediojn de la pasinteco, ni nepre lernu el la historio. Tiam la lernolibro de historio estas, por multaj junuloj, la unua enirejo al la historio.

Priskribo pri la milito

Jenaj frazoj estas citaĵoj de la parto pri la Dua Mondmilito, cititaj respektive el (1) lernolibro de historio por mezlernejoj de Sud-Koreio; (2) lernolibro de historio por mezlernejoj de Ĉinio; (3) unu el la lernolibroj de historio aprobitaj de la registaro por mezlernejoj de Japanio.

La sama situacio dum la Dua Mondmilito, sed priskribita malsame



Korea lernolibro ①

Nia lando fariĝis provianta bazo por la agresmilito de la japana imperiismo...La japana imperiismo ne nur forrabis materialojn, sed ankaŭ devige rekviziciis koreojn por turmentaj laboroj en minejoj kaj fabrikoj, kaj trudis la sistemon de konskripcio kaj memvolaj soldatoj de koreaj studentoj. ...Tiel la japana imperiismo forrabadis niajn materialajn kaj homajn riĉfontojn, kaj dume ĝi efektivigis politikon nuligi nian nacion kaj nacian kulturon.



Ĉina lernolibro ②

En la okupitaj zonoj la japanaj agresantoj daŭrigis kolonian regadon per bajonetoj. Ili instalas mekanismon subpremi la ĉinan popolon, nome ĝendarmon, policon, juĝejon, kaj malliberejon ktp. La armeo, polico kaj spionoj ĉie faris ekstremajn brutalaĵojn. Ili arestis ĉinajn loĝantojn laŭplaĉe, torturis kaj murdis ilin.



Japana lernolibro ③

Tio (venkoj de la japanaj armeoj en la unuaj bataloj de la milito kontraŭ Usono kaj Britio) estis frukto de kunlaboro de la lokaj homoj, kiuj suferadis pro la koloniaj regadoj de blankuloj dum kelkcentoj da jaroj. Tiuj ĉi venkoj de Japanio en la unuaj bataloj kreskigis revon kaj kuraĝon por sendependiĝo de multaj homoj en la suda Orientazio kaj Hindio. ...La japana registaro nomis tiun ĉi militon "La Granda Orientazia Milito". Kaj ĝi deklaris, ke la celo de la milito estas memstareco kaj memdefendo de Japanio, liberigo de Azio el la kolonia regado de Eŭropo kaj Usono, kaj konstruo de "Kunprospera Sfero de Granda Orientazio".

Malsamaj perceptoj pri la samaj aferoj. Nur ③ priskribas kvazaŭ Japanio faris bonaĵon per la milito. Tiu priskribo tre multe diferencas de ① kaj ②, kiuj enfazas la damaĝon de la milito. Ankaŭ en la lernolibro ③ troviĝas iom da priskribo pri la faktoj similaj al ① kaj ②, sed kun komento, ke spite de tiaj malfacilaĵoj multe da popolanoj bone laboris kaj bone militis, dezirante la venkon. Ĝi skribas kvazaŭ tio estus neevitebla por venki en la milito. Kiel utilas al la amikeco kaj paco de la orientaziaj nacioj tia memormaniero pri la historio?

En Japanio privataj libroeldonejoj redaktas lernolibrojn kaj ilin poste kontrolas la registaro. Oni rajtas uzi nur aprobitajn lernolibrojn en lernejoj laŭ la regulo. La lernolibro de ③ estas "Nova Lernolibro de Historio", aprobita en 2001. Kompreneble ne ĉiuj lernolibroj de historio havas similan priskribon. Sed ĝia apero elvokis grandan reagon en Japanio, kaj en Ĉinio kaj Koreio. Kaj pro tio ĉi tiu lernolibro preskaŭ nenie estas uzata nun ĝis marto 2005.

Japania lernolibro de historio, kaj Koreio kaj Ĉinio

Ne la unuan fojon japana lernolibro de historio estis kritikita internacie. Ekde ĉirkaŭ la malfruaj 1950aj jaroj la japana registaro, pere de la aprobpolitiko de lernolibroj, ne aprobis lernolibrojn kiuj skribis pri la faktoj de la agresmilito kaj uzis la vorton "invadi". En 1982 la registaro kontrolis la lernolibrojn tiel, ke ili skribu nebule pri la faktoj de agresmilitoj kaj pri la Nankina Masakro kaj aliaj atencoj, kaj uzu la esprimon "tumulto" por priskribi "La Movadon de la 1-a de Marto", la sendependiga movado en Koreio 1919. Kontraŭ tio leviĝis protesto de la popolo en Ĉinio kaj Koreio. La moderna historio de Japanio interrilatas profunde kun la samtempa historio de Koreio kaj Ĉinio. Kaj kiel la japana popolo memoras la pasintecon, estas plej grave por la popolo de Ĉinio kaj Koreio. Post tiu afero en 1982, la japana registaro aldonis al la kriterioj por aprobi lernolibron novan principon. Laŭ la aprobpolitiko de historiaj libroj, pri la traktado de la historiaj aferoj rilataj al najbaraj aziaj landoj en la moderna tempo, oni devas konsideri surbaze de la vidpunkto de la internaciaj kompreniĝo kaj kunlaborado.

Tamen la japana registaro denove elpaŝis en la direkto malplimultigi aŭ neniigi la priskribojn rilatajn al la kolonia regado al Koreio kaj la respondeco pri la Dua Mondmilito. Tio aperis kiel la problemo de la lernolibro de la jaro 2001.

Estas tre dolorige rigardi rekte la historion de la pasintaj atencado kaj damaĝado. Eble ni povus ne rigardi malagrablajn aŭ hontindajn aferojn. Sed ni ne povas krei pacon en la estonteco sen rekta rigardo al la faktoj en la pasinteco. Ni pripensu, kiel ni devas memori la pasintecon.

4. La Demando pri la Ŝintoisma Sanktejo Yasukuni

Ĉiufoje, kiam japanaj politikistoj adorvizitas la ŝintoisman sanktejon Yasukuni, leviĝas disputoj en la internacia socio. Kio efektive estas tiu sanktejo, kaj kial leviĝas tiom multe da disputoj?

Kio estas la ŝintoisma sanktejo Yasukuni?

La ŝintoisma sanktejo Yasukuni originas de la sanktejo nomata "Shokonsha" (sanktejo por momente gastigi spiriton), konstruita ĉe Kudan en Tokio en 1869, unu jaron post la Meiji-Restaŭro. Tie sanktuligitaj, kiel la gardospiritoj de la lando, estas la falintoj de la militoj je la nomo de Tennoo. Nome, la militfalintoj estis plej alte honorataj kiel modelaj fideluloj al la Tennoo kaj al la ŝtato, kaj tio sekve efikegis por persvadi kaj peli la popolon al la milito.

Ĝis la malvenko de Japanio en la Dua Mondmilito, la sanktejo Yasukuni estis administrata de la Tera kaj la Mara Armeoj, malsame ol ordinara ŝintoismaj sanktejoj, kiuj estis administrataj de religiuloj. La sanktejestro de Yasukuni estis ĉiam la japana ter-armea generalo. La sanktejon gardis ĝendarmo. Tiel ĝi estadis la armea religiejo.

Ekde la Interna Milito dum la Meiji-Restaŭro en 1868 ĝis la Azia-Pacifika Milito en 1945, troviĝis pli ol 2,460,000 da militfalintoj, tie apoteozitaj kiel militherooj.

Post la Dua Mondmilito, la Okupacia Armeo dekrete pri ŝintoismo, kaj tial la sanktejo Yasukuni estis disigita de la ŝtata potenco, fariĝante unu el la kutimaj religiaj instancoj. La Japana Konstitucio diktas la apartigon de politiko kaj religio, kaj malpermesas, ke la ŝtato faru religiajn ritojn. Sed post la validigo de la Sanfranciska Pacpacto, aperis en la japana socio tendenco fornei la respondecon pri la agresmilito. Kaj la konservativuloj kaj la Asocio de la Militaj Postlasitoj vigle kampanjis por ŝtate bonteni la sanktejon Yasukuni. Malgraŭ tio, la leĝpropono por igi la sanktejon sub ŝtatan protekton estis malaprobata en la parlamento je kvar fojoj kun apogado de la popola voĉo. Tiam la

konservativaj politikistoj ŝanĝis taktikon: la ĉefministro kaj aliaj ministroj "oficiale adorvizitas" la sanktejon, por ke la bontenado de la sanktejo fariĝu efektiva fakto establita.

En 1978, la sanktejo Yasukuni nove apoteozis Tojo Hideki kaj aliajn, entute 14 A-klasajn militkrimulojn (plej gravajn). Inter ili estis Itagaki Seishiro, la ĉefkomplotinto de la Evento de 18a de Septembra (Manĉuria Incidento), kaj Matsui Iwane, la ĉefkomandanto de la Nankina Masakro. Tia "apoteozigo" de la

Ŝintoisma sanktejo
Yasukuni



planintoj kaj efektivigantoj de la agresmilito signifas, ke la sanktejo staras sur la flanko de la aprobantoj de tia milito.

La japana registaro kaj la sanktejo Yasukuni

En 1985, la tiama japana ĉefministro Nakasone Yasuhiro oficiale adorvizitis la sanktejon Yasukuni. Tiam la ĉina, korea kaj aliaj aziaj registaroj kaj ties popoloj forte kritikis tion, kaj ankaŭ la opinio de la japana popolo estis kontraŭ tio. Post tio ne sekvis ĉefministraj adorvizitoj.

Sed en la 13a de aŭgusto 2001, la ĉefministro Koizumi Junichiro faris oficialan adorviziton. La ĉina kaj korea registaroj severe kritikis tion kaj protestis. Sed spite ĉion ĉi, la ĉefministro vizitadis la sanktejon, unu fojon jare en diversaj datoj, ĝis 2004.

Japanaj politikistoj devas profunde konsideri jenon: kial nun vi bezonas adorviziti la sanktejon, kiu estas "la spirita simbolo de la japana militismo", kiu iam funkciis kiel milita instanco? Kial vi denove ofendas popolojn suferintajn pro la agreso de Japanio, kial vi malbonigas la internacian reputacion kaj la amikan rilaton kun aziaj landoj, kial en Japanio leviĝis procesoj, ke tia adorvizito ofendas la japanan konstitucion?



Japanoj manifestacias surstrate en Tokio, kontraŭ la adorvizito al la sanktejo Yasukuni.

Kiel alfronti la historian respondecon?

Por homoj, rememoro de la milita historio celas preni el ĝi instruon, kaj por ne ripeti la estintecon simile. La japana registaro ĵurpromesis en la "Komuna Deklaro Japana-Ĉina" en 1972, ke "ni en Japanio ŝuldas multe por la damaĝoj al la ĉina popolo pro la milito, kaj profunde kritikis nin". Tiu ĉi Komuna Deklaro devus resti en la historia memoro, same kiel la agresmilito.

La problemo pri la sanktejo Yasukuni tial demandas nin, pere de la kritikoj el la ĉina kaj korea flankoj, kiel la registaro kaj socio de Japanio alfrontu la respondecon de la pasinta agresmilito.

Peco de Historio

Ienaga Saburoo, kiu lanĉis proceson kontraŭ la malaprobo de lernolibro

*Ienaga Saburoo
(1913-2002)*



Dum esplorantoj, instruistoj kaj popolanoj batalis kontraŭ la aprobo de lernolibro fare de la japana Ministerio pri Edukado, Prof. Ienaga Saburoo (de la Tokia Eduka Universitato), verkis historian lernolibron por supermezlernejo, kun priskribo pri la faktoj de la agresmilito, kaj submetis ĝin por la aprobo de la ministerio en 1963. Tiam la japana registaro kaj la ministerio ordonis mildigi aŭ forstreki la priskribon pri "malprudenta milito" aŭ "mizeraj flankoj de la milito". Sed Ienaga rifuzis tion kaj tial la lernolibro ne estis aprobita. Pro tio ekproceŝis Ienaga en junio 1965 kontraŭ la registaro, ke la registara

aprobo de lernolibroj estas kontraŭ la konstituciaj rajtoj de la libereco de studo kaj la libereco de opinioj, eldonado kaj esprimado, kaj atencas la rajton je edukado, kiu estas ankaŭ diktita en la Fundamenta Leĝo pri Edukado.

Poste, ankaŭ en 1967 kaj 1984, Ienaga procesis, kaj la lukto daŭris 32 jarojn. Pli ol 27 mil instruistoj kaj civitanoj kaj multaj societoj subtenis lin, formante organizojn. En aŭgusto 1997, la Plejsupera Kortumo agnoskis la kontraŭleĝecon de la aprobsistemo, kiu postulis forigon de la priskriboj pri la Nankina Masakrado, la Trupo 731 kaj pri aliaj faktoj de la japana agresmilito. Tiel finiĝis la longa procesado. Tiu afero iĝis unu el la subtenaj fortoj post 1980 por plibonigi la historiajn lernolibrojn de Japanio en esprimado de la veraj kaj faktaj situacioj de la milito.

En 2001, entute 176 profesoroj kaj deputitoj tra la mondo kandidatis lin al la Nobel-Pacpremio, sed bedaŭrinde ne sukcesis. Ienaga estis historiisto, kiu dum sia vivo batalis por la paco, homaj rajtoj kaj demokratio.

La apelacio de Ienaga je la proceso

Dum la lasta milito, mi, kiel sendependa civitano, certe sentis memfieron ne laŭdi la militon. Sed mi bedaŭras, ke mi ne povis haltigi la militon. Nun, se oni vidus burĝonon de milito, tiu devas esti forplukita. En la milito, miaj samgeneracianoj estis multe damaĝitaj, kaj multaj kolegoj mortis. Surbaze de tiaj multegaj viktimoj, naskiĝis la konstitucio. Pacismo kaj demokratiismo estas ĝiaj du kolonoj, postlasitaj de la lasta milito. Ni sentus domaĝon, se ili estus ignorataj.

Milito kaj muzeoj

Memorhalo de la Ĉina Popola Kontraŭjapana Rezistmilito

Post la evento, ke en 1982 la japana Eduka Ministerio postulis forstreki el la lernolibro la enhavon pri agresado kaj damaĝado de Japanio, Ĉinio establis serion da memorhaloj pri la japana agreso kaj la ĉina rezista milito, sin gardante kontraŭ forgeso de la historiaj instruoj.

La Memorhalo de la Ĉina Popola Kontraŭjapana Rezistmilito en Pekino estas la plej granda inter la memorhaloj de la kontraŭjapana rezistmilito en Ĉinio. Ĝi estis konstruita en 1987, ĉe la 50-jariĝo de la Evento de la Lugou-Ponto. En la memorhalo jenaj vortoj estas skribitaj: "Ne Forgesu la Pasintecon kiel Instruantojn por la Estonteco".

En la memorhalo oni per abundaj materialoj konigas pri la Masakro en Nankino, la operaco de tri neniigoj (forbruligado, formortigado kaj forrabado), la Trupo 731, la bakteria milito, la venengasa milito kaj aliaj kruelaj krimoj de la japana armeo, kaj elmontras la historian procezon de la kontraŭjapana rezistmilito de la armeanoj kaj popoloj de la tuta Ĉinio.

La memorhalo celas ne nur por tio, ke oni ne forgesu la katastrofon kaj damaĝon alportitajn de la japana agresa milito al la ĉinaj popoloj nek la historiajn lecionojn, sed ankaŭ por tio, ke oni ĉiam memoru la grandan nacian spiriton montritan de la ĉina popolo en la ekstreme malfacila situacio.

Korea Sendependiĝa Memorhalo

La Korea Sendependiĝa Memorhalo estis konstruita kaj malfermita en la 15a de aŭgusto 1987, la memortago de la nacia liberiĝo, financita per kontribuoj de koreaj popoloj en- kaj eksterlandaj, kiam la problemoj de la historia lernolibro leviĝis en 1982.

La ĉefa inter la 7 haloj estas la "Halo de la Japana Invado", kiu montras materialojn pri japanaj agresoj, ekspluatado, perforta premado kaj persekutado. Speciale ŝokaj estas vaksaj figuroj kiuj montras torturadon kaj turmentadon fare de japanaj policanoj



*Maldekstre:
Memorhalo de la Ĉina
Popola Kontraŭjapana
Rezistmilito*

*Dekstre:
Korea Sendependiĝa
Memorhalo*

Peco de Historio

kaj ĝendarmoj. La Halo de la Movado de la Unua de Marto montras materialojn pri la movado kaj la restaĵojn de la tiamaj mortintoj.

La halo memorigas niajn praidojn pri la batalo por la nacia sendependiĝo kaj donas mesaĝon pri la nacia spirito.

Porpaca Memormuzeo de Hiroŝimo

La muzeon konstruis la urbo Hiroŝimo en aŭgusto 1955, dek jarojn post la atombombado en Hiroŝimo. Estas skribite en la fondodokumento de la muzeo, ke ĝia celo estas informi ĉiujn homojn en la mondo pri la faktoj de la damaĝoj de la atombombo kun deziro neniigi nukleajn armilojn kaj efektiviĝi eternan mondpacon.

Estas ekspoziciataj en la muzeo impresaj materialoj pri la damaĝo de la atombombo kaj multaj objektoj postlasitaj de la viktimoj. La materialoj temas pri la damaĝoj pro varmoradioj, eksploda blovego, radioaktiveco, supervarmegaj incendioj, kaj pri tiel nomata "atombomba malsano" kaŭzita de radioaktiveco. Ni povas konstati, kian mizeran damaĝon donis unu atombombo.

Komparante la ĉinan kaj korean muzeojn kun la japana oni konstatas, ke la manieroj memori la militon kaj la entenata mesaĝo estas malsamaj respektive. Kiel do la trilandaj junuloj kaj infanoj memoros pri la milito, vizitante la muzeon en sia lando?

Ni pripensu, kiel memori la militon, por ke la orientaziaj junuloj povu konstrui pacan orientan Azion.



*Atombombita
kupoldomo proksime,
kaj Porpaca
Memormuzeo, oblonga
konstruaĵo en la
distanco (fotitaj en
oktobro 1998)*

Civila Virina Internacia Tribunalo pri Militkrimoj

En decembro 2000, okazis la "Virina Internacia Tribunalo pri Militkrimoj" en Tokio, Japanio, por juĝi la programon de konsolvirinoj de la japana armeo. La celo de la tribunalo estis evidenti la respondecon de la japanaj armeo kaj registaro kiel atencintoj, responde al la akuzo de suferintaj virinoj, kiuj deziris "punon al la respondeculoj".

Ĝis tiam la suferintaj virinoj estis longe ignorataj. La programo de konsolvirino ne estis traktata de la oficiala Tokia Tribunalo. Kaj en la 1990aj jaroj la suferintaj virinoj procesis kontraŭ la japana registaro, asertante, ke la programo de konsolvirino estis militkrimo kaj grava atenco kontraŭ homaj rajtoj. Sed la juĝejoj en Japanio evitis malkaŝi la faktojn, nek agnoskis la kompensan respondecon de la japana registaro.

Kaj do, se la ŝtato evitis juĝon, la popolo havas rajton kaj respondecon mem juĝi. Tiel, oni organizis tiun ĉi popolan tribunalon. Ĝi ankaŭ estis internacia tribunalo, organizita en kunlaboro kaj solidareco trans la landlimoj de la memstaraj virinoj de la atencinto, Japanio, kaj de la suferintaj ses landoj kaj regionoj (Sud-Koreio, Nord-Koreio, Ĉinio, Taiwan, Filipinoj, Indonezio). En la tribunalo partoprenis 64 suferintaj virinoj el ok landoj kaj regionoj (inkluzive de Orienta Timoro kaj Nederlando).

Konforme al la reala procesmaniero, en la juĝado oni unue preparis tribunalan ĉarton, kaj invitinte juĝistojn kaj prokurorojn, kiuj agadas internacie, suferintajn virinojn, atencintajn armeanojn kaj fakulojn, oni esploris la krimojn surbaze de la submetitaj atestaĵoj, kaj post tio la juĝistaro verdiktis laŭ la internaciaj leĝoj. Por la unua fojo post la mondmilito la juĝado menciis la problemojn pri la militrespondeco de la Tennoo Showa (Hirohito) kaj pri puno de la respondeculoj. Unu el la suferintaj virinoj diris ĝojege, ke tiu ĉi tribunalo donis al ŝi justecon, kiun ŝi postuladis dum 10 jaroj.

En decembro de la sekva jaro, refoje malfermiĝis la tribunalo en Hago, Nederlando, kaj ĝi donis la finan verdikton: "La Tennoo-Showa (Hirohito) kaj la aliaj militgvidintoj estas kulpaj", "La japana ŝtato mem havas respondecon pri la krimoj". La tribunalo havis grandan signifon ankaŭ kiel tia internacia movado por virinaj homrajtoj, kia kontribuas por prepari kadron de internacia juro por puni ĉiajn dummilitajn perfortojn.



Virina Internacia Tribunalo pri Militkrimoj. Estis epokfare, ke sudkoreaj kaj nordkoreaj prokuroroj kune skribis akuzdokumenton kaj esploris la krimojn.

5. Interŝanĝo de Gejunuloj de la Tri Landoj en Orientazio

Nuntempe aktivas la interŝanĝo de gejunuloj en Orientazio. Bela estas la mondo vidata de la klaraj okuloj de gejunuloj. La blua ĉielo estas tiel alta kaj tiel senfine vidata, kiel la estonteco, kiun ili deziras pentri. Ni studu, kio estas necesa al ili, legantaj la rakontojn de la najbaraj landoj, kaj de tieaj loĝantoj, kiujn ili rigardas kiel amikojn.

La interparolo de gejunuloj, plena de amikeco kaj interzorgo

Japana mezlernejano en Kioto sendis leteron al koreaj mezlernejanoj jene:

Oni diras, ke en Koreio floris ĉerizfloroj, ĉu ne? Japanio jam eniris en varman sezonon, kiel somero, kaj la vetero daŭras malhele.

Kvankam mi ne spertis lerni la Korean alfabeton(Hangulo), en la lasta jaro mi deziris lerni pri Koreio, kaj de tiam mi iom post iom lernis pri suda Koreio kaj norda Koreio. Mi jam gustumis korean frititan krespon kaj rizkukon, kiuj jam fariĝis popularaj manĝaĵoj por japanoj. Speciale sekigita marherbaĵo "gim" estas tre bongusta. Mi opinias, ke koreaj manĝaĵoj estas vere bongustaj.

Sed ĉu vi iam spertis japanajn manĝaĵojn? Ankaŭ en Japanio estas bongustaj manĝaĵoj, kiel la koreaj.

Interparolo de gejunuloj estas plena de amikeco kaj interkonsidero. La letero esprimas la konsideron pri nekonata amiko, imagon pri Koreio pere de la gusto, kaj fieron pri japanaj manĝaĵoj.

Interŝanĝo de gejunuloj — la espero por la estonteco

En la 21a jarcento, la tri-landaj gejunuloj havas multajn okazojn renkonti unu la aliajn. Kreskas ĝemelrilatoj inter lernejoj kaj pli kaj pli da studentoj partoprenas en lernvojaĝo. Ju pli multiĝas interfluo de gejunuloj, des pli mallarĝiĝas la fendo farita de plenaĝuloj. Iu ĉina mezlernejano, kiu partoprenis en iu historia renkonto inter Ĉinio, Japanio kaj Koreio, aranĝita de registara organizaĵo, diris pri la estonteco de la tri landoj jene:

Ĉinio, Japanio kaj Koreio havis multajn konfliktojn kaj koliziojn en la historio. Sed nun la popoloj de la tri landoj havas amikajn rilatojn, respektive. Pere de ĉi tiu renkonto, mi deziras plifortigi la amikecon, kaj diversiĝi la interfluan de diversaj flankoj, inkluzive kulturon. Kaj tial estus pli bone, se la tri landoj lanĉos komune pacan evoluon.

Se oni havas tian sintenon kaj pretas akcepti aliajn partnerojn, oni ankaŭ povas pli bone kompreni pasintajn erarojn.

Kiel en la parolo de tiu ĉi lerneĵano, estas nepre necesa la interfluo de kreskantaj gejunuloj. Se oni havas tian sintenon kompreni aliajn, oni povas kompreni, kiel okazis la eraroj de la pasinteco. Vera pardonpeto ne venas de la parolo, sed de la koro. La unua butono, per kiu oni malfermas tiun koron, estas la interfluo de gejunuloj.

Kio estas la bildo por la estonteco desegnata de gejunuloj?

Oni deziras, ke gejunuloj interhelpu unu la aliajn, kiel la kunvojaĝantoj en la estonteco. Dum la futbalo por mondĉampioneco en 2002, japanaj kaj koreaj gejunuloj laŭtvoĉe hurais por bona ludo de ambaŭ teamoj. En 2008 la Olimpiaj ludoj en Pekino montris al ni saman bildon, ke popoloj de la tri landoj kuraĝigos unu la aliajn.

La gejunuloj havas multan intereson pri aliaj kulturoj. Plibonigo de komuna sento inter gejunuloj estas la vojo forigi la 20an jarcenton, kiam milito, perforto, kaj malracio regis. La gejunuloj estas la sonĝo kaj espero por malfermi la novan Orientazion.



La 3-a Sperto-Trejnado de Historioj de Ĉinio, Japanio kaj Koreio, aŭguste, 2004. La malfermo de nova estonteco de Orientazio estas la rolo de gejunuloj.

6. Kontraŭmilita Pacmovado kaj Civila Movado

Eĉ en la 21a jarcento, la homaro ne distanciĝas de militoj. Sed en la moderno, ankaŭ leviĝas kaj intereĥas civitanaj voĉoj el multaj lokoj de la mondo, rifuzantaj militon kaj celantaj pacon, rifuzantaj diktatorecon kaj celantaj demokratecon. Ni ĉirkaŭrigardu la fluon de la novtipaj pacmovadoj.

Kontraŭnuklea movado post la Dua Mondmilito

En 1950, kelkajn jarojn post la Dua Mondmilito, en la sveda ĉefurbo Stokholmo, kunvenis la Konstanta Komitato de la Monda Pacdefenda Konferenco, kaj publikigis la t.n. "Apelacion de Stokholmo" por malpermesi nukleajn armilojn, kaj alvokis al la tuta mondo por subskribado. Reage al tio kolektiĝis pli ol 500 milionoj da subskriboj, kun Ĉinio ĉekape je 220 milionoj. Tio fariĝis unu el la motivoj por okazigi en Japanio ekde 1955, la Mondan Konferencon kontraŭ Atom- kaj Hidrogen-bomboj, kiu en 2005 havis la 51an konferencon. La longedaŭra, forta movado preventis situacion, ke iu lando uzas nuklean armilon anticipe ol alia lando.

La Apelacio de Stokholmo (la 19an de marto 1950)

Ni postulas la absolutan malpermeson de nukleaj armiloj, kiuj estas armiloj de teruro kaj amasbuĉado de la homaro. Ni opinias, ke kiu ajn registaro unuafoje uzos la nuklean armilon, tiu faros krimon kontraŭ la humaneco, kaj tiu estu traktata kiel militkrimulo. Ni apelacias al ĉiuj sinceruloj en la mondo subskribi tiun ĉi apelacion.

La usonaj militbazoj en Orientazio kaj la kontraŭmilitbazaj movadoj

Post la Dua Mondmilito, Usono konstruis en Orientazio multajn militbazojn, precipe en Japanio kaj en Korea Respubliko, kaj plene utiligis ilin kiel la etapojn kaj militirejojn, jen al Vjetnamio, jen al Irako. La militbazoj naskas profundan damaĝon, precipe al la Insularo Okinavo, kie amasiĝas 75% el la usonaj bazoj en Japanio, kaj ankaŭ al Koreio. En Okinavo en la mezo de la 1950aj jaroj okazis tutinsulara kontraŭmilitbaza movado. Sed la situacio ne ŝanĝiĝis: en 1995, tri usonaj soldatoj perfortis japanan knabinon. En Korea Respubliko en 2002 du knabinoj estis surveturitaj de usonaj kirasaŭtoj.

Ĉar ekzistas traktato malegale favora al Usono, la usonaj perfortintaj soldatoj estas nur malmulte punataj. Tia akumulado de la mizeraj okazaĵoj eksplodigis la koleron de la popolo, per grandskala protestado en la tuta insularo de Okinavo kaj la tuta lando de Korea Respubliko. La okinavanoj kaj la koreoj portas interfluan kontaktadon por paco kaj forigo de la militbazoj.


La monda fluo de kontraŭmilitaj porpacaj movadoj

En 1955, ĉe Bandungo en Indonezio okazis la Azia-Afrika Konferenco, en kiu kunvenis 29 landoj inkluzive Ĉinion kaj Hindion, kaj ĝi proklamis la Dek Principojn por Paco, nome por kontraŭi la koloniisman regadon fare de la grandpotencoj, por celi nacian sendependecon, pacan kunekzistadon kaj egalecon de la rasoj.

Malgraŭ tio, en Vjetnamion jam sendis armeon Francio, kaj poste Usono, kaj damaĝis la landon per napalmo kaj herbovelkiga kemiaĵo. Kontraŭ tio senlace batalis vjetnamoj, kaj ilin subtenis mondskala civitanaro, kaj ankaŭ en Usono fortiĝis kontraŭmilita movado, tial en 1976, Usono evakuis Vjetnamion, kaj la lando unuiĝis, kun plena sendependo, el la perforta disigo al la Nordo kaj la Sudo.

En la 1980aj jaroj, en Korea Respubliko la militdevena reĝimo cedis al la popoldevena reĝimo. Tio estas tre signifoplena al la paco en Orientazio. En Japanio, la Konstitucio kun la principoj de "la forrezigno de la milito kaj la maltenado de la militpovo" estis atencita de la premo por ŝanĝi ĝin, sed la popolo agadis "por gardi la Konstitucion". Laŭ la konstitucio, la Japana Memdefenda Korpuso estis malpermesite operaci en milito. Sed en 2004, la Memdefenda Korpuso estis sendita al Irako ankoraŭ militanta, je la nomo de humaneca asistado. En la mondo tie kaj ĉi okazas konfliktoj, kaj la plena paco ankoraŭ ne estas atingita. Sed en februaro 2003, ĝuste antaŭ la milita sturmado al Irako fare de Usono kaj Britio, okazis ondo da kontraŭmilitaj agadoj je la nombro de dek milionoj da leviĝantoj, rekorda ĝis tiam. La plimultiĝo de la civitanoj aspirantaj pacon, kiuj sin deklaris por la paco trans la landlimo, ja estas la ŝlosilo por atingi la mondpacon.

Vivi pace ne nur estas vivi en senmilita socio, sed ankaŭ estas vivi kun respekto al la humaneco, kun garantio de homaj rajtoj, estas vivi liberigite de malriĉeco kaj ĝui feliĉan vivon. Tio ne estas nura revo, se multaj homoj vere klopodas por realigi tian staton.



En la 21a de oktobro 1995, okazis la ĝenerala insurekcio de la popolo de Okinavo. Motivis ĝin la perfortado al knabino fare de tri usonaj soldatoj, kaj fine eksplodis la kolero de okinavanoj kontraŭ la longe daŭranta damaĝado pro la militbazoj. Entute 85 mil homoj el ĉiuj aĝoj, tavoloj kaj organizoj kunvenis.

7. Por Repacigo kaj Paco en Orientazio

La popoloj loĝantaj en Orientazio, de post la 2-a Mondmilito, deziras la eternan pacon. Sed sen vera pento pri la pasinta historio de koloniismo kaj invadmilito, sen klopodo por interpaciĝo reciproka, refoje ripetiĝas konflikto kaj kontraŭstaro. Kiel ni povas krei helan estontecon?



Afiŝo de korea
televizfilmo en Japanio

Orientazio sur vojkruciĝo de konflikto kaj interpaciĝo

Kvankam mondscale finiĝis la malvarma milito, en Orientazio la konfliktoj ripetiĝas, kaj militforto pliiĝas. Sed aliflanke, aktive disvolviĝas la klopodo realigi harmonion kaj pacon. Oni esploras la veron de la Incidento de la 28-a de februaro 1947 en Taiwan, la Incidento de la 3-a de Aprilo en Cheju-Insulo en Koreio, 1948 ktp. kaj pere de tiu esplorado jura aranĝo estas preparata por regajni la honoron de la tiamaj viktimoj. En 2000, okaze de la pintkunsido inter Kim Daejung (prezidento de Korea Respubliko) kaj Kim Jong-Il (prezidanto

de Defendkomitato de la Korea Popoldemokratia Respubliko), la Koreaj Sudo kaj Nordo malfermis la vojon al harmonio kaj kunlaboro. La ekonomia kunlaboro inter la landoj de Orientazio plifortiĝis, kaj kiel oni vidas sur la foto en tiu ĉi paĝo, plimultiĝas la kulturinterŝanĝoj de civitanoj, kaj disvolviĝas intima rilato inter la civitanoj en tiuj landoj.

Kazoj en Eŭropo

De post la 2-a Mondmilito, la aliancaj landoj postulis de Germanio, kiu startigis la militon, la likvidadon de la pasinteco kaj severan penton. Germanio akceptis tiun postulon, kaj renaskiĝis kiel lando por demokratio kaj paco.

Konsultorganizo estas establita inter Francio kaj Germanio, kaj inter Germanio kaj Pollando, kaj klopodis mildigi konfliktojn kaŭzitajn pro diferenco de historiaj vidpunktoj, kaj ĝustigi la enhavon de iliaj historiaj lernolibroj. Tiu agado estis farita ĉefe de neregistaraj organizoj, sed registaroj pozitive akceptis la rezultojn de tiu klopodo. Tiu

klopodo multe helpis unuigi la tutan Eŭropon.

Kompare kun Eŭropo, Orientazio havas malsamajn spertojn en politiko, en ekonomio, kaj tial la vidpunktoj estas ankaŭ malsamaj. Sed lernante de la sperto de Eŭropo, kiu kontribuis al la fondo de Eŭropa Unio, la landoj kaj la landanoj de Orientazio devas klopodi por konstrui pacan komunumon.

Por pento, harmonio kaj paco

Ni devas klopodi introspekti la historion de invado kaj milito, kaj ne ripeti samajn erarojn. La japana registaro devas unue pardonpeti pri siaj eraroj en la pasinteco, kaj kompensi al la viktimoj, kaj nur deposte, la civitanoj de najbaroj Koreio, Ĉinio ktp, akceptos tion klarvide kun varma koro.

Paco, homaj rajtoj kaj demokratio estas la necesaj gravaj universalaj valoroj por la dezirinda estonteco. Por realigi ilin, ne nur Japanio, sed ankaŭ la landoj en Azio devas havi politikon ne nur por nacia intereso, kaj ankaŭ la civitanoj devas klopodi kunvivadi paco, sen postuli nur nacian intereson. La internacia solidareco kaj kunlaboro de civitanaj movadoj estas unu el la vojoj por realigi tion. Lernado el la historio, realigo de vera harmonio kaj paco estas la hejmtaskoj de ni homoj, kiuj vivas hodiaŭ en Orientazio.



Preparado de lernolibroj de komuna historio de la tri landoj. La 5-a Sesio por prepari la komunan lernolibron, novembre 2003, Seulo.

Postskribo

Por krei pacan komunumon en Orientazio, nepre necesas kiel premiso kundividi la komunan rekonon de historio. Kompreneble tio ne estas tasko nur por junuloj. La perspektivo por kundividi la komunan rekonon de historio certe pligrandiĝos pere de tio, ke la civitanoj en Orientazio lernu el la historio de la agresmilito kaj la koloniado surbaze de la faktoj, kaj ili ripete interparolu kaj diskutu inter si por alproprigi la pasintecon.

De marto 2002, historiistoj, instruistoj kaj civitanoj de Ĉinio, Japanio kaj Koreio, kiuj havas tiun ideon, okazigis sinsekvajn diskutojn sub la nomo "Pacforumo por Rekono de Historio en Orientazio". Ties motivon donis al ni la apero de la lernolibro de historio, redaktita de la "Societo por Eldoni Novan Lernolibron de Historio" de Japanio. La unua forumo okazis en Nankino, Ĉinio, la dua en Tokio, Japanio, en februaro 2003, kaj la tria en Seulo, Koreio, en aŭgusto 2004.

Tiu ĉi libro naskiĝis el tiu kunlaborado. En la unua forumo oni diskutis pri la plano elfari komunan suplementan lernomaterialon de historio pere de la trilanda kunlaboro tiel, ke orientaziaj geknaboj povu havi komunan rekonon de historio. Kaj sekvis en ĉiuj landoj organizado de komitato por verki kaj kompili la suplementan materialon de historio.

La unua trilanda kunsido por verki kaj kompili la suplementan lernomaterialon okazis en Seulo en aŭgusto 2002. Post tio la kunsido okazis kvar fojojn en Japanio, kvar fojojn en Ĉinio, kaj tri fojojn en Koreio. Intertempe la trilandaj komitatoj skribis manuskriptojn por sia parto, kiujn ni kontrolis en la trilanda kunsido kaj pri kiuj ni interŝanĝis opiniojn kaj postulojn, kaj poste ni ilin korektis kaj reskribis. La laboro ripetiĝis multfoje.

Ni kritikis la lernolibron de historio kompilitan de la "Societo por Eldoni Novan Lernolibron de Historio", ĉar ĝi deformas historiajn faktojn, pravigante la agresmiliton kaj la koloniadon de Japanio en la pasinteco, kaj ke pro ĝia ŝovinismo la lernolibro malrespektas aziajn popolojn kaj agitas por bigota naciismo. Sed tamen nura kritikado ne donas al ni la vojon al la kumuna rekono de historio. Tiu ĉi libro estas unu el niaj respondoj al la demando, kian historion ni transdonu en praktiko.

Ĝis nun oni jam faris kelkajn provojn kompili lernomaterialon de historio kunlabore de du landoj, nome, Japanio kaj Koreio, kaj Ĉinio kaj Japanio, sed tiu ĉi komuna suplementa lernomaterialo de historio estas historie la unua, kiu estis kompilita kunlabore de tri landoj. Dum eĉ dulanda kunlaborado estas nefacila, des pli malfacila neatendite estis la trilanda kunlaborado. Evidentiĝis, ke ekzistas sufiĉe da malsamaj vidpunktoj, opinioj k.a. pri unuopaj historiaj eventoj pro la malsamaj studoj, edukoj kaj lernolibroj de historio. Kaj tial unuigi niajn malsamajn rekonojn fariĝis nia plej grava tasko. Ni tamen akordigis la diversajn opiniojn per senlacaĵaj diskutoj kun reciproka respekto al la aliaj vidpunktoj, starante sur la principo de egaleco kaj samrajteco, kaj sukcesis eldoni la samenhavan libron samtempe en la tri lingvoj. Kompreneble ankoraŭ povos troviĝi nesufiĉaj lokoj plibonigendaj, ĉar tiu ĉi estas la unua provo. Ni do atendas senrezervajn kritikojn de ĉiuj legantoj.

Ni lernis multajn aferojn tra la transnacia kunlaborado. Ni renkontiĝis kun multaj novaj amikoj kaj pliprofundigis amikecon kaj fidon. Interparolo, diskuto kaj solidareco por la estonteco nin mem riĉigas kaj malfermas al ni la eblecon de nova historio. Tio estas nia firma kredo, kiun ni gajnis tra la laboro por ĉi tiu lernomaterialo.

Nia laboro ne povus efektiviĝi sen sindonaj helpoj de ĉiulandaj kunlaborantoj, kiuj interpretis en la internaciaj kunsidoj kaj tradukis la manuskriptojn. Ni denove esprimas korajn dankojn precipe al la junaj kunlaborantoj, nome alilandaj studentoj, fervore lernantaj alian kulturon, kaj alinaciaj loĝantoj en Japanio, kiuj estas ĉiuj pretaj fariĝi ponto inter la tri landoj.

Fine, ni ne forgesu danki pro grandega kunlaborado al la eldonejoj, Kobunken en Japanio, Eldonfako de la Ĵurnalo Hangyore en Koreio, kaj Eldonejo de Socisciencaj Dokumentoj de Sociscienca Akademio de Ĉinio, kiuj efektivigis por ni tiun ĉi unuan provon de la trilanda eldonhistorio.

Ĉina-Japana-Korea Komitato por
la Trilanda Komuna Lernolibro de Historio
Majo 2005

Kronika Tabelo de la Moderna Historio de Ĉinio, Japanio, Koreio kaj la Mondo

Jaroj	Ĉinio	Japanio	Koreio	La Mondo
1840aj	Opia Milito; Nankina Traktato			
1850aj	Insurekcio de Paca Ĉiela Lando; 2-a Opia Milito	Usona Perry petis malfermon; Malfermpakto subskribita		
1860aj	Okcidentiga Movado ekis; Subskribo de Pekina Pakto kun Britio kaj Francio	Edo-erao finiĝis; Meiji-Restaŭro komenciĝis	Korea-Franca Milito	Sklavoj emancipiĝis en Rusio; Suda-Norda Milito en Usono
1870aj		Civila movado komenciĝis; Kangwha puĉo; Japana-Korea Pakto	Korea-Usona Milito; Subskribo de Kangwha pakto	La tria respubliko Francio fondita; Germana Imperio fondita
1880aj	Ĉina-Franca Milito	Japana Imperia Konstitucio proklamita	Ribelo de 1882; Politika evento de 1884	Germana-Itala-Aŭstra Alianco formita
1890aj	Ĉina-Japana Milito; Reformado de 1898	Ĉina-Japana Milito; Traktato de Shimonoseki	1894 Terkulturista Milito; Granda Korea Imperio anoncita	Usona-Hispana Milito
1904		Japana-Rusa Milito		
1910		Aneksi Koreion	Japana-Korea Aneksiĝa Pakto subskribita	
1912	Ĉina Respubliko fondita			
1915		21-punkta postulo al Ĉinio		Unua Mondmilito (1914-1918)
1919	Movado de la 4a de Majo		Movado de la 1-a de Marto; Korea Provizora Registaro fondita	Pariza Paca Konferenco
1921	Ĉina Komunista Partio fondita			Vaŝingtona Konferenco
1923		Kantona tertremo; Murdo al koreoj		
1931	Evento de la 18a de Sept. kaŭzita de Japanio	Manĉŭria Evento; Japana invado al Ĉinio komenciĝis		

Jaroj	Ĉinio	Japanio	Koreio	La Mondo
1937	Kontraŭ-japana Rezistmilito komenciĝis; Masakro en Nankino	Ĉina-Japana Milito komenciĝis; fari masakron en Nankino	"Ĵurpromeso de la Imperia Regato" proklamita	
1941	Deklaro de Ĉinio pri milito kontraŭ Japanio; aliĝo al Kontraŭ-faŝisma Alianco	Atako al Perlo-haveno; Azia-Pacifika Milito	Korea Provizora Registaro fondita	Germanio surprizis Sovetion
1945	Venko en Kontraŭ-japana Rezistmilito; Liberiĝo de Taiwan	Atombomboj al Hiroŝimo kaj Nagasako; Sovetunio deklaris militon kontraŭ Japanio; Japanio kapitulacis	Liberiĝo de 15a de aŭg.; Koreio dividita de 38a-grada linio	Germanio kapitulacis; Unuiĝintaj Nacioj fondita
1948		Ekstrem-Orienta Internacia Milita Tribunalo verdiktis	Korea Respubliko kaj Demokratia Popola Respubliko de Koreio aparte fonditaj	Israela Respubliko fondita
1949	Ĉina Popola Respubliko fondita			NATO fondita
1950	Ĉina Popolvolontula Armeo partoprenis korean militon	Polica Rezerva Brigado fondita	Korea Milito (1950-1953)	
1951		Sanfranciska Pacpakto		
1955	Zhou Enlai partoprenis en Bandung-Konferenco	1-a Monda Konferenco kontraŭ Atombombo		Organizo laŭ Varsovia Pakto establita
1965		Diplomatiaj rilatoj kun Koreio establitaj	Diplomatiaj rilatoj kun Japanio establitaj	
1972	Usona prezidento Nixon vizitis Ĉinion; Normaligo de diplomatiaj rilatoj kun Usono; Japana ĉefministro Tanaka Kakuei vizitis Ĉinion; Normaligo de diplomatiaj rilatoj kun Japanio	Okinavo al Japanio; Tanaka vizitis Ĉinion; Ĉina-Japanaj diplomatiaj rilatoj normaligitaj	Reformada Sistemo de Park Junghee komenciĝis	
1978	Ĉina-Japana Paca Amikeca Traktato subskribita	Ĉina-Japana Paca Amikeca Traktato subskribita		

Jaroj	Ĉinio	Japanio	Koreio	La Mondo
1982	Protestis al Japanio pri la lernolibro kun distordita historio	La historia lernolibro vekis internaciajn kritikojn	Protestis al Japanio pri la lernolibro kun distordita historio	
1989				Berlina muro falis
1991			Suda kaj Norda Koreioj samtempe aliĝis al UN	La Golfo-milito
1992	Diplomatiaj rilatoj kun Koreio (suda) establitaj; Japana imperiestro vizitis Ĉinion		Diplomatiaj rilatoj kun Ĉinio establitaj	
1997	Hongkongo redonita al Ĉinio; 15-a Kongreso de Ĉina Komunista Partio	Nova gvidlinio pri Japana-Usona Defendpacto		Kioto-Konferenco pri varmigo de terglobo
1998	Ĉina prezidanto Jiang Zemin vizitis Japanion; Ĉina-Japana Komuna Manifesto subskribita	Ĉina-Japana Komuna Deklaro; Japana-Korea Komuna Manifesto	Kim Daejung vizitis Japanion; Japana-Korea Komuna Deklaro subskribita	
1999	Makao redonita al Ĉinio	Leĝo pri naciaj flago kaj himno		NATO aeratakis Jugoslavion
2000			Kim Daejung kaj Kim Jong-Il deklaris komunan deklaron	

Listo de la Kontribuintoj por Tradukado kaj Redaktado

Ĉinio	Japanio	Korelo
Yu Tao*	SATOO Morio*	LEE Chong-Yeong*
Li Shijun	AKADA Josihisa	LEE Young Koo
Tan Xiuzhu	HIRAI Isako	MA Young Tae
Wang Shirong	HORI Yasuo	KIM Uson
Wang Lihua	YAJIMA Hiroshi	CHO Sung-Ho
Zhao Jianping	YAMAMOTO Sintaroo	HONG Sung-Jo
Liu Caisheng	KIMURA Eizi	KWAK Jong-Hoon
Su Yijun	KIMURA Goroo	CHOI Tae-Suk
Niu Xueqin	KITAGAWA Syozi	HO Song
Liu Zijia	KUBOTA Kunio	JANG Jeong-Ryeol
Li Jianhua	KUMAKI Hideo	NA Ui-Suk
	MATSUMOTO Hiroyo	
	NAKATU Masanori	
	NAKAMURA Daishin	
	NISHIKAWA Satoru	
	OOIŖI Akira	
	SASAKI Yasuko	
	SIBAYAMA Zyun'iti	
	TANAKA Kazuki	
	HOŖIDA AcuŖi	
	KURITA Kimiaki	
	TANI Hiroyuki	

* Kunordiganto

Divido de la Traduktasko inter Ĉinio (Ĉ), Japanio (J), Koreio (K)

Kovrilo (Ĉ)
Dorskovrilo (Ĉ)
Klarigoj pri fotoj ĝis antaŭparolo (K)
Antaŭparolo (K)
Enhavo (Ĉ)

Enkonduka Ĉapitro: La Tri Landoj antaŭ la Malfermo

Subĉapitro E-1. Interrilatoj de la Tri Landoj (K)

Peco de Historio:

Kiel oni vidis la mondon? (K)
"Drivuloj" inter la tri landoj (J)

Subĉapitro E-2. Interna Situacio en la Tri Landoj

1. Japanio — Samurajoj kaj Plebanoj (J)
2. Koreio — Yangban kaj Plebanoj (K)
3. Ĉinio — Gentlemanoj kaj Plebanoj (Ĉ)

Peco de Historio:

La ĉefurboj de la tri landoj
Pekino (Ĉ)
Edo (J)
Seulo (K)

Konfuceanismo kaj la tri landoj (Ĉ)

Ĉapitro I: Malfermo kaj Moderniĝo

Enkonduko (J)

Subĉapitro I-1. La Premo de Eŭropaj Potencoj kaj
la Reagoj de la Tri Landoj

1. Ĉinio — La Opia Milito kaj Okcidentiga Movado (Ĉ)
2. Japanio — Malfermo kaj Meiji-Restaŭro (J)
3. Koreio — Konfliktoj Rilate Malfermon (K)

Peco de Historio:

Malfermitaj havenoj en la tri landoj
Ŝanhajo (Ĉ)
Jokohamo (J)
Inchon (K)

La Tennoa sistemo de la moderna Japanio (J)

Subĉapitro I-2. Militoj Englutis Orientazion

1. Konfliktoj inter la Tri Landoj (K)
2. Ĉina-Japana Milito (Ĉ)

3. Japana-Rusa Milito (J)

Peco de Historio:

Fukuzawa Yukichi (J)

Kim Ok-Gyun (K)

Li Hongzhang (Ĉ)

Subĉapitro I-3. La Reformada Movado en la Tri Landoj

1. Japanio — la Movado por Libereco kaj Popolaj Rajtoj (J)
2. Ĉinio — la Reformado de la Qing-Dinastio kaj Yihetuan-Movado (Ĉ)
3. Koreio — la Terkulturista Milito kaj la Sendependiga Movado (K)

Peco de Historio:

Nakae Chomin (J)

Kang Youwei (Ĉ)

Gvidantoj de la Donghak terkulturista milito (K)

Subĉapitro I-4. Vivo kaj Kulturo de la Popolo en la Tri Landoj

1. Ŝanĝiĝo de la Korea Socio kaj la Popolo (K)
2. Ŝanĝiĝo de la Ĉina Socio kaj la Popolo (Ĉ)
3. Ŝanĝiĝo de la Japana Socio kaj la Popolo (J)

Peco de Historio:

Ĉinaj literoj en la moderna historio (J)

Resumo (J)

Ĉapitro II Ekspansio de la Japana Imperiismo kaj la Rezistado de Ĉinio kaj Koreio

Enkonduko (K)

Subĉapitro II-1. La Tri Landoj ĉirkaŭ la Unua Mondmilito

1. Japana Aneksio de Koreio kaj Rezistado de Koreoj (K)
2. Japana Kolonia Regado de Taiwan (Ĉ)
3. La Revolucio de 1911 kaj Fondiĝo de la Ĉina Respubliko (Ĉ)
4. La Unua Mondmilito kaj la Japana Imperiismo (J)

Peco de Historio:

Kontraŭjapana Armita Batalo de Taiwan-a Popolo (Ĉ)

Ahn Jung-Geun kaj Ito Hirobumi (K)

Ĉu Japanio perforte okupaciis aŭ laŭleĝe aneksis Koreion? (J)

Subĉapitro II-2. La Intensigo de la Japana Regado de Koreio

1. Militpolica Regado (K)
2. La Realo de "la Kultura Politiko" (K)
3. Ekonomia Politiko kaj Uzurpado (K)
4. Eduka kaj Kultura Politiko (K)

Peco de Historio:

Kontroli la fervojon (K)

Orienta Koloniada Kompanio (J)

Subĉapitro II-3. Sendependiga kaj Rezista Movado kaj Socia Movado

1. La Movado de la Unua de Marto (K)
2. La Movado de la Kvara de Majo (Ĉ)
3. Socia Movado en la Tri Landoj (J)
4. Granda Tertremo de Kantoo kaj Masakro de Koreoj kaj Ĉinoj (J)

Peco de Historio:

- Shin Chae-Ho (K)
- Fuse Tatsuji (J)
- Li Dazhao (Ĉ)
- Chen Tiejun (Ĉ)
- Chung Jong-Myeong (K)
- Kaneko Fumiko (J)

Subĉapitro II-4. Ŝanĝiĝo de Socio kaj Kulturo

1. Ŝanĝiĝo de la Koreaj Socio kaj Kulturo (K)
- 2) Ŝanĝiĝo de la Ĉinaj Socio kaj Kulturo (Ĉ)
3. Ŝanĝiĝo de la Japanaj Socio kaj Kulturo (J)

Peco de Historio:

- Na He-Seok (K)
- Hiratsuka Raicho (J)
- He Xiangning (Ĉ)

Resumo (K)

Ĉapitro III Invadmilito kaj la Damaĝo al la Popolo

Enkonduko (Ĉ)

Subĉapitro III-1. Japana Invado en la Nordorientan Regionon de Ĉinio

1. La Evento de la 18-a de Septembro (Ĉ)
2. Naskiĝo de "la Manĉuria Respubliko", la Pupa Reĝimo (Ĉ)
3. Socio kaj Ekonomio de "Manĉurio" (Ĉ)
4. Unuiĝinta Rezistado de la Ĉinaj kaj Koreaj Popolanoj (K)

Peco de Historio:

- Zhang Hanhui kaj la kontraŭjapana kanto "Ĉe Songhua-Rivero" (Ĉ)
- Yun Bong-Gil: Heroa ago en Ŝanhajo (K)

Subĉapitro III-2. Japana Invadmilito

1. Ĉina-Japana Totala Milito (J)
2. Azia-Pacifika Milito (J)
3. Iluzio de "Kunprospera Sfero de la Granda Orientazio" (J)
4. Tutforta Militsistemo (J)

Peco de Historio:

- Gvido de la milito fare de la Showa-Tennoo (J)
- La milito en propagandaj folioj (J)

Subĉapitro III-3. La Kruele Agado al la Ĉina Popolo Fare de Japana Armeo

1. Popolanoj kaj Rifuĝintoj en Batalkampoj (Ĉ)
2. Masakro en Nankino (Ĉ)

3. Sendistinga Bombado, Tri-neniiga Operaco kaj Starigo de Senhoma Zono (Ĉ)
4. Bakteria Milito, Gasmilito kaj Homkorpa Eksperimentado (Ĉ)
5. Seksa Perfortado de Japanaj Soldatoj (Ĉ)

Peco de Historio:

Feng Yiping: Atesto pri perforta laborado (Ĉ)

Atesto de eksa japana soldato (J)

Subĉapitro III-4. Koreio kiel Militbazo kaj la Damaĝo al la Popolo

1. Japaniga Politiko (K)
2. Milita Industrio en la Milittempo (K)
3. Mobilizado de Milita Materialo (K)
4. Mobilizado de Homforto (K)
5. Koreaj Virinoj Forprenitaj kiel Japanarmeaj Konsolvirinoj (K)

Peco de Historio:

"Porjapaniulo" kaj naciperfidulo (Ĉ)

Avino Kang Duk-Kyung, kiu denunciis la damaĝon de la konsolvirinoj (K)

Subĉapitro III-5. Damaĝo kaj Damaĝiĝo de la Japana Popolo

1. Dumilita Ĝenerala Tutmobilizado kaj Kunlaboro de la Popolo por Milito (J)
2. La Vivo kaj la Rezistado de Popolo (J)
3. Granda Aeratako al Tokio kaj Aliaj Urboj (J)
4. Batalo en Okinavo (J)
5. Atombombo al Hiroŝimo kaj Nagasako (J)

Peco de Historio:

Kamikaze: Atakoaviadiltrupo kaj junaj studentoj (J)

La japana totala milito kaj virinoj (J)

Subĉapitro III-6. Malsukceso de la Japana Invadmilito

1. Kontraŭjapana Milito Fare de Ĉinio (Ĉ)
2. Rezistado de Koreoj kaj Preparado por Nacia Sendependiĝo (K)
3. Rezistado de la Popolo en la Okupita Sudorienta Azio (J)
4. Venko en la Kontraŭfaŝisma Milito kaj Japana Kapitulaco (J)

Peco de Historio:

Provizora Registaro de la Korea Respubliko (K)

Kontraŭmilita Ligo de Japanaj Soldatoj (J)

Resumo (Ĉ)

Ĉapitro IV Orientazio post la Dua Mondmilito

Enkonduko (J)

Subĉapitro IV-1. Nova Komenco de la Tri Landoj

1. Malvenko de Japanio kaj Postmilita Reformado (J)
2. Liberiĝo kaj Dividiĝo de Koreio (K)
3. Fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko (Ĉ)

Peco de Historio:

Du vizaĝoj de D. MacArthur (J)

Fora patrujo (J)

Subĉapitro IV-2. "Likvido de la Pasinteco" de Japanio

1. La Tokia Juĝado (J)
2. La Sanfranciska Pacpakto kaj la Problemo de Kompenso (J)
3. Sociaj Problemoj, Postlasitaj de la Kolonia Regado kaj Milito (J)

Peco de Historio:

Aliaj militaj tribunaloj (J)

Internacia komparo de la postmilita kompenso (J)

Subĉapitro IV-3. Dividiĝo de Orientazio kaj Normaligo de Diplomatiaj Rilatoj

1. Malvarma Milito de Orientazio kaj la Korea Milito (J)
2. Normaligo de Diplomatiaj Rilatoj inter Koreio kaj Japanio (K)
3. Normaligo de Diplomatiaj Rilatoj inter Ĉinio kaj Japanio (Ĉ)
4. Establo de Diplomatiaj Rilatoj inter Ĉinio kaj Koreio (K)

Peco de Historio:

Batalo por la rajtoj de la koreoj en Japanio (J)

Japanoj revenintaj el Ĉinio (J)

Resumo (J)

Fina Ĉapitro: Taskoj por Paco en Orientazio en la 21a Jarcento

Enkonduko (K)

1. Kompenso al la Forlasitaj Homoj (Ĉ)
2. Japanarmeaj Konsolvirinoj kaj la Virinaj Homaj Rajtoj (K)
3. Lernolibro de Historio (J)
4. La Demando pri la Ŝintoisma Sanktejo Yasukuni (J)

Peco de Historio:

Ienaga Saburoo, kiu lanĉis proceson kontraŭ la malaprobo de lernolibro (J)

Milito kaj muzeoj (Ĉ, J, K)

Civila Virina Internacia Tribunalo pri Militkrimoj (J)

5. Interŝanĝo de Gejunuloj de la Tri Landoj en Orientazio (K)
6. Kontraŭmilita Pacmovado kaj Civila Movado (J)
7. Por Repacigo kaj Paco en Orientazio (K)

Postskribo (J)

Kronika Tabelo de la Moderna Historio de Ĉinio, Japanio, Koreio kaj la Mondo (K)

Divido de la Traduktasko inter Ĉinio (Ĉ), Japanio (J), Koreio (K)
Financaj Kontribuintoj (Ĉ)

Financaj Kontribuintoj

(La ciferoj en parentezo indikas antaŭmenditajn ekzemplerojn de la libro)

Ĉinio

Ĉina Esperanto-Ligo (50), Yu Tao (10), Sun Dachen (7), Niu Xueqin (5), Tan Xiuzhu (5), Wang Ruixiang (5), Chen Ji (5), Jiang Limin (5), Shi Guang (5), Li Baofa (5), Wang Shirong (5), Wang Lihua (5), Liu Zijia (5), Li Jianhua (5)

Japanio

AKADA Joŝihisa (5), DOI Hirokazu (6), HORI Jasuo (10), ISIKAWA Kazuya (5), KIMURA Eizi (5), KITAGAWA Syozi (5), KOBAYASHI Tukasa (62), KONISI gaku (5), KUBA Toshio (5), KUBOTA Kunio (6), KUMAKI Hideo (5), KURITA Kimiaki (5), MORI Singo (5), NAKATU Masanori (7), NANBA Syozi (5), OSIOKA Moritaka (5), SASAKI Yasuko (5), SUGIJAMA Ŝigeki (5), SYOZI Keiko (42, reprezentante Esperantistan Grupon de la bilddokumento, “Hirosima-Nagasaki”), YAMAMOTO Sinterô (5)

Koreio

IM Hanu (5), LEE Hyun-Hee (5), Hirundo (10), LEE Chong-Yeong (5), KWAK Jong-Hun (5), KIM Jae-Won (5), LEE Young-Koo (10), CHO Sung-Ho (5), LEE Jung-Kee (5), LEE Hong-Jin (5), KIM Young Myong (10), KIM Uson (5), YU Young-Ae (5), Hortensio (5), PARK Yong-Sung (10), KANG Hong-Ku (5), PARK Hwa-Jong (5) KEA Kyungpook Filio (5), Korea Esperanto-Asocio (50)

Aliaj

Germanio: Edward SEIBEL (5)

Italio: Luigia Oberrauch MADELLA (5)

Belgio: Joelle Corroy (5)

Usono: Donald J. Harlow (10, por Esperanto-Ligo por Norda Ameriko)

Brazilo: Jader Rodrigues da Silva (6)

图书在版编目 (CIP) 数据

东亚三国的近现代史：世界语/《东亚三国的近现代史》
编写委员会编著. —北京：外文出版社，2007
ISBN 978-7-119-04842-0

I. 东… II. 东… III. ①中国-近代史-世界语②日本-
近代史-世界语③韩国-近代史-世界语 IV. K31

中国版本图书馆CIP数据核字 (2007) 第102270号

责任编辑：牛雪琴 苏漪军
装帧设计：周晓冰
印刷监制：李志存

东亚三国的近现代史

《东亚三国的近现代史》共同编写委员会编著
李士俊等译

*

©外文出版社
外文出版社出版
(中国北京百万庄大街24号)
邮政编码 100037
外文出版社网址：http://www.flp.com.cn
外文出版社电子邮箱：info@flp.com.cn
sales@flp.com.cn

北京科文天和印刷有限公司
中国报道杂志社发行
(中国北京百万庄大街24号)
邮政编码 100037
电子邮箱：libroservodeepec@163.com
elpc@china.com

2007年 (大32开) 第1版
2007年第1版第1次印刷
(世界语)

ISBN 978-7-119-04842-0
01500 (欧洲)

역사
历史
歷史



ISBN 978-7-119-04842-0



9 787119 048420 >

ISBN 978-7-119-04842-0

01500